



# *En Pli Granda Mondo*

De la Spirito Andreo Ludoviko  
Francisco Cândido Xavier

*La Vivo en la Spirita Mondo*



**Francisco Cândido Xavier**  
(Mediumo)

# En pli Granda Mondo

DIKTITA DE LA SPIRITO

**ANDRÉ LUIZ**

(ANDREO LUDOVIKO)



*Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio*  
DEPARTAMENTO EDITORIAL E GRÁFICO  
Rua Souza Valente, 17 – CEP 20941 – 040  
Rio de Janeiro, RJ – *BRAZIL*O

## **1ª eldono en Esperanto**

*5000 ekzempleroj*

Kovrilo de CECCONI

El la portugala lingvo tradukis Esperanten:

CARLOS DE ALMEIDA WUTKE

Laŭ la 5ª eldono

53-AA; 001.5 – O; 10/1977

*Copyright 1976 by*

FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA

*(Brazila Spiritisma Federacio)*

SGAN 603 – Conjunto f– Av. L2 Norte

Brasília – DF – Brasil – CEP 70.830-030

*Kompostado, fotolitografio kaj ofset-presado de*

*Presejo de la Eldona Fako de FEB*

*Rua Souza Valente, 17 – CEP 20941 – 040*

*Rio de Janeiro – RJ – BRAZILIO*

*C.G.C. nº 33.644.857/0002 I.E. nº 097.031.01*

**PRESITA EN BRAZILIO**

***Impreso no Brasil***

## TABELO DE LA ENHAVO

<i>Antaŭparolo</i> .....	11
<i>Sur la evolua vojo</i> .....	13
I. Inter du mondoj .....	17
II. La lekcio de Eŭzebio .....	27
III. La domo de la menso .....	37
IV. Studado de la cerbo .....	47
V. Povo de la amo .....	59
VI. Frateca subteno .....	71
VII. Sava proceso .....	83
VIII. En la sanktejo de la animo .....	93
IX. Mediumeco .....	105
X. Dolora Perdo .....	119
XI. Sekso .....	131
XII. Stranga malsano .....	143
XIII. Ama psikozo .....	153
XIV. Sava rimedo .....	163
XV. Kristana admono .....	169
XVI. Mensmalsanuloj .....	177
XVII. Ĉe la sojlo de la kavernoj .....	185
XVIII. Malnova karulo .....	193
XIX. Realproksimiĝo .....	201
XX. En la Hejmo de Cipriana .....	209

# Antaŭparolo

Atentu kinon, radiofonon, televizion  
kaj aliajn artojn, penante kleriĝi.

Legu tamen spiritisman libron, kiu  
instruas pridistingi.

*Andreo Ludoviko*

EN PLI GRANDA MONDO estas plia libro de la Spirito  
Andreo Ludoviko, medieme ricevita per Francisco Cândido  
Xavier, kaj nun en Esperanta traduko.

En ĝi la leganto trovos mirindajn raportojn pri la laboro,  
kiun en la eksterteraj helpsferoj bonfaraj, saĝaj kaj amaj  
Spiritoj plenumas tute abnegacie, en la nomo de la Universa  
Frateco.

Per rakontoj teksitaj en lingvaĵo simpla, sed kun alta  
morala-filozofia karaktero, tiu libro ankaŭ malkaŝas al ni la  
sciencan flankon de la konceptoj rilate la cerbon, la nervan  
sistemon kaj la menson, rigardataj laŭ la vidpunkto de la  
Spiritoj specialigitaj pri tiu temo, kiuj donas al la leganto  
mirindajn instruojn, helpante lin pli facile kompreni la  
meĥanisman de kelkaj mensmalsanoj ankoraŭ troviĝantaj en  
la sfero de la hipotezoj formulitaj de la nuntempa materialisma  
psikiatrio.

El la ĉiutagaj mensaj konfliktoj plurfoje fontas gravaj  
kaj daŭraj obsedivaj procesoj strikte rezultantaj ne nur el la  
modifo de la elementoj, kiuj konsistigas nian somatan korpon,  
sed ankaŭ el ekstermateriaj faktoroj, kion Spiritismo penas  
klarigi kaj analizi, faciligante pli bonan komprenon pri la  
surtera ekzistado kaj ĝia intima rilato kun la realaĵo de la  
spirita ekzistado, sen kio la ŝanĝiĝo de la homa konduto neniel  
povas esti komprenata en sia tuta pleneco.

Libro renovigas la menson, plilarĝigante aŭ mallarĝigante la horizontojn de la penso.

Estas ja pro tio, ke ia nova libro, kvazaŭ ia gvidanto inter ideoj, venas transdoni al la nuna generacio novajn respondojn al malnovaj demandoj, proponante adekvatajn solvojn al la antikva problemoj pri la homa feliĉo.

La krepusko de la civilizacio cedas lokon al la tagiĝo de nova jarmilo, kaj la surtera vojaĝanto bezonas, multe pli ol antaŭe, vigan klopodon por la vojo irota.

Simile al lumturo en ombra nokto, la spiritisma libro estas espero kaj konsolo, morala averto kaj beletra romano, interesa klarigo pri vivmaniero, karesa admono kaj frata renkontiĝo kun la realo, ĉar ĝi subtenas la noblan homan konduton kaj solvas ĉian moralan problemon.

Dum la nuntempa literaturo ordinare malhumaniĝas kaj vulgariĝas, fariĝante ilo de malnoblaj interesoj, la spiritisma libro, disdonante Amon kaj vastigante Bonecon, donas al la Universala Penso oportunan planiron je libereco por la Eterna Vivo plena de gloro, espero kaj senmorteco, ĉar, transdonante elstaran kulturon, ĝi samtempe kaj trafte instruas pridistingi.

\*

Mi ĝojas, ke la Brazila Spiritisma Federacio de preskaŭ unu jarcento disvastigas, pere de la libro, la plej sublimajn instruojn, celante la homan mensan ekvilibron, kaj en tiu periodo ĝi jam publikigis proksimume tricent verkojn, multaj el ili jam plurfoje reeldonitaj en la portugala lingvo kaj en Esperanto.

Same mi sincere dankas la laŭdindan helpon de la kompetentaj samideanoj Prof. Allan Kardec Afonso Costa kaj D-ro Benedicto Silva, kiuj per erudicia revizio kaj nepre necesaj sugestoj ebligis la definitivan pretigon de la traduko de ĉi tiu eminenta verko.

La Tradukinto

Uberlândia, la 14-an de Julio 1976.

## Sur la evolua vojo

El la kvar anguloj de la Tero ĉiutage milope foriras homaj vojaĝantoj direkte la landon de la Morto. Ili ekiras el kleraj centroj de eŭropa kulturo, el tumultaj usonaj urbegoj, el malnovaj aziaj rondoj, el krudaj afrikaj klimatoj. Ili devenas de la metropoloj, vilaĝoj, kamparoj...

Malmultaj vivadis sur la montoj de sublimeco, ligitaj al la nobligaj devoj. La plimulto konsistas el senspertaj Spiritoj luktantaj por la konkero de titoloj, kiuj altigu ilian personon. Ili ne sukcesis esti kompletaj homoj. Trapasis la “mare magnum” de la homaro ĉe konstanta spertado. Multfoje ili alkonformiĝis al la ĉiaspecaj malvirtoj, restante memvole sur la vojoj de malsaĝo. Sed malgraŭ tio ili preskaŭ ĉiam arogis al si la nemerititan kondiĉon de “elektitoj de la Providenco”; kaj kristaliĝintaj en tia supozo, ili aplikadis la justicon al la proksimulo, ne sciante siajn proprajn mankojn, atendante ian paradizon de graco por si mem kaj ian inferon de senfina turmento por la aliaj. Kiam perdiĝintaj sur la konfuzaj vojoj de la blinda materialismo, ili senprave kredis, ke en la tombo estingiĝus ilia memoro; kaj, kiam aliĝintaj al religiaj skoloj, krom malmulte da esceptoj, ili ventkapaj kaj senpripensaj fidis privilegion, por kies merito ili neniam ion faris.

Kie do gastigi tian strangan kaj senfinan karavanon? Kiel asigni la saman finan stacion al vojaĝantoj kun tiel diversaj kulturoj, situacioj kaj pakaĵo?

Antaŭ la Superega Justeco, madagaskarano kaj anglo ĝuas samajn rajtojn. Sed ili probable diferencas unu de la dua, laŭ individua konduto, ĉe la Dia Leĝo, kiu senerare distingas inter virto kaj malvirto, laboremo kaj mallaboremo, vero kaj hipokriteco, bonvolo kaj indiferenteco. Sed en la kontinua pilgrimado al la tombo partoprenas sanktuloj kaj maliculoj, diligentaj homoj kaj maldiligentaj homoj.

Ĉu estas prave taksu heterogenajn vazojn, kiel samvalorajn? Sed konsiderante nian komunan originon, ĉu ni ne estas infanoj de la sama Patro? Kial likvidi per nenuligebla kondamno la krimintojn, kiam la dia vortaro registras per fajroliteroj la vortojn “regeneriĝo”, “amo” kaj “favorkoreco”? Ĉu la Sinjoro ordonus al la kreitoj la nepran kulturon de espero, se Li mem senesperus? Ĉu Li glorigus la bonvolon de la homoj kaj Li mem restus en la malluma karcereto de neado? Ĉu sovaĝulo, kiu eliminis siajn similulojn per sagoj, ricevis en la mondo la samajn oportunajn okazojn lerni, kiuj feliĉigas la supercivilitan eŭropanon, kiu ekstermas sian similulojn per mitralo? Ĉu ambaŭ estis preparitaj por la definitiva eniro en la paradizon de senfina feliĉo sole nur pro la simbola bapto aŭ danke al la malfrua pento en sia lito de morto?

Logiko kaj komuna saĝo ne ĉiam akordiĝas kun la nesangeblaj teologiaj argumentoj. La vivo neniam interrompas siajn naturajn aktivecojn pro altrudo de dogmoj starigitaj de artifiko. Kaj, se ordinara verko de la homa arto, kies destino estas la ŝima kvieteco de la muzeoj, postulas jarojn da pacienco por esti entreprenata kaj efektivigata, kion diri pri la superbela faro por la perfektigado de animo, kiu estas destinita al nevelkemaj glorioj?

Pluraj samreligianoj miras pri la kunlaboro de Andreo Ludoviko, kiu teksas al ni informojn pri kelkaj aktivecoj en la sferoj plej proksimaj al la ordinaraj mortemuloj.

Iluziitaj antaŭ la teorio pri la malgranda klopodo, ne ekzistanta en la superaj rondoj, ili atendis personan superecon sen ia montro de servado kaj for de inda laboro en ĉielo de kontemplaj ĝuoj, troabunda je dolĉa komforto. Ili en beata stato preferus senzorgecon en galerioj, kie la dia grandeco limiĝus al mirindaj spektakloj, kies surprizajn programerojn ludus superaj Spiritoj aliigitaj en amuzistojn kun brila vesto.

Sed la misio de Andreo Ludoviko estas diskonigi la trezorojn, de kiuj ni estas feliĉaj heredantoj en la Eterneco, la nepereemajn riĉaĵojn, kies posedon ni atingos nur post akiro de Saĝo kaj Amo.

Por tio ni ne funkcias en miraklecaj laborejoj por improvizi-ta feliĉo, kie oni akiras dotojn por malaltaj prezoj kaj ordinarajn flugilojn el vakso. Ni estas progresantaj infanoj de Dio. Ĉu sur la kampo de la densigitaj fortoj, kiaj tiuj de la fizika lukto,



ĉu en sferoj el subtilaj energioj, kiaj tiuj de la supera mondo, la influoj prezidantaj en niaj destinoj estas de evolua kategorio, pura kaj simpla, kun fatala justeco, proksime sekvanta nin, en la glora kaj kompatema heleco de la Dia Amo.

La morto donas al neniuj senpagan pasporton por la ĉiela feliĉo. Ĉiu kreito transpasos tiun doganejon de la eterneco, kun la ekskluziva pakaĵo el tio, kion li estos seminta kaj li lernos, ke ordo kaj hierarkio, paco el edifa laboro estas neŝanĝeblaj karakterizaĵoj de la Leĝo en ĉiu loko.

Neniu post la tombo ĝuos ripozon, kiun li ne rajtas, ĉar “la Regno de la Sinjoro ne venas kun eksteraj aspektoj”<sup>(\*)</sup>.

En la homa provado la kunuloj komprenantaj la subliman ŝtuparon, kies ŝtupojn ili devas supreniri koste de ŝvito, kun profito de la ĉielaj benoj, ĉe la senĉesa praktikado de bono, ne surpriziĝos antaŭ la rakontoj de la sendito interesata servi pro amo. Ili scias, ke ili ricevis la donon je vivo ne por pasigi tempon, la donacon de fido ne por konfuzigi siajn similulojn, absorbite ja en la plenumado de la Diaj Planoj. Sed al kredantoj al protektismo, implikitaj en la reto de malnovaj iluzioj, eĉ kiam ili sin prezentas kun plej respektindaj titoloj, la asertoj de la frateca sendito kaŭzos malkontentecon kaj miregon.

Tamen estas memkompreneble: ĉiu terkulturisto spiras aeron de la kampo, kiun li elektis.

Sed por ĉiuj ni petegas la benon de la Eternulo: por ili kaj por ni.

EMMANUEL

Pedro Leopoldo, la 25-an de Marto 1947.

---

<sup>(\*)</sup> Luko, 17:20. – **La Trad.**

## I

### INTER DU MONDOJ

La lunlumo brilas, kovrante la angulojn de la pejzaĝo per intensa lumo. Mirindaj kumulusoj ueste dissemitaj sur la horizonto similas kastelojn el lakteca ŝaŭmo, perdiĝintajn en la senmezura bluo; limigante sin kun tiu vastaĵo, la surtera scenejo kontrastas kun la dolĉa beleco de la supro, vidigante la vastan ebenaĵon ornamitan per tre mallume verda arbaro. Sude fantaziaj cirusoj pendas sur la Ĉielo super la Tero, simboligante ornamojn el flirtanta gazo; en tiu momento mi rememoris la junularon el la enkarniĝinta Homaro, demandante min mem, ĉu tiuj blankaj lokoj de la firmamento ne estas ĉielaj regionoj, protektantaj la ripozon de la surtera edukejo.

La impona soleco de la plenluno inspiradis al mi kvazaŭan teruron pro la melankolio de sia majesta kaj neesprimebla beleco.

La ideo pri Dio okupis mian penson, inspirante al mi notojn de respekto kaj danko, kiujn mi eĉ ne eldiris. Meze en la nokta domo, mi esprimis kulton de amo al la Eternulo, kiu kreis al ĝi la sublimajn fundamentojn de silento kaj paco por konsolo de la enkarniĝintaj animoj sur la Terkrusto.

La luma lundisko tiamaniere disradiis mirindajn sugestojn. Sub ĝiaj rebriloj komenciĝis la surtera evoluo, kaj multnombraj civilizacioj modifis la marŝon de la homaj spertoj. Tiu sama pendanta lampo heligis la vojon de la primitivaj estuloj, kondukis la paŝojn de la konkerintoj, gvidis iradon de la sanktuloj. Muta atestanto, ĝi observis fondon de luksaj urboj, akompanante iliajn prosperon kaj dekadencan; rigardis la senĉesajn renovigojn de la politika geografio de la mondo; brilis super la kronita frunto de princoj kaj super la bastono de mizeregaj paŝtistoj; ĉiutage ĉeestis de multe da jarmiloj

naskiĝon kaj morton de milionoj da estuloj. Ĝia majesta sereneco respegulis la dian pacon. Ĉi tie malsupre ni, elkarnuloj kaj enkarnuloj, povis fari eksperimentojn, ripari ŝoseojn, enŝuldiĝi aŭ konstrui virtojn, inter espero kaj zorgo, lernante kaj ĉiam relernante; sed la Luno, soleca kaj senmakule blanka, donis al ni ideon pri la neprenebla trankvileco de la Dia Leĝo.

– La regiono de la renkontiĝo estas proksima.

La parolo de la Asistanto Kalderaro interrompis mian meditado. Tiu sciigo igis min senti mian laboron, mian respondecon; sed ĝi super ĉio atentigis min, ke mi ne estas sola.

Ni ambaŭ ne vojaĝadis sen celo.

Baldaŭ ni partoprenos en la laboroj de la Instruanto Eŭzebio, abnegacia predikanto de la kristana amo, servanta kunulojn, kiuj bezonas helpon.

De longe Eŭzebio sin donis al laboro de spirita helpo, kun multe da merito en nia mondo. Li rezignis elstarajn poziciojn kaj prokrastis noblajn realigojn, tute sin donante al bezonantaj lumon. Li administradis prestiĝohavan helpan organizaĵon sur intera regiono, elaŭdante studantojn relative spiritigitajn, ĉar ili ankoraŭ estis jungitaj al la karna rondo, kaj la disĉiplojn ĵus liberiĝintajn de la fizika kampo.

La grandega institucio, ĉe kiu lia direktado estis tre brila, superpleniĝis de animoj, rangantaj inter la malsuperaj kaj superaj sferoj, animoj kun multego da problemoj kaj da ĉiaj demandoj, kaj dezirantaj ricevi de li paciencon kaj saĝon; la senlaca misiulo tamen, malgraŭ la amaso da kompleksaj laboroj, ankoraŭ havis tempon por ĉiusemajne malsupreniri sur la Terkruston, kontentigante tujajn interesojn de lernantoj, kiuj kandidatis al disĉipleco, sen rimedoj por altiĝo renkonte de lia luma parolo, en la supera sidejo.

Mi lin ne konis persone. Sed Kalderaro ricevadis de li instruon laŭ la hierarkia kadro kaj aludis lin kun la entuziasmo de malsuperulo, ligita al sia estro, tenante amon super obeemo.

La Asistanto siavice realigis aktivan laboron sur la Terkrusto mem, rekte helpante enkarniĝintajn fratojn. Li specialigis sin pri la scienco de spirita helpo, pri tiu, kiun inter la studemuloj en la mondo, oni povus nomi “prilumita psikiatrio”, sektoro de laboroj, kiu de longe min altiris.

Disponante unu semajnon sen difinitaj devoj, el inter la komisioj min koncernantaj, mi petis eniron en la grupon de

trejnado, de kiu Kalderaro fariĝis eminenta instruanto, kaj min akceptis li mem kun la ĝentileco karakterizanta la efektivajn misiistojn de la bono, volontante min ameme konduki. Mi troviĝis en okazo favora por miaj decidoj lerni, ĉar la trejngrupo, kiu ricevadis liajn instruojn, ekskursadis sur alia regiono, ĉe edifaj taskoj; tial li povis doni al mi tutan atenton, helpante min pri miaj deziroj.

La aferoj lin koncernantaj – li min ĝentile informis – ne prezentis substancan kontinuecon: ili disvolviĝis; ili estis improvizita verko, ili obeis la neatenditecon de la servodonoj aŭ de la situacioj. Sur aliaj kampoj de agado ia plano kun antaŭvido de kondiĉoj kaj cirkonstancoj fariĝas nepre necesaj. Sed en la kadro de respondecoj, kiuj koncernas lin, la normoj diferencas; estis grave akompani la problemojn, kiel neatenditajn manifestiĝojn de la vivo mem. Pro tiaj neatenditaĵoj li ne faris ĝustadire programojn pri apartaĵoj. Li plenumis siajn devojn, kie, kiel kaj kiam determinis la superaj ordonoj. La fundamenta celo de lia tasko limiĝis al tuja helpo al la malfeliĉuloj, kaj li evitigis al ili kiel eble frenezecon, memmortigon kaj ekstremajn moralajn ruiniĝojn. Pro tio la aktiva misiulo estis devigita profunde koni la ludon de la psikaj fortoj, kun sia pura dediĉo al la bono de la proksimulo. En tiu rilato Kalderaro ne vidigis ian ajn dubon. Lia spontanea bonkoreco estis signo de virto, kaj lia nerompebla sereneco montris lian saĝecon.

Mi ne ĝuis lian ĉeeston de multe da tagoj. En la hieraŭo mi lin brakumis la unuan fojon; sufiĉis minuto da identeco de sentoj, por ke inter ni okazis sana kamaradeco. Kvankam mi rekonis lian sobran parolon, ni tamen de la momento de nia renkontiĝo, interŝanĝis impresojn, kvazaŭ malnovaj amikoj.

Ameme sekvante liajn paŝojn, kun animo edifita en frateco kaj konfido, mi vidis min en malgranda distanco de vasta parko, meze en la surtera naturo.

Ĉirkaŭe fortikaj arboj kun murmuranta foliaro enviciĝis, simile al gardostarantoj intence postenantaj por prizorgi nin pro la servoj.

La vento pasadis mallaŭte kantanta; en la medio prilumita de helaĵoj nevideblaj por la vidkapablo de la homa okulo amasiĝadis kelkaj centoj da estuloj nedaŭre apartigitaj for de la fizika korpo, de la liberiga forto de dormado.

Amikoj el nia sfero sindone akceptis nin, montrante ameman intereson, plezuron servi kaj sanktan paciencon. Mi rimarkis, ke multaj sin tenis starantaj; aliaj tamen komfortiĝis sur teraltaĵoj tapiŝitaj per mola herbo, gravaspekte kaj respekte konversaciantaj.

Preparante min por tiu horo de ekstrema spirita beleco, Kalderaro diris:

– En la hodiaŭa kunveno la instruanto Eŭzebio akceptos el diversaj skoloj lernantojn pri spiritualismo, kiuj kandidatis por la servoj ĉe la fronto.

– Ho! – mi scivole ekkriis – Ĉu ĝi ne estas kunveno el individuoj sendistinge aliĝintaj al la skoloj de fido?

La Asistanto tuj klarigis:

– Tia kunveno ne estas konsilinda, konsidere la specialecon de nia rondo. La Instruanto sin donas al la helpado al la enkarniĝintaj kreitoj kaj aparte al la ĵus liberiĝintaj el la fizika mondo, bezonante pleniĝi la tempon per horoj da prediko, por la maksimuma profito. La diverseco de principoj en centoj da individuoj, ĉiu kun sia vidpunkto, devigus lin fari longajn temodekliniĝojn, kaŭzante malaprobindajn disperdojn de oportunaĵoj.

Li longe fiksas la rigardon sur la amason kaj daŭrigis:

– Ĉi tie troviĝas ĉirkaŭ mil ducent personoj. Okdek procentoj de tiu nombro konsistas el lernantoj en la templo de diversaj branĉoj de spiritualismo, ankoraŭ nekapablaj por la grandaj flugoj en la scio, kvankam ili sin nutras per fervoraj deziroj kunlabori por la Dia Plano. Ili estas kunuloj kun granda potencialo de virto. Ili donas ekzemplon de bonvolo, ekzercas sian internan lumon per laŭdinda klopodo; sed ili ankoraŭ ne kreis kernon de konfido por sia propra uzo. Ili tremas antaŭ la naturaj tempestoj sur la vojo kaj hezitas ĉe la provoj necesaj al riĉiĝo de sia animo, postulante de ni apartan zorgon, ĉar, per siaj atestoj de diligenteco en la spiritiga verko, ili estos la estontaj iloj por la servoj en la fronto. Malgraŭ la heleco de ilia programo, ili ankoraŭ spertas malharmoniojn kaj angorojn, kiuj minacas ilian komencantan ekvilibron. Sed al ili ne mankas la necesa helpo. Institucioj por restarigado de fortoj malfermas al ili invitemajn pordojn sur niaj kampoj de agado. Ilia liberiĝo per dormado estas la tuja rimedo por niaj manifestoj de frata

subteno. Komence ili senkonscie ricevas nian influon; sed poste ili malrapide fortikigas sian menson, registrante nian helpon en sia memoro, prezentante ideojn, proponojn, sugestojn, opiniojn kaj bonfarajn kaj savantajn inspirojn per malklaraj rememoroj.

Li faris mallongan paŭzon kaj konkludis:

– La ceteraj estas kunlaborantoj de nia mondo, en tasko de helpo.

La organizado de la laboroj estis inda je sincera admiro. Ni efektive estis sur surtera kampo. La atmosfero, sorbigita de aromoj, kiujn la vento disportis ĉirkaŭen, memorigis min pri mia hejmo sur la Tero, ĉirkaŭitan de ĝardeno, en varma punkto.

Kion mi estus farinta en la fizika mondo, se mi estus ricevinta en antaŭa tempo tiun benatan okazon de prilumo? Tiu amaso da mortintoj sub la radioj de la Luno ŝajnis al mi kunveno de privilegiitoj favorataj de ĉielaj genioj. Milionoj da viroj kaj virinoj, dormantaj en proksimaj urboj, katenitaj al siaj nunaj interesoj kaj avidantaj interŝanĝojn de plej malnoblaj sentoj, tute neniel suspektos la ekziston de tiu neordinara kolektiĝo da kandidatoj al la interna lumo, vokitaj al intensa preparo por pli longaj kaj efikaj penetroj en pli superan mondon. Ĉu ili havis konscion pri la subluma okazo, ilin plezuriganta? ĉu ili profitos tiun donon, kun sufiĉa kompreno de la eternaj valoroj? ĉu ili iros kuraĝe antaŭen aŭ haltos antaŭ la unuaj malhelpaĵoj, en sia propra priluma klopodo?

Kalderaro rimarkis miajn silentajn demandojn kaj diris plu:

– Nia kolektivo de laboro sin donas precipe al subtenado de ekvilibro. Vi scias, ke la modifon de la mensa sfero de la kreitoj neniam iu altrudas: ĝi estas frukto de tempo, de klopodo, de evoluo; kaj la konstruaĵo de la homa socio, en la nuna tempo de la mondo, jam estas skuata en siaj propraj bazoj, devigante grandegan nombron da personoj al neantaŭviditaj renoviĝoj. Certe vi ne surpriziĝos, se mi diros, ke, antaŭ la disvolviĝo de la moderna inteligento, kiu kaŭzas paralizon de sento, la racio pereas. La materia progreso konfuzas la animon de la sentema homo. De jarcentoj grandaj amasoj restas distancaj de la spirita lumo. La civilizacio tute scienca estas kvazaŭ

formanĝanta Saturno, kaj la nuna homaro estas antaŭ senkompataj postuloj de la rapida mensa kreskado. El tio venas la pligravigo de niaj devoj ĉe la helpa tasko. La bezonoj de preparo de la spirito pliiĝas laŭ miriga ritmo.

En tiu momento ni atingis la pacan amason.

Mia interparolanto ridetis kaj emfazis:

– Hazardo ne kaŭzas miraklojn. Ĉian realigon ni devas plani, komenci, forfini. Ke la fizika homo ŝanĝiĝu en spiritan homon, estas miraklo postulanta fortan kunlaboron de nia flanko.

Li ĵetis sur min signifoplenan rigardon kaj konkludis:

– La sublimaj flugiloj de la eterna animo ne disetendiĝas en la malvasta spaco de kovaparato. Ĝi devas labori, poluri, suferi.

Tiam iu alproksimiĝas, alparolante nin: tio estis ĝentila kamarado, kiu nin informis, ke Eŭzebio penetras la ejon. Efektive sur proksima altaĵo sin montris la misiulo akompanata de ses asistantoj, ĉiuj ĉirkaŭitaj de haloo el intensa lumo.

La abnegacia instruanto ne montris trajtojn de respektinda maljuneco, kiajn ni ĉiuj supozas esti karakterizaĵo de la diaj apostoloj; li sin prezentis al ni, kun la aspekto de la viglaj homoj, en sia plena spirita matureco; liaj nigraj kaj trankvilaj okuloj ŝajnis fontoj de grandega magneta forto. Li rigardadis nin, ridetante, kia ordinara kolego.

Lia ĉeesto tamen trudis al ni respektan silenton. Ĉesis ĉiuj konversacioj, kiuj ĉi tie kaj tie aŭdiĝis, kaj antaŭ la lumaj fadenoj, kiujn la laborantoj ĉirkaŭe teksis, izolante nin de la eventuala sieĝo de la malsuperaj fortoj, nur la milda vento aŭdiĝis sian voĉon, murmurante ion bela kaj mistera ĉe la foliaro.

Ni ĉiuj sidiĝis por aŭdi, dum la Instruanto sin tenis staranta; rigardante lin preskaŭ vidalvide, mi nun povis taksii lian majestatan figuron, kiu inspiris sekurecon kaj belecon. Ĉe lia nekonsternebla vizaĝo bonkoreco kaj kompreno, toleremo kaj dolĉeco disradiis nesupereblan simpation. Lia malstrikta helverda tuniko eljetadis smeraldkolorajn brilojn. Tiu vigla persono inspiradis respektigon kaj kareson, konfidon kaj pacon.

Kvietiginte la medion, li levis la dekstran manon al la Supro kaj preĝis per kortuŝa voĉo:

Sinjoro de la Vivo,  
Benu nian intencon  
Penetri la vojon al la Lumo!...

Ni estas viaj infanoj,  
Ankoraŭ sklavoj en malvastaj sferoj,  
Sed soifo je Senfino  
Disŝiras niajn homajn vualojn.

Heredantoj de senmorteco  
Ni iras al viaj eternaj fontoj,  
Esperante kun fido, je via favorkoreco.

Per ni mem, Sinjoro, ni nenion povas.  
Sen Vi, ni estus detranĉitaj frondoj,  
Kiujn la fajro de provo  
Torturus kaj transformus...

Sed unuigitaj al via Amo,  
Ni estas gloraj daŭrigantoj  
De via Senfina Kreado.

Ni estas kelkaj miloj  
Sur ĉi tiu surtera kampo;  
Kaj super ĉio  
Ni laŭdas vian grandecon,  
Kiu ne subpremas nian malgrandecon...

Pliigu nian scion antaŭ la vivo,  
Malfermu niajn okulojn  
Nebuligitajn de la dormo de iluzio,  
Ke ni vidu vian gloron sen fino!...  
Dolĉe vigligu nian aŭdadon,  
Ke ni ĝuu la himnon  
De via sublima eterneco.  
Benu la semojn de saĝeco,  
Kiujn viaj senditoj dissemis  
Sur la kampon de niaj animoj;  
Faru fekunda nian internan grundon,  
Ke la diaj ĝermoj ne pereu.



Ni scias, Patro,  
 Ke ŝvito pro laboro  
 Kaj la savanta larmo  
 Estas plej riĉa sterko  
 Por florado de niaj semejoj;  
 Tamen  
 Sen via beno,  
 Ŝvito forviŝiĝas  
 Kaj larmo malesperas...  
 Sen via kompatema mano  
 La vermoj de la pasioj  
 Kaj la tempestoj de niaj malvirtoj  
 Povas ruiniĝi nian komenciĝantan semejon...

Veku nin, Sinjoro de la Vivo,  
 Por la lumo de la nuna okazo;  
 Fortikigu niajn manojn,  
 Ke la frotoj de la lukto ne ilin senutiligu;  
 Gvidu niajn piedojn al la superega bono;  
 Envolu nian koron  
 En vian patran serenecon,  
 Fortikigante nian rezistemon!  
 Ĉiopova Sinjoro,  
 Helpu nin en nia malforteco,  
 Korektu niajn erarojn,  
 Prilumu nian nescion,  
 Akceptu nin en vian sinon.

Plenumiĝu, Patro Amata,  
 Viaj suverenaj voloĵ,  
 Nun kaj ĉiam.  
 Tiel estu.

Fininte la kortuŝan preĝon, la Instruanto mallevis la okulojn nebuligitajn de larmoj, kaj mi tiam vidis, ekposedite de ĝojego, ke de nesondebla alto faladis sur nin ia stranga heleco, laŭ kristalklaraj ŝprucoj.

Eretoj, similtantaj eteriĝintan arĝenton, faladis sur nian medion, filtriĝante en la radikojn de la plej proksimaj arboj, tie ekstere.

Stranga raviteco ekposedis mian animon. Ĉe la kontakto kun la diaj fluidaĵoj, mi rimarkis, ke miaj fortoj grade sereniĝis laŭ mirinda akceptebleco. Ĉirkaŭe ŝvebis la samaj notoj de ĝojo kaj beleco, ĉar trankvilo kaj feliĉo travidiĝis tra ĉiuj ekstazantaj vizaĝoj, turnitaj al la Instruanto, ĉirkaŭ kiu pli intensaj estis la ondoj de ĉiela lumo.

Sublima feliĉo inundis mian tutan eston, dronigis min en nepriskribeblan banon de renovigaj energioj.

Miaj okuloj estis senpovaj por reteni la larmojn de feliĉo, kiujn la belegaj rebriloj gutigis el la kaŝitajn fontoj de mia spirito. Kaj antaŭ ol la nobla mentoro reprenis la parolon, mi silente dankis la respondon de la ĉielo, rekonante en la preĝo ankoraŭfoje ne nur la manifestadon de religia respekto, sed ankaŭ rimedon por eniro en la neelĉerpeblajn fortojn de la Dia Povo.

## II

### LA LEKCIO DE EŬZEBIO

Rekte staranta, kun torako prilumita de milda lumo, la Instruanto parolis per kortuŝanta tono:

– Ni plezure turnas nin al vi, fratoj, kiuj ankoraŭ havas la okazon lerni en la benata karna lernejo.

“Tuŝitaj de bezono, soifantaj sciaron aŭ ĉe la zorgo de la amo, kiu transpasas abismojn, vi venkis pezajn vibrajn barojn kaj troviĝas ĉe la deirpunkto de la nova vojo, kiu sin prezentas al vi. Dum via fiziologia organismo ripozas aparte, lertiĝante por la morto, viaj preskaŭ liberiĝintaj animoj dividas kun ni fratecon kaj esperon, ekzercante kapablojn kaj sentojn por la vera vivo.

Pro nesufiĉa kapableco de via cerbo, ne povanta elteni samtempe la pezon de du vivoj, vi kompreneble ne povos konservi plenan rememoron pri ĉi tiu horo, post kiam vi reprenos vian karnan envolvajon; la rememoro tamen restos plu en la fundo de via memo, gvidante viajn superajn inklinojn direkte al la kampo de altiĝo kaj malfermante vian intuician pardonon, por ke nia frateca penso helpu vin”.

La predikanto faris mallongan paŭzon, fiksante sur ni sian trankvilan kaj brilan rigardon, kaj sub delikata kaj senĉesa pluvo de arĝentaj radioj, daŭrigis:

– “Teditaj de sinsekvaj sensacoj en la kruda sfero de la surtera ekzistado, vi provas koni aliajn regionojn. Vi serĉas novaĵojn, nekonatan komforton, solvon de torturantaj enigmoj; sed ne forgesu, ke la flamo de via propra koro ŝanĝita en sanktejon de dia heleco, estas la sola lampo kapabla klarigi al vi la spiritan misteron, dum nia irado sur la savanta kaj evolua vojo. Ĉe ĉiu viro kaj virino, en la mondo, la Volo de Dio

restas viva, rilate la devojn, nepre plenumotajn de vi. Ĉiu havas antaŭ si la laboron, kiun li devas fari, same kiel ĉiu tago kunportas specialajn eblojn realigi bonon. La Universo harmonias kun la absoluta ordo. Liberaj birdoj en limigitaj ĉieloj, ni intervenas en la dian planon, kreante al ni katenojn kaj ligilojn, liberecon kaj riĉecon. Urĝas do, ke ni adaptiĝu al la dia ekvilibro, plenumante la apartan funkcion, kiu nin koncernas meze en la abelujo de la vivo.

De kiam ni faras kaj malfaras, finas kaj rekomencas, entreprenas la rebonigan vojaĝon kaj revenas perpleksaj por denove rekomenci? Sur la scenejo de la Planedokrusto ni estas la samaj aktoroj de la dramo de la evoluo. Ĉiu jarmilo estas mallonga akto, ĉiu jarcento rapida scenaro. Utiligante sanktajn korpojn, ni tamen, simile al senzorgaj infanoj, okupiĝintaj nur pri infanaj ludoj, perdas la sanktigan okazon de la ekzistado; tiamaniere ni fariĝas kondamnitoj de la suverenaj leĝoj, kiuj katenas nin al restaĵoj de la morto, kvazaŭ iajn piratajn ŝiprompiĝulojn por longa tempo neindajn reveni al la laboroj sur la maro. Dum milionoj da animoj ĝuas bonajn okazojn por korektiĝo kaj reĝustiĝo, ree sin donante al la regenera klopodo en la surteraj urboj, milionoj da aliaj priploras sian propran malvenkon, perdiĝintaj en la malluma izolejo de disreviĝo kaj doloro.

Ni ne parolas ĉi tie pri la heroaj misiistoj, kiuj, pro sia rezignacio kaj amo, solidareco kaj sinofero, elportas la sangajn vundojn kaŭzitaĵojn de iliaj doloraj atestoj; ili estas lumoj provizore apartigitaj de la Dia Lumo, kiuj revenas al la ĉiela loĝejo, kiel la fidela laboristo, post kiam li finas sian ĉiutagan taskon.

Ni aludas al la nombraj amasoj da animoj katenitaj al nedankemo kaj dubo, al malforteco kaj disperdiĝo, animoj dotitaj per la lumo de racio, sed sklavigitaj al la tiraneco de la instinkto.”

Kaj montrante kristanan humilecon, Eŭzebio daŭrigis:

– “Ni parolas pri ni ĉiuj, vojaĝantoj forvagantaj sur la dezerto de nia propra neado; pri ni, birdoj kun rompigitaj flugiloj, provantaj flugi al la nesto de libereco kaj paco, kaj kiuj baraktas en la ŝlimejo de tre malsuperaj plezuroj. Kial ni ne baru la fluon de la detruantaj pasioj, kiuj vipas al ni la spiriton? kial ni ne bridu la bestecan impeton, en kiu ni

plezuras, ekde la unuaj signoj de prudento? Ĉiam la terura dualismo el lumo kaj mallumo, el kompatato kaj malico, el intelekto kaj besteca impulso. Ni studas la scienccon de la konsolanta spiritaro, ekde la komenciĝanta racio, kaj tamen de la plej foraj tempoj ni nin donas al fieco kaj murdado.

Ni kantadis laŭdajn himnojn, kun Kriŝno, lernante la instruon pri la anima senmorteco, en la ombro de la altaj arboj, strebantaj al la supro de Himalajo, kaj tuj poste ni malsupreniris al la valo de Gango, murdante kaj detruante por plezuri kaj posedi. Ni lernis la universan amon, kun Sidharto Gotamo, kaj persekutis niajn similulojn, aliancante al la cejlonaj kaj hindaj militistoj. Ni estis heredantoj de la Saĝeco, en la foraj temploj de la Sfinkso, kaj tamen de la respekto al la misteroj de inicado ni iris ĝis la sangosoifanta malamikeco ĉe la bordoj de Nilo. Akompanante la simbolan keston de la hebreoj, ni ofte legis la ordonojn de Javeo en la sanktaj rulaĵoj, kaj ni senatentaj ilin forgesadis ĉe la unua klarionsono de milito kontraŭ la filiŝtoj. Ni ploradis pro religia emocio en Ateno kaj murdis samlandanojn en Sparto. Ni admiris Pitagoron, la filozofon, kaj sekvis Aleksandron, la konkerinton. En Romo ni portis altvalorajn oferojn al la dioj, en la mirindaj sanktejoj, altigante la virton, por eltiri armilojn post kelkaj minutoj, en la atrio de la temploj, dissemante morton kaj surtronigante krimon; ni skribis belajn sentencojn pri respekto al la vivo, kun Marko-Aŭrelia, kaj ordonis murdadon de personoj sen kulpoj kaj utilaj al la socio. Kun Jesuo, la Dia Krucumito, nia konduto ne estis malsama ĝis hodiaŭ. Sur la kadavrojn de martiroj, buĉitaj en cirkoj, ni verŝis riverojn da sango por kruela venĝo, starigante ŝtiparojn pro religia sektismo. Ni elportis arbitrajn kaj malnoblajn administrantojn, de Nerono ĝis Deokleciano, ĉar ni havis soifon je povo, kaj kiam Konstanteno malfermis la pordojn al la politika superregado, ni ŝanĝis nin, ŝajne fidelajn servantojn de Evangelio, en krimajn arbitraciantojn de la mondo. Iom pos iom ni forgesis la blindulojn el Jeriĥo, la paralizulojn el Jerusalemo, la infanojn ĉe Tiberiado, la fiŝkaptistojn el Kapernaumo, por karesi la kronitajn fruntojn de la triumfintoj, kvankam ni sciis, ke la venkintoj sur la Tero ne povas eviti sian pilgrimon al la tombo. La ideo pri la Dia Regno fariĝis fantazio de naivuloj, ĉar ni ne foriĝis de la dekstra flanko de la princoj, soifante la

monduman superregon. Ankoraŭ hodiaŭ, post kiam forpasis preskaŭ dudek jarcentoj super la kruco de la Savinto, ni benas bajonetojn kaj kanonojn, mitralojn kaj tankojn en la nomo de la Plejnobla Patro, kiu briligas la sunon de favorkoreco sur la justajn kaj maljustajn.

Jen kial niaj provizejoj de lumo restas malplenaj. La uragano de la homaj kaj popolaj mortigaj pasioj pasas ululantaj, de poluso al poluso, semante malbonajn aŭgurojn.

Ĝis kiam ni estos detruaj kaj malicaj genioj? Anstataŭ lojalaj servantoj de la Sinjoro de la Vivo, ni ĝis hodiaŭ estas soldatoj de la armeo de iluzio, postlasante en nia pasinteco milionojn da tomboj, malfermitaj sub inundoj de cindro kaj fumo. Vane la Kristo admonis nin serĉadi la manifestiĝojn de la Patro en nia propra interno. Ni nutras kaj semas nur egoismon kaj ambicion, vantecon kaj fantazion sur la la Terkrusto. Ni prenas sur nin pezajn ŝuldojn kaj sklavigas nin al la doloraj rezultatoj de niaj faroj, restante plu ĉe la rikolto de dornoj.

Tiel estis, ke ni atingis la modernan tempon, kiam frenezeco ĝeneraligis kaj la mensa harmonio de la homo estas tuj drononta. Kun evoluinta cerbo kaj nematura koro, nun ni plej zorge poluras nian arton detruigi la spiritan progreson.”

La noblega instruanto faris en sia parolado pli longan paŭzon, dum kiu mi observis la ĉirkaŭantaj kunulojn. Viroj kaj virinoj, el kiuj iuj forte prenis al si reciproke la manojn, montris ekstreman palecon sur la miranta vizaĝo. Iuj el ili certe tien venis la unuan fojon, kiel mi, kio evidentiĝis el la ekstaza mirego, stampita sur ilia vizaĝo.

Fiksante sur la ĉeestantaro penetrantan rigardon, la Instruanto daŭrigis:

– “En la pasintaj jarcentoj la urboj florantaj en la mondo malaperis masakritaj per la glavo de la kruelaj konkerintoj aŭ stagnis sub ondo de mortiga pesto, nekonata kaj ne atakata. Hodiaŭ homaj kolektivoj ankoraŭ suferas la atakon de la hommortiga spado, kaj pluvo da bomboj ĵetiĝas kontraŭ sendefendajn popolojn; sed la flava febro, holero kaj variolo jam estas kuraceblaj; lepro, tuberkulozo kaj kancero ricevas konstantajn atakojn. Ekzistas tamen la nova minaco por la tera loĝejo: la profunda malekvilibro, la ĝenerala malharmonio, la malsanoj de la animo, subfosante vian stabilecon.

Viaj vojoj laŭŝajne ne estas irataj de konsciaj estaĵoj, sed similas strangajn mallarĝajn irejojn, sur kies longo piedbatas haluciantaj koboldoj. Kiel frukto de ombraj epokoj, karakterizitaj de reciprokaj subpremo kaj malico, en kiuj ni ĝis hodiaŭ vivas, ni vidas la Teron ŝanĝita en kampon por preskaŭ senfinaj malamikaĵoj. Homoj kaj nacioj postkuras la miton de facila oro; sentemaj kreitoj sin donas al la turmentoj de pasioj; fortikaj cerboj perdas la internan vidon, blindigitaj de personaj trompoj kaj aŭtoritateco. Sindoninte al senfinaj disputoj, ĉe timigaj dueloj de opinio, kondukate de frenezecaj malsuperaj ambicioj, la teranoj venas al la randon de alia abismo, kiun ilia konfuzitaj okuloj ne vidas. Tiu oscedanta profundegaĵo, miaj fratoj, estas ja tiu, de la menskonfuziteco kiu ne nur disruiniĝas la ĉelajn konstruaĵojn de la fizika vivo, sed ankaŭ atingas la subtilan histon de nia animo, invadante la kernon de nia perispirita korpo. Preskaŭ ĉiuj kadroj de la moderna civilizacio estas kompromititaj ĉe sia fundamenta strukturo. Ni do devas mobilizi ĉiujn fortojn laŭ nia povo por servi al la homara bono, kiu estas nia propra bono.

La savanta laboro ne estas ekskluzivaĵo de religio: ĝi estas ĉies laboro, ĉar venos tempo, kiam la homo devos rekonigi ĉie la Dian Ĉeeston. La realigo nin koncernanta ne estas privata afero: ĝi estas verko de la tuta kolektivo, klopodo de la honesta kaj sincera servanto, interesiĝanta pri ĉies bono.

Se vi nin vizitas, serĉante orientadon por la subluma laboro de la spirito, ne forgesu vian propran lumon. Ne kalkulu je aliulaj torĉoj por la irado. Sur mizeraj regionoj de regenera sufero, proksimaj al la karno, amare ploras milionoj da viroj kaj virinoj, kiuj misuzis la helpon de la bonuloj, sin ĵetante en mallumon, kiam ili perdis en la tombo siajn nedaŭrajn okulojn, per kiuj ili admiris la pejzaĝon de la vivo, en la lumo de la Suno. Senzorgaj kaj obstinaj ili evitis ĉiujn ŝancojn lumigi sian propran lampon. Ili abomenis la malglataĵojn de la lukto, ili elektis la karnan ĝuon, kiel superegan celon de siaj intencoj sur la Tero; kaj, kiam la morto fermis iliajn satigitajn palpebrojn, ili tiam ekkonis nokton pli longan kaj pli malluman, plenan de ĉagrenoj kaj teruroj.”

En tiu momento, montrante ion nedifinitan ĉe sia rigardo, Eŭzebio silentis dum pli ol minuto, kvazaŭ rememorante kortsajajn scenojn, kiujn elvokis la bildoj de lia parolo.

Mi rimarkis la senpaciencon, kun kiu la ĉeestantaro atendadis la daŭrigon de lia parolo. Sinjoroj kortuŝitaj travidigis fortan impreson tra siaj transfiguritaj mienoj, kaj ni ĉiuj, antaŭ lia lojala kaj emocia elvolvado, tenis nin kvietaj kaj ravitaj.

Post longaj sekundoj la parolanto daŭrigis per energia kaj patriarkeca tono:

– “Vi serĉas ĉe ni la ĝustan instruon por la laboroj nun koncernantaj vin sur la Terkrusto. Altirite de la heleco de la Supera Sfero, ravite de la unuaj konoj pri la universa amo, vi deziras favoron de kunhelpo en la semejo de la estonteco. Vi petas flugilojn por altaj flugoj, celu do kunhelpi ĉe la klopodo de altiĝo.

Sendube via intenco ne povas esti pli nobla; sed estas nepre necese konsideri la bezonon plenumi vian ĉiutagan devon. Neeble progresi en la jarcento, ne plenumante la devojn de ĉiu horo. Estas nepre necese en la nuna tempo restarigi energiojn, reĝustigi aspirojn kaj sanktigi dezirojn.

Ne sufiĉas kredi je la senmorteco de la animo. Neprokrastebla estas la prilumo de ni mem, por ke ni fariĝu plejintensa heleco. Por la kuraĝa entrepreno de saviĝo ne sufiĉas la simpla ekscio pri la postvivado de la animo kaj pri la interrilatoj inter la du mondoj. Frivoluloj kaj maliculoj, nesciantoj kaj stultuloj ankaŭ povas korespondi inter si, de malproksime, de lando al lando. Antaŭ ĉio, gravas altiĝi la koron, rompi la miregojn, kiuj enfermas nin en ombro, forgesi posediluziojn, disŝiri la dikajn vualojn de vaneco, eviti la mortigan likvoron de la malnobliga sinmontrado, por ke la heloj sur la monto rebrilu en la fundo de la valoj, por ke la eterna suno de Dio disbatu la pasemajn homajn mallumojn.

Pioniroj de la vivanta fido, ĉar tio vi de nun deziras esti, malgraŭ la malhelpaĵoj frontantaj kontraŭ ni, oni postulas de vi plenan elmontron, ke vi estas certaj pri la dia spirita mondo.

La Supera Mondo ne interesiĝas pri piuloj avidantaj feliĉegan paradizon. Ĉu vi eble konsentus restadi sur la Plandedokrusto, ne havante specialajn celojn? Se la mola herbo devas produkti laŭ superaj celoj, kion ni diru pri la mirinda inteligento de enkarniĝinto? Kion do ni atendu de la racio prilumita de la fido? Ĉu ni ja ricevus tiel sanktan provizon de edifa scio, por sinofero por nenio? Ĉu ni ricevus la roson de



tiaj benoj por fortigi la egoisman intencon atingi la ĉielon sen preparaj stadioj, sen purigaj laboroj?

Nia celo, miaj amikoj, ne alkonformiĝas al la memadora ekskluzivismo. La Dia Pordo ne malfermiĝas al spiritoj, kiuj ne nobliĝis per la senĉesa laboro de kunhelpado al la Plejalta Patro. Kaj la grundo de la Planedo, al kiu vi provizore ligiĝis, estas la benata kunlaborejo, kiun la Sinjoro konfidis al vi. Gardu la ĉielan roson en la vazo de via koro, soifanta pacon; rigardu la stelojn, sin montrantaj de malproksime, kiel superbelajn verkojn de Dio; sed ne forgesu la kampon de la nunaj luktoj.

En la modernaj tempoj, la spiritualismo ne povas enfermi Dion inter kvar muroj de ia surtera templo, ĉar nia esenca misio estas aliigi la tutan Teron en la sanktan templon de Dio.

Por nia avangardo el decidaj kaj bravaj laborantoj forpasis la fazo de frivola eksperimentado, de senordaj esploroj, de supraĵaj rezonoj. Ni travivas la strukturadon de novaj sentoj, konstruante la kolonojn de la venonta mondo, kun lumanta lampo en nia interna kampo. Estas memkompreneble, ke la ĵusvenintaj lernantoj eksperimentu, ekzameni, sondu, elvoku brilajn teoriojn, kie la hipotezoj intermiksiĝas kun elmonro de memamo: kompreneble kaj pravigeble. Ĉiu lernejo havas plurajn kursojn, kiuj firmigas al ĝi la fakojn kaj lernobjektojn. Sed ĉi tie ni ne turnas nin al tiuj, kiuj ankoraŭ revas enfermitaj en sia “memo”, implikitaj en la retoj el mil obstakloj de sia fantazio, kristaligantaj ties impresojn. Ni parolas al vi aliaj, kiuj strebas al universalismo, sennomaj kunuloj de la homaro, penanta malmergiĝi el mallumo en lumon. Kiel vi akceptas stagnon, kiel principon, kaj ekskluzivisman feliĉon, kiel celon?

Ni nutru renovigan esperon. Ne elvoju Jesuon por pravigi dezirojn je neinda ripozo. Li ne atingis la kulminon de Reviviĝo, antaŭ ol supreniri sur Kalvarion, kaj liaj lecionoj rilatas al la fido, kiu formovas montojn. (\*)

Ni do ne postulu eniron en feliĉajn mondojn, antaŭ ol plibonigi nian propran mondon. Forgesu la malnovan eraron, ke la korpa morto estas mirakla mergiĝo de la animo en sorĉan

---

(\*) Jesuo ( Marko, 11:23 ). – **La Trad.**

riveron. Ni kultu la ĉiaman vivon, la perfektan justecon, kaj ni obeu la leĝon, kiu taksos ĉiam nian meriton, laŭ niaj propraj verkoj.

Nia tasko estas la klariga kaj la eterna servado.

La Universa Regado ne limigis niajn aktivecojn al gardo de pasemaj altaroj. Ni estas vokitaj ne por protekti apartan rondon de ekskluzivema interpreto, sed por kunlabori por liberigo de la enkarniĝinta spirito, malfermante pli helajn horizontojn al la homa racio, referante la konstruaĵon de la savanta fido, kiun la laŭliteraj religioj forgesis.

Fortegaj blovoj de la evolua ondo balaas la surterajn mediojn. Ĉiutage disfalas konvenciaj principoj konsiderataj kiel netuŝeblaj dum jarcentoj. La homa menso, perpleksa, estas pelita al afliktaj transiĝoj. Inversigo de valoroj, socia provo, rapida procedo de selektado por kolektiva sufero konfuzas timemajn kaj malviglajn, kiuj formas ĉie absolutan plimulton... Kiel vi helpus tiujn milionojn da spiritaĵoj bezonantaj, se vi ne akceptus la respondecon de frata prizorgo? Kiel vi kuracus komenciĝantan frenezecon, se vi ne aliĝus en magneton, kiu tenas ekvilibron? Ni scias, ke la interna harmonio ne estas varo por oferto kaj mendo sur la surteraj merkatoj, sed spirita akiro nur ebla en la templo de la Spirito.

Necese do, ke ni stimulu la koron por la frata amo, ĉe la servado. Por niaj realigoj ne sufiĉas atendanta kredo; nepre necesa estas la amo, kiu konfidas kaj plenumas, transformas kaj altigas, kvazaŭ aŭtentika vazo da Dia Saĝo.

Ni prefere estu instrumentoj de bono ol atendantoj de favoro. La tasko postulas kuraĝon kaj superegan sindediĉon al Dio. Se ni ne fariĝos lumo en la rondo, kie ni estos, ni vane disbatos mallumon ĉe niaj propraj piedoj. Kaj, dum la agado nin koncernanta, ni ne forgesu, ke evangelizo de rilatoj inter la videbla kaj nevidebla mondoj estas devo tiel natura kaj neprokastebla, kiel la evangelizo de homoj.

Ne serĉu ion miraklecan: soifo je miraklo povas malvirtigi kaj pereigi vin.

Ligiĝu per preĝo kaj konstrua laboro al la superaj mondoj, kaj ĉi tiuj rilatigos vin kun la Diaj Provizejoj, kiuj donas al ĉiu el ni laŭ niaj ĝustaj bezonoj.

La disponoj jungantaj vin sur la tera scenejo, kiel eble plej krudaj kaj malagrablaj fontas el la Superega Volo.

Ne transsaltu malhelpaĵojn nek provu ĉirkaŭiri ilin pro antaŭdecidita evito: venku ilin, uzante volon kaj persistadon, kiuj donas al vi okazon pliigi viajn proprajn valorojn.

Ne iru sen la necesa prudento la vojon de la karno, sur kiuj vi multfoje imitas la malkvietan papilion. Plenumu la ĉiutagajn postulojn kaj ĝojegu, ke vi realigas viajn plej malgrandajn taskojn.

Ne lerninte marŝon, ne provu flugon.

Super ĉio ne demandu pri la probablaj rajtoj, kiuj estus al vi juĝitaj ĉe la dia bankedo, antaŭ plenumo de viaj homaj kompromisoj.

Neebla estas al vi la titolo anĝelo, antaŭ ol vi estu prudentaj homoj.

Suverenaj kaj nepereemaj leĝoj prezidas en niaj destinoj. Ni estas konataj kaj ekzamenataj ĉie.

La facilajojn donatajn al la sanktigitaj spiritoj, kiujn ni admiras, Dio ĉie malavaras al ni. Ilia profitado do estas afero nia. La surteraj maŝinoj povas levi vian fizikan korpon ĝis granda alteco, sed la spiritan flugon, per kiu vi liberiĝas de besteco, vi neniam entreprenos sen propraj flugiloj.

La konsolado kaj amikeco de la en- kaj elkarniĝintaj bonfarantoj riĉigos vin per trankvileco, kvazaŭ mildaj kaj benataj floroj de la animo; ili tamen velkos, kiel la unutagaj rozoj, se vi ne preparos la grundon de via koro per fido kaj kompreno, per nerompebla espero kaj senmorta amo, bonegaj sterkoj, kiuj favoras ilian disvolviĝon sur la kampo de via senĉesa klopodo.

Ne avidu ripozon al viaj manoj kaj piedoj; antaŭ ol nutritian intencon, pensu realigi vian internan pacon per la superega trankvileco de via konscienco.

Forlasu iluzion, antaŭ ol iluzio vin forlasu.

Dum vi estras vian propran ekzistadon, plantu bonon ĉe la spuro de viaj paŝoj.

Nur tiuj servantoj, kiuj laboras, starigas en la tempo la markojn de evoluo; nur tiuj, kiuj sin banas per la ŝvito de respondeco sukcesas estigi novajn formojn de vivo kaj renoviga idealo. La ceteraj, sindonintaj al senfareco, kvankam ili nomu sin monarĥoj aŭ princoj, ministroj aŭ leĝofarantoj, sacerdotoj aŭ generaloj, ili tamen estas klasifikitaj en la grupon da parazitaj sur la Tero; ili eĉ ne signas sian nedaŭran restadon

sur la Terkrusto; ili flugetas, kiel diverskoloraj insektoj, revenante al la polvo, de kiu ili sin levis dum kelke da minutoj.

Revenonte en vian karnan korpon, tiam helpu vin per la lumo por la necesaj edifoj.

Ni partoprenu en la glora Spirito de la Kristo.

Ni aliiĝu en savantan lumon.

La ĝenerala kaj kreskanta perturbo invadas la departamentojn de la homa menso. Furioze interbatalas nacioj kaj ideologioj, sistemoj kaj principoj. Post halto de la internaciaj bataloj ekestas la bedaŭrindaj civilaj militoj, armante fratojn kontraŭ fratoj. Maldisciplino instigas strikon, soifo je libereco konfuzas la domon de la popoloj. Sferoj de agado militas unu kontraŭ alia; enkarniĝintoj kaj elkarniĝintoj kun malsuperaj inklinoj kruele kolizias pomilione. Sennombraj hejmoj aliiĝas en mediojn de nekonformiĝo kaj malharmonio. La homo duelas kontraŭ si mem en la nuna proceso de rapida transiĝo.

Ekvilibro do en la necesa edifado, konvinkitaj, ke estas neeble konfuzi la Leĝon aŭ perfidi ĝiajn universajn artikolojn!”

Fininte Eŭzebio eldiris belan kaj emocian preĝon, petante la diajn benojn por la ĉeestantaro. Superbelaj manifestiĝoj de lumo tiam vidiĝis super ni.

Post la laboroj, la kunuloj ankoraŭ ligitaj al la karna rondo komencis foriri en respektoplena silento.

Kalderaro kondukis min al la Instruanto kaj min prezentis. La altranga direktanto afable akceptis min, kun abundo da stimulaĵoj. Ni devas servi, li klarigis, reliefigante la ĉie amasigitajn bezonojn de spirita helpo, kiu postulas abnegaciajn kaj fidelajn kunlaborantojn.

Kiam Kalderaro aludis al miaj planoj, Eŭzebio montris al mi patran rideton kaj, informante min pri la pluraj farotaj paŝoj, li rekomendis al ni ekirilati kun la helpa grupo, al kiu la Asistanto donadis aktivan kunlaboradon.

Tuj poste, forirante akompanata de la asesoroj, kiuj kompletigis lian karavanon, la nobla mentoro bonkore konsolis min:

– Estu feliĉa!

Direktante al Kalderaro espriman rigardon, li aldonis:

– En oportuna okazo, konduku lin al la helpa servado ĉe la kavernoj.

Posedite de scivolo, mi emocie dankis kaj ekatendis.

### III

#### LA DOMO DE LA MENSO

Ree akompanante Kalderaron en la hela mateno, mi estis absorbita de la intenco riĉigi min per konoj rilataj al la manifestado de la vivo proksima al la fizika sfero.

Enlasite en la spiritan kolonion, kiu kun ekstrema amemo min akceptis, mi intime konis kelkajn instruantojn kaj fidelajn bonfarantojn.

Vere ni ĉiuj vivis en intensa laboro, kun malmulte da horoj por distraj ekskursoj; krome, ni ĝuis feliĉan, gajan medion, favorantan al ni la evoluan marŝon. Niaj temploj estis per si mem benataj nukleoj de konsolo kaj revigligo. En niaj kulturaj kaj artismaj societoj ni trovis daŭrigon de la surtera ekzistado, sed riĉigita per multoblaj edukaj elementoj. Sur la socia kampo svarmis mirindaj okazoj por akiro de netakseblaj korinklinoj. La domoj, en kiuj ni plenumis la daŭran servon, staris inter ĉarmaj ĝardenoj, simile al varmetaj kaj feliĉaj nestoj sur parfumaj kaj kvietaj foliaroj.

Ne mankis al ni ordonoj kaj devoj, ordo kaj disciplino; sed sereneco estis nia klimato, kaj paco nia ĉiutaga dono.

La morto ĵetis nin al atmosfero nekonata, stranga por la fizika lukto. Nia unua sento estis ŝoko. Neatendaĵo altiris nian atenton. Ni vivis plu, nur sen la fiziologia maŝino, sed la novaj kondiĉoj de ekzistado ne signifis mankon de evoluokazo. La motivoj de bonefika konkuro, la eblaĵoj de spirita kresko estis senfinaj. Ni povis helpi nin per la superaj fortoj, teni edifajn interrilatojn, teksti esperojn kaj amrevojn, plani pli altajn spertojn sur la reenkariga kampo, plibonigante nin ĉe laboro kaj studo kaj pliigante nian servokapablon.

Resume nia traĵiro tra la tombo kondukis nin al pli bona vivo; sed... kion ni diru pri tiuj milionoj da homoj, kiuj transpasis la mallarĝan sojlon de la morto, restante plu alkroĉitaj al la Terkrusto?

Tiaj nekalkuleblaj amasoj sin tenis en la rudimenta stadio de kono; ili nur posedis kelke da primaraj informoj pri la vivo; ili petegis subtenon de la Superaj Spiritoj, kiel la primitivaj triboj petas helpon de la civilizitaj homoj; ili devis disvolvi kapablojn, kiel la infanoj devas kreski; ili restis ligitaj, katenitaj al la karna sfero ne pro malico, sed longe restis, hezitantaj sur la Tero, kiel la etaj idoj de homoj sin premantaj al la patrina brusto; el sia ekzistado ili nur rememoris siajn sentojn, postulante preskaŭ tujan reenkarneigon, kiam ne estis ebla al ili eniro en niajn edukejojn de komenca servado kaj lernado. Aliflanke efektivaj falangoj da krimuloj kaj deviintoj tumultis ne malproksime de ni, post kiam ili transiris la tombolimojn; iafoje ili pasigis multe da jaroj inter ribelo kaj malespero, kvazaŭ timegigaj genioj de ombro, kiel okazas, en la surteraj rondoj, al la obstinaj krimuloj apartigitaj de la sana societo; sed ili ĉiam finis sian frenezan kuron ĉe la mallumaj anguloj de konsciencoriproĉo kaj sufero, fine pentante pri siaj malicaĵoj. Pento tamen estas vojo al regenero kaj neniam rekta pasporto al al ĉielo, pro kio tiuj malfeliĉuloj formis vivajn bildojn de sufero kaj hororo.

Mi vidis ilin en pluraj okazoj, menskonfuzitaj kaj afliktitaj, prenantaj formojn malagrablajn al mia rigardo.

Ĉe la kazoj de obsedo ili ŝanĝis sin en reciprokajn turmentantojn aŭ en malvarmajn ekzekutistojn de la enkarniĝintaj viktimoj; kiam ili estis vagantaj aŭ lokitaj en la punovaloj, ili ĉiam teruregis pro la scenoj de senlimaj doloro kaj mizero.

Tamen estas grave rimarki, ke ili, la malfeliĉuloj, kaj ni, laborantaj plu laŭ ordinara ritmo, trapasis similajn pordojn. En multaj okazoj, ni eble forlasis nian materian envolvadon sieĝitan de similaj malsanoj. Pro ĉi tio kaj pro la deziro koni la Dian Leĝon, kiu favore ne liveras paradizojn nek starigas eternajn inferojn, la simpla rigardo al tiuj longaj vicoj da suferantoj min konsternadis.

Efektive mi vidis multajn el ili en rebonigaj ĉambroj de pluraj helpaj institucioj; sed tiuj, troviĝantaj en la zono de frata helpo, prezentis favore al si mem simptomojn de pliboniĝo,

rilate al rekono de siaj propraj mankoj kaj rilate al spiritaj meritoj, kiujn ili ĝuis, danke iajn intervenajn fortojn.

Sed la mizeruloj, al kiuj ni aludis, havis aliajn devenojn. Temis pri la nesciantoj, la ribelantoj, konfuzantoj kaj nepentantoj kun animo fermita al edifaj admonoj, fieruloj kaj vantemuloj je plej variaj nuancoj, obstinaj en malbono, disperdantoj de anima energio, per kondutoj malicaj rilate la vivon.

Mia kontakto kun ili, en pluraj okazoj, estis simpla hazarda renkontiĝo sen pli granda signifo por mia kleriĝo.

Kial ili tiel longe restis en la malluma hemisfero de nekompreno? ĉu ili decide prokrastis la akcepton de la lumo? ĉu ne dolorigos ilin la stato de estuloj de si mem kondamnitaj al longaj punoj? ĉu ili ne sentis honton pro memvola tempoperdo? Mi multfoje surpriziĝis rigardante ilin... La mienoj de multaj el tiuj malfeliĉuloj ŝajnis montran desegnon, estigantan ironion kaj kompaton. Kia leĝo regis la stereotipadon de iliaj formoj? ĉu ilin forgesis la patrinonaturu, malavara je benoj en ĉiuj sferoj, aŭ ili prenis tiujn trajtojn de persona prezentado pro ia puno trudita de superaj planoj?

Tiaj demandoj bolantaj en mia cerbo trenadis min al la vivo, kiu sin montris ebla al mi.

En tiu manteno mi aliris Kalderaron, avida je scio. Mi malkaŝis al li miajn internajn demandojn, mi rakontis al liaj toleremaj oreloj mian malpaciencon kaj longe bridatan atendon; mi intencis koni tiujn, kiuj longe restis en malico, krimo kaj nekontenteco.

Mia amiko trankvile aŭdis min, bonvoleme ridetis kaj komencis klarigi:

– Antaŭ ĉio, Andreo, ni modifu nian koncepton. Por transformi nin en efektivajn elementojn de helpo al la suferantaj Spiritoj elkarniĝintaj aŭ ne, estas al ni nepre necese kompreni malicon kiel frenezecon, ribelon kiel nescion, kaj malesperon kiel malsanon.

Antaŭ mia perplekseco, li fratece aldonis:

– Ĉu vi komprenis? Tiuj difinoj vere ne estas miaj. Ni lernis ilin de la Kristo, en lia dia trakto kun nia malsupera pozicio sur la Terkrusto.

Mi opiniis, ke la Instruanto sin tenos en longa parola elmontro de la afero, prezentante altvalorajn konojn kaj

komentariante personajn spertojn. Sed tio tute ne okazis; Kalderaro tute simple min informis:

– La spirita blindeco estas frukto de la profunda nescio en siaj primaraj manifestiĝoj aŭ de la ombrigo de la racio en la statoj de la homa malnobliĝo. Helpante la konfuzan menson, nia intereso estas esplori ĉi tiun lastan aspekton de la ombro, peze falanta sur la animojn; tiel, estas necese, ke vi konu ion pri la frenezo en la sfero de la civilizacio. Por tio estas grave, ke ni pli detale studu la cerbon de la enkarniĝinto kaj tiun de la elkarniĝinto en malekvilibra pozicio, ĉar ni konsideras ĝin, kiel organon de manifestiĝo de la spirita aktiveco.

Mi dezirus aŭdi plu liajn klarajn kaj konvinkajn eksplikojn fluantaj el liaj lipoj, sed Kalderaro eksilentis, por diri kelkajn momentojn poste:

– Mi ne disponas je multe da tempo por konversacii pri afero ne koncernanta miajn servojn; sed ni duope agos, konvinkiĝintaj pri tio, ke, laborante ĉe la bonaj verkoj, ni ĉiam lernos la edifan sciencan.

Li frate ridetis kaj finis:

– Paroloj uzitaj ĉe servoj de bono estas dia cemento por senmortaj faroj. Ni do konversacios, efektive servante niajn similulojn kaj nia profito ĉiam kreskos.

Mi eksilentis edifita.

Post kelkaj minutoj, lin akompanante, mi penetris en vastan hospitalon kaj ni ekhaltis antaŭ la lito de iu malsanulo, kiun la Asistanto devus helpi. Malvigla kaj pala, li sin tenis apud estulo el nia sfero en mizeraj kondiĉoj de malsupereco kaj sufero. La malsanulo, kvankam preskaŭ senmova, montris tamen fortan nervan tension, ne vidante per la fizikaj okuloj sian kunulon kun timiga aspekto. Estis tiel granda la kvanto da fadenoj ilin reciproke ligantaj, ke ili estis kvazaŭ jungitaj unu al la dua, aspektante al mi kiel du homoj malliberigitaj en vibra reto. Pensoj de unu certe vivis en la cerbo de la dua. Emocioj kaj sentoj eble estis interŝanĝataj kun matematika precizeco. Spirite ili eble estis konstante akordaj inter si. Mirplena mi observadis la abundegon de iliaj komunaj mensaj vibroj.

Kiam mi decidis komentarii la fenomenon, tiam Kalderaro aliris, rekomdante:



– Ekzameni la cerbon de nia enkarniĝinta frato.

Mi koncentris mian rigardadon sur la delikatan organon, centralizante mian tutan vidkapablon por ĝin interne analizi.

La krania envolvajo antaŭ miaj pliintensigitaj vidpovoj ne prezentis malhelpon. Kiel mi rimarkis aliajn fojojn, tie estis la komplika fako de la mensa produktado, simila al laboratorio el la plej kompleksaj kaj malplej alireblaj. La ĉirkaŭvolvoj apartigitaj inter si, kunigitaj per loboj, egale distancantaj unuj de la aliaj per incizuroj, donis al mi ideon pri elektra aparato preskaŭ nekonata al la homoj. Komprenante la du hemisferojn mi rememoris la signifon de la klasika terminologio kaj restis longajn minutojn rigardante la specialajn aranĝojn de la nervoj kaj la karakterizaĵojn de griza substanco.

Mia instruanto, kies voĉo rompis la silenton, neatendite ekkriis:

– Rimarku la signaladon.

Mirplena, mi rimarkis, la unuan fojon, ke la cerbaj disradioj havis esencajn diferencojn. Ĉiu motorocentro distingiĝis per diversaj proprajoj, pro la radiantaj fortoj. Surprizite mi rimarkis, ke la tuta cerba regiono, laŭ la lumaj signaloj dividiĝis en tri malsamajn regionojn. Sur la fruntalaj loboj la regionoj de kuniĝo estis preskaŭ brilaj. De la motora kortekso, ĝis la ekstremaĵo de la spina medolo, la lumeco malpliĝis kaj fariĝis ankoraŭ malpli intensa ĉe la bazaj ganglio.

Mi jam konsumis kelke da minutoj en la rigardado de la nervaj ĉeloj, kiam la Asistanto min konsolis:

– Vi ekzamenis la cerbon de kunulo ankoraŭ katenita al la densa korpo; nun rimarku la saman organon de la elkarniĝinta estulo lin rekte influanta.

La estulo, kiu ne rimarkis nian ĉeeston pro la krudaj vibroj, en kiuj li sin tenis, koncentris sian tutan atenton sur la malsanulon, memorigante al ni pri ruza feliso, gardanta sian predon.

Mi observis lian strangan vundon sur la toraka regiono kaj kiam mi pretiĝis esplori ĝian kaŭzon, ekzamenante la pulmojn, tiam Kalderaro senafekte min konsolis:

– Ni priraktos la vundon en la helpa laboro. Koncentru viajn vidpovojn sur la cerbon.

Post kelkaj momentoj mi konkludis, ke, krom la formoj de la pecoj kaj la vibra ritmo, ankaŭ kuŝas sub miaj rigardoj

du cerboj preskaŭ egalaj. La mensa kampo de la elkarniĝinto diferencis, montrante ian superecon rilate al la substanco, kiu en la perispirita korpo estis pli malpeza kaj malpli malhela. Mi havis la impreson, ke, se ni lavus interne la cerbon de la amiko kuŝanta sur lito, liberigante ĝin de pli pezaj korpuskloj, ĝi esence estus preskaŭ egala al tiu de la estulo ekzamenata de mi. Sed la lumaj dividoj estis tute egalaj. Pli da lumo sur la fruntalaj lomboj, malpli da lumo sur la motora kortekso kaj preskaŭ neniom da lumo sur la spina medolo, kie la radioj fariĝis difuzitaj kaj opakaj.

Post zorga esplorado mi interrompis la komparan studon kaj mi kun silenta demando fikse rigardis Kalderaron.

La komplezema mentoro argumentis, ridetante:

– Post la korpa morto, kio plej surprizigas nin, tio estas nia renkontiĝo kun la vivo. Ĉi tie ni lernas, ke la perispirita organismo, kiu alĝustigas nin al pli malpeza kaj pli plasta materio, post la tombo, estas ja frukto de evolua proceso. Ni ne estas miraklaj kreaĵoj por ornamo de kartona paradizo. Ni estas filoj de Dio kaj heredantoj de la jarcentoj, akirante konojn, de sperto al sperto, jarmilon post jarmilo. En la Univerŝa Templo de la Eternulo ne estas nepotismo kaj ĉiuj fortoj de la Kreitaĵaro perfektiga en la Senfino. La krizalido de konscienco, kiu kuŝas en la kristalo rulanta en la riverfluo, tie troviĝas en liberiĝa proceso; la arboj multfoje altiĝantaj dum centoj da jaroj, eltenantaj la rigorojn de la Vintro kaj ricevantaj la karesojn de la Printempo, konkeras memoron; tigrino, kiu lekas siajn ĵusnaskitajn idojn, lernas rudimentojn de amo; simio, kiu blekas, organizas parolkapablon. Vere Dio kreis la mondon, sed ni ankoraŭ restas for de la kompleta verko. La estuloj, kiuj loĝas en la Universo, dum multe da tempo verŝos ŝviton por ĝin plibonigi. Tiel ankaŭ la individuo. Ni estas kreitaĵoj de la Dia Aŭtoro kaj ni devas nin tute perfektigi. La Eterna Patro starigis kiel universan leĝon tion, ke la perfektiĝo estu verko de kunlaborado inter Li kaj ni, liaj infanoj.

La mentoro silentis dum momentoj, en kiuj mankis al mi sufiĉa kuraĝo por aldoni ian ajn komenton al liaj altaj pensoj.

Tuj poste li montris al mi la spinan medolon kaj daŭrigis:

– Mi opinias senbezona ian aludon al la unuaj laboroj de nia longa dramo de evolua vivo. Ekde la amebo en la varmeta marakvo, ĝis la homo, ni luktas, lernante kaj senĉese selektante.

Por akiri movadon kaj muskolojn, kapablojn kaj rezonadon, ni provis la vivon kaj de ĝi ni estas provataj milojn da jaroj. La paĝoj de la hinda sciario estas skribaĵoj de hieraŭ, kaj la Evangelio de Jesuo estas hodiaŭa lernobjekto, kompare kun la jarmiloj travivitaj de ni sur la vojo de progreso.

Farinte per la dekstra mano signifan geston, li diris plu:

– La nerva sistemo estas la komenca cerbo, sidejo de la instinktaj movoj kaj de la subkonsciaj aktivecoj; ni figuru ĝin, kvazaŭ ĝi estus la kelo de la personeco, kie ni gardas ĉiujn spertojn kaj registras la plej malgrandajn okazintaĵojn de la vivo. En la regiono de la motora kortekso, kiu estas zono inter la fruntalaj loboj kaj la nervoj, ni vidas la disvolviĝantan cerbon, estigantan la motorajn energiojn, kiujn nia menso utiligas por la nepre necesaj manifestoj en la nuna evolua stato de nia memo. En la fruntalaj loboj, ankoraŭ mutaj pro la scienca esplorado de la mondo, kuŝas materialoj havantaj sublimajn karakterojn, materialoj, kiujn ni grade konkeros, en nia penado por altiĝo, kaj kiuj estas la plej nobla parto de nia dia evoluanta organismo.

Liaj simplaj kaj mirindaj klarigoj mirigis min. Kalderaro estis instruanto el la plej alta klaso. Li lernigis, ne lacigante, li sciis konduki la instruaton al profundaj konoj, ne kaŭzante ian penon al la lernanto.

Mi rimarkis lian noblecon, kiam li daŭrigis, post nelonga paŭzo:

– Ni ne povas aserti, ke ni havas tri cerbojn samtempe. Ni havas nur unu, kiu tamen sin dividas en tri apartajn regionojn. Ni konsideru ĝin, kvazaŭ kastelon el tri etaĝoj: en la unua estas la “sidejo de niaj aŭtomataj impulsoj”, prezentanta la vivan resumon de la plenumitaj servoj; en la dua ni lokas la “loĝejon de la nunaj konkeroj”, kie stariĝas kaj plifirmiĝas la noblaj kvalitoj, kiujn ni konstruas; en la tria estas la “domo de la superaj konoj”, montranta la kulminojn, kiujn ni devas atingi. En unu el ili loĝas kutimo kaj aŭtomatismo; en la alia, klopodo kaj volo; kaj en la lasta, idealo kaj la supera atingota celo. Ni tiamaniere distribuas al tri etaĝoj la subkonscion, konscion kaj superkonscion. Kiel ni vidas, ni havas en ni mem la pasintecon, la estantecon kaj la estontecon.

Post pli longa paŭzo mi donis kuron al intimaj pripensadoj, laŭ malnova kutimo informiĝi.

La altvaloraj klarigoj, kiujn mi aŭdis, ne povus esti pli simplaj nek pli logikaj. Mi tamen demandis min mem: ĉu la cerbo de elkarniĝinto estus same malsaniĝema? Mi sciis, ke la griza substanco, en la karna mondo, povus esti atakita de tumoroj, de moliĝo, de hemoragio; sed en la nova sfero, en kiun la morto min kondukis, kiaj morbiaj fenomenoj sieĝus la menson?

Kalderaro registris miajn demandojn kaj klarigis:

– Ni ĉi tie ne diskutu la ĝustadire materiajn malsanojn. Kiu de longe akompanas, kiel ni, la servadon de la psikiatroj, tute sindonintaj al la bono de sia proksimulo, tiu ĝissate scias, ke ĉiuj elmontroj de homa dankemo restas senesprimaj antaŭ la apostoleco de iu Paul Broca, kiu konstatis la malsanon de la parolcentro, aŭ de iu Wagner Jauregg, kiu sin dediĉis al la kuracado de la paralizo, persekutante la spiroketon de la sifiliso ĝis trovi ĝin en la interno de la griza materio, malordigantan la motorajn zonojn. Antaŭ tiaj fenomenoj estas komprenebla la rompo de la cerba harmonio, kaŭze de la deviga foriĝo de la principoj de la perispirita korpo for de la ĉelaj aglutiniĝoj de la fiziologia kampo; tiuj aglutinoj tiam restas malordigitaj ĉe siaj strukturoj kaj normalaj aktivecoj, same kiel okazas al violono nekapabla por perfekta ludado de ia melodia peco, kiam ĝi havas unu aŭ du kordojn malagordiĝintajn. Ni ne devas nek povas ignori la leĝojn regantajn la kampon de formo... El tio venas la neebleco de nia pretendo pri “ekvilibra psikologio” sen “harmonia fiziologio” en la sfero de la homa scienco: tio estas afero tute komprenebla. Ni parolos sole nur pri la spiritaj manifestiĝoj laŭ ilia esenco. Vi demandas, ĉu la elkarniĝinta mensa povas malsaniĝi... Kia demando! ĉu vi pensas, ke la antaŭdecidita malico ne estas anima malsano? ke malamo ne estas terura morbo? ĉu vi eble opinias, ke ne ekzistas “mensaj vermoj” de malĝojo kaj nekonformiĝo? Kvankam ni havas la feliĉon agi en pli subtila kaj malpeza korpo, danke al la naturo de niaj pensoj kaj aspiroj, jam malproksime de la krudaj vivoregionoj, kiujn ni forlasis, ni tamen ankoraŭ ne posedas carbono de anĝelo. La konservado de nia nuna formo, survoje al pli altaj konkeroj, estas nia senĉesa laboro; ni ne povas ripozi ĉe la lumigaj procedoj; ni devas ĉiam puriĝi, selekti inklinojn kaj kribri konceptojn, tiel ke la marŝo ne interromp-

iĝu. Milionoj da estuloj vivas ĉi tie en la situacio, en kiu ni troviĝas, sed aliaj milionoj restas en la karno aŭ ĉe niaj malaltaj sferoj de evoluo, sub la fera ganto de kruela frenezo. Por tiuj ja ni devas studi la patologion de la spirito, helpante la plej malfeliĉajn, intervenante fratece kaj nerekte por solvo de la doloraj problemoj, en kies nigraj fadenoj ili enretiĝas. Ili estas senesperaj koboldoj, viktimoj de si mem, rikoltantaj dornojn kaj elreviĝojn. La homa perispirita korpo, vazo por niaj manifestiĝoj, estas almenaŭ nuntempe nia plej grava konkero sur la Tero, sur la kampo de la formoj. Por la klarmensaj animoj, jam prilumitaj de savanta lumo, ĝi estas ponto al la supera kampo de la eterna vivo, ankoraŭ ne atingita de ni mem; por la vulgaraj spiritoj ĝi estas ĉirkaŭlino nepre necesa kaj justa; por la kulpaj konsciencoj ĝi estas neesprimebla malliberejo, ĉar, ĝi krome registras la faritajn erarojn, gardante ilin kun ĉiuj vivaj detaloj de la nigraj momentoj de la falo. La speco de vivo de ĉiu homo en la karna envolvajo kaŭzas la densecon de la perispirita organismo post la perdo de la materia korpo. Nu, la cerbo estas la instrumento de la menso, fonto de niaj pensoj. Per ĝi do ni unuiĝas al lumo aŭ al mal-lumo, al bono aŭ al malbono.

Rimarkante la atenton kun kiu mi sekvis liajn altvalorajn klarigojn, Kalderaro signife ridetis kaj demandis:

– Ĉu vi komprenis?

Montrante la du suferantojn apud ni, li daŭrigis:

– Ni ekzamenis ĉi tie du malsanulojn: unu en la karno; alia ekster ĝi. Ambaŭ portas la cerbojn toksikitaj, absolute harmoniante unu kun alia. Ili spirite defalis de la tria etaĝo, kie ni lokas la superajn konceptojn, kaj, sin donante al la malstreĉiĝo de la volo, ne estis akceptitaj en la duan etaĝon, – sidejon de la individua klopodo –, perdante altvaloran okazon restariĝi; ili enfalis do en la sferon de la instinktaj impulsoj, kie oni gardas ĉiujn spertojn de la antaŭa animaleco. Ambaŭ abomenas la vivon, sin reciproke malamas, malesperas, nutras ideojn pri turmento, aflikto kaj venĝo. Unuvorte, ili estas frenezaj, kvankam la mondo ne vidas ilian grandegan malekvilibron, efektiviĝantan interne de ilia perispirita organismo.

Mi estis preta eldiri longan liston da demandoj pri la du studataj personoj, kiam la kunparolanto komencis la servon de rekta helpo, kaj, metante la dektran manon sur la maldekstran fruntalan lobon de la enkarniĝinta malsanulo, afable diris al mi:

– Silentu, mia amiko, pri viaj insistaj demandoj. Trankviligu. Dum niaj laboroj mi klarigos al vi, kio estos al mi eble.

## IV

### STUDADO DE LA CERBO

Kun frateca mano malfermita super la frunto de la malsanulo, kvazaŭ fluigante sur lin viglajn fluidaĵojn de renoviganta vivo, Kalderaro klarigis al mi bonkore:

– Antaŭ proksimume dudek jaroj ĉi tiu amiko metis finon al la materia vivo de sia nuna turmentanto per dolora sanga sceno. Mi komencis la helpan servadon al li nur antaŭ tri tagoj; mi tamen jam tute informiĝis pri lia kortuŝa historio.

Li turnis kompateman rigardon al la elkarniĝinta turmentanto kaj daŭrigis:

– Ili kune laboris en granda urbo, sindonintaj al vendado de bagatelaĵoj. La murdinto estis dungito de la viktimo, ekde sia infaneco, kaj, atinginte sian plenaĝon, postulis de sia estro, fariĝinta lia kuratoro, pagon por pluraj jaroj da laboro. Lia estro kategorie rifuzis kontentigi lin, pretekstante lacigajn laborojn, kiujn li travivis por helpi la dungiton, dum ties infaneco kaj juneco. Li ebligis al la junulo profitan situacion sur la kampo de negocoj, donus al li grandajn interesojn, sed eĉ groŝon ne pagus por la pasinteco. Ĝis tiam li tenis lin, kvazaŭ filon, kiu postulas kontinuan helpadon. Diskuto ekestis. Krudaj vortoj, interŝanĝitaj meze en koleraj vibroj, ekflamigis la cerbon de la junulo, kiu, en la apogeo de malamo, posedita de sovaĝa furiozo, murdis sian estron. Sed antaŭ ol forkuri, la kriminto rapidis al la kaso, en kiu amasiĝis pakoj da monpapiroj, prenis grandan sumon, kiun li supoze rajtis, restigante multe da mono por trompi la policon en la sekvanta tago. Efektive, en la morgaŭo li mem venis al la komercejo, kie la mastro tranoktis, dum ties malgranda familio longe restis sur kamparo, kaj hipokritante zorgon antaŭ la fermitaj pordoj, invitis policiston lin akompani, ke ambaŭ rompu unu

el la seruroj. Post kelkaj momentoj disvastiĝis sciigo pri la krimo; sed la homa justico, enretiĝinta en la ruzeco de la krimulo, ne sukcesis klarigi la problemon pri la mortorigino. La murdinto malavaris zorgojn por gardi la interesojn de la mortinto. Li ordonis sigeli ferŝrankojn kaj librojn. Li faris paŝojn por peniga inventaro. Li postulis subtenon de la laŭleĝaj aŭtoritatoj por skrupula ekzameno de la situacio. Li estis efektiva advokato de la vidvino kaj de la du infanoj de la mortinta kuratoro, kiuj, danke lian sindediĉon, ricevis riĉan heredaĵon. Li priploris la okazaĵon, kvazaŭ la elkarniĝinto estus lia patro. Finiĝinte la afero kun la senutileco de la justico antaŭ la enigmo, li diskrete retiriĝis en grandan industrian centron, kie li aplikis la ekonomiajn rimedojn al profitodonaj aktivecoj.

Mia mentoro montris diferencon brilon sur siajn okulojn, faris mallongan paŭzon kaj aldiris:

– Li sukcesis trompi homojn, sed ne povis iluzii sin mem. Koncentrante sian menson al la ideo de venĝo, la elkarniĝinta estulo persiste sekvis lin. Li alkroĉiĝis al la psika organismo, kiel hedero al viskeca muro. La murdinto faris ĉion por malstreĉi la konstantan sieĝon de la malamiko. Li intensigis laborojn ĉe siaj materiaj entreprenoj, avidante forgeson de si mem, praktikante iniciativojn, kiuj valorigis liajn bankajn kambiojn. Sed rimarkante, ke la grandaj ekonomiaj kapitaloj ne malpliiĝis liajn nekonfeseblajn maltrankvilon kaj suferon, li rapidis edziĝi, sopirante kvietigi sian propran koron. Li edziĝis kun fraŭlino de animo ekstreme altiĝinta al la supera regiono de la homa vivo, kiu donis al li kvar ĉarmajn infanojn. En la spirita klimato de la elektita virino, li iel sukcesis ekvilibri, kvankam la viktimo neniam lin forlasis. Estis okazoj, dum kiuj li kaptiĝis de plej kruelaj nervaj deprimoj, atakite de strangaj inkuboj, antaŭ okuloj de familianoj; sed li ĉiam rezistis ĝis ioma grado, subtenate de amikoj, kiujn lia edzino posedis de longe, en nia mondo. Se la homaj leĝoj respondas al eraremo de enkarnuloj, la diaj leĝoj tamen neniam eraras. Konservante ĉiujn nigrajn fortojn akumulitajn en sia destino, ekde la nokto de murdo, nia malfeliĉa amiko, tenis enfermitajn, en la kelo de sia personeco, ĉiujn detruajn impresojn rikoltitajn en la momento de sia falo. Naŭzis lin publika konfeso pri la krimo, kio



iel mildigus lian angoron kaj forpelus pereigajn energiojn, kiujn li konservadis.

Ĉe tiu parto de la rakonto, Kalderaro eksilentis.

Li tuŝis la korteksan regionon kaj daŭrigis:

– La krima menso sieĝita de la konstanta ĉeesto de sia viktimo, perturbanta ĝian memoron, fiksiĝis en la meza regiono de la cerbo, ĉar la doloro de la konsciencoriproĉo ne permesis al ĝi eniron en la superan sferon de la perispirita organismo, kie la plej noblaj principoj de estulo starigas la sanktejon de manifestado de la Dia Konscio. Vipas lin, terurita de siaj rememoroj, neesprimebla timego antaŭ la konsciencaj juĝoj. Aliflanke, pli kaj pli interesiĝinta garanti la feliĉon de sia familio, sola oazo en la varmega dezerto de diaj doloraj rememoroj, la malfeliĉulo, tiam respektata pro la socia pozicio, kiun mono konstruis por li, sin donis al febra kaj seninterrompa aktiveco. Mense vivante en la meza regiono de la cerbo, preskaŭ ekskluzive, li nur ĝuis ian trankvilon, agante kaj laborante iel ajn, eĉ iele trapele. Li provis forkuri de si mem, per ĉiuj rimedoj, laŭ sia povo. Li enlitiĝadis malvigliĝinta, pro laciĝo de la korpo, kaj ellitiĝadis, en la sekvanta tago, malforta kaj laca dueli senutile kun sia nevidebla persekutanto dum la dormhoroj. Sekve, li naskis la malekvilibron de sia perispirita organismo kaj tio malordigis lian motorzonon, kaŭzante la organaran ĥaoson.

Li faris karakterizan movon kun la montrofringro kaj akcente diris:

– Rimarku la korteksajn centrojn.

Mirante, mi rigardadis tiun admirindan mikroskopan mondon. La piramidoformaj ĉeloj, distingiĝantaj pro la grandeco, esprimis la gravecon de la funkcioj, kiujn ili devis plenumi en la laborejo de la nervaj energioj. Atente rimarkante la vidaĵon, ne ŝajnis, ke mi ekzamenadas la vivan histon de blanka-griza substanco: mi havis la impreson, ke la kortekso estas fortika funkcianta dinamo. Ĉu ni ne estus antaŭ ia aparato kun kompleksa strukturo? Malgraŭ tiuj impresoj, mi rimarkis, ke la cerba substanco kvazaŭ moliĝas.

Mi restis plu perpleksa, nesciante, kiel esprimi la konformajn komentariojn, kiam la Asistanto venis helpe al mi, klarigante:

– Ni estas antaŭ la perispirita organo de la homa estaĵo, alteniĝinta al sia fizika duoblaĵo tiel same, kiel ia parto de karna korpo havas intiman kontakton kun vestaĵo. La tuta perispirita kampo de la kreito estas reprezentaĵo de la fikikaj potencoj, malrapide konkeritaj de la estaĵo, jarmilojn post jarmiloj. Renaskiĝante inter la pereemaj formoj, nia subtila korpo, en nia malpli densa sfero, pro sia ekstrema malpezeco kaj eksterordinara plasteco, submetas sin sur la Terkrusto, al la leĝoj de relernado, heredo kaj fiziologia disvolviĝo, laŭ la merito aŭ senmerito, kiujn ni kunportas, kaj la necesaj misio aŭ lernado. La efektiva cerbo estas aparato el la plej kompleksaj, per kiu nia memo respregulas la vivon. Per ĝi ni sentas la eksterajn fenomenojn, laŭ nia komprenokapablo, kiun la sperto disvolvas; tial ĝi varias de kreito al kreito, pro la plureco de pozicioj en la evolua skalo. Eĉ la simioj aŭ la antropoidoj sur la vojo al simileco kun la homa genro ne prezentas cerbojn tute egalajn inter si. Ĉiu individuo montras ĝin laŭ la efektiva farita progreso. Sovagiĝo prezentas perispiritan cerbon kun vibroj tre diversaj ol tiuj de la pensorgano de la civilizita homo. Laŭ tiu vidpunkto la encefalo de sanktulo elĵetas ondojn distingiĝantajn de tiuj, kiujn elĵetas la mensa fonto de sciencisto. La akademia skolo sur la Terkrusto ligiĝas al la koncepto pri tuŝebla formo transiĝe al transformoj pro malsano, kadukeco aŭ morto. Sed ĉi tie ni ekzamenas la organismon, kiu modlas la manifestojn sur la fizika kampo, kaj ni rekonas, ke la tuta nerva aparato estas el superega kategorio. La nerva ĉelo estas ilo kun elektra naturo ĉiutage sin nutranta per adekvata brula materialo. Ekzistas sensaj, motoraj, peraj kaj refleksaj neŭronoj. Estas tiuj, kiuj ricevas la eksterajn sensojn kaj tiuj, kiuj ricevas impresojn de la konscienco. En la tuta ĉela kosmo funkcias malŝaltiloj kaj konduktiloj, elementoj por elsendo kaj ricevo. La menso estas orientanto de tiu mikroskopa universo, en kiu miliardoj da korpuskloj kaj plurformaj energioj sin donas al ĝia servado. El ĝi venas fluoj de volo, determinantaj vastan reton da stimuloj, reagantaj antaŭ la postuloj de la ekstera mondo aŭ kontentigantaj la sugestojn de la internaj zonoj. Lokita inter la objektiva kaj subjektiva mondoj, ĝi estas devigata de la Dia Leĝo lerni, observi, elekti, malakcepti, akcepti, ricevi, konservi, riĉiĝi, prilumiĝi, ĉiam progresi. El la objektiva ĝi spertas la batojn kaj influojn de la rekta lukto;

el la subjektiva sfero ĝi absorbas la pli aŭ malpli intensan inspiron de la elkarniĝintaj aŭ enkarniĝintaj inteligentoj al ĝi similaj, kaj la rezultatojn de la mensaj kreoj, kiuj estas propraj al ili. Kvankam ĝi ŝajnas senprogresa, la menso tamen iras sian vojon, sen retroiroj, sub la nepra influo de la videblaj aŭ nevideblaj fortoj.

Dum ordinara paŭzo de la klarigoj, okupis min nombraj kaj seninterrompaj asociadoj de ideoj.

Kiel mi komprenu ĉiujn instruojn de Kalderaro? Ĉu la ĉeloj el la fiziologia amaso ne havas proprajn karakterizaĵojn? Ĉu ili ne estas infinitezimaj personoj kunigitaj sub disciplino, en la organaj apartaĵoj, sed preskaŭ liberaj en siaj manifestadoj? Ĉu ili eble estas duoblaĵoj de la spiritaĵoj? kiel akordigi tian teorion kun liberigo de la mikroorganismoj tuj post la morto de la korpo? Se tiel estus, ĉu la memoro de enkarniĝinto ne devus liberiĝi de la provizora forgeso pri la pasinteco?

La instruanto kaptis miajn internajn demandojn, ĉar li trankvile daŭrigis, kvazaŭ al mi respondante:

– Mi konas viajn demandojn kaj iam ankaŭ mi ilin faris, kiam la novaĵon kaptis mia observo. Sed hodiaŭ mi povas diri al vi, ke, se ekzistas la fiziologia kemio, ankaŭ estas la spirita kemio, kiel ni posedas la organikan kaj neorganikan, kaj estas ekstreme malfacile difini iliajn punktojn de sendependa ago. Preskaŭ neeble difini iliajn limojn, ĉar plej saĝa spirito ne kuraĝus lokalizi per dogmaj asertoj la punkton, kie finiĝas materio kaj komenciĝas spirito. En la fizika korpo, la ĉeloj mirinde diferencas. Ili montras ian personecon ĉe hepato, alian ĉe renoj kaj ankoraŭ alian ĉe la sango. Ili sin modifas senfine, aperas kaj malaperas pomile, sur ĉiuj kampoj de la ĝustadire organika kemio. Sed en la cerbo komenciĝas la imperio de la spirita kemio. La ĉelaj elementoj tie estas malfacile anstataŭeblaj. La delikata kaj supera scenejo ĉiam estas sama, ĉar la animolaboro postulas fiksiĝon, profiton kaj kontinuecon. Stomako povas esti alambiko, en kiu la infinitezima mondo sin montras per tumulta animaleco, alproksimiĝante al la mal-supraj vivaj estaĵoj, ĉar stomako ne devige bezonas rememori, kian nutran substancon oni donis al ĝi por digesto en la antaŭtago. Sed la organo por mensa esprimo postulas kemiajn personecojn de superega tipo por nutri sin per spertoj, kiuj devas esti registrataj, gardataj kaj rememortaj ĉiam, kiam

oportune kaj necese. Tiam la supera kemio intervenas, kaj dotas la cerbon per neanstataŭebla materialo en multaj apartaĵoj de ĝia interna laboratorio.

La Asistanto eksilentis kelkajn sekundojn, kvazaŭ donante al mi tempon por pripensi.

Poste li ĝentile daŭrigis:

– Vere, ĉe tio ekzistas nenia mistero. Ni ree prenu la temon pri la evoluantaj spiritaĵoj fortoj. La spirita principo venis en la varmetan sinon de la akvoj per la ĉelaj organismoj, kiuj sin tenis kaj multiĝis per simpla dupartiĝo. Dum miloj da jaroj ĝi longe vojaĝis en la spongo, ekregante memstarajn ĉelojn, al ties trudante obeemon kaj kolektivemon ĉe la primitiva muskola organizaĵo. Antaŭ ol provi la bazojn de la nerva aparato, ĝi pasigis longan tempon en meduzo, en vermo, en batrako, sin trenante por eliri el la malluma kaj kota fundo de la akvoj por komenci siajn unuajn spertojn en la tagmeza suno. Kiom da jarcentoj ĝi travivis, prenante monstrajn formojn, pliperfektigante ĉi tie kaj tie, helpate de la nereakta influo de la superaj inteligentoj? Neeble nuntempe respondi. Ĝi suĉis la abundan sinon de la Tero, senĉese progresante, tra miljaroj, ĝis konkero de pli alta regiono, kie ĝi sukcesis ellabori sian propran nutraĵon.

Kalderaro fiksas sur min signifan rigardon kaj demandis:

– Ĉu vi sufiĉe komprenis?

Antaŭ la surprizo de la novaj ideoj, kiuj vipis mian imagopovon, malhelpante al mi la detalan ekzamenon de la afero, la mensklara kamarado ridetis kaj diris plu:

– Kiom multe da klopodo ni faru por resumi la prezentadon de tiu delikata temo, tiu antaŭa parolo pri ĝi ĉiam naskas perpleksecon. Mi volas diri, Andreo, ke la spirita principo, ekde la nekonata momento de sia kreado, iras senhalte antaŭen. Ĝi apartiĝis de la oceana interno, atingis la supraĵon de la protektantaj akvoj, moviĝis direkte al la marbordaj kotoj, baraktis en ŝlimejo, alvenis al la firma tero, spertis en arbaro abundan materialon da reprezentaj formoj, altiĝis de la grundo, vidis la ĉielon kaj, post multe da jarmiloj, dum kiuj ĝi lernis alproprigi, nutri sin, elekti, memori kaj senti, akiris inteligenton... Ĝi vojaĝis de la simpla impulso al eksciteco, de eksciteco al senso, de senso al instinkto, de instinkto al racio. Dum tiu peniga pilgrimado, sennombraj jarmiloj

forpasis super ni. Ni en ĉiuj tempoj forlasas malsuperajn sferojn, por ke ni iru en la superajn. Cerbo estas la sankta organo por manifestado de la menso, transirante de la primitiva animaleco al la homa spiriteco.

La orientanto eksilentis, tuŝetis min, kvazaŭ kunulo sperta ĉe studo, stimulantia humilanta lernanton, kaj poste aldonis:

– Unuvorte, la homo de la lastaj dekoj da jarcentoj reprezentas la venkantan homaron, elirantan el la primara bestostato. Tiun kondiĉon ni partoprenis, ni, elkarniĝintoj, pomilione da Spiritoj ankoraŭ pezaj, ĉar ĝis nun ni ne forĵetis la enhavon de malsuperaj kvalitoj de nia perispirita organizaĵo; tia cirkonstanco nin pelas vivi, post la fizika morto, en similaj aroj, en efektive progresintaj societoj, sed similaj al la surteraj grupoj. Ni oscilas inter libero kaj reenkarigiĝo, nin perfektigante, nin polurante, ĝis atingi per propra rafinado aliron al la sublimaj esprimoj de la Supera Vivo, kies kompreno ankoraŭ ne estas al ni permesata. Sur la du flankoj de la ekzistado, sur kiuj ni moviĝas kaj sur kiuj troviĝas naskiĝo kaj morto de la densa korpo, kiel pordoj por komuniko, la konstrua laboro estas nia beno, preparanta nin por la dia estonteco. La aktiveco en la sfero, kiun ni nun okupas, estas por tiuj, kvitaj al la Leĝo, pli riĉa de beleco kaj feliĉo, ĉar la materio estas pli maldensa kaj pli obeema al niaj postuloj de supera inklino. Sed, kiam ni renaskiĝas, surprizas nin la peza laboro de ripetado por la necesa lernado. Tie ni semos por ĉi tie rikolti, plibonigante, reĝustigante kaj beligante ĝis atingi perfektan rikolton, abundan ejon da nutraj granoj, por ke ni transiru kapablaj kaj venkaj en aliajn “mondojn en la ĉielo”. Sed rilate la servojn de pago kaj elaĉeto ni ne devas kredi, ke la karna sfero estas la sola kapabla prezenti la benatan okazon por akra kaj savanta sufero. Ekster ĝi, en mallumaj regionoj, kiajn vi ne povas nescii, estas okazo de elaĉeta traktado por la pli malfeliĉaj ŝuldantoj, kiuj memvole faris pereigajn ŝuldojn antaŭ la Leĝo.

Estiĝis mallonga paŭzo, kiun mi ne interrompis, konsiderante la nekonvenon de ia ajn demando miaflanke.

Kalderaro tamen afeble daŭrigis:

– Vi demandas la motivon, kial enkarigiĝinto ne konservas la tuton de siaj rememoroj pri fora pasinteco; kompreneble, pro la tiel granda supereco de la perispirita korpo kompare kun la fiziologia meĥanismo. Se la fizika formo evoluis kaj

perfektiĝis, tiel same certe okazis al la perispirita organismo tra la aĝoj. Ni mem, en nia relativa spirita kondiĉo, ankoraŭ ne posedas la proceson de tuta rememoro pri la iritaj vojoj. Ni ne estas ankoraŭ kun sufiĉa lumo por profite malsupreniri al ĉiuj anguloj de la abismo pri la originoj; tian kapablon ni akiras nur poste, kiam nia animo estos senigita je ĉia ajn restaĵo de ombro. Sed komparante nian situacion kun la malpli klarmensa stato de niaj enkarniĝintaj fratoj, ni devas ne forgesi, ke la nerva sistemo, la motora kortekso kaj la fruntalaj loboj, kiujn ni nun ekzamenas, estas nur ordinaraj punktoj de kontakto inter la perispirita organizaĵo kaj la fizika aparato, nepre necesaj unu al alia, al laboro de riĉiĝo kaj kreskado de la eterna estulo. Laŭ pli simpla parolo ili estas spirejoj por la impulsoj, spertoj kaj altaj konoj de la efektiva persono, kiu ne estingiĝas en la tombo, kaj kiu ne eltenus ŝarĝon de duobla vivo. Tial, atentaj al la devoj truditaj al konscio pri viglado je la ĉiutagaj servoj, ili plenumas dampantan funkcion: ili estas lumoŝirmiloj bonefike agantaj, por ke la enkarniĝinta animo laboru kaj evoluu. Krom tio, naskiĝo kaj morto en la karna sfero, por ĉiuj homoj, estas biologiaj okazaĵoj, nepre necesaj al renoviĝo. Vere, sur la Terkrusto ne estas tuta forgeso, nek tuja restarigo de memoro en la regionoj de ekzistado, nature sekvantaj la kampon por fizika aktiveco. Ĉiuj homoj konservas inklinojn kaj kapablojn, kiuj estas preskaŭaj efektivaj rememoroj pri sia pasinteco; trairinte la tombon, ne ĉiuj tuj reakiras la tuton de siaj rememoroj. Kiu tro materiigas longe restante en malalta vibra pozicio, sur la kampo de densa materio, tiu ne povas subite relumigi la lampon de sia memoro. Li bezonos multe da tempo por liberiĝi de la pezaj envolvajoj, al kiuj li sin neatenteme alligis. Ankaŭ meze en la homa lukto estas nepre necese, ke la neŭronoj fariĝu gantoj, pli-malpli dikaj, ke la flukso da rememoroj ne malpliigu la edifan klopodon de la enkarniĝinta animo, sin doninta al noblaj celoj de evoluo aŭ elaĉeto, pliboniĝo aŭ sublimeservado. Sed estas grave rekonigi ke nia menso ĉi tie agas sur la perispiritan organismon, kun povoj multe pli grandaj, danke sian nevulgaran naturon kaj la elastecon de la materio, kiu nun nin formas. Tio tamen sur niaj agokampoj ne evitas al ni la krudajn manifestiĝojn, la bedaŭrindajn falojn, la komplikajn malsanojn, ĉar la menso,

mastro de korpo, eĉ ĉi tie estas atingebla por malvirto, malfortiĝo kaj ruinigaj pasioj.

Ĉe tiu parto de la klarigo mi kuraĝis demandi dum la fariĝinta espontanea paŭzo:

– Kiel tute simple kompreni la tri regionojn de la cerba vivo, pri kiuj vi parolis?

Mia kunulo tuj kontentigis min kaj respondis:

– Nerva sistemo, motora zono kaj fruntalaj loboj, en la karna korpo, kiuj esprimas impulsigon, sperton kaj superajn konojn de la animo, konsistigas la kampojn de fiksiĝo de la en- aŭ elkarniĝinta menso. La troa restado sur unu el tiuj kampoj, kun ties koncernantaj agoj, okazigas la destinton de la individua kosmo. Homo, longe restanta sur la regiono de impulsoj, perdiĝas en labirinto de kaŭzoj kaj efikoj, kaj malŝparas tempon kaj energion; tiu, sin absolute donanta al maŝineca klopodo, sen konsulto al sia pasinteco kaj sen baza organizo por la estonteco, tiu aŭtomatigas sian ekzistadon, ĝin senigante je edifa lumo; kiu ekskluzive staras en la templo de la superaj nocioj, tiu troviĝas en danĝero de kontemplado sen verkoj, de meditado sen laboro, de rezigno sen profito. Por ke nia menso iru antaŭen, direkte al la supro, estas nepre necese, ke ĝi ekvilibru, helpante sin per la pasintaj akiroj, por gvidi la nunajn laborojn, kaj samtempe subtenante sin per la kristalklara kaj bela espero, fluanta el supera fonto de alta idealo; per tiu fonto ĝi povas kapti el la dia mondo la restarigantajn energiojn, kaj tiel konstrui sian sanktigan destinton. Kaj, ĉar ni estas nedisigeble ligitaj al tiu akordiĝintaj kun ni, danke al fatalaj universaj planoj, kiam ni malekvilibras pro troa mensa fiksiĝo en unu el la cititaj regionoj, tiam ni ekrilatas kun la en- aŭ elkarniĝintaj inteligentoj en kondiĉoj analogaj al la niaj.

Kun frateca mieno la instruanto demandis:

– Ĉu vi komprenis?

Mi jese respondis, posedita de sincera ĝojo, ĉar mi fine asimilis la lecionon.

Kalderaro fluis magnetajn emanaĵojn sur la kranion de la malsanulo, envolvante ĝin en bonefikajn fluidaĵojn, kaj diris al mi post longa paŭzo:

– Jen ĉi tie du amikoj kun mensoj fiksitaĵoj sur la regiono de primaraj instinktoj. Post ripetataj vibroj sur la pensokampo,

tiu enkarniĝinta, kiu evitas rememoron kaj konsciencoriproĉon, ruinigis siajn motorcentrojn, ankaŭ malordigante la endokrinan sistemon kaj perturbante la vivajn organojn. Tiu elkarniĝinto aliigis ĉiujn energiojn en substancon por nutri venĝideon, enloĝinte en malamo, en kiu li troviĝas, ekster racio kaj karitato. La situacio de ambaŭ estus alia, se ili estus forgesintaj la falon, por restarigi sin per la konstrua laboro kaj per la frata kompreno, en la sanktejo de la efektiva pardono.

La Asistanto vidigis novan brilon en siaj penetrorigardaj okuloj kaj aldonis:

– Kiel ni konstatis, Jesuo Kristo estis tute prava, kiam li rekomendis al ni amon al niaj malamikoj kaj preĝon al tiuj, kiuj nin persekutas kaj kalumnias. Tio ne estas simpla virto, sed scienca principo de liberiĝo de la estulo, de progreso de la animo, de spirita vasteco: en la penso loĝas la kaŭzoj. Venos tempo, kiam amo, frateco kaj kompreno, signifantaj spirito-statoj, estos tiel gravaj por la enkarniĝinta menso, kiel pano, akvo kaj medikamento; tio dependas nur de tempo. Estas prave, ke oni ĉiam atendu bonon, kun dia optimismo. La homa menso ĝenerale supreniras al la supera kono, malgraŭ tio, ke iafoje okazas la malo.

Poste Kalderaro restis longajn minutojn en viglaj magnetaj disradiadoj, kiuj, envolvante la kapon kaj spinon de la malsanulo, ŝajnis al mi forte reanimantaj, ĉar baldaŭ la malsanulo, antaŭe torturata, sin donis al trankvila dormo, kvazaŭ li estus sorbinta tre mildan dormigilon. Post nelonge li troviĝis en nia rondo nedaŭre apartigita de sia densa korpo, posedita de teruro antaŭ la nefleksebla turmentanto, kiu sin tenis sidanta, nekortuŝebla, en unu el la anguloj de la lito.

Mi rimarkis, ke la malsanulo ne sentis nian ĉeeston, kaj ankaŭ tio okazis al la turmentanto en silenta atendo.

Mi estis konvinkita, ke la Asistanto faros al ili longajn predikojn; sed Kalderaro sin tenis en absoluta silento.

Mi ne detenis min: mi lin pridemandis. Kial oni ilin ne helpas per klarigaj vortoj? La malsanulo ŝajnis afliktita, dum nun la persekutanto fariĝas pli agresiva. Kial oni ne senmovigas la kruelan brakon, kiu minacas malfeliĉulon? Ĉu ne estus juste malhelpi tiun kolizion, kiu kuntrenus neatenditajn konsekvencojn al la enhospitaligita kamarado?



La instruanto serene aŭdis min kaj respondis:

– Ni vane parolus, Andreo, ĉar ni ankoraŭ ne scias ilin ami, kvazaŭ ili estus niaj fratoj aŭ niaj infanoj. Por ni ambaŭ, spiritoj kun iom pli evoluinta rezono, sed kun sentoj malpli superaj, ili estas du malfeliĉuloj, kaj nenio pli. Ni nun donas al ili, el tio, kion ni disponas, t.e. bonefikan helpon sur la kampo de ilia eksteraj suferoj, laŭ niaj akiroj de kono.

Li rigardis al granda proksima pordo kaj akcente diris:

– Tiu helpo tamen ne estas forgesita. Fratino Cipriana, gvidantino de la helpaj servoj de la grupo, ĉe kiu mi kunlaboras, eble ne malfruiĝos.

Post kelkaj minutoj, dum kiuj persekutanto kaj viktimo interŝanĝadis amarajn vortojn, la komplezema mentoro daŭrigis:

– Ĉu vi memoras pri De Puysegur?

– Jes, mi neprecize memoris pri li. En mia cerbo okazis libera asociiĝo de ideoj kaj mi rememoris studojn, kiujn mi faris pri iaj realigoj de Charcot. Sed mi ne povis mencii detalaĵojn, ĉar psikiatrio ne estis mia efektiva laborkampo en la medicino.

Kalderaro ĝentile daŭrigis:

– De Puysegur estis unu el la unuaj magnetizistoj, kiu trovis la revelaciantan dormon, dum kiu estas eble konversacii kun paciento en konscienca stato alia ol la ordinara. De tiam tiu malkaŝo impresas la psikologojn; el ĝi venis nova terapeŭtiko por kuracado de nervaj kaj mensaj malsanoj. Sed por ni, “en ĉi tiu flanko” de la vivo, la fenomeno estas tre ordinara: milionoj da personoj ĉiutage ekdormas sub la magneta influo de spiritoj-amikoj, por ke ili estu helpataj per neprokrasteblej decidaj.

– Kial ni nun ne provu doni parolan klarigon al tiuj niaj amikoj? – mi senpacience insistis, observante la suferantajn estulojn, kiuj interŝanĝis insultojn kaj akuzojn.

– Ĉar, se kono ekstere helpas, nur amo interne helpas – trankvile daŭrigis la instruanto. Per nia kulturo ni kiel eble korektas efikojn, sed tiuj amantaj sukcesas atingi la profundajn kaŭzojn. Nu, niaj malfeliĉaj amikoj bezonas helpon en ilia interno, ke ili definitive ŝanĝu siajn mensajn sintenojn... Kaj ni ambaŭ nun konas, nesciante ami...

En tiu momento, iu ekaperis ĉe la enirpordo.

Ho! Tio estis ĉarma plenaĝa virino; ŝiaj okuloj disradiis mildan kaj ameman brilon. Mi kliniĝis kortuŝita kaj respektema. Kalderaro tuŝetis mian ŝultron kaj murmuris en mian orelon:

– Tio estas fratino Cipriana, portanta la dian fratan amon, kiun ni ankoraŭ ne akiris.

## V

### POVO DE LA AMO

La senditino alproksimiĝis al ni kaj nin salutis. Kalderaro ĝentile prezentis min.

Ŝi fikse rigardis la bedaŭrindan scenon kaj parolis al la Asistanto:

– Mi gratulas vin por la helpo, kiun vi ekde la lastaj tagoj donadas al la malfeliĉaj fratoj. Nun ni realigos la finan parton de la laboro, certaj pri la sukceso.

– Mia klopodo – humile aldiris la interparolanto – estis preskaŭ nula, kaj konsistis el nuraj antaŭpreparoj.

Fratino Cipriana afable ridetis kaj demandis:

– Kiel ni atingu la finon, ne irante de la komenco?

– Ho fratino! kono iomete povas, se oni ĝin komparas kun multo, kiun amo ĉiam povas.

Stranga esprimo montriĝis sur la fizionomio de la senditino, kvazaŭ tiuj diroj profunde vundis ŝian naturan modestecon. Kaŝante siajn proprajn meritojn, ŝi parolis:

– La Dia Sinjoro scias, ke mi ankoraŭ estas ne kapabla realigi tion, kion vi atribuas al mi. Mi estas malforta kaj neperfekta, kaj mi devas paŝi plu senfine por akiri la amon, kiu fortikigas kaj perfektigas.

Longe rigardante mian kunulon, ŝi diris plu:

– Ni frate kunlaboras ĉe la verko, kiu apartenas al la Plejalta. Mi esperas, ke la amikoj restu laborantaj, efektivigante la pli grandan servoparton, ĉar miaflanke mi nur plenumos la simplajn devojn, kiujn patrina koro povas realigi.

Tiel dirinte, ŝi venis al ambaŭ malfeliĉuloj kaj restis en teniĝo de preĝanto.

Kion tiu virino kun eksterordinara esprimo estus petanta de la Superaj Fortoj? Ravite mi sentis ŝian profundan sin-

cerecon, ŝian fidelan humilecon. Tiu preĝo, en kiu ŝi koncentriĝis dum kelkaj minutoj, satoriĝis per sublima povo, ĉar baldaŭ milda lumo venis de supro sur ŝian respektigindan frunton. Cipriana grade fariĝis pli bela. La diaj radioj fluantaj de la nevideblaj fontoj, envolvante ŝin, tute transfiguris ŝin. Mi havis la impreson, ke ŝia perispirita organaro sorbas la mirindan helecon, kiu akumuliĝis en ŝia interno.

Post kelke da sekundoj, brilega haloo ĉirkaŭis ŝin, kies sanktecon mi devis respekti. El ŝiaj okuloj, torako, manoj elfluis neintensa kaj milda lumo, kiu ne kaŭzis timon al mia surprizita retino. Ŝi estis bela, disradianta, kvazaŭ ŝi estis la materiigo de la madono de Murilo, danke al mirakla aperaĵo.

Antaŭ ŝia transfigurita persono, mi preskaŭ adorkliniĝis, ĉar forta estis mia emocio dum tiu neforgesebla minuto.

Ŝi direktis al ni nenian rigardon, eble pro humileco, dezirante kaŝi la altan pozicion, kiun ŝi ĝuis.

Ŝi etendis la manojn al la du malfeliĉuloj, ilin helpante per sia amema magnetismo, kaj mi ravite rimarkis, ke la povo de tiu supera virino modifis ilian vibran kampon. Ambaŭ sentis sin premitaj de la forto, ilin pelanta al kvietiĝo. Ili rigardis unu la alian kun neesprimebla miro, sentante respekton kaj timon, katenite de nedirebla kaj nekonata emocio... Iliaj okuloj respegulis en silento angoran demandon, kiam la senditino, alproksimiĝante, ilin delikate tuŝis sur la okulan regionon; mi miaflanke rimarkis, ke ili ambaŭ sentis pli fortan kaj videblan skuon.

Rekonante la dian povon, per kiu la senditino estis dotita, mi rimarkis, ke la malsanulo, parte liberiĝinta de sia korpo, kaj la senkompata persekutanto komencis vidi nin, kun nepriskribebla mirego. Ili forte ekkriis, poseditaj de surprizo, kaj, ĉar ĉiu el ni juĝas la aferojn laŭ la akiritaj konoj, ili pensis, ke ili estas vizitataj de la sublima Patrino de Jesuo: ili difinis la medion laŭ la religiaj nocioj, kiujn la mondo instruis al ili.

La malsanulo subite adorkliniĝis, posedita de nebridebla emocio, kaj disfandiĝis en abundajn larmojn. Kvankam perpleksa kaj konsternita, la alia sin tenis staranta, kvazaŭ la benata favoro en tiu horo estis nur por li mem.

– Ho Patrino de Ĉielo! – ekkriis la enhospitaligita kunulo, konvulsie ploranta – kial vi bonvolis viziti min, kiu estas krimulo? Mi hontas pri mi mem, mi estas nepardoninda

pekulo, ruinigita de mia propra mizero... Via lumo montras, en ĝia tuta denseco, la mallumon, en kiu mi vivas! Kompatu min, Sinjorino!...

En tiuj vortoj de ĉagreno kaj pento estis senlima sincereco kune kun akra doloro. Sufokaj singultoj sinsekvis, interrompante lian kortuŝan petegon.

Cipriana proksimiĝis al li, kun brilaj kaj malsekaj okuloj. Ŝi provis starigi lin, kaj ŝi ne povis levi lin de lia genua pozicio.

La kompatema misiistino certe informiĝis pri ĉiuj detaloj necesaj al sukceso de sia misio en tiuj minutoj, ĉar, patrinece ĉirkaŭbrakante lin, ŝi vokis lin laŭ la nomo kaj klarigis:

– Petro, mia filo, mi ne estas tiu, pri kiu vi pensas en la apogeo de viva konfido, vibriganta vian animon. Mi estas nur via fratino en la eterneco; sed mi ankaŭ estis patrino sur la Tero kaj scias, kiom vi suferas.

La alparolito levis la petegantajn okulojn, fikse rigardante ŝin, tra la dika vualo el larmoj. Kvankam videble kuraĝigita per la aŭditaj klarigoj, li tamen sin tenis en respekta kaj humila pozicio.

– Mi murdis homon!... – li ekkriis, faciligante sian koron.

La senditino karesis lian vizaĝon banitan de larmoj kaj aldonis:

– Mi tion scias.

Post kelke da tempo, dum kiu ŝi direktis sian ameman rigardon, jen al la interparolanto jen al la turmentanto, tenita de respekto en malgranda distanco, ŝi intence sin turnis al la malsanulo, tiel ke ŝi fariĝis aŭdata de la venĝanta kunulo:

– Kial vi, Petro, detruis la vivon de via frato? kiel vi juĝis vin kun forto kaj rajto por rompi la dian harmonion?

Komprenigante, ke ŝi aŭdis liajn plej internajn pensojn, ŝi daŭrigis:

– “Vi opiniis, ke vi faris justaĵon per viaj propraj manoj, kiam vi nur pliigis la detruantan koleron. Kial, mia filo, vi intencis ekvilibrigi la vivon, kaŭzante morton? kiel akordigi justecon kun krimo, kiam ni scias, ke la vera justulo estas tiu, kiu laboras kaj esperas al Dio, la Superega Donanto de Vivo? Antaŭ longe vi faris murdon, pensante likvidi ŝuldon per ŝprucoj de sango... Vi eliminis la korpon de amiko, fariĝinta nekomprenebla kaj malhumana; sed ekde tiu tragedia momento,

vi aŭdas la dian konsciencan, kiu ripetas la malnovan demandon: “Kain, kie estas via frato Habel?” (\*) Vi de longe vivas senkonsila kaj malfeliĉa, kun animo katenita al via propra viktimo, lernante, ke malbono neniam konformiĝos al bono kaj ke la leĝo postulas de tiu, kiu kontraŭas ĝiajn saĝajn kaj suverenajn ordonojn, duoblajn tributojn. Vi detruis pacon de kunulo kaj perdis vian propran trankvilecon; vi ruinigis lian fizikan portilon, sed iradas katenita al la via, ĝin sentante, kvazaŭ pezan ŝarĝon... Vi pensis, ke vi instruas juron kaj tordis vian destinon, danĝere kurbigante vian vojon, kiu povus esti rekta kaj prilumita. Timante vin mem, ĉar ĉie vi sentis vin krimulo, vi serĉis rifuĝejon ĉe laboro senorda kaj aŭtomatiga; vi akiris monon, kiu neniam pacigis vian animon; vi atingis kulminan socian pozicion inter homoj, ĉe kiu tamen vi vin sentas pli kaj pli malĝoja kaj forlasita... Kial vi, Petro ne pensis pri la sanktiga preĝo? kiel vi ne pentis antaŭ la vivo, humiliĝante ĉe la piedoj de via viktimo, kun sincera kaj efektiva intenco regeneri? vi preferis la frenezan kuron serĉe de eksteraj sensacoj, la fuĝon de la regionon de materia gajno, la paseman altiĝon al pozicio de trompa regado... Terurita, vi provis forkuri de via interna tribunalo, kie la spirita povo riproĉis vian kondamnindan konduton!

Sed neniam estas malfrue por levi la koron kaj flegi la vunditan konsciencan. Multe suferante, vi vin donis al malsano kaj proksimiĝas al frenezo. Kun vundita animo kaj malorda korpo vi turnis vin al la Dia Providenco kaj tial jen ni estas ĉi tie. Sed, mia amiko, ni ne uzas nian voĉon por vipi vian spiriton, jam tiel punitan de vi mem kaj tiel malfeliĉan! Ni venas al via renkonto por kuraĝigi vin je la regeneriĝo. Kiu povos iun kondamni, post kiam li partoprenis en la karnaj sortovicoj? kiu sentas sin sufiĉe pura kaj sanktigita por ĵeti la unuan ŝtonon, eĉ post kiam li trapasis la cindran limon de tombo? kiu el ni eble trapasis senmakule la fluojn de la ŝlimejo? Ho, Petro, la fundamento de la dia verko estas la senmezura amo. Ni troviĝas ĉi tie, ĉar ni amas vin, kaj ni intencas altigi vian konsciencan ĝis la senfinaj kampoj de la eterna vivo. Vi preĝis kaj vokis nin. Vi malfermis vian menson

---

(\*) Genezo, 4:9 – **La Trad.**

al la regenera forto, kaj ni estas viaj fratoj. En alia tempo multaj el ni ankaŭ penetris en la malluman groton de la valoj de hommortigo, de maljusteco kaj morto; sed ni haltis sur la vojo, abomenis krimon, lutis per larmoj la ringojn rompitaĵn de nia malprudento, kaj, kulturante pardonon kaj humilecon, ni lernis, ke nur amo savas kaj konstruas por ĉiam.

Memoru pri viaj propraj bezonoj, interrompu la marŝon de la aflikto, rekonsideru vian konduton kaj prenu alian kompromison antaŭ la Dia Justeco.”

Post longa paŭzo, Cipriana malfermis la patrinajn brakojn kaj aldonis:

– Stariĝu kaj venu al mi. Mi estas via spirita patrino en la nomo de Dio.

Kun brilaj kaj larmantaj okuloj la malsanulo stariĝis kvazaŭ infano kaj, nin kortuŝante, ekkriis:

– Ĉu mi meritis tiel grandan gracon?

– Kiel ne, mia filo? La Patro ne respondas niajn petegojn per kondamnaj paroloj. Ni venas al vi en la nomo de la Patro, nia Superega Sinjoro.

Tion dirinte, ŝi alpremis lin ĉe sia sino; sed estis tia amemo en tiu neatendita brakumo, ke aliaj ĉirkaŭstarantoj, krom mi, dirus, ke ili ĉeestas renkontiĝon de karesa patrino kun ŝia forestinta filo, post longa kaj dolora apartiĝo.

La malfeliĉulo klinis la kapon sur unu el ŝiaj ŝultroj, elmontrante senfinan konfidon kaj infane flustris:

– Patrino de la Ĉielo, neniu sur la Tero iam tiel parolis al mi...

Oni vidis lian ĝojon sur lia feliĉa mieno.

Cipriana bonkore kuraĝigis lin kaj klarigis:

– Estas nepre necese, ke vi kvietigu vian ekscititan menson, deponante la malnovajn afliktiĝojn en la manoj de la Sinjoro.

Tiam mi direktis al Kalderaro mian emocian rigardon kaj rimarkis, ke larmoj fontis ne nur el miaj okuloj. Mia kunulo ankaŭ havis larmojn abunde fluantajn sur sia flegma vizaĝo.

Tuŝite de mia silenta demando, li parolis per voĉo apenaŭ perceptebla:

– Plaĉu al Dio, Andreo, ke ni ankaŭ lernu ami por akiri la povon transformi korojn.

La senditino, kiu laŭŝajne ne rimarkis nin, aliris la turmentanton, subtenante Petro ĉe la brakoj, kvazaŭ li estis ia malsana infano. La persekutanto atendis ŝin, rektestaranta kaj fiera, montrante sin nesentebla por la paroloj, kiuj regis niajn korojn. La misiistino, anstataŭ timi, proksimiĝis al li, preskaŭ lin tuŝante kaj humile parolis:

– Kion do vi faras, Kamilo, tute fermita por la kompato?

Montrante nekompreneblan malvarmecon, la turmentanto kruele respondis:

– Kion povas fari mi, la viktimo, krom senkompate malami?

– Malami? – ree demandis Cipriana, ne ŝanĝiĝante. Ĉu vi scias la signifon de tia konduto? La viktimoj ne inklinaj al pardono kaj kompreno ordinare superas per hardeco kaj malico la kondamnitajn, kaŭzante hororon kaj kompaton. Kiom da homoj uzas tiun titolon por manifesti la monstraĵojn amasiĝintajn en sia animo! kiom da aliaj profitas la momenton de senpripensado de nescianta aŭ malfeliĉa amiko por komenci multjarcentan persekuton en la infero de kolero! Viktima kondiĉo ne donas al vi sanktecon; vi uzas ĝin por semi sur via propra vojo ruinon kaj mizeron, mallumon kaj rubojn. Petro sendube vundis vin en momento da frenezo, perdita en la iluzio de tumultema junuleco; sed, estante familia patro, laŭŝajne pripensa kaj prudenta homo, vi ne trovis en via spirito plej malgrandan fasketon da frata kompato por lin senkulpigi. De dudek jaroj vi altiras ĉirkaŭ vi vipuran venenon, aspektante malsata ŝakalo. Povante akiri gloron de la venkintoj kun la Kristo, vi preferis la venĝan ponardon, egaligante vin al la malmolkoraj malbonfarantoj. Ĝis kie vi iros, mia filo, kun viaj malŝatindaj sentoj? al kia murego da doloro vi estos manĉatenita de la Dia Justeco?

El la okuloj de Cipriana fluis dikaj larmoj.

Kamilo ŝanceliĝis inter nefleksebleco kaj kapitulaco. Ekstrema paleco kovris lian vizaĝon kaj, kiam laŭŝajne li estis trafite maltrafe respondonta, jen la misiistino direktiĝis al mia instruanto, humile petante:

– Kalderaro, mia amiko, helpu min konduki ilin. Ni iru ĝis la hejmo de Petro, kie Kamilo kontentigos niajn petojn.

Mia kunulo ne hezitis. Turninte sin al mi, li diris:



– Nia Fratino transportos Petron per siaj propraj rimedoj, sed la alia, terure sklavigita al siaj malsuperaj pensoj kaj al siaj krimaj intencoj, estas peza por transporto: ni ambaŭ lin konduku.

Donante al li niajn brakojn, Kalderaro dekstre kaj mi maldekstre, mi rimarkis, ke la paciento ne reagis; eble komprenante la vanecon de ia ajn ribelo, li konsentis esti forportata senproteste.

Tiel ni donis nin al rapida iro.

Post nemultaj minutoj ni penetris en komfortan loĝejon en kiu ia sinjorino, en la vizitoĉambro ion trikotis apud du malgrandaj infanoj.

La konversacio en la domo estis dolĉa, pura.

– Panjo – diris la pli malgranda – kie estas Neneko?

– Li revenis al laboro.

– Kaj Celita?

– En la kolegio.

– Kaj Markoĉjo?

– Ankaŭ.

– Mi deziras, ke ili ĉiuj estu ĉi tie, hejme...

– Por kio? – demandis la patrino, ridetante.

– Ĉu vi ne scias, Panjo? Por ke ni preĝu por Paĉjo.

Ĉu vi rimarkis hieraŭ vespere, kiel li aspektis afliktita kaj malvigliginta?

Ia ĉagreno montriĝis en la lumaj okuloj de la juna sinjorino, sed ŝi diris per firma voĉo:

– Ni fidu Dion, mia infano. La kuracisto rekomendas al ni trankvilecon kaj mi estas konvinkiĝinta, ke la Providenco elaŭdos nin.

Ŝi ĵetis inteligentan rigardon sur la knabon kaj akcente parolis:

– Iru distriĝi, Vilhelmo; iru ludi.

La malgranda Vilhelmo tamen apogis la dekstran brakon sur elementa lernolibro por unuaj literoj, meditante, kvazaŭ li nerekte sentis nian ĉeeston, dum la sinjorino subite forlasis sian trikoton por plori en ĉambro, en la distanco.

Ni kortuŝitaj observis la scenon, kiam Cipriana sin turnis al Kamilo hontigita:

– Ni daŭrigu. Nia amiko efektive detruis vian fizikan vivon, en alia tempo, kaj tiel li faris doloran ŝuldon; ĉu la

voĉo de tiu knabo sindoninta al preĝo ne emocias vian malmolkoran spiriton? ĉi tiu estas la hejmo, kiun la kriminta Petro starigis por varto de la renoviĝinta Petro... Li ĉi tie ĝislace laboras por rebonigi sin antaŭ la Leĝo. Kompreninte la teruran respondecon, kiun li prenis per la bato, kiu li senpripense donis al vi, li metis sin en senordan kaj senĉesan aktivecon, detruante siajn fikikajn centrojn. Antaŭ ol siaj kvindek jaroj en la surtera korpo, li jam montras evidentajn signojn de maljuneco. Se li faris gravan eraron, li tamen ĉion eblan faras por sin rebonigi en nobla kaj utila vivo. Li subtenis sindediĉan virinon en la edziĝa institucio, donis rifuĝejon al kvin infanetoj, penante ilin konduki al bono per honesta laboro kaj edifa studo. Petro sendube ricevis estimon de siaj amikoj, atingis riĉan materian pozicion; sed li nun scias el proprasperto, ke mono ne solvas fundamentajn problemojn de la destino kaj ke la alta reputacio, kiun ni povas ĝui ĉe aliaj ne ĉiam respondas al realo. Malgraŭ ĉiuj bonoj akiritaj sur la materia kampo, li jam de longe vivas malsana, malfeliĉa, afliktita... Malgraŭ tio, favoris lin lia laboro bonintence realigita, la danko de la edzino, kiu lin nobligas, kaj la preĝo de kvin dankemaj infanoj.

Kaj vi, kion vi faris? Dum precize dudek jaroj vi ne nutras alian deziron, krom ekstermi. La abomeninda venĝo jam de longe estas la ekskluziva celo de viaj detruantaj intencoj. Via sufero nun naskiĝas el la volupto de venĝo. Ĉu valoras la penon esti viktimo, ricevi la sanktigan palmon de doloro por tiom multe malsupreniri la ŝtuparon de la vivo?

La bonfarantino post mallonga paŭzo lin komplete rigardis kaj daŭrigis:

– Sed, Kamilo, nia energia parolo ne aŭdiĝas en ĉi tiu sanktejo, kvazaŭ definitiva juĝo. Vi super ĉio estas nia frato, meritanta nian amon, nian lojalan estimon. Vizitante, ni celas helpi. Eble vi rifuzos nian fratan helpon, sed ni fidas vian regeneriĝon. Ni ankaŭ en foraj tempoj restadis en la fatala interkrutejo, en kiun vi kondukis vin mem. Ni pasigis longan tempon, kvazaŭ venena serpento ĉirkaŭvolvita, atendanta okazon ekstermi aŭ vundi. Sed la Ĉiofavoranta Sinjoro al ni instruis, ke la vera libereco fontas el la perfekta oboe al Liaj sublimaj leĝoj kaj ke nur la amo havas sufiĉan povon por savi, altigi kaj elaĉeti. Ni ĉiuj estas fratoj, ankaŭ eraremaj,

infanoj de la sama Patro... Ni parolas al vi ne kiel anĝeloj, sed kiel regenerintaj homoj, pilgrimantaj al la Pli Grandaj Rondoĵ!

Estis tiel karesa tono en tiuj mildaj kaj saĝaj konsideroj, ke la persekutanto antaŭe malvarma kaj senkompata, forte ekploris. Malgraŭ tia aliiĝo, li levis la montran fingron al Petro kaj ekkriis:

– Mi deziras esti bona kaj tamen mi suferas! Turmentas min akraj suferoj. Se Dio estas bona, kial Li forlasas min?

Tiuj singultoĵ eksplodantaj el lia torturara animo, profunde vundis mian koron. Kiel detenus de ploro ankaŭ mi, tie, antaŭ tiu simbola sceno? Ĉu Kamilo kaj Petro, interligitaj de la krimo kaj elaĉeto ne reprezentas nin ĉiujn, homajn eraremajn estaĵojn? Ĉu Cipriana tolerema kaj patrineca ne estis personiĝo de la Dia Kompato, ĉiam inklina instrui per pardono kaj korekti per amo?

Aŭdinte la parolojn de la turmentanto, la misiistino rimarkigis:

– Kiu el ni, mia amiko, povos kompreni la tutan signifon de sufero? Vi demandas la motivon, kial la Sinjoro permesis ke vi travivas tiel krudan provon... Ĉu ne same estus demandi argilaĵiston pri la motivoj, kiuj pelas lin baki delikatan vazon en arda varmo, aŭ demandi artiston pri la celoj devigantaj lin marteladi la krudan ŝtonon por la majstroverko de statuarto? Kamilo, doloro ampleksigas la vivon, sinofero ĝin liberigas. Martireco estas problemo el dia origino. Provante solvi ĝin, la spirito povas altiĝi ĝis brila kulmino aŭ sin ĵeti en malluman abismon; ĉar multaj elprenas el sufero la oleon de pacienco, per kiu ili faras lumon por venki sian propran mallumon, dum aliaj eltiras el ĝi ŝtonojn kaj dornojn de ribelo, kun kiuj ili sin ĵetas en ombbron de profundegaĵo.

Rimarkante, ke la malfeliĉulo amare ploris, Cipriana daŭrigis post mallonga silento:

– Ekploru! Faciligu vian koron! Larmoj de pento havas miraklan povon sur la vunditan animon.

La senditino eksilentis dum minutoj. Ŝiaj tre lumaj okuloj nun ŝajnis vagantaj en malproksima pejzaĝo...

Ŝi preskaŭ aŭtomate prenis Kamilon en la brakojn, konservante la disputantojn alpremitaj al la brusto, kvazaŭ ŝi estis ilia komuna patrino.

Post kelka tempo ŝi turnis karesan rigardon al la turmentanto de Petro kaj daŭrigis:

– Vi diskutas la malbonon, kiu vundis vin, al la Providenco vi turnas vin kun malrespektaj esprimoj... Ho! Mia filo, silentigu la benon paroli, kiam vi ne povos servi bonon. Mi ankaŭ vivis sur la Tero kaj ne suferis, kiom mi devis, se oni konsideras la trezoron de prilumiĝo, kiun mi ricevis de la ĉielo per doloro. Mi perdis miajn revojn, hejmon, edzon, infanojn! La Sinjoro ilin donis al mi, la Sinjoro ilin reprenis. Miaj du knaboj estis murditaj en civila milito, en nomo de laŭleĝaj principoj; miaj du filinoj altiritaj de la allogo de plezuro kaj oro; ili mokis mian esperon kaj restadas en la malluma sfero, embarasate en danĝeraj iluzioj. Mia edzo estis mia sola amiko nun al mi restanta; sed kiam lepro atakis mian karnon, tiam li ankaŭ forlasis min, posedite de videbla teruro. Ĉiuj amatoj forlasis min, malaperis ĉiuj favoroj de la mondo; sed, dum miaj membroj malligiĝis de la putriĝanta korpo, kiam mi troviĝis tute forlasita de tiuj, kiuj estis al mi karaj, altiĝis interne de mi la kantiko de espero. Mia animo gloris la Sinjoron de la Vivo Triumfanta... Li iam donis al mi ĉiujn favorojn de la sano kaj juneco, poste reprenante tiujn bonojn, kiujn mi prunte konservis. Li senigis min je miaj amatoj, malfaris mian organisman ekvilibron, sendis al mi malsaton kaj doloron; sed kiam mia soleco fariĝis amara kaj kompleta, jen mia fido altiĝis pli klara kaj viva... Kion bezonis mi, mizera virino, krom suferi, por sanktigi mian esperon? kion mi ankoraŭ ne bezonos por atingi la superajn fontojn? Kiuj ni estas, krom fieraj vermoj kun malbone aplikita inteligento, al kiuj milmaniere manifestiĝas la Senfina Favorkoreco, sed vane?

Tiam siavice Kamilo genuiĝis.

El la torako de Cipriana brilis fasko da lumo, penetranta en lian koron, kvazaŭ lanco el klara lunlumo.

La malfeliĉulo, nun genuiĝinta, kisadis ŝian dekstran manon, en apogeo de emocia danko, malsekigante ĝin per larmoj.

– Jes – li diris, ploranta – tiamaniere vi ne parolus al mi, se vi min ne amus! Ne viaj vortoj konvinkigas min..., sed estas ja via sento, kiu min aliigas!

Same kiel okazis al Petro, li ankaŭ ekkriis:

– Patrino de Ĉielo, liberigu min el miaj propraj pasioj! Fortiru la mankatenojn, kiujn mi mem forĝis..., mi volas eviti miajn nigrajn rememoraĵojn..., mi volas foriri, forgesi, min doni al la regeneranta lukto, rekomenci laboron!

Cipriana konfidis al ni la malsanulon, kies densa korpo ripozis en proksima hospitalo, kaj ŝi kun triumfanta rideto de patrino amo prenis la eksperskutanton, murmurante:

– Benata estu vi, kiu aŭdis la peton de la savanta pardonon. La Patro vin benu por ĉiam! Ni foriru! La Providenco destinas por ni ĉiuj regeneran laboron...

Ŝi brakumis la naŭzan figuron de la eksperskutanto, alpreminte lin al sia koro kaj venis al ni, ĝentile alparolante:

– Fratoj, mi dankas vin pro via frata helpo. Nia suferanta amiko iros kune kun mi. Mi esperas loki lin sur kampo de regenera aktiveco.

Kaj antaŭ ol adiaŭi nin, ŝi diris al mia instruanto:

– Frato Kalderaro, mi atendos vian kunlaboron hodiaŭ vespere, por helpo al Kandida, kiu devos definitive “apud ni” reveni morgaŭ. Ni devas savi ŝian filinon el tuta frenezo.

La senditino foriris, kondukante la devojiĝinton kvazaŭ li estus altpreza ŝarĝo, dum nova lumo prilumis mian spiriton.

La Asistanto tuŝis al mi la ŝultron kaj parolis:

– La amanta koro estas ĉiam plena de renoviga povo. Foje diris Jesuo, ke ekzistas demonoj nur regenerablaj “per fasto kaj preĝo”. Iafoje, Andreo, kiel en ĉi tiu okazo, kono ne sufiĉas: la homo devas esti animita de dia forto, kiu fluas de fasto per rezigno, kaj de la lumo de preĝo, kiu fontas de la universa amo.

Ni pretiĝis rekonduki la malsanulon en la malsanulejon, kiam la dommastrino en promenvesto eniris la ĉambron kaj parolis al la infanoj:

– Pretiĝu. Ni vizitos vian paĉjon post nelonge.

Ni transportis Petron sur liton, kun plej eblaj zorgoj.

Li baldaŭ vekiĝis ridetante, plibonigita, preskaŭ feliĉa. Li vokis la flegistinon, montrante novan brilon en la okuloj. Li ne plu sentis la persistan doloron ĉe la brusto. Io – li pensis – forviŝis de lia kapo la nigraĵojn, same kiel la bonfara pluvo lavas kaj heligas plumban ĉielon.

Post horo lia edzino kaj la infanoj penetris en la ĉambron, partoprenante lian ĝojon.

Petro rakontis al ili, plorante de ĝojo, ke li havis lumigan sonĝon; li asertis, ke li vidis la Sanktegan Patrinon, kiu etendis al li siajn diajn manojn plenajn de lumo.

Lia edzino, aŭdante lin, verŝis abundajn larmojn de ĝojo kaj danko. Vilhelmo, la knabo plena de viva fido, prenis la patran desktran manon kaj ĝin kisis kun fida amo kaj danko al Dio.

Mi emocie observis la intiman scenon, en kiu la familio renkontis pacon, kaj mi rememoris Cipriana kun ŝia mirakla savanta influo kaj komprenis, ke virino sanktigita de sinofero kaj sufero aliĝas en portantino de la Dia Patrina Amo, kiu venas en la mondon por nobligi la senton de la homoj.

## VI

### FRATECA SUBTENŬO

Estis malfrua nokto kaj ni troviĝis ĉe la pordo de modesta ĉambro en malriĉa kuracejo.

Ĝentila fratino el nia sfero nin atendis ĉe la enirejo kaj afable nin salutis.

Kalderaro antaŭenpaŝis, demandante:

– Kaj Kandida? kiel ŝi fartas?

– Tre bone. Ŝi definitive devas esti kun ni morgaŭ nokte.

Fratino Cipriana komisiis min zorgi pri ŝi, ke ŝia elkarniĝo serene efektiviĝu. Mi opinias, ke nia sindona amikino jam devus esti veninta; sed laŭŝajne la filino, kiun ŝi postlasos sur la Terkrusto, postulas kelkajn antaŭzorgojn.

Ni eniris la ĉambron.

Sur lito, sinjorino antaŭtempe maljuniĝinta atendis morton.

Sur ŝia vizaĝo la fenomenoj de estingiĝo de la vitala tonuso estis videblaj.

Kandida, tiu fratino meritanta de ni tiom multe da kareso, ankoraŭ kateniĝis al sia korpo per tre delikataj ligiloj. Laŭ la dolĉa lumo, aŭreolanta ŝian frunton, disradiana el ŝia propra menso, mi rimarkis la grandecon de ŝia animo, ŝian serenon heroecon.

Apud ŝi junulino kun pala vizaĝo kaj malfortiĝinta korpo karesis ŝian grizan hararon, iam kaj iam forviŝante siajn larmojn kontinue fluantajn.

La Asistanto montris ŝin al mi, informante:

– Tio estas la filino, kiu adiaŭas. Ni aŭdu ilin.

Kandida malfacile kuraĝigante ŝin, diris emociite:

– Julieta, mia infano, gardu vin. Vi eble scias, ke mi ne plu elitiĝos. Mi timas postlasi vin forlasita al batoj en la mondo, sen amikaj manoj...

La junulino estis gorĝpremita. La abundaj larmoj evidentigis ŝian eksterman doloron.

La patrino, apenaŭ bridante la emocijon, ameme daŭrigis:

– Miaj filoj forlasis nin. Ni estas solaj kaj devas pensi. Mi vidas vin maltrankvila kaj pli afliktita en ĉi tiuj lastaj tagoj. Mi havas la impreson, ke la mono ne estas sufiĉa por niaj elspezoj. Kio do okazas? Mi de longe estas peza al via juneco! Sed mi plu fidas Jesuon. Mi ĉiutage petas de la Sinjoro, ke Li ne ĉesu subteni nin. Mi timas, ke via destino devojiĝu de la rekta vojo pro mi... Mi timas, infano, ke en aliaj okazoj vi fine freneziĝu...

Kaj post mallonga paŭzo, dum kiu ŝi pli ameme premis la dekstran manon de la junulineto, kiu ŝajne aĝis ne pli ol dudek jarojn, la malsanulino daŭrigis:

– Aŭdu, mi petas: Vi scias, ke en la lastaj monatoj la elspezoj estas grandegaj. La operacioj, kiujn mi spertis, estis delikataj kaj longaj. La kontoj estas gigantaj. Kaj la mono? Trankviligu min, kara!

La fraŭlino forviŝis la abundajn larmojn kaj informis:

– Ne afliktiĝu, panjo. Ni havas tion necesan. Mi laboras.

– Sed per kudrado vi tiel malmulte enspezas! – diris la malsanulino per senespera tono.

– Ho! ne tiom ĉagreniĝu! Krom niaj ordinaraj rimedoj, ni ankaŭ havas malgrandan prunton. Post kelkaj monatoj ĉio reprenos sian normalan ritmon.

– Dio tion konsentu.

Post pli longa paŭzo, la malsanulino demandis:

– Kie estas Paŭleno?

La filino ruĝiĝis kaj honte respondis:

– Mi ne scias, panjo.

– Ĉu vi longe ne intervidiĝas?

– Ne – timeme denove respondis la junulino.

– Mi deziras vidi lin. Mi timas morti subite... kaj mi ne vidas personon, de kiu mi petu helpon por via juneco. Kio do estos al vi tute sola, vivanta laŭ plaĉo de la cirkonstancoj? La mondo estas plena de malicaj homoj, atendantaj okazajn krimi...

Tiam, el la lumaj okuloj de Kandida ekfluis kelkajn larmoj, kiuj dolorigis mian koron.



– Se mi mortos, mia infano – ŝi daŭrigis per kortuŝa tono –, ne lasu vin esti trenata de tentoj. Serĉu vivrimedojn per nobla laboro, ne impresu vin la promesoj de la facila vivo. Vi scias, ke mia vidvineco estigis al ni terurajn malfacilaĵojn, via patro tamen postlasis al ni honestan malriĉecon plenan de benoj. Vere viaj fratoj, altiritaj de la materiala gajno, pelis nin al forlaso, al forgeso, sed mi neniam pentis pri miaj humileco kaj laboro... Frue mi perdis mian sanon kaj baldaŭ elreviĝoj dolorigis mian koron; sed sur ĉi tiu silenta kaj dolora litaĉo, paco estas beno de mia animo kaj mi rekonas, ke ne ekzistas pli granda bono, ol trankvila konscienco... La Sinjoro konas la motivojn de niaj suferoj kaj senhavaĵoj, kaj koncernas nin nur laŭdi Lin... El ĉio, kio suferigis min, mi kunportas trezoron, vian sindonemon, mia infano. Via amo riĉigas min. Mi mortos feliĉa, sciante, ke la filina koro memoros min sur la Tero per preĝoj de amo, kiu neniam mortas... Sed, Julieta, mi deziras, ke vi estu bona kaj dolĉa ne nur al mi; ankaŭ obeu Dion, dediĉu al Li amon kaj konfidon. Li estas nia Patro de Senfina Boneco kaj de ni Li petas nur simplan koron kaj puran vivon. Alkonformiĝu, infano, al la diaj planoj, en la kirlo da homaj provoj, kaj ne malkuraĝiĝu!

– Ho panjo! ne daŭrigu! Ni ĉiam estos kune. Vi ne mortos. Ni vivos unu ĉe alia, ni neniam apartiĝos... Trankviliĝu! mi volas vidi vin ne afliktita... Ĉio forpasos. La doktoro promesis al mi komenci pli energian kuracadon. Ni fidu!

Kandida faris malgajan rideton, karesis la manojn de la junulino kaj diris:

– Dankon, mia infano! mi estas trankvila kaj feliĉa...

Poste ŝi rigardis la montrilojn de la proksima horloĝo kaj diris plu:

– Foriru trankvile! la horaro de nia interparolo finiĝis.

Emociite ili sin kisis. Kaj Julieta, post amema adiaŭo, foriris.

– Ni sekvu ŝin – atente diris Kalderaro; ni devas helpi ŝin per magnetismaj rimedoj. Pri tio mi ricevis instruojn de Cipriana.

Sur la vojo la instruanto rakontis al mi la historion de la agoniantino:

“Kandida vidviniĝis tre juna, kun tri infanoj: du knaboj kaj Julieta, kies edukado trudis al ŝi amaran rezignon pri la

bonoj de la vivo. Ŝi rezignacie kaj kuraĝe luktis, laboris kaj suferis. La filoj, kiujn ribeligis la malriĉeco de la patrina hejmo, forlasis ŝin, irante al malproksimaj centroj por kontentigi la malpli edifajn impulsojn de sia juneco. En sia simpla ekzistado persistis la vidvino, sindoninta al la preparado de la estonteco de sia filino. Kandida lernigis al ŝi la kudrilajn laborojn, kaj la filino tuj fariĝis bonega kudristino, sed post nemultaj jaroj da pli krudaj provoj la kompatinda patrino falis malvigla sur liton. Enhospitaligita, ŝi spertis diversajn operaciojn sur sia organa kampo, sed sen kontentigaj rezultatoj. Tiel afliktanta fariĝis la situacio, ke ŝia internigo en hospitalo jam daŭris dek longajn monatojn. Komence Julieta per si mem sukcesis pagi la elspezojn. Sed kun la paso de la tempo la kompatindulino travivis teruran duelon inter necesbezono kaj malvigliĝo. Elĉerpitaj la eblaĵoj, kiujn ŝi disponis, ŝi penis helpi sin per parencoj, kiuj singardaj ŝin evitis; ŝi petis pri helpoj amikojn, kiuj sin montris indiferentaj.

“La elspezoj tamen ĉiam kreskis senĉese. La kudrado ne donis al ŝi la necesan kompenson. Ŝi ĉiutage, en la krepusko vizitadis sian patrineton, informigante pri la situacio fariĝanta pli kaj pli grava. Pelita de doloro ŝi frapis ĉe ĉiuj pordoj kaj ĉiuj pordoj restis fermitaj. Nekapabla esplori tiun situacion, en ĝia tuta profundeco, kun sia patrino, kiu memkompreneble ne deziris ŝian sinoferon, Julieta cedis al insida invito. Ŝi ekuzis la vesperon por labori en amuzdomo ekskluzive celante ricevi pli da mono; ŝi kantos kaj dancos por pliiĝi la enspezon.

“De tiam ŝi ludis la rolon de ŝafino sieĝita de rabobestoj, kaj kvankam kiel eble plej multe ŝi rezistadis al voluptoj, ŝi tamen en ia cirkonstanco ne sukcesis eviti la altrudojn de la plezuroj de la sensoj. Allogite de proponoj de iu viro, tiu sama Paŭleno, kiun aludis ŝia patrino, ŝi ne havis forton por malcedi: akceptis lian antaŭtempnan protekton. Ŝi forlasis sian kudromaŝinon kaj transloĝiĝis de la modesta ĉambro, en kiu ŝi mizere vivis. Ŝi tiam ekloĝis en la centro de la noktaj amuzoj, kaj, kiam ŝi iris en aliajn lokojn, tiam ŝi tion faris, akompanate de li, interesata profiti el ŝiaj juneco kaj beleco, kiel vantema sinjoro, montranta juvelon.

“Julieta tamen kaŝis la realon for de la patrinaj okuloj. Ŝi modeste sin vestis por la ĉiutaga vizito, kaj kiam ŝi la

unuan fojon estis akompanata de Paŭleno, en la hospitalo, ŝi prezentis lin al Kandida, kiel simplan amikon.

“Sed la sinsekvaj afliktiĝoj de la junulino difektis ŝian sanon. Ŝi estis malvigla, malsana. Rememorante la patrinajn ekzemplojn, ŝi spertis dolorajn konsciencajn maltrankvilojn. La malnoblaj plezuroj ne faciligis ŝian senteman kaj ameman koron. La abunda mono tute ne malpliigis ŝian ĉagreniĝon. Laŭmezure kiel ŝi konkeris la aliulan admiron al siaj fizikaj dotoj, ŝi ŝajne perdis la pacon de si mem. Katenite de neforigebla malvigliĝo, ŝi pasigis tagojn kaj noktojn sub energiaj riproĉoj de sia propra konscienco. Kial ŝi ne restis plu en sia modesta vivo ĝis la fino? kial ŝi ne konfesis ĉion al sia kara patrino por ricevi la necesan konsilon? Ŝi siaflanke sentis sin senkulpa: ŝi bezonis financan helpon de Paŭleno por subteni tiun, kiu donis al ŝi la vivon; ŝi iris al ĉiuj homoj, ŝajnintaj al ŝi honestaj kaj komprenemaj, sed ĉiuj manoj restis fermitaj antaŭ ŝiaj petoj... Ĉu ŝi ĝuste kondukis? Ŝi ne kuraĝis sin doni al preĝado, kiel en antaŭaj tempoj. Ŝia menso baraktadis ĉagrenita inter la postuloj de la materia mondo kaj la superaj interesoj de la spirito.

Sed – ĝentile finis Kalderaro – la patrinaj preĝoj akompanis ŝin sur ŝia glata vojo. Kaj Kandida ne vane suferas. Fidela kunlaborantino ĉe multe da servoj, ŝi indas multe da benoj...”

Informiĝinte pri tiu dramo komuna al pluraj junulinoj en la nunaj tagoj, mi sekvis la instruanton ĝis la ĉambro, en kiu Julieta ricevos lian helpon al sia psika organismo en konfuziteco.

Rememorante la vortojn eldiritaj de la patrinaj lipoj, la junulino sidiĝis sur divano, en konvulsia ploro. Torturantaj pensoj kunpuŝiĝis en ŝia malsana cerbo. Pezaj vibroj, kiuj karakteriziĝis per malhela koloro, malsupreniris de la frunto kaj fiksiĝis en la spiraparato. Ili amasiĝis en la pleŭro, invadis la alveolojn kaj de tie iris en la koron, influante sur la sangajn ŝanĝojn, kiam la fluideca substanco de la mensaj emanaĵoj forviŝiĝis absorbata de la arterioj. Mi rimarkis, ke tiu materialo, devenanta de la konfuzita menso, penetrante en la fiziologian meĥanisman, estis asimilita de la sango, kiu siavice ĝin redonis al la fizika cerbo, amasiĝante sur ĉiuj ĝiaj regionoj plej proksimaj al la griza substanco.

Tial mi observadis la junulinon, ne nur ŝiajn ruĝajn kaj ŝvelintajn okulojn, sed ankaŭ la prodromojn de la plej gravaj organaj perturboj.

Konstatinte la manifestiĝantaj perturboj en la cerbo kaj en la rakia bulbo, mi ekrigardis mian instruanton kaj demandis:

– Ĉu ni ne estas ĉi tie antaŭ la origino de la letargia encefalito?

– Antaŭ multe pli ol tio – respondis Kalderaro, ridetante –; la konfuzita menso elĵetas detruantajn fortojn, kiuj povantaj atingi aliajn homojn, unue trafas la organismon de la elĵetanto. Elektinte specon de vivo, kaŭzanta fortojn kaj kontinuajn konfliktojn en sia menso, Julieta komencis elĵeti fatalajn energiojn kontraŭ si mem. Dotite de distingiĝa edukiteco, ĉerpita el kontakto kun sia patrino, kiu plibonigis ŝiajn konceptojn kaj nobligis ŝiajn sentojn, ŝi venis en konflikton kun ekzistado de pli malalta nivelo sur la Terkrusto: la preparado de spirito nevarie prilumas. Tial, posedante subliman internan lumon por la homa irado, ŝi memkompreneble ricevus pacon, ĝojon kaj edifon el la praktikado de siaj virinaj kapabloj, se nur oni donus al ŝi kampon de lukto, sur kiu ŝi sentus la sanan manifestiĝon de la povoj de sia animo. La digna edziniĝo estas la rekomendinda kampo por ŝia ekzemplo de virino nobligita de kono kaj virto. Cedante al la tentoj, de kiuj ŝi estas viktimo, ŝi sin intime sentas falinta sur ŝtuparon malsupren. Ŝi ĉiutage, en silento, estas devigita rememori la ekzempladon de sia patrino, rekonsideri sian propran konduton antaŭ la vivo kaj rekoni, ke ŝi estas for de la ĝusta vojo. En tiu senĉesa konflikto pligravigita de la malbonegaj fluidecaj elradioj el la medio, de kiu ŝi fariĝis ordinara vizitintino, ŝia menso malsupreniras en la regionon de la instinktaj impulsoj, sentante plej grandan malfacilon supreniri en la kastelon de superaj konoj, kie la lumo de konscienco faras al ŝi insistajn petojn, ke ŝi revenu al simpleco kaj harmonio. Tia situacio malebligas al ŝi fervoran, sanktigan kaj regeneran preĝon kaj el tio venas la haoso, en kiu la kompatinda ŝanceliras. Ŝi estas sufiĉe edukita por rikolti ian ajn profiton el la medio, en kiun ŝi ventkape ĵetis sin, kaj regata de la konstanta ĉagreniĝo, ŝi faras troan premon al la griza materio, kaŭzante bedaŭrindajn organajn malekvilibrojn.

Kalderaro dum kelke da sekundoj interrompis sian instruadon, kvazaŭ profesoro malfermanta vojon por pripensado de sia lernanto kaj serene diris plu:

– Ŝi do ne estas minacata de letargia encefalito; ŝi najbariĝas al frenezo post stadioj en variaj perturboj, kaŭzita de ĉela misfunkcio. Ne nur tio. Julieta, en la cirkonstancoj, ĉe kiuj ni ŝin observas, povos esti atingita ĉe aliaj vivaj centroj. Ŝi estas trafebla por pleŭrito, antaŭĉambro de tuberkulozo. Ŝi facile estos viktimo de sangovenenadoj, kiuj karakteriziĝos per nedifineblaj malsanoj de vaskuloj aŭ de epidermo, ne inkluzivante la fatalajn malharmoniojn de hepato, eblaj portantoj de ruino kaj morto al la densa korpo.

Post tiuj lastaj klarigoj la instruanto levis la okulojn kaj konsideris:

– Sed... la dia justeco neniam malrekonas la kompaton. Nia neatendita falo iafoje estas nura parta akcidento, en kiun la malespero nin trenas. La Eterna Saĝo esploras la celon de niaj agoj kaj ĉiam, kiam eble nin tuj restarigas. Nur kiam ni enprofundiĝas en la tutan eklipson de amo kaj racio, intence evitante la procesojn de dia helpo, nin tenante en la nigraj mallumoj de malamo kaj neado, ni tiam renkontas absolutan malfacilecon ricevi savantajn influojn; ni tiam devas atendi la kruelajn korektojn de la tempo, kune kun la altrudaj fortoj de la universaj leĝoj. Se la junulino ne povas altiĝi al superaj regionoj, kvazaŭ birdo vundita de pafado de senkompata ĉasisto, ŝia patrineto restas plu en potencaj renovigantaj preĝoj. La filino malnobliĝis por helpi la patrinan korpon, sed Kandida altiĝis por savi ŝian animon. Pro tio, la ama povo de Cipriana agos en ĉi tiu nokto.

La interparolanto eksilentis, submetante la larmantan junulino al la magneta helpo el nia mondo, senigante ŝin de ioma kvanto da malhela materialo sekreciita de ŝia propra menso kaj amasigita laŭlonge de ŝia cerbo, kion li efektivigis sen menciindaj malhelpoj. Sed, ĉar li restigis iom da tia substanco en la cerbujo, mi demandis lin pri la kaŭzo de tiu lia decido.

La amiko faris signifan fizionomian esprimon kaj klarigis:

– Mi ricevis instruojn rilatajn al la afero. Julieta ne devas ricevi hodiaŭ nian tutan helpon. Ŝi devas esti plu korpe malsana por forresti for de la noktaj aktivecoj, kiujn ŝi ordinare

praktikas. En nemultaj horoj ŝi estos konduktita kune kun Paŭleno, en spirito, al la ĉambro de Kandida, kie fratino Cipriana deziras sin turni al li, profitante liajn rapidajn horojn de nekompleta malligiĝo pro dormo.

Mi ĉion komprenis kaj ankoraŭfoje admiris la imanentan ordon en la sfero de la spirito.

Poste Kalderaro kondukis min al helpa servo al suferanta frato, kies problemo ni ekzamenos en la sekvanta ĉapitro, por ke ni ne apartiĝu de la proceso de helpo al Julieta.

Ĉirkaŭ la dua, meze en la frumateno, la instruanto revenis kun mi en la modestan ĉambron de Kandida; ĉi tiu ekster sia malgrasa materia envolvajo, ripozis sur la brakoj de Cipriana, kiu karesadis ŝian frunton, kun patrina amemo.

La malsanulino, en ekstrema klarmenso, for de sia fiziologia kampo, respondis niajn salutojn, trankvila kaj feliĉa. Aliaj amikoj estis apud ŝi, ŝin konsolante por la definitiva transpaso.

Kiam ni plezure interŝanĝadis impresojn, jen du fratoj el nia mondo penetris en la ĉambron, kondukante Julietan kaj sinjoron, kiun mi intuicie identigis.

Kalderaro konfirmis, klarigante:

– Tio estas Paŭleno, kiu venis nin aŭdi.

Antaŭ Cipriana tenanta la malsanulinon sur siaj brakoj, ili ambaŭ instinkte surgenuiĝis, kortuŝite plorante. Helpate de la magneta servo de la senditoj, kiuj ilin alportis al ni, ili rigardis nin ĉiujn, kun forta miro, sed rimarkinde estas, ke la lumo de nia bonfarantino-instruistino altiradis ilian pli grandan atenton. Ili sentis sin humiligitaj kaj afliktitaj. Ili tie rekonis ion de la ĉiela povo.

Ili sin tenis konfuzitaj kaj larmantaj, kiam Cipriana sin turnis speciale al la junulo:

– Paŭleno, mi parolas al vi en la nomo de la Dia Justeco. La Sinjoro vin benu, ke vi aŭdu min per la aŭdopovoj de la racio! Aŭdu do! Ĉu vi ne opinias Julietan inda je via vigla kaj laborema brako por la surtera vojiro? Kion vi faras el via juneco? ĉu simplan aventuron de viaj sentumoj? ĉu vi ne komprenas la homan sperton, kiel preparan vojon por la eterneco? kian juĝon vi faras pri la vivo kaj ĝiaj sublimaj donoj? Ne partoprenu en la sendanka laboro de niaj malpli klarmensaj fratoj, kiuj intencas aliigi virinon en malfeliĉan

kobajon por ĝuo de la sentumoj. Nobligu vian homan ekzistadon, honorante la sanktan virinan mision. Vi renaskiĝis sur la Tero, protektata de virina sindono, vi kreskis sub la patrinaj zorgoj, kaj vi ankoraŭ trovos la virinon, kiel amatan vazon por viaj revoj de krea patreco. Kial vi persistas en la vantema regado super kompatinda infano pro nura impulso de egoismo kaj sinmonro? Ĉu vin ne kortuŝas rigardi la longan afliktiĝon de Kandida, turmentata de kruela doloro antaŭ la konsterna necerteco pri la estonteco de sia filino? Vekiĝu por viaj devoj de supera karaktero. Vi venis en la mondon ne tute simple por ĝuamo. La tera ekzistado, mia amiko, estas benata kolegio por renoviga prilumiĝo. Kiaj motivoj pelas vin al kondamninda konduto? Vi estas bonkora kaj utila, inteligenta kaj nobla. Kial vi evitas la sanktigan respondecon?

En tiu momento Paŭleno, kiu ploradis sub nebridebla emocio, ne respondis, sed elradiis pensojn fariĝintajn klaraj por ni.

Li ne hezitus koncerne edziĝon – li pripensis, rezonante; sed li trovis Julietan ekster ŝia doma sanktejo. Li konatiĝis kun ŝi en rondo da malpli respondecaj personoj, en klimato de sugesto ne invitantaj al la spirita altiĝo. Ĉu ne estus prudente sin defendi? ĉu ne estus devo organizi la hejmon sur pli firmaj bazoj? Li iris al la junulino en dumnokta klubo. Li trovis ŝin sen hejmo.

Fratino Ciprianan kaptis liajn konsiderojn, ĉar ŝi firme daŭrigis post mallonga paŭzo:

– Antaŭ via kriterio de nobla homo, la afliktiĝoj de Julieta faras ŝin inda je pli granda subteno. La kompatindulino ne iris al diboĉejo por malpli dignaj amuzoj, nutrante flankajn intencojn. Ĉu vi eble ne konas la absorbajn zorgojn de sindona filino? ĉu vi ne scias, ke ŝiaj piedoj serĉas laboron kaj apogon, protekton kaj monrimendon? Dum vi interesiĝis pri nura distro por via senfara menso, Julieta travivis humiligojn, provante perlabori por aĉeti la necesan medikamenton por sia malsana patrineto... Kiel vi povos senkulpigi vin mem kaj kondamni ŝin? kun kia rajto vi mokis la respektindecon de junulino strebanta al tiel sanktaj celoj? Ĉu ekzistas fieco en la Suno, kiam ĝiaj radioj incidas sur ŝlimejon? ĉu lilio kulpas pro tio, ke ĝi ornamas kadavron? Paŭleno, forskuu de via dormanta konscienco la homajn facilajojn! vi ankoraŭ ne suferis, kiom

vi devas por sanktigi kaj ami la vivon. Ne malprofitu la oportunan okazon, kiu sin prezentas al vi! Kunlaboru por la rebonigo de juna virino, kiu ekaperis sur via vojo ne per nura hazardo. Amo kaj konfido ne estas verkoj de improvizo: ili naskiĝas sub dia beno, ili kreskas kun la lukto kaj firmiĝas en jarcentoj. Simpatio en la plimulto da okazoj estas konstruaĵo efektivigita dum jarmiloj. Vi ne irus al Julieta, kun tia altireco, se ŝi ne partoprenus en via spirita pasinteco. Donu vin al ŝi, savu ŝin de frenezo kaj senutileco. Donu al ŝi vian brakon de edzo, honorante la vivon, antaŭ ol la morto disrompu vian fizikan vazon per siaj nevideblaj manoj. Estas pli noble doni ol ricevi, pli bele ami ol esti amata, pli die sin oferi ol uzurpi aliulajn oferojn. Ne kaŭzu al vi ĉagreniĝon la monda kritiko. La homa socio estas respektinda sur siaj fundamentoj, sed maljusta, kiam ĝi ekstermas la ĝermojn de spirita regenero por la supera vivo, sub preteksto sin antaŭgardi. Venu al ni, Paŭleno! La Sinjoro benos vian indan konduton. Kandida morgaŭ travivos la lastajn horojn de sia nuna ekzistado. Donu al ŝi pacon, restarigante ŝian trankvilecon pro la multa afliktiĝo teni la filinon en respektinda pozicio. Ne permesu, ke la amo malvirtigu en via animo. Sanktigu ĝin per via respondeco, fortikigu ĝin per viaj naturaj dotoj, kaj la Providenco estos ĉe via flanko dum la tuta tempo.

La instruantino eksilentis, sed de ŝia koro eliĝis radioj de safirkolora lumo, envolvanta la tutan junulon.

La junulo levis la larmantajn okulojn, ŝin danke rigardante kaj diris:

– Mi ricevas vian parolon, kvazaŭ ĝi venis el mia Ĉiela Patrino. Faru do el mi tion, kio al vi plaĉos. Mi estas preta...

Cipriana ameme metis Kandidan en la fizikan envolvajon kaj sin turnis al la juna paro kaj aldiris:

– La Patro benu nin ĉiujn.

Julieta kaj Paŭleno estis rekondukitaj en la ĉambron, el kiu ili venis, kaj ni niaflanke plilongigis nian restadon en la ĉambro de la malsanulino por helpo ĉe la “elkarniĝa proceso”.

Je la oka matene Cipriana senigis ŝin je pli granda parto da fortoj. Vokite de la postenanta flegistino, la kuracisto prognozis ŝian proksiman morton.



Ĉar estis petita la ĉeesto de ŝia filino, la junulino alvenis post tagmezo, kaj ŝin sekvis Paŭleno videble emociita.

Kiel ja bele estas observi la nerektan influon de la supera mondo sur la surterajn kunulojn!

Kiel ili kondutis dum la horoj da karna dormado, tiel ili ambaŭ, observante la respektinda sinjorino meze en agonio, surgenuiĝis larmantaj, preskaŭ en sama pozicio de antaŭ kelkaj horoj.

Kandida en peteganta sinteno fiksitis la rigardon sur la junulo kaj malfacile parolis al li dum Cipriana tenadis ŝiajn energiojn, kun sia dekstra luma mano super ŝia kapo. La agoniantino emocie komentariis la angoron, kiu turmentis ŝian spiriton. Ŝi timis postlasi sian filinon en la mondo, sub la kaprico de la tentoj. Ŝi petis helpon de la nobleco de Paŭleno, kiu ne lasis al ŝi fini. Kun okuloj plenaj de larmo, li almetis la montran fingron al la lipoj de la respektinda mortantino, kaj li ŝin konsolis:

– Sinjorino Kandida – li ĝentile diris – ne parolu plu pri tio. Mi hodiaŭ vekiĝis kun neformovebla intenco: Julieta kaj mi geedziĝos post nemultaj tagoj. Ni morgaŭ mem komencos proceson fari laŭleĝa nian kompromison, antaŭ ol ia cirkonstanco intervenu por malhelpi niajn dezirojn. Restu do trankvila. De nun mi ankaŭ estas via filo.

La agoniantino, abunde plorante, faris signon.

Julieta alproksimiĝis al ŝi, dum Paŭleno alpremis la vizaĝon al ŝiaj haroj antaŭtempe blankiĝintaj. Tiam Kandida, subtenate de Cipriana, kuniĝis iliajn manojn, per simbola gesto kaj ilin tre kortuŝite kisis.

Tiu estis ŝia lasta movo en la lacega korpo. Post nemultaj minutoj la fizikaj palpebroj fermiĝis por ĉiam, dum ŝiaj spiritaj okuloj malfermiĝis inter ni, por rigardado de la lumantaj vojoj en la Eterneco.

## VIII

### SAVA PROCESO

Forirante de la hospitalo en tiu nokto, kiu antaŭis la elkarniĝon de Kandida, la Asistanto diris:

– Ni ne perdu tempon.

Efektive, la laboro de helpo al la estiminda malsanulino okupis nin dum kelkaj horoj.

– Nia klopodo – diris plu la estiminda amiko – celas ĉefe malhelpi la efektivigiĝon de la procesoj de frenezo. La centroj de spirita subteno por tiu afero estas preskaŭ sennombraj. La pozitiva elmondo de mensa konfuzo ĉiam estas fino de longa lukto. Vere ni ĉi tie ne citis la pure fiziologiajn kazojn, precipe tiujn de invadoj de sifiliso al la cerba materio; ni parolis pri la intimaj dramoj de introvertitoj katenitaj de malekvilibro, de fenomenoj de malevoluo, de pasiaj tragedioj, kiuj estas okazintaĵoj ĉiusemajne eksplodantaj pomile. En la sferoj, tuj sekvantaj tiun de lukto de la ordinara homo, en kiu ni nun troviĝas, estas sennombraj tiaspecaj helpaj organizaĵoj. Estas nepre necese, ke ni subtenu la homan menson sur la terkrusto, ĉe ĝiaj naturaj delokiĝoj. La vasta surtera lernejo postulas senĉesan kaj kompleksan spiritan kunlaboron. La Dia Saĝo ne malzorgis la anticipan planon de servo en tiu rilato. Se ĝi komisiis la Sciencon gvidi la harmonian disvolviĝon de la fenomenoj rilataj al la fizika sfero, se ĝi ordonis al la Filozofio akompani tiun sciencon, pliriĝigante ĝiajn intelektajn valorojn, ĝi tamen konfidis al la Religio la taskon zorgi pri la progreso de la animo, favorante ĝin per benataj lumoj por la klopodo de altiĝo. La religia kredo tamen en la lastaj jaroj montriĝas nekapabla por tia misio: mankas al ĝi taŭga personaro. Dum la scienca konstruaĵo en la mondo prezentiĝas,

kiel giganta arbo tenanta en siaj branĉoj plenaj de teorioj kaj rezonoj la enkarniĝintajn inteligentojn, la Religio dividita en sektojn donas la ni ideon pri mola herbo, velkanta sur grundo. La Dia Amo tamen scias pri la malhelpoj humiligantaj la rondojn de fido. Se al la esplorado de kono sufiĉas la intelekta voloro, la religia problemo postulas altajn kapablojn de sento. La unua postulas observadon kaj persiston, sed la dua neprigas tendencon al rezigno. Pro tio, kunhelpante kun la decidemaj laborantoj, sennombraj legioj nevideblaj por la homaj okuloj ĉie sindone laboregas, helpante la suferantojn, stimulante tiujn, kiuj firme esperas ĉe bono, ĉiam pliboniĝante. Nia klopodo do ĉe la enkarniĝinta menso estas ampleksa kaj kompleksa. Sed oni devas konsenti, ke, se la programo donas motivaĵon por zorgoj, ĝi ankaŭ estas fonto de plezuro. Ni spertas ĝojon de pli aĝaj fratoj kapablaj doni helpon al tiuj pli junaj. Nedis-kuteble, ni, la homaro, formas unu nuran familion.

Post natura paŭzo post la klarigoj de Kalderaro, mi scivole demandis:

– Kiel do okazas la apliko de tiaj helpoj? Ĉu hazarde?

– Ne – klarigis la demandito –, ordemo kondukas nian aktivecon, en ĉiuj cirkonstancoj. Preskaŭ ĉiam estas ja la intervena forto, kiu kaŭzas la helpoprocetojn. Preĝo reprezentata de ne manifestiĝinta deziro, de internaj aspiroj aŭ de deklarataj petoj, venanta de supera regiono aŭ de profunda valo, kie agitiĝas la homaj pasioj, estas ĝustadire la ĉefa motivo de niaj agadoj.

Mi deziris formuli ian demandon ligitan al malnovaj konceptoj pri religia aparteco, kiam Kalderaro, komprenante mian penson tuj esprimotan, trankvile aldonis:

– Ni ĉi tie ne aludas la preĝojn aŭ aspirojn de iaj idealistaj fluoj: nomo ne gravas. Ni kunlaboras kun la eterna spirito, supreniranta al la dia regiono, alportante novajn fortojn al bono, kie ajn ĝi troviĝas, sendepende de formuloj dogmaj aŭ ne, kun kiuj ĝi manifestiĝas en la homaj rondo. Nia problemo estas ne pri nepotismo, sed pri supera spiriteco, rezulto de la unuiĝo de efektivaj valoroj, favore al pli bona vivo.

Post tiuj instruoj, kiujn mi ricevis en formo de mallonga konversacio, dum ni moviĝis por servado, ni atingis loĝejon kun simpla aspekto, kiun distingis zorge flegata ĝardeno, ĝin ĉirkaŭanta.

– Ni vidas ĉi tie – diris la instruanto – nelacigeblan kunulon el aliaj tempoj, reenkarniĝintan en doloraj kondiĉoj. De kelkaj semajnoj mi helpas lian patrinon per revigligaj emanaĵoj. Pro la terura korpa strukturo de la filo, al ŝi ĉenita de multe da jarcentoj, la menso de la kompatindulino endanĝeriĝas; ili ligiĝas unu al la dua per katenoj de gravaj kompromisoj. Konsiderante ŝian noblan kutimon preĝi en antaŭdifinita horo, ni profitas tiujn okazojn por ŝin helpi.

Mirante la starigitan ordon por la laboroj en nia mondo, ordon, kiu vidiĝas ĉe la minimumaj aferoj, mi silente iris kun Kalderaro en la internon de la domo.

Post rapidaj minutoj ni troviĝis en malgranda ĉambro, kie maldika eta malsanulo kuŝis plorante. Ĉe li estis du estuloj tiel malfeliĉaj, kiel li mem, laŭ la aspekto, kiun ili prezentis. La malsana knabo kaŭzis kompaton.

– Li estas denaska paralizulo, unuenaskito de laŭŝajne feliĉa paro, kaj havas la aĝon de ok jaroj, en sia nova ekzistado – informis Kalderaro, montrante lin –; li ne parolas, ne paŝas, eĉ ne sidiĝas, tre malbone vidas, preskaŭ ne aŭdas en la homa sfero; li psike havas vivon de sentema kondamnito, plenumanta rigoran punon, vere aplikatan de li mem. Antaŭ preskaŭ du jarcentoj li dekretis morton por multe da sampatrujanoj pro civila ribelo. Li profitis politika-administran malordon por venĝi al personaj malamikoj, dissemante malamon kaj ruinon. Apartigite de la karno, li travivis abomenindajn turmentegojn. Nombraj viktimoj jam pardonis al li la krimojn; sed multaj obstine lin sekvis jarojn post jaroj... La hordo, iam densa, iom post iom maldensiĝis ĝis kiam ĝi reduktiĝis al tiuj du malamikoj, hodiaŭ en fina proceso de transformiĝo. Pro la luktoj krude travivitaj de li en mallumaj kaj danteskaj kavernoj de sufero, la malfeliĉulo pretiĝis por ĉi tiu fina fazo de kulpelpago; tiel prosperis al li kompletigi sian efektivan resaniĝon, en kies proceso li troviĝas jam de multe da jaroj.

La scenejo estis malgaja kaj kortuŝa. La malsanulo kun maldikaj ostoj kaj preskaŭ travideblaj karnoj devus esti, laŭ sia aĝo, bela kaj feliĉa knabo; li tamen tie estis senmova, eligante kriojn kaj guturalajn sonojn proprajn al la subhoma sfero.

Kun la necesa respekto al la doloro kaj kun la observo donita de la scienco, mi rimarkis, ke la malgranda paralizulo prefere similis ian devenanton de pliperfektigitaj simioj.

– Efektive, la spirito neniel malprogresas – klarigis Kalderaro –; sed la formoj de manifestiĝo povas sperti degenerojn, por faciligi la regenerajn procesojn. Ĉiu malbono kaj ĉiu bono praktikitaj en la vivo altrudas modifojn al nia organaro. Nia malfeliĉa amiko longe venenis la aktivajn centrojn de sia perispirita envolaĵo. Ĉirkaŭite de turmentantoj kaj malamikoj, fruktoj de la krima agado, al kiu li memvole sin dediĉis, li restas plu preskaŭ senkonsciigita de la ombroj rezultantaj de liaj teruraj eraroj. Sur sia konscienca kampo, li ploras kaj baraktas sub la pikilo de torturantaj rememoroj, kiuj al li ŝajnas senfinaj; sed liaj sentumoj, eĉ tiuj de fizika naturo, sin tenas malekvilibritaj, sen direkto... La pensoj de ribelo kaj venĝo elsenditaj de ĉiuj, al kiuj li decide ofendis skurĝis lian perispiritan korpon dum pli ol cent sinsekvaj jaroj, kvazaŭ batoj por diserigi lian personecon, kaj la malfeliĉulo malproksima de la enirejo al la plej alta regiono de sia propra memo, kie ni lokas “la kastelon de la superaj konoj”, vane baraktis sur “la kampo de la nuna klopodo”, t.e. ĉe la alto de la regiono, kie situas la motoraj energioj; liaj senkompataj malamikoj, alkroĉiĝante al li per rekta influo, devigis lin fiksi sian menson ĉe la aŭtomataj impulsoj en la regado de la instinktoj; la Leĝo tion permesis, memkompreneble ĉar la konduto de nia malfeliĉa frato estis egala al tiu de jaguaro, kiu uzas sian forton por regi kaj vundi. La misuzoj de racio kaj de aŭtoritato estas gravaj eraroj antaŭ la Eterna Reganto de niaj destinoj.

La estimata Asistanto rigardis min per siaj lumaj okuloj kaj demandis:

– Ĉu vi komprenis?

Ĉar li deziris vidi min sufiĉe informitan, li aldone diris:

– Ĉi tiu kompatinda malsanulo ne malprogresis spirite. Sed la evolua proceso, kiu estas servado de la dia spirito, dum jarmiloj, farata por lia glora destino, estis de li mem (la malsanulo) piedpremita, ridindigita kaj malfruigita. Li semis malbonon, kaj nun ĝin rikoltas. Li faris kuraĝan planon de ekstermado, helpante sin per aŭtoritato, kiun la Patro al li konsentis, li realigis la bedaŭrindan planon kaj li suferas ĝiajn

naturajn konsekvencojn, por sin korekti. La pli malbona fazo jam forpasis. Li nune apartiĝis de la pli granda nombro da malamikoj, irinte al amema patrina koro, kiu helpas lin refariĝi ĉe la fino de lia longa regenera proceso.

Vidinte la strangan sintenon de la malfeliĉaj elkarniĝintoj lin sekvantaj, mi deziris demandi ion pri ili, kaj jen Kalderaro kontentigis miajn dezirojn, dirante plu:

– Tiuj mizeraj persekutantoj estas koboldoj de malamo kaj venĝo, kiel nia malsanulo estas restanto el krimuloj. Ili estas ŝiprompiĝuloj en sia lasta savofazo, post grandega hekatombo sur la maro de la vivo, kie ili dum multe da jaroj restis perditaj, nekapablaj uzi la kompason de pardono kaj bono. Sed ili proksimiĝas al la helpa haveno. Ili revenos en la sunon de la surtera ekzistado, pere de virina koro, kiu lernis el Jesuo la valoron de la sinofero. Andreo, laŭ la jam planita programo, ili baldaŭ naskiĝos en ĉi tiu hejmo, kiel fratoj de la malnova kontraŭulo. Kaj kiam ili interplektos siajn manojn sur li, konsumante energiojn por lin helpi, subtenate de la bonkoreco de la abnegacia patrino, amema kaj justa, tiam ili kisos kun grandega amo sian malnovan malamikon. La nigraj katenoj de malamo aliiĝos en brankbrilajn ligilojn de lumo, kiuj reflektos la eternan amon. Venonte tiu tempo, la forto de pardono redonos nian malsanulon el la libereco; kvazaŭ feliĉa birdo, li forlasos tiun fizikan kriplan korpon, sufokantan karceron por krimo kaj ĝiaj sekvoj, kie li baraktis dum pli ol du jarcentoj. Ĝis tiam gravas klopode zorgi pri la brava virino, kia ŝi ja estas, en ĉi tiu hejmo, nobla dommastrino, kies inklinon al martireco respektas la Diaj Fortoj pro tio, ke ŝi prilumas la vivon kaj riĉigas la verkon de Dio.

Apenaŭ Kalderaro finis siajn instruojn, jen unu el la turmentantoj ektuŝis per la dekstra mano la cerbon de la malsanuleto, kaj la Asistanto petis, ke mi ekzameni la efikon de tiu kontakto.

Ekstrema paleco kaj grandega angoro travidiĝis sur la vizaĝo de la paralizulo. Mi rimarkis, ke la malfeliĉa estulo elsendis el siaj manoj nigrajn striojn el substanco simila al peĉo, kiuj atingis la encefalon de la etulo, pliigante liajn impresojn de timego.

Mi direktis al la Asistanto demandan rigardon kaj Kalderaro informis:

– Se amo elĵetas lumradiojn, malamo elĵetas stiletojn de mallumo. Per la fruntalaj lomboj ni ricevas “stimulojn por la estonteco”, en la kortekso ni konservas “sugestojn de la estanteco”, kaj en la ĝustadire nerva sistemo ni gardas la “memorojn el nia pasinteco”. Nia kompatinda amiko estas “bombardita” per detruaj energioj de malamo sur la regionon de la “estantaj servoj”, t.e. sur siajn kapablojn de kresko, de realigo kaj de laboro, en la fluantaj tagoj. Tia situacio, rezultanta de la kulpo, pelas lin mense malsupreniri en la zonan de “rememoroj el lia pasinteco”, kie lia konduto estas malsupera, ĝislimanta la duonsenkoscion de la primitivaj evoluaj statoj. Frakasanta plimulto da fenomenoj de psika malsano venas de malekvilibrigita menso. Bonvolu vidi lian organaron.

La malsanuleto pasis de la afliktiĝo, en kiu li dronis, al tordiĝoj, evidentigante ĉiujn karakterizaĵojn de la klasika idioteco. La organoj nun montris strangan delokiĝojn. La endokrina sistemo montris nedifineblajn perturbojn.

Kortuŝite, la instruanto kliniĝis super la malsanulo kaj klarigis:

– La detruantaj radioj atingas lian motoran zonan, kaŭzante paralizon de la centroj de parolo, de movoj, de aŭdado, de vidado, kaj de ĉiuj glandaj organoj. Vere, tia dolora situacio kronikiĝis pro ripetiĝo de tiu okazaĵo milojn da fojoj, en preskaŭ du centoj da jaroj.

Li faris signifan paŭzon kaj daŭrigis:

– Ekzameni la sintenon de la malsanulo. Post kiam li fiksas sian menson en la ekstrema “regiono de la aŭtomataj impulsoj”, lia konduto fariĝis efektive subhoma. Li ree vivas primarajn stadiojn, el kiuj la personeco eliĝis antaŭ multe da jarcentoj. Ĉe aliaj malpli gravaj kazoj la medicino jam uzas ŝokon, same kiel eksperimentanto, kiu studas en mallumo, ekzamenante efikojn kaj ne konante la kaŭzojn. Ni devas tamen rekoni, ke la bela klopodo de la moderna psikiatrio indas la plej grandan atenton de niaj spiritaĵaj aŭtoritatoj, kiuj helpas diligentajn kaj sindonajn kuracistojn, kaj gvidas ilin por la bono de ĉiuj, samtempe en pluraj kulturaj centroj; nun ili ne povas akcepti la veron, kiel dezirinde pro la neceso, ke la surtera medicino estu gardata sur konservativa kampo malpli malfermita al la aventuristoj; sed poste tiuj noblaj profesiuloj por la homa sano komprenos, ke la elektra ŝoko, aŭ la

hipoglukozemio, kaŭzita de invado de insulino estas vivantaj alvokoj al la centroj de la perispirita organismo, invitante ilin al reĝustiĝo, pelante la neŭronojn al readaptiĝo por la servo de menso, en ties regenera proceso. Cetere estas notinde, ke tiu rimedo sin helpi per la profundaj provizoj de la psika kosmo tute ne estas nova. Iam la frenezuloj estis kondukataj en putojn kun serpentoj, por ke la terura komocio faru la subitan transformiĝon de la malekvilibrigita menso; tiel estas, ĉar la homo ekde fora antikveco intuicie komprenas, ke la plimulto da kazoj de mensmalsano venas de la vola aŭ nevola foresto de animo for de la realo. Kaj, sur nia kampo de pli klara observado, ni povas aldone aserti, ke ĉiu malekvilibro okazas pro disiĝo de la Leĝo.

Kalderaro eksilentis kelkajn momentojn kaj poste montris al la malgrandulo kaj akcente diris:

– Sed en ĉi tiu kazo la ŝoko aplikata de homa scienco rezultigus nenian avantaĝon. Ni troviĝas antaŭ la tuta eklipso de la menso pro tuta foriĝo de la Leĝo, je kiu kondukis la interesato pri la helpo. La reĝustigo ĉi tie postulas tempon. La ŝlimaj akvoj de malbono longe retenataj en la koro ne facile elfluas. La mensa ujo de ĉiu el ni ne estas vazo de imaga enhavo: ĝi estas provizujo da vivaj fortoj, kia estas la fizika portilo de manifestado, kiu estas propra al ni, dum ni pilgrimas sur la Planeda Krusto.

– Ĉu ni ne estas, science parolante – mi demandis –, antaŭ tipa kazo de mongolismo?

La Asistanto senĝene respondis:

– Ni observas fenomenon de absoluta spirita malekvilibro. En maloftaj situacioj ni vidos tiaspecajn perturbojn kun esence fiziologiaj kaŭzoj. Estas neeble ne rekoni en la karna sfero tiun psika-fizikan paralelon. Kiu vivas sur la Terkrusto, tiu unue renkontas la pereeman formon. Tial ni ne povas ne konsideri la densan envolvajon en la patologio de la animo, nek malestimi la kunlaboron de la abnegaciaj fiziologoj, kiuj atente sin donas al la esplorado de la mikroskopa faŭno, de la reĝustigo de formoj, de la kadro de efikoj. Ni ne forgesu do, ke ni nun esploras la kampon de kaŭzoj...

La sincera amiko ŝajne estis preta daŭrigi, pliigante miajn konojn pri la afero, kiam ni aŭdis paŝojn de iu alprok-



simiĝanta. Sendube la dommastrino venis en la ĉambron de la knabo por helpi lin per preĝo.

Kalderaro rapide finis:

– Niaj kunuloj de la homa medicino laŭplaĉe nomas la mensajn malsanojn, tenante sin ĉe supraĵaj aferoj, senatentaj je la fundamentaj problemoj de la spirito. Rilate la sciencajn aferojn, ni interparolos morgaŭ, kiam ni portos helpon al juna amiko.

En tiu momento, lia patrineto, kiu ankoraŭ ne estis tri-dekjara, venis al la malsanulo, tute ne sentante nian spiritan ĉeeston. Ŝi malgaja ekhaltis apud la infanolito kaj karesis lian frunton kovritan per ŝvito, ĉe la fino de liaj finaj konvulsioj. Ŝi forigis la puntan kovrilon, zorge lin levis kaj brakumis, envolvante lin en sia plej sankta amo.

La knabo kvietiĝis.

Tuj poste la patrino komencis preĝi, banata de larmoj, simile al cigno el la spirita regiono, aŭdinganta mirindan kanton.

Dum Kalderaro servadis, riparante ŝiajn nervajn fortojn per efektiva transigo de sanaj fluidaĵoj, kiuj la sindona kunlaboranto transdonis de si mem, mi miaflanke akompanis kun viva intereso la patrinan preĝadon.

La juna sinjorino intermetadis humanajn konsiderojn en sian koran petegon.

Kial la Sinjoro en la Altaj Ĉieloj ne aŭdis ŝin, permesante ian miraklon, kiu redonu la fileton al la tiel necesa ekvilibro? Ŝi edziniĝis antaŭ naŭ jaroj, revante hejmon plenan de feliĉaj infanoj; sed la unua el siaj aspiroj tie ironie estis kun horora vizaĝo de monstro kaj sufero... Kial – ŝi demandis petegante – naskiĝas infanoj sur la Tero, kun destino de tiel granda angoro? Kial martirlibro de etaj estaĵoj? Ŝi vane iris en kuracistajn kabinetojn kaj aŭdis specialistojn. Ĉiam la samaj elreviĝoj, la samaj seniluziigoj. Ŝia fileto ŝajnis neatingebla por ia ajn kuracilo. Ŝi sentis sin malforta kaj lackonsumita... kaj ŝi ploris, petegante la dian benon, ke energioj ne manku al ŝi dum la lukto.

Fininte sian taskon, Kalderaro venis al mi kaj demandis:

– Ĉu vi deziras respondi tiun petegon en nomo de la Supera Inspiro?

Ho ne! Mi dekliniĝis de tiu invito, pretekstante, ke tio estas al mi tute nepraktikebla post kiam mi aŭdis Fratino Cipriana renoviganta korojn per sia parolo flamanta de amo.

Kun ĝentila gesto la instruanto diris:

– Ni ĉi tie ne parolos al malamantaj koroj, sed al turmentata patrino spirito, bezonanta fratan stimulon. Kono kaj bonvolo povas fari multon.

Li bonvoleme ridetis kaj aldonis:

– Cetere estas necese ankaŭ diplomiĝi pri la scienco de amo. Por tio ni komencu esti fratoj unuj de aliaj kun sincereco kaj fidela preteco servi.

Mi dankis lian konsideron, sed mi ekskuzis min. Kalderaro mem instruu. Mia kondiĉo estis tiu de lernanto. Mi tie troviĝis por aŭdi la superbelajn lecionojn.

La abnegacia amiko metis la manojn sur ŝiajn fruntalajn lombojn, kvazaŭ altirante la patrinan menson al la plej alta regiono de la memo kaj disradiis kortuŝajn petojn, kvazaŭ sindona patro parolanta al ŝia koro. Treege emociita mi aŭdis liajn parolojn de kuraĝigo kaj konsolo, kiujn la amema patrino ricevis, kiel superajn ideojn kaj sugestojn.

Mi rimarkis, ke ŝia animo iom post iom gajnis novan forton. Mi ankaŭ rimarkis, ke sur ŝia pineala glando brilis milda fokuso de disradianta lumo kaj ke el ŝiaj okuloj ekŝprucis neordinaraj larmoj. La milda heleco sur ŝia cerbo malsupreniris ĝis ŝia torako, el kie tiam eliĝis delikataj fadenoj el lumo, kiuj ŝin ligis al la malfeliĉa fileto. Ŝi rigardadis la malgrandulon, nun trankvila, tra dika vualo da larmoj kaj mi aŭdis ŝiajn altajn pensojn.

Jes. Dio ne forlasos ŝin – ŝi pensis; Li donos al ŝi fortojn por realigi ĝis la fino la taskon, kiun ŝi prenis sur siajn ŝultrojn, en la heleco de sia unua revo kaj en la feliĉo de la unua horo. Ŝi subtenos la filon de sia karno, kvazaŭ li estus ia ĉiela trezoro. Ŝia amo kreskos kun la suferoj de sia tre amata fileto; ŝiaj sinoferoj estos pli dolĉaj ĉiufoje, kiam la doloro pli intense tuŝos lin. Ĉu li ne estas pli inda je ŝia sindediĉo kaj rezigno pro la aflikta kondiĉo, en kiu li naskiĝis? La infanoj de ŝiaj malnovaj kamaradinoj estis ĉarmaj kaj inteligentaj, kvazaŭ parfumitaj rozburĝonoj de la vivo, promesantaj senfinajn ĝojojn en la ĝardeno de la estonteco; ankaŭ ŝia eta paralizulo estis bela, bezonante pli da kareso kaj

subteno. Dio scias, kial li venis en la mondon, sen la kapablo de parolo kaj sen inteligentomanifestoj. Ĉu ne sufiĉas konfidi la Superegan Patron? Ŝi servos la Sinjoron, ne demandante; ŝi amos sian filon dum la tuta eterneco; se estus necese ŝi mortus, por ke li vivu.

En la apogeo de nedifinebla korinklino, la juna patrino kliniĝis kaj kisis la lipojn de la malsanuleto, kun ĝojego de tiu, kiu kisis ĉielan anĝelon. Surprizita mi vidis nombrajn lumajn fajrerojn depreniĝantajn pro la ama kontakto de ili ambaŭ kaj falantaj sur la malsuperajn estulojn; ĉi tiuj siaflanke ankaŭ kliniĝis, ŝajne malpli malfeliĉaj antaŭ tiu nobla virino, kiu poste servos al ili, kiel patrino.

Kalderaro tuŝetis mian ŝultron kaj informis:

– Nia helpa laboro finiĝis. Ni foriru.

Kaj montrante al la patrino kaj filo kune, li fine diris:

– Ekzamenante ĉi tiun suferantan knabon, kiel enigmon sen solvo, kelkaj malprudentaj kuracistoj sur la Tero eble pensos pri la “milda morto”; ili ne scias, ke inter la muroj de ĉi tiu modesta hejmo, la Dia Kuracisto, uzante ian nekurac-eblan korpon kaj la ĝisoferan amon de patrino koro, redonas la ekvilibron al eternaj spiritoj, por ke ili super la ruinoj de la pasinteco povu kunfratiĝi por gloraj destinoj.

## VIII

### EN LA SANKTEJO DE LA ANIMO

Nigra nokto. Kalderaro kaj mi penetris en komfortan kaj nobelecan domon, kie la instruanto laŭ sia promeso, donos al mi novajn klarigojn pri la malekvilibroj de la animo.

– Ĝi ne estas kazo tiel grava, kiel tiu de la paralizulo, kiun ni vizitis – diris la servema informanto; ĝi estas ĝustadire afero preskaŭ solvita. De longe mi helpas Marcelon per revigligaj fluidaĵoj kaj li nun ĝuas la situacion de tuta triumfo. Obeema al nia influo, li akiris per preĝo kaj per la spirita aktiveco provizon da energioj, kiun li bezonis. Hieraŭ ni vidis kazon de tuta malordiĝo de la perispiritaj elementoj kaj la sekvan perturbon de la nerva sistemo, en dolora sceno, kiun nur la tempo forviŝos. Sed ĉi tie la scenejo estas alia. La problemo de ĉefa perturbo jam estas solvita, la reĝustiĝo de la vivo fariĝis plena de novaj esperoj, la paco revenis en la organan korpon; sed ankoraŭ daŭras la rememoroj, la bildoj pri la travivitaj dramoj en la pasinteco, reaperantaj sub formo de epilepsiaj fenomenoj, la refleksaj agoj de la animo originantaj el la vasta komplikita tunelo de mallumo, kaj definitive revenantaj en la lumon. Se malbono postulas longan tempon por fiksiĝi, estas evidente, ke restarigo de bono ne povas esti subita. Same okazas al malsano kaj sano, al la devio kaj al la restarigo de ekvilibro.

Trairinte la portikon, ni kun plena permeso direktis nin al la dominterno, kie agrable surprizis min ĉarma sceno de hejma religio: sinjoro, sinjorino kaj knabo troviĝis dronintaj en la diaj vibroj de preĝo, ĉirkaŭitaj de granda nombro da amikoj el nia mondo.

Ni estis ame akceptitaj.

La gvidanto invitis min kunhelpi ĉe la fariĝantaj aktivecoj, ĉar per la valora kunlaboro de tiuj tri enkarniĝintaj kunuloj oni donis al ĵusliberiĝintoj de la Krusto efektivajn helpojn de variaj specoj.

Notinda estis la respektoplena beleco de tiu malgranda kunveno dediĉita al bono kaj al spirita prilumado.

Admirante la harmonion de tiuj tri koroj kunigitaj per la samaj noblaj pensoj kaj deziroj, kiujn mirindaj fadenoj de lumo interligis, la amika Asistanto oportune komentariis:

– La familio estas spirita kuniĝo en la tempo, kaj tial la hejmo estas sanktejo. Plurfoje, precipe sur la Tero, pluraj el ĝiaj membroj apartiĝas de la sintonizo kun la plej altaj vivoceloj; sed, kiam du aŭ tri el ĝiaj membroj komprenas la grandecon de siaj eblecoj de altiĝo, intime kuniĝante por la realiĝoj de la eterna spirito, tiam oni atendas mirindajn edifojn.

Mi komprenis, ke la instruanto deziras doni al mi aliajn klarigojn kaj riĉigi la sanktigan koncepton pri familio; sed la urĝa laboro ne plu permesis pli longan konversacion.

La helpa laboro al suferantaj fratoj daŭris aktiva en “nia flanko”.

Post la kunveno de la familia trio, finiĝinta per esprima kaj kortuŝa preĝo, la kunuloj el nia sfero komencis foriri, dum la enkarniĝintaj amikoj tenis koran interparoladon.

Tiu sinjoro kun rideto de laboranto bone plenuminta sian devon, laŭte turnis sin al la ĉeestantoj:

– Dank’al Dio, ĉio estas en ordo.

Rigardante la knabon, li kun grandega patra amo demandis:

– Kaj vi, Marcelo, ĉu vi fartas bone plu?

– Ho! sendube – ĝoje respondis la aldemandito; mi estas feliĉa pro la bonegaj rezultatoj, kiujn mi ricevas de niaj ĉiuĵaŭdaj kunsidoj.

– Ĉu la noktaj atakoj ripetiĝas?

– Ne. Laŭmezure kiel mi klopodas ĉe la diaj veraĵoj, kunhelpante per mia propra volo sur la kampo de la praktikaj aplikoj de la ricevitaj lecionoj, mi sentas, ke mi pli kaj pli bonfartas, ke mi interne plifortiĝas, rehavigante al mi la perditan sanon. Mi ankaŭ rekonas, ke, kiam mi seninteresiĝas pri mia spirita edifado, senatenta pri mia bezono altiĝi, tiam

intense revenas la perturboj. En tiuj malutilaj tempoj mi vekigās tre malfrue en la nokto, kun lacaj kaj doloraj membroj, kaj alsaltas al mi evidentaj signoj de la konvulsioj, kaj faras min senkonscia dum longaj minutoj...

La knabo ridetis post ĉi tiu simpla fila konfeso kaj daŭrigis:

– Sed feliĉe nun, kiam mi zorge kaj akurate min donas al la sanktiga tasko, tiam mi rekonas, ke la emanaĵoj de mia patrino estas pli efikaj. Mi estas pli komprenema kaj rimarkas, ke bonvolo estas klara faktoro de mia trankvilo.

La aŭdantoj interrigardis kontentaj, kaj la intima konversacio daŭris plu edifa, plena de belaj sugestoj.

Preparante mian rezonon, la Asistanto informis:

– Certe mi ne bezonas klarigi, ke Marcelo distras sin kun la gepatroj. Li posedas aliajn fratojn, kiuj ne alkonformiĝas al la sankta misio de la paro. Sed li estas portanto de altaj kaj noblaj sentoj. Kiel preskaŭ ni ĉiuj, li havas pasintecon plenan de pasioj kaj aŭtoritataj eksceso, intense travivitan. Iam li tenis grandegan povon, kiun li ne noble uzis. Posedante vigan inteligenton, li restadis sur altaj intelektaj niveloj, de kie li ne ĉiam malsupreniris por konsoli aŭ helpi. Havante variajn honorajn titolojn, li multfoje ilin forgesis, sin donante al la kapricoj komunaj al krimuloj. Li trudis sin pro sia absoluteco, kaj li pligrandigis sian semejon de dornoj, kiuj poste lin pikis. Veninte la rikolto de la abomenindaj fruktoj, li spertis akrajn suferojn. Sennombraj viktimoj lin atendis trans la tombo, kaj ili rapidis kontraŭ li. Se Marcelo faris kiantajn erarojn, li tamen en multaj okazoj deziris esti bona kaj kreis valorajn amikojn ĉirkaŭ sia nomo; sed tiaj sindonoj devis atendi okazon por lin helpi. Liaj malamikoj formis densan amason kaj furioze kriis, petante helpo de la vulgara justico; ili longe retenis lin en la malsuperaj regionoj, kontentigis malnovajn dezirojn de venĝo, turmentante lian perispirititan korpon. Marcelo meze en la ombro de sia konscienco petegis, ploris kaj pentis plurajn jarojn. Kiom ajn li petegis kaj kiom ajn la interhelpaj elementoj insistis, la sopirata liberiĝo ankoraŭ tre longe malfruis, ĉar konsciencoriproĉo ĉiam estas la punkto de sintonizo inter kriminto kaj viktimo, kaj nia amiko portis konsciencon skurĝatan de kruelaj rimorsoj. La malekvilibroj

de perispirito skurĝis lin, tuj kiam li transpasis la sojlon de tomo, kaj ili daŭris longajn jarojn...

Post nelonga paŭzo dum tiuj klarigoj mi scivoleme aldone diris:

– Tio signifas, ke la epilepsioforma fenomeno...

–... tre malofte okazas pro nuraj encefalaj ŝanĝoj, kiaj tiuj rezultantaj de frapoj sur kapon – klarigis la Asistanto, interrompante mian apenaŭ faritan rimarkon –, kaj ordinare estas animomalsano, sendependa de la fizika korpo, kiu en tiu okazo nur registras la refleksajn agojn. Fore estas la tempo, kiam racio akceptis paradizon aŭ purgatorion, kiel eksterajn regionojn: ĉielo kaj infero esence estas konsciencaj statoj; kaj, se iu malobeis la Leĝon, li estigos en si mem rebonigan proceson, kiu daŭros tiel longe, kiel necese. Sed antaŭ la realo ni estas pelitaj konstati, ke se ekzistas nombraj malsanoj por la malekvilibroj de la korpo, sennombraj aliaj ekzistas por la devioj de la animo.

La instruanto faris mallongan paŭzon, almontris la knabon kaj daŭrigis:

– Sed reprenante la informojn pri Marcelo, mi devas diri al vi, ke iom post iom li elverŝis la plej pezajn substancojn el la fundo de sia kaliko da provoj. Longaj jaroj da malekvilibro, en kiu la viktimoj, fariĝintaj kvazaŭ ekzekutistoj, lin skuis per teruraj konvulsioj, neesprimeblaj ŝokoj kaj torturoj, heligis al li la internajn horizontojn, kaj nia frato fine interkonsentis kun servema kaj saĝa spirita instruanto, al kiu li estas ligita de fora pasinteco. Li estis helpata kaj subtenata. Li sopire demandis pri animoj al li karaj, kaj oni sciigis lin, ke liaj plej bonaj amatoj jam ree troviĝas en la karno, por dignigaj atestoj kaj laboroj. Li petegis pri reenkarniĝon, promesis akcepti devojn de spirita helpo sur la Krusto, por pagi grandegajn ŝuldojn, kunlaborante por la bono kaj evoluo de siaj iamaj malamikoj, kaj li ricevis tiun donacon, favorate de abnegacia mentoro, kiu lin estimas de multe da jarcentoj. Li revenis en la karnan sferon kaj rekomencis sian lernadon. Li lastatempe renaskiĝis protektata de karesemaj brakoj, al kiuj li estas ligita en la daŭro de pluraj ekzistadoj komune travivitaj. Nun sincere profitante la ricevitaĵajn benojn, li de siaj fruaj jaroj zorgas pri reĝustiĝo de siaj altvaloraj moralaj kvalitoj: li karakteriziĝas de sia knabeco, per koreco kaj

obeemo, naturaj mildeco kaj amemo. Li trankvile pasigis sian infanecon, kvankam spionata de siaj malnovaj nevideblaj persekutantoj. Li jam ne estis altirita de ili pro la regenera laboro, al kiu li submetiĝis; sed renkontante iun el siaj kontraŭuloj, en la minutoj de parta liberiĝo kaŭzata de la fizika dormo, li amare suferis pro la rememoroj. Ĉio pasis sen menciindaj novaĵoj. Sub la viglado de siaj gepatroj kaj kun subtenado de la nevideblaj bonfarantoj, la knabo sin preparadis por la estontaj laboroj. Sed apenaŭ plifirmiĝis lia fizika propraĵo, post siaj dek kvar jaroj, Marcelo kun sia perispirita organismo plene ligita al sia fiziologia envolaĵo komencis rememori la travivitajn fenomenojn kaj al li aperis la tiel nomataj epilepsiaj konvulsioj kun iom da intenseco. Sed la knabo tuj trovis la necesajn antidotojn, rifuĝante en la “loĝejon de la noblaj principoj”, t.e. en la plej altan regionon de persono, per la kutimo preĝi, per la frata kompreno, per la praktiko de bono kaj per la supera spiritaro. Tial li limigis la neŭro-psikan malharmonion kaj reduktis la ĉefan misfunkcion, reakirante tagon post tago sian ekvilibron, mobilizante la armilojn de volo. En tiu klopodo, en kiu li fariĝis ekstreme simpatia, li ricevis grandan kunlaboron de nia sfero, ĝin plene profitante ĉe la kriteria aliĝo al la konstrua klopodo de bono. Serene kaj pacience ricevante la lukton, li instalas en si mem altvalorajn ricevokvalitojn, kiuj favoris nian helpon kaj ĝuste tial malakceptis la terapeŭtikon de narkotaĵoj aŭ de ŝokoj, kiu, kaŭzante nenormalajn statojn de la perispirita organismo, preskaŭ ĉiam nenion sukcesas efektiviĝi, krom deloki la malsanojn, ne kontraŭbatalante ilin ĉe la originoj. Tial la afero pri Marcelo liveras altvalorajn karakterizaĵojn. Akceptante sugestojn de tiuj, kiuj lin helpas, alkonformiĝante al la realo, li de longe fariĝis sia propra kuracisto, sola recepto, per kiu malsanulo trovos sian propran resaniĝo.

En tiu momento la knabo respekte adiaŭis siajn gepatrojn kaj foriris en sian privatan ĉambron, kie li enlitiĝis, post kiam li lavis sian menson per pensojn de paco kaj danko ao Dio.

Post nemultaj minutoj li apartiĝis de la densa portilo kaj venis al ni, salutante Kalderaron, kun speciala koreco.

La Asistanto afable prezentis lin al mi.

La junulo montris profundan klarvidecon. Brakumante nin ambaŭ, kun evidentaj elmontroj de ĝojo, li parolis pri siaj



esperoj en la estonteco. Li eksterigis sian ardan deziron labori por diskonigo de la evangelia Spiritismo, preta kunlabori en la edifa verko, kiun liaj gepatroj realigas. Kun mia miro li aludis niajn aktivecojn en la spirita kolonio, demandis pri miaj impresoj pri “Nia Hejmo”<sup>(\*)</sup>, ravante min pro la oportuneco de konceptoj kaj pro la beleco de la inteligentaj kaj spontaneaj observoj.

La konversacio fluis, kiam du ombraj figuroj zorge alproksimiĝis al ni. Kiaj ili estos, krom mizeraj elkarniĝintaj preterpasantoj? Tute distrita mi daŭrigis miajn humilajn komentariojn, sed la estimata interparolanto videble perdis sian flegmon. Kvazaŭ tuŝita de konfuzantaj fortoj en sia interno, Marcelo paliĝis, levis la dekstran manon al la brusto kaj faris senmezure grandajn okulojn. Mi rimarkis, ke liaj ideoj tiel miksiĝas en la perispirita cerbo, ke li ne sukcesas aŭdi nin facile, kaj tuj malligiĝinte de niaj brakoj, li rapidis por repreni sian korpon.

Kortuŝite mi volis haltigi lin, ĉar li estis tute sintonizita kun ni; io pli forta ol nia kora konatiĝo ligis min al la nova amiko, kion mi komprenis de la unua kontakto; sed mi ne povis tion fari.

Kalderaro vikle retenis min kaj ekkriis:

– Ne prenu lin, Andreo. Ni lin akompanu. Ni ne povas forgesi, ke Marcelo ne estas tute resanigita.

Almontrante la provokantajn estulojn, en malgranda distanco, li klarigis plu:

– La nura alproksimiĝo de liaj malamikoj el alia tempo ŝanĝas liajn mensajn kondiĉojn. Timema, afliktita li evitas revenon al la dolora situacio, en kiu li troviĝis antaŭ multaj jaroj, en la malsuperaj sferoj, kaj rapide iras al sia fizika korpo simile al iu, kiu helpas sin per la sola disponata rifuĝejo, antaŭ tuja tempesto.

La erarantaj spiritoj forkuris kaj ni ree venis en dominternon, kie ni trovis la junulon ekposeditan de konvulsioj.

Mi brakumis lin, kvazaŭ karan infanon.

La atako malintensiĝis, sed ne tute ĉesante. Mi levis la okulojn al la instruanto, kun muta demando. Kial tia perturbo?

---

<sup>(\*)</sup> Aludo al la libro “Nia Hejmo”. – (Noto de la spirita aŭtoro.)

La ĉambro de Marcelo estis izolita, sen rekta kontakto kun la malsuperaj estuloj. Ni tri daŭrigis edifan konversacion. Kial okazis tiu perturbon, se ni nin tenis en sana atmosfero el sanktigaj pensoj?

La instruanto bonkore rigardis min kaj petis:

– Observu la organan kampon, kaj aparte ekzemu la cerbon.

Mi rimarkis, ke la endokrinaj centroj paliĝis, kaj nur la pineala glando restis plu, elsendante nenormalajn radiojn. En la encefalo la malekvilibro estis kompleta. El la plej altaj zonoj de la cerbo eliris radioj de mensa lumo, kiuj kvazaŭ bombardis la amason da ĉeloj de la kortekso. La pluraj motoraj centroj, inkluzive tiujn de la memoro kaj de la parolo kuŝis malordigitaj, senfunkciaj. Tiuj nenormalaj radioj penetris en la plej profundajn tavolojn de la cerebelo, konfuzante la vojojn de ekvilibro kaj malfortigante la muskolan tension; ili kaŭzis strangajn transformojn de la neŭronoj kaj eniĝis en la nervan grizan sistemon, malhelpante la aktivecon de la fibroj. La delikata encefala organo estis tute inhibiciita. La motoraj zonoj, skurĝataj de la mensaj fajreroj, perdis ordon, disciplinon, memregadon, kaj ili fine cedis mankaj de energioj. Dume, Marcelo-spirito tordiĝis de angoro, almetite al Marcelo-formo, enkarcerigite en la senkonsciencia organismo, suferanta konvulsiojn, kiuj disŝiris mian koron.

Post zorga ekzameno mi demandis Kalderaron:

– Kiel ni klarigu tiun okazaĵon? Cetere nia amiko ĉi tie ne troviĝas torturata de siaj persekutantoj, sed en nia ekskluziva kompanio.

La instruanto, nun en reboniga magnetiza laboro, interhelpis, restarigante la ekvilibron, kaj petis, ke mi atendu kelkajn minutojn. Post nelonge li superregis la malharmonion. Envolvinte lian mensan kampon per balzamfluidecaj emanaĵoj, la akcidento ne efektiviĝis. Marcelo kvietiĝis. La cerba aktiveco refariĝis, kvazaŭ tumultanta placo, kiu tuj sereniĝas. La nervaj ĉeloj reprenis sian taskon, la trafiko-vojoj normaliĝis, la endokrina sistemo revenis en sian ordinarcon, la stimulaĵaj retoj restarigis la laŭkutimajn servojn.

Marcelo, desaponita kaj malfortiĝinta, falis en profundan dormon, ĉar Kalderaro trovis konvene, ke li restu en pli longa

ripozo, ne permesante al li foriri en lia perispirita korpo, en la unuaj minutoj da paco, sekvantaj la gravan krizon.

Observante la knabon kuŝantan sur la lito, la instruanto bonvole rigardis min kaj demandis:

– Ĉu vi memoras pri la kondiĉitaj refleksoj de Pavlov? (\*)

Kial do ne? jes, mi rememoris la faman eksperimenton ĉe hundoj aplikitan al aliaj fenomenoj.

– Nu – bonkore daŭrigis Kalderaro –, la afero de Marcelo okazas laŭ la samaj principoj. En pasintaj ekzistadoj li multmaniere eraris, kaj la konsciencoriproĉo, potenca forto servanta laŭ la Dia Leĝo, gardis lian konscion, kvazaŭ vigla gardostaranto, transdonanta lin al liaj malamikoj sur la malsuperaj planoj kaj kondukanta lin al la rikolto da dornoj, kiujn li semis, tuj kiam li perdis sian fizikan vazon, en unu el siaj plej gravaj periodoj de spirita falo. Rezulte de tiaj devioj li erarvadis malekvilibrigita, kun malsana animo, elmetite al la regado de la malnovaj viktimoj. Li malordigis siajn perispiritajn centrojn, longe malsanigante ilin. Protektate de granda instruanto, kiu interhelpis por li, li renaskiĝis pli trankvila, por grava laboro de elaĉeto. Sed la altvalora ricevita kunlaboro ne povis tute transformi lian internan situacion. Li sin tenis preskaŭ libera de la senkompataj kontraŭuloj, kiujn li de nun devas helpi; lia perispirita organismo tamen konservis la tutan rememoron pri spertitaj konfliktoj for de la densa portilo. Tial la motoraj zonoj de Marcelo – emfazis la ĝentila instruanto – simbolantaj la loĝejon de la “konsciaj fortoj”, en sia aktualeco de laboro, estas ia “resaniĝanta perispirita regiono”, kiaj tiuj sentebraj cikatroj de la fizika korpo. Alproksimiĝante al malnovaj malamikoj, la knabo, kiu ankoraŭ ne firmigis sian intelektan ekvilibron, suferas fortajn psikajn ŝokojn, pro kiuj liaj emocioj lin frenezigas kaj apartigas de la necesa harmonio. La menso perturbata forlasas la direktilon de la perispirita organismo kaj de la fiziologia elementoj, prenas ekscentrajn kondiĉojn, malhavas energiojn proprajn al ĝi, en senordaj movoj; tiam tiuj energioj komencas konflikti kaj elsendi radiojn de malalta frekvenco preskaŭ sama, kiel

---

(\*) La kondiĉita reflekso estis malkovrita de I. Pavlov en 1904.

tiu, incidinta sur lin el la freneza penso de liaj viktimoj. Tiuj detruantaj elsendoj invadas la delikatan materion de la encefala kortekso, mastras la korteksajn centrojn, perturbas la sidejojn de memoro, de parolo, aŭdo, de sento, de vido, kaj de sennombraj aliaj sidejoj de regado de variaj stimuloj; tial ni vidas tiun grandan malbonon, kun pompa simptomaro, kaŭzantan la konvulsiojn, en kiuj la malvigliginta, venkita fizika korpo prefere similas ŝipon subite hazarde flosantan.

La instruoj de Kalderaro plenigis min per respekto al la moralaj fundamentoj de la vivo. Mi nun komprenis, ke estas neeble ia psikiatrio sen nocioj pri spirito. Mi rememoris la jarcentan lukton inter fiziologoj kaj psikologoj, disputantaj la regulon de helpo al la mensaj malsanuloj. Mesmer kaj Charcot, Pinel kaj Broca pasis unu post alia, en mia imagemo pliriĉigita de novaj konoj.

La interrompo de la temodeflankiĝoj de la Asistanto ne longe daŭris. Vere mi devas diri, ke, de la unua horo de nia konversacio, tiaj interrompoj fariĝis kutimaj, kaj ŝajnis al mi, ke Kalderaro intence donas al mi tempojn por primediti liajn konceptojn.

Respondante miajn internajn demandojn, li daŭrigis:

– Estas neeble kuraci frenezulojn per ekskluzive materiaj procedoj. Estas nepre necese penetri en la animon, esplori la kernon de persono, plibonigi la efikojn per la kaŭzoj; sekve ni ne restarigas malsanajn korpojn sen la rimedoj de la Dia Kuracisto de la animo, nome Jesuo Kristo. La fiziologoj faros multon, provante korekti la misfunkcion de la ĉeloj; sed estas necese interveni en la originojn de la perturboj. La afero de Marcelo estas nur unu el la multaj aspektoj de la “epilepsioforma fenomeno”, laŭ la terminaro de la enkarniĝintaj kuracistoj. Tiu perispirita malekvilibro tamen fariĝis grade tro kompleksa. La aserto pri la kondiĉitaj refleksoj ne aplikiĝas al li ekskluzive. Ekzistas milionoj da incitiĝemaj personoj, kiuj, pro kutimo facile koleri, difektas la fundamentajn nervajn centrojn pro la eksceso de sia menso sen disciplino, turnante sin en portantojn de la “malgranda malbono”, en antaŭtempajn mensmalsanulojn, en neŭrasteniulojn el diversaj tipoj aŭ en malsanulojn kun epilepsia ŝajno, kiuj tiom submetiĝas al la insulina hipoglu-

kozemio aŭ al “metrazolo” (\*); dum tio ilia mensa edukado por korekto de iliaj internaj sintenoj en la rutina vivo estus pli efika kaj adekvata, ĉar ĝi estas regenera kaj substanca kuracado. Citante tiajn veraĵojn, ni ne malestimas la servadon de la abnegaciaj psikiatroj, kiuj pasigas sian ekzistadon, sin dediĉante al la similuloj, nek kuraĝas diri, ke ĉiuj malsanuloj sen escepto povas rifuzi la helpon de la renovigaj ŝokoj, tiel necesaj al multaj homoj, kiel duŝoj al la “surpolvigitaj nervoj”. Ni nur deziras emfazi, ke la homo per sia konduto povas vigligi sian propran animon aŭ ĝin lezi. Tiu altruisma karaktero, kiu lernis sinoferi pro ĉies bono, pligrandigas sian propran provizejon meze en la eterneco; murdanto, dissemanta morton kaj ombron sur sia ĉirkaŭaĵo, starigas la regadon de sufero kaj mallumo en sia interno mem. Renkontante niajn fratojn kun perispiritaj lezoj, vivaj konsekvencoj de iliaj agoj, registritaj de la Universa Justeco, estas nepre necese, por sukcese helpi ilin, ke oni serĉu la originon de la perturboj, kiuj ilin atakas; tio okazas ne per paroloj kaj paroloj de psikanalizo, sed ilin helpante per la forto de frateco kaj amo, ke ili akiru la nepre necesan komprenon por sin modifi, reĝustigante siajn proprajn fortojn...

En tiu momento, rimarkante, ke Marcelo restariĝas, la instruanto interrompis siajn klarigojn kaj invitis lin ree veni al ni. La knabo kortuŝite nin brakumis.

– Tiam – li diris, humile rigardante Kalderaron – mi malfortiĝis kaj ekfalas...

– Ho ne! – ekkriis la instruanto, lin karesante – ne sentu vin falanta. Vi ankoraŭ estas kuracata, kaj ni ne povas forgesi la realon. Via klopodo estas admirinda; sed vi devas atendi la kontribuon de la tempo.

Li ridetis kaj akcente diris:

– En foraj tempoj vi perdis altvaloran okazon laŭiri la progresan vojon, forglitante, defalante... Nun estas nepre necese zorge refari la supreniron. Birdo kun malfortikaj flugiloj ne povas trouzi flugon.

---

(\*) Metrazolo aŭ “cardiazol” (**pentametenotetrazol**) uzata de psikiatrio, kiel konvulsioterapiop kaj helpilo ĉe la flegado de kelkaj mensaj malsanoj. – **La Trad.**

La junulo ricevis novajn esperojn kaj, danke rigardante Kalderaron demandis:

– Ĉu vi kredas, mia bonfaranto, ke mi devas preferi la uzon de hipnozdrogoj?

– Ne. La hipnozdrogoj estas utilaj dum la malglata fazo de absoluta mensa nescio, kiam estas necese neniigi la nervajn ĉelojn antaŭ la eblaj suferoj de la perispirita organismo. Rilate vian aferon, Marcelo, por via konscienco jam vekiĝinta en la supera mondo, la plej efika kuracilo estas la pozitiva fido, la memkonfido, la inda laboro, la nobligaj pensoj. Restante sur la plej alta zono de la personeco, vi venkos la malekvilibrojn en la pli malaltaj apartaĵoj, kaj tial vi devas komenci la renovigan kaj subliman mision, kiun oni konfidis al vi por via propra prilumo kaj por la bono de via proksimulo. La medikamentaj elementoj povas doni despotan protekton al la organa kosmo ĉiam, kiam la menso ne pretiĝas ĝin kontroli kaj sin helpi per edukaj faktoroj.

La knabo ameme kisis liajn manojn, kaj Kalderaro, kaŝante la emociion, bonhumore parolis:

– Ni ankoraŭ nenion faris por indi dankon de ia ajn kreito. Ni estas nenio alia ol neperfektaj laborantoj en servado, kaj servado estas la plej granda forto, kiu manifestas niajn proprajn neperfektaĵojn. Ni ĉiuj havas ian dian kreditoron – Jesuon –, kies senfinan bonecon ni ne povas forgesi.

Kaj, karesante liajn harojn, li firmtone diris:

– Vi jam aŭdis lian ĉielan parolon, forlasante malbonon, “por ke io pli malbona ne okazu al vi” (\*). Tial vi nun estas feliĉa. Vere ni nun estas feliĉaj, ĉar nia hodiaŭa celo estas la realigo de la Regno de Dio en ni, kun la Kristo. Ni laboru kun Li, pro Li kaj por Li, kuracante niajn malbonojn por ĉiam.

La junulo nin brakumis, kvazaŭ filo, forte ĉe niaj koroj, kaj ni kune foriris por agrabla ekskurso de studoj, dum lia fizika korpo kviete dormadis.

---

(\*) Johano, 5:14 – **La Trad.**

## IX

### MEDIUMECO

Tre interesiĝinta pri la esprima kazo de Marcelo, mi prezentis al Kalderaro, en la sekvanta tago, kelkajn demandojn, kiuj forte priokupis min.

Ĉu la kondiĉitaj refleksoj ne aplikiĝas ankaŭ al la pluraj mediumaj fenomenoj? ĉu ili ne klarigas la senkonsciajn mistifikojn, kiuj multfoje konfuzas la rondojn de enkarniĝintaj eksperimentoj?

Nemultaj studemuloj de Spiritismo, sindediĉaj kaj honestaj, rekonante la rifojn sur la kampo de mediumismo, kreis la hipotezon pri la anima fantomo de la mediumo mem, kiu agus anstataŭ la elkarniĝintaj estuloj. Ĉu tiu teorio estas adekvata al la pritraktata afero? Ĉu pro la rememoro pri iaj bildoj la penso de la mediumo ne submetiĝas al iaj asocioj, aŭtomate intervenantaj en la interŝanĝadon inter la homoj sur la Tero kaj la loĝantoj en la Transmondo? Tiaj intervenoj en multe da okazoj, povus kaŭzi fortajn malekvilibrojn. Pensante pri observoj aŭditaj en la lastaj tempoj, en pluraj centroj de spiritualisma kulturo, rilate la aferon, mi demandis min mem ĉu la problemo ne havas rilatojn kun la samaj principoj de Pavlov.

La instruanto pacience aŭdis min, ĝis la fino de miaj konsideroj kaj bonvole respondis:

— Via konsulto postulas pli grandan meditado. La animisma tezo estas respektinda. Konsciaj kaj sinceraj esplorintoj ĝin kreis, kaj ĝi naskiĝis por malhelpi la eblajn trouzojn de imagpovo; ĝi tamen estas kruele defendata de la plimulto de niaj enkarniĝintaj kunlaborantoj, kiuj faras el ĝi ian altrudan ilon, anstataŭ ĝin profiti, kiel edukon elementon ĉe la frateca ago. Miloj da kamaradoj forlasas laboron timigite,

malkuraĝiĝas antaŭ la malhelpoj ĉe la mediuma inicado, ĉar animismo fariĝis Cerbero. Seriozaj kaj edifaj asertoj, ŝanĝitaj en preman sistemon, baras pasadon de kandidatoj en la laboron pro la natura gradiĝo de lernado kaj praktikado. Oni postulas de ili absolutan precizecon, forgesante elementajn lecionojn de la naturo. En sia teoria kastelo, niaj sennombraj amikoj, kuniĝante por la nobla servo de interŝanĝo kun nia sfero, ordinare evitas la servantojn, kiuj devas kreski kaj perfektigi kun la tempo kaj kun la klopodo. Ili postulas aparatojn, kvazaŭ la spirita lumo brilus same kiel elektra lumo per ordinara lampo. Nenia arbo naskiĝas produktante, kaj ĉiu nobla kapablo petas poluron. Mediumeco do havas sian evoluon, sian kampon, sian vojon. Ne estas eble aprobi iun lernanton en supera kurso, se li ne havas sufiĉan konon pri preparaj kursoj, dum kelkaj jaroj da lukto, da klopodo, da disciplino. El tio, Andreo, venas nia prava zorgo antaŭ la animisma tezo, kiu intencas doni la tutan respondecon de la mediuma laboro al unu sola kapo, t.e. al tiu de la mediuma instrumento. Ni bezonas pli altajn instruojn, kiuj kuraĝigu la komencantajn kunlaborantojn, donante al ili pli grandajn konojn sur la vojo de ili mem irata, ke la sanktiga spiriteco penentru en la fenomenojn kaj studojn rilatajn al la Spirito.

Li faris malgrandan paŭzon, kiun mi ne kuraĝis interrompi, ravite de la alteco de la aŭditaj konceptoj, kaj li daŭrigis:

– Ni diskutu vian sugeston. La kondiĉitaj refleksoj efektive rilatas al la temo; sed ni devas esplori kampon por pli gravaj konsideroj. La bestoj de Pavlov montris memor-kapablon; ili memoris faktojn per mensaj spontaneaj asocioj. Ĉi tio esprimas, ke ili mobilizis subtilan materion sendependan de sia densa korpo; ke ili uzis mensajn fortojn en sia aparaturo pro primitivaj impulsoj. Se la “fragmentaj konsciencoj” de la eksperimento estis kapablaj uzi tiun energion, kaŭzante ripetigon de iaj fenomenoj en la ĉela kosmo, kiajn mirindaĵojn eble realigos la homa menso, obeante, ne al nuraj kondiĉitaj refleksoj, sed al elsendoj de alia menso en sintonizo kun tiu de li? Laŭ tiuj principoj estas necese, ke la peranto kreskigu sian propran valoron. Eksterordinaraj kaj nekonataj okazaĵoj plenigas la vivon en ĉiuj lokoj, sed evoluo kondiĉas, ke oni ĝin fervore serĉu. Neniu ricevos la benojn de rikolto sen la



ŝvito de semado. Sed bedaŭrinde la plimulto de niaj amikoj laŭŝajne ne konas tiajn altrudojn de laboro kaj kunhelpo: ili postulas kompletajn kapablojn. La mediuma peranto aŭtomate estas elklasigita, en la okazo, ke li ne havas la feliĉon elmontri absolutan harmonion kun la elkarniĝintoj, sur la triopa kampo de la mensaj, perispiritaj kaj fiziologiaj fortoj. Ĉu vi komprenas la malfacilaĵojn?

Jes, mi komencis kompreni. La instruoj tamen estis tro altiraj, ke mi kuraĝus fari ian ajn rimarkon; tial mi aŭdis la daŭrigon de la difinoj, kiel humila lernanto.

La Asistanto rimarkis mian internan sintenon kaj diris plu:

– Prenante pli simplan simbolon, ni prezentu al ni mediumon, kvazaŭ ponton inter du sferoj, inter kiuj okazis ŝajna rompo de la kontinueco, pro diferenco de materio sur la vibra kampo. Por esti relative ĝusta instrumento, estas nepre necese, ke li lernis obei, kaj ne ĉiuj metiistoj en la mediuma metiejo realigas en mallonga tempo tian akiron, kiu postulas sindediĉon al la feliĉo de la proksimulo, altan komprenon pri la ĝenerala bono, fortan emon al la frata helpo kaj serenajn superecon ĉe la konfliktoj kun aliula opinio. Ke la mediumo atingu tian edifon, estas necese, ke li ofte rifuĝu en la “loĝejon de la superaj principoj”. La menso de la servanto devas firmiĝi sur la plej altaj zonoj de la memo, kie li komprenos la valoron de sublimaj konceptoj, renoviĝante kaj perfektigante por fariĝi modela elemento al tiuj sekvantaj liajn paŝojn. La homo por helpi la estantecon estas devigata vivi en la estonteco de sia raso. Tiu antaŭeco trudas al li solecon kaj nekomprenon iafaĵe dolorajn; tiu situacio tamen estas artikolo de la Leĝo ordonanta akiri, ke ni povu doni. Neniu povas lernigi vojojn, kiujn li ankoraŭ ne iris. El tio venas, rilate la edifan mediumecon, la bezono fiksi la instrumentajn energiojn en la pli alta sanktejo de la persono. Fenomenoj – ne gravas ilia naturo –, estas necese rekonii, ĉie sieĝas la homon. La efektiva scienco estas la grada akiro de la fortoj kaj laboroj de la Naturo, kie ili kuŝis kaŝitaj for de nia malforta komprenpovo. Kaj ĉar ni estas idoj de la Revelacianta Dio, senfina je grandeco, ni esperas, ke ni ĉiam havu antaŭ ni senlimajn kampojn de observo, kies pordoj malfermiĝos laŭmezure kiel gradiĝos niaj meritaj titoloj. Tial, Andreo, ni pensas, ke la mediumeco pli stabila kaj bela

komenciĝas, ĉe la homoj, sur la kampo de intuicio pura. Moseo plenumis sian taskon, pelite de fenomenaj esprimoj, kiuj lin ĉirkaŭis; li ricevis sub nebridebla emocio la sublimajn principojn de la Dekalogo, sentante sin alfronti materiĝintajn figurojn kaj voĉojn el la spirita mondo; sed samtempe kiel li transdiras la ordonon “ne mortigu”, li laŭŝajne ne estas inklina al la nerompebla respekto por la aliula vivo; lia doktrino, kvankam respektiginda, baziĝas sur ekskluzivismo kaj timo. Kun Jesuo la aspekto de la mediumeco estas alia. La Majstro sin tenas en konstanta rilato kun la Patro, per sia propra konscienco, per sia propra koro; li ne postulas justecon nek petas tujan komprenon, li amas la homojn kaj ilin servas, tenante sin unuiĝinta al Dio. Pro tio la Bona Novaĵo estas mesaĝo de konfido kaj de universa amo. Ekzistas do du tipoj de perantoj de la Ĉielo mem, treege diversaj, montrantaj la modelon preferindan. Sed en la ordinara mediumismo la kunlaboranto servos per la mensa materio propra al li, suferante ĝiajn malprecizaĵojn antaŭ la surteraj esploroj; kaj, adaptiĝinte al la plej noblaj imperativoj de la persona rezigno, li, ne improvize, sed koste de senĉesa laboro, konstruos la internan templon por servado, en kiu li rekonos la superecon de la dia programo rilate la homajn kapricojn. Efektiviginte tiun realigaĵon, li estos preta sintonizi sin kun pli granda nombro da elkarniĝintoj kaj enkarniĝintoj, donante al ili, kiel bonfara ponto, la oportunan okazon renkonti unu aliajn, en la evolua pozicio, en kiu ili troviĝas, por konstruaj interkonsentoj. Mi devas al vi diri, ke ĉi tie ni ne zorgas pri akcidentaj kapabloj aperantaj kaj malaperantaj inter la kandidatoj al servado, sen orda kaj disciplina inklino, efektivaj provbalonoj por flugoj en la estontco; ni aludas la mediumecon akceptita de la servanto kaj uzebla en ĉia situacio por ĉies bono. Komentariante aktivecojn kaj taskojn, ni devas elstarigi la modelojn al ili rilatantaj, kaj tia estas la karakterizaĵo de la spirita instrumentaro en la superaj sferoj. Laŭ la logiko estas neeble tion atingi per unu fojo: ĉia verko havas komencon.

Ĉar mi montris per la okuloj la nebrideblan emocijon, kiu ekposedis min antaŭ la aŭditaj instruoj, la Asistanto ŝanĝis sian voĉtonon kaj trankviligis min:

– Parolante ankoraŭ pri la Kristo, estas grave rekoni, ke la Majstro vivis izolita sur “la dia monto de la konscienco”,

malfermante vojon al la homaj valoj. Vere neniu el ni pretendas imiti Jesuon; sed liaj lecionoj devas inspiri nin. Ekzistas milionoj da homoj, enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj, kun menso fiksita en la malpli altaj regionoj de la malsuperaj impulsoj, absorbite de la instinktaj pasioj, de la malvirtoj de la malnobla pasinteco, katenite de la kondiĉitaj refleksoj rilataj al perturbantaj emocioj, al kiuj tiuj homoj sin donis; multe da aliaj sin tenas ligitaj al la karno kaj ekster ĝi en senorda aktiveco, en amaj manifestoj sen celo, freneze alkroĉitaj al la pasinta formo aŭ situacio ne plu pravigebla; aliaj plie haltas ĉe la beata pozicio de la ekskluziva religia mistikismo, sen personaj realigaĵoj sur la kampo de sperto kaj merito, kiuj ilin rajtigu eniri en la kadron de vera altiĝo. Sen la fizika korpo la situacio restas plu senŝanĝa por la perispirita organismo, frukto de pacienca laboro kaj de longa evoluo. Tiu organismo, kvankam konsistigita per pli plastecaj kaj subtilaj elementoj, tamen ankoraŭ estas materiala konstruaĵo por reteno de la konscienco. Multe da homoj sur la Planedokrusto pensas, ke la Ĉielo vestas nin per anĝela tuniko, tuj kiam la korpo malleviĝas en tombon. Tio estas grava eraro. Memkompreneble ni ne aludas, en ĉi tiuj konsideroj, la Spiritojn samkategoriajn kiel Francisko el Asizo, nek la kreitojn ekstreme malicaj, unuj kaj aliaj ne apartenantaj al nia kadro: zenito kaj nadiro de la surtera evoluo ne estas en niaj studoj; ni parolas pri vulgare homoj, kiaj ni mem, pli-malpli normale irantaj sur la progesa vojo, por konkludi, ke, kiel estas nia nutrata mensa stato, tiel la elkarniĝintaj aŭ enkarniĝintaj inteligentoj, kiujn ni altiras, kaj de kiuj ni nerekte fariĝas naturaj instrumentoj. Estas realaĵo, mia amiko, ke ni ĉiujn, nombrantaj centojn da milionoj, ne povas malhavi prilumitajn perantojn kapablajn komunikigi nin kun la fontoj de Supera Donado. Ni bezonas pli noblan helpon, kaj ankaŭ apogon de la bonfarantoj loĝantaj super niaj regionoj. Por tio oni devas organizi rimedojn por ricevado. Nia menso avidas lumon, same kiel la surtera organismo bezonas panon. Amo kaj scio estas diaj substancoj subtenantaj nian viklecon.

La instruanto faris nelongan paŭzon kaj diris plu:

– Ĉu vi nun komprenas la valoron de la mediumeco, t.e. de la nobleco de niaj ricevaj kapabloj por atingi la necesan sintonizon kun la fontoj de la supera vivo?

Jes, mi respondis, mi komprenis liajn rimarkojn kaj taksis ilian grandecon.

– Ĝi ne estas servo, kiun ni povas organizi de ekstere internen – diris plu Kalderaro – sed de interne eksteren. La enkarniĝinta homo preskaŭ ĉiam regata de iluzio povos komenciĝi per fenomeno; sed laŭmezure kiel vekigās la pli profundaj energioj de la konscienco, li sentas bezonon reĝustiĝi kaj serĉos la kaŭzon por perfektigi la efikojn. Verko de konstruado, de tempo, de pacienco...

Post tiu parto de la konversacio la instruanto invitis min al laboro de helpo al sindona sinjorino, elvolviĝanta mediumino, kiu ricevas de li helpon por daŭrigi sian taskon, kun la nepre necesaj kuraĝo kaj trankvileco.

Donante al mi tiun feliĉan oportunon, mia ĝentila instruanto tiel finis:

– Tiu kazo estas oportuna. Vi kune kun mi observos la barojn kreitajn de la animisma tezo.

La horloĝo ĝuste montris la okan vespere, kiam ni penetris en komfortan ĉambron. Pluraj estuloj el nia mondo tie moviĝadis flanke de dek unu kamaradoj kunsidantaj por privata seanco, dediĉata al servado de preĝo kaj al la psika disvolviĝo. Ĉe la enirejo akceptis nin ĝentila kolego, al kiu oni prezentis min kun sincera ĝojo.

Mi komence ricevis de li resumajn informojn, kiujn mi kontente notis. Li ankaŭ estis kuracisto. Li forlasis la fizikan ekzistadon antaŭ ol realigi malnovajn planojn pri frateca helpo al siaj sennombraj malriĉaj malsanuloj. Li ĝojis pri sia trankvila konscienco, li zorgis pri ĉies bono kiel eble plej multe; sed, vidante eblecon ion fari en la transmondo, li havis permeson kunhelpi kun tiu malgranda grupo el amikoj, celanta realigi ian planon de helpo al forlasitaj malsanuloj. La interŝanĝo kun la elkarniĝintoj ne povas transformi homojn en anĝelojn en nur unu tago, sed povas helpi ili fariĝi pli bonaj kreitoj. Estas neeble instalati paradizon sur la Krusto de la mondo dum kelke da semajnoj; tamen estis juste kunlabori por la plibonigo de la surtera socio, kaj stimuli homojn praktiki bonon kaj vivi fratece. Por tiu celo, li tie restis, interese kontribui por la protekto al la malpli feliĉaj malsanuloj.

Aŭdante kun miro liajn argumentojn, mi tenis min silenta, sed Kalderaro ĝentile demandis, post kiam li informiĝis pri la okazaĵoj:

– Kiel disvolviĝas viaj altaj intencoj?

– Malfacile – respondis la alparolito –; la komunikorimedoj, kiujn mi havas, ankoraŭ ne inspiras konfidon al la plimulto de la enkarniĝintaj kamaradoj. Vere mi ne interesiĝas veni ĉi tien kun pompa nomo el la klasika terminologio, nek kuraĝas prezenti novajn temojn, konkurante kun la kuracista rondo. Nun gvidas min nur la sana deziro praktiki bonon. Sed...

– Ĉu ili ankoraŭ ne aŭdis viajn petojn pere de Eŭlalia? – demandis mian instruanto.

– Ne; ankoraŭ ne. Ĉiam la sama suspekto pri animismo, pri senkonscia mistifiko.

La konversacio atingis la mezon, kiam la spirita direktoro de la seanco invitis sian kolegon fari eksperimenton. Venis la difinita minuto. Li povus proksimiĝi al la mediumino.

Ni iris al la grupo da amikoj sindonintaj al profunda enmemiĝo.

Dum la nova konato apudiĝis al distingiĝa sinjorino, certe provante dikti la mesaĝon, kiun li deziris transdoni al la karna rondo, Kalderaro min atentigis:

– Vidu la tuton. Mi jam faris miajn rimarkojn. Ekseptinte tri personojn, la ok aliaj montras favoran sintenon. Ĉiuj troviĝas ĉe la mediuma pozicio pro sia pasiveco. Ekzamenu fratinon Eŭlalia kaj vi rekonos, ke ŝi posedas la plej progresintan ricevokapablon; el la ok probablaj kunhelpantoj ŝi estas tiu, kiu pli proksimiĝas al la necesa tipo. Nia kuracisto-amiko tamen ne trovas en ŝia psiko-fizika organismo kompletajn afinajn elementojn: nia kunlaborantino ne ligiĝas al li per ĉiuj siaj perispiritaj centroj; ŝi ne estas kapabla altiĝi ĝis la sama vibrofrekvenco, en kiu troviĝas la komunikiĝonto; ŝi ne posedas sufiĉan “internan spacon” por akcepti liajn ideojn kaj konojn; ŝi ne ensorbas lian tutan entuziasmon por la scienco, ĉar ŝi ne portas el aliaj ekzistadoj nek konstruis en la nuna la evoluajn klavojn, kiujn nur la dezirata kaj travivita laboro povas doni al ŝi. Sed Eŭlalia montras grandan povon – la kreantan bonan volon –, sen kiu estas nebla la komenco de altiĝo al la plej altaj regionoj de la vivo. Ĝi estas la plej grava pordo, per kiu ŝi interkompreniĝados kun la elkarniĝinta

kuracisto. Ĉi tiu, siavice, por realigi la noblan deziron, kiu lin animas, estas devigita, pro la cirkonstancoj, flanken meti la profesion nomaron, la sciencajn teknikojn, la proprajn daŭrojn, la novajn difinojn, la famajn titolojn, kiuj altigas lian memoron ĉe la rondo de liaj konatoj kaj de liaj klientoj. Li povos identiĝi kun Eŭlalia por la necesa mesaĝo, ankaŭ uzante siavice la bonvolon; kaj, utiligante ĉi tiun rimedon de komunikado, li super ĉio helpas sin per la mensa komuneco, minimume reduktante la influon sur la neŭro-psikajn centrojn; rilate mediumismon, ekzistas egalaj tipoj de kapabloj, sed tre granda malegaleco pri gradoj de riceva kapablo, kiuj senfine varias, same kiel la personoj.

La instruanto silentis dum kelkaj momentoj kaj poste daŭrigis:

– Ni ne forgesu, ke ni nun estas aro da laborantoj eksperimente agantaj. La probabla komunikonto eĉ ne realigis la bazojn de sia projekto nek la mediumino atingis ankoraŭ sufiĉan mensklarecon kaj ricevokapablon por kunlabori kun li. Sur la kampo de difinitaj aktivecoj, en ĉi tiu rilato, ni volonte povus agi; ne ĉi tie: nia konduto devas esti de mensa neŭtraleco, ne de interveno. Komprenante do, ke ĉiuj rimedoj devas esti profitataj por la triumfo de la laŭdinda edifado, neniu el ni intervenos, konfuzante aŭ perdante tempon. Estas al ni permesate interŝanĝi ideojn, ekzameni la okazaĵon, sed kun absoluta senpartieco. La momento apartenas al la komunikonto, kiu ne disponas je pli perfekta aparato por la transsendo.

En tiu momento li almontris la kolegon, kiu, starante ĉe Eŭlalia, tenis sian menson prilumita por disrompi la naturan muregon inter nia sfero kaj la kampo el densa materio.

– Rimarku la apartaĵojn de la servo – diris al mi Kalderaro kun signifa voĉtono –; ĉiuj kunuloj en riceva pozicio sorbadas la mensan elsendon de la komunikanto, ĉiu siamaniere. Flegme observu.

Mi ĉirkaŭiris la tablon kaj vidis, ke la radioj de pozitiva forto de la kuriero efektive trafis ok personojn. Mi rekonis, ke la ĉefa temo formulita de nia amiko, rilate la helpon al malsanuloj atingis la cerbon de tiuj, kiuj troviĝis ĉe pasiva sinteno; sur la animita ekrano de koncentriĝo de mensaj

energioj, ĉiu frato ricevis la sugestian influon, kiu tuj kaŭzis al ili la liberan asocion de la psikanalizistoj.

Atente mi fikse rigardis la apartaĵojn.

Tuj kiam ili ricevis la elsendon de fortoj de laboranto por la bono, iu sinjoro rememoris kortuŝan scenejon de hospitalo; alia ricevis pensojn de simpatio al forlasitaj malsanuloj; du sinjorinoj pensis pri la karitema misio de Vincento de Paŭlo; al iu kadukulino venis ideo viziti kelkajn surlitajn personojn de ŝi amataj; unu junulo silente rememoris notindajn paĝojn, kiujn li iam legis, pri frata kompato al ĉiuj similuloj apartiĝintaj de la fizika ekvilibro.

Mi ekzamenis ankaŭ la tri personojn, tenantaj sin indiferentaj al la bonfara servo en tiu horo. Du el ili malĝojas, ke ili ne ĉeestis kinan prezentadon, kaj la alia, maljuna sinjorino, retenis sian menson ĉe rememoro pri la hejmaj laboroj, kiujn ŝi konsideris nepre necesaj kaj neprokrasteblaj eĉ tie, ĉe rondo de preĝo, kie ŝi devus ricevi la bonon de paco.

Nur Eŭlalia pli klare ricevis la alvokon de la komunikanto. Ŝi sentis lin apude; ŝi involviĝis en liajn pensojn; ŝi posedis ne nur ricevemon, sed ankaŭ bonvolon por lin servi.

Post kelkaj minutoj da atendo kaj silenta preparo, la mano de la mediumino gvidata de la kuracisto kaj movigata helpe de la psika-fizikaj stimuloj de la perantino, komencis skribi per neregulaj skribkarakteroj, montrantaj la naturan konflikton de “du psikaj kosmoj” malsamaj, sed klopodantaj por nura celo – produkti superan verkon.

Mi interese akompanis la scenon.

Post kelkaj minutoj oni legis la malgrandan manskribitan tekston.

La komunikaĵo estis redaktita en simpla formo, kia frateca alvoko.

“Miaj fratoj – skribis la sendito –, Dio vin benu.

Altirite de la konstruo por la bono, ni laboru ĉe la helpado al malsanuloj, bezonantaj nian amon, meze en la suferoj de la surtera provado. La servo apartenas al bonvolo ligita al la vivanta fido. La semado postulas abnegaciajn laborantojn, kiuj ignoras lacecon, malĝojon kaj malkuraĝon.

Ni iru antaŭen.

Ĉiu eta montrado de persona klopodo ĉe la realigoj de karitato ricevos de la Sinjoro da Dian Benon.

Ni do lernu helpi niajn amikajn malsanulojn. Dum densaj noktoj da doloroj ili suferas kaj ploras iafoje en tuta forlasiteco.

Ĉu la rigardado de tia sceno ne ĉagrenas vin? Ni rememoru la Dian Kuraciston, kiu pasigis la tempon en la mondo, praktikante bonon. De Li ni ricevos la necesan forton por progresi. Li estos kun ni ĉe la granda kompata laboro por la suferantoj.

Ni fidas vin, vian sindonon al la afero de la evangelia boneco.

La vojo eble estos malfacila kaj malglata; sed la Sinjoro restos ĉe ni.

Ni sentime antaŭeniru kaj Li benu nin nun kaj ĉiam.”

La komunikanto subskribis per sia nomo kaj post kelke da minutoj finiĝis la spiritaj laboroj de tiu vespero.

La prezidanto de la kunsido kaj liaj kunuloj komencis la studon kaj diskuton de la mesaĝo. Oni konsentis, ke ĝi esence estas edifa, sed ĝi ne prezentas konkludigajn signojn pri persona identeco; ke ĝi eble ne venas de la konata profesiulo, kiu ĝin subskribis; mankis al ĝi la specialaj karakterizaĵoj, ĉar kuracisto uzus ĝustan terminaron, apartigante sin de la ordinara lingvaĵo.

Kaj la animisma tezo ekaperis kvazaŭ sava tabulo por ĉiuj. La konversacio transiris en la kompliktajn aludojn al la eŭropa mondo; oni multe parolis pri Richet kaj pri la tutmonda metapsikio; Pierre Janet, Charcot, De Rochas kaj Aksakof estis ofte citataj.

La komunikanto en nia mondo de agado, konsternita, sin turnis al mia instruanto kaj komentariis:

– Ba! mi neniam deziris veki tian polemikon en la domo. Ni intencas aliaĵon. Sufiĉas al ni iom da amo al malsanuloj, neniom pli.

Kalderaro ridetis, ne dirante vorton, kaj vidigante zorgon pri pli grava objekto, venis al Eŭlalia malĝoja.

La mediumino aŭdis la altvalorajn difinojn kun intensa amareco.

Ŝia menso nun konfuziĝis, kovrita per densaj vualoj da dubo. La fluanta argumentado nebuligis ŝian komprenon. Ŝiaj okuloj pleniĝis de larmoj, kiuj tamen ne falis.



Alproksimiĝante al ŝi, la instruanto bonkore parolis al mi:

– Niaj enkarنيĝintaj amikoj ne ĉiam esploras la situaciojn el vidpunkto de efektiva justeco. Eŭlalia estas valora kaj sincera kunlaborantino. Kvankam ŝi ankoraŭ ne kompletigis siajn kulturajn akirojn, ŝi tamen estas sufiĉe riĉa je amo por kontribui al la semado de lumo. Sed ŝi troviĝas senprotekta inter siaj neviglantaj kunuloj. Ŝi restas tute sola kaj, tiele sieĝita, ŝi povas fali. Ni helpu ŝin, ne perdante tempon.

La dekstra mano de la Asistanto, malfermita sur la kapo de nia respektinda fratino, elsendis brilajn radiojn, kiuj malsupreniris de ŝia encefalo ĝis torako, kiel renoviga fluo.

La mediumino, kiu antaŭe ŝajnis torturita, pene bridante la naturan reagon je la aŭditaj opinioj, revenis al trankvileco. Ŝia malkontenta mieno malaperis, disaeriĝis ŝia detrua malĝojo; ŝiaj perispiritaj centroj ree normaligiĝis; la pineala glando disradiis mildan lumon. La nuboj da ĉagreno, kiuj formiĝis en ŝia menso, disfumiĝis, kvazaŭ per ŝorĉo. Unuvorte, subtenate de la rekta agado de mia instruanto, Eŭlalia sciis pri la ĝenoj de la laboro kaj grade enprofundiĝis en la mildan klimaton de kompreno.

Restariginte ŝian trankvilecon, la instruanto tuj poste tenis plu la manojn apogitajn sur ŝiaj fruntalaj lomboj kaj agis sur ŝiajn inhibiciajn fibrojn. Mi tiam rimarkis novan ŝanĝon. La menso de la mediumino, kvazaŭ enmemiĝinta, seninteresiĝis pri la ĉirkaŭa konversacio kaj restis pli atentanta nian kampon de agado. La bonfara kontakto de la Asistanto, ne perceptebla al ŝi, rompis ŝian intereson pri la senprofitaj aludoj, kaj alvokis ŝin al pli intima interŝanĝo kun ni.

Kladeraro kun patra amemo, tenante la manojn ĉe la sama pozicio, kliniĝis al ŝiaj oreloj kaj afable parolis:

– “Eŭlalia, ne senkuraĝiĝu! La fido estas forto subtenanta la spiriton en la fronta batalo por venko de la dia lumo kaj de la universa amo. Niaj amikoj ne akuzas vin nek vundas: ili sole nur dormas en la iluzio kaj revas apartigitaj de la vero; senkulpigu ilin pro la nuna frivoleco. Poste ili vekigoŝ por la klopodo semi bonon... Ili esploras per la okuloj la supraĵon de la aferoj, sed per siaj oreloj ili ankoraŭ ne aŭdas la subliman savantan alvokon. Ni iru antaŭen. Ni estos kun vi ĉe la ĉiutaga tasko. Estas nepre necese, ke ni amu kaj ĉiam pardonu,

fororgesante la malluman tagon, ke ni atingu la lumajn jarmilojn. Ne senkuraĝiĝu! La Eterna Patro vin benos.”

Mi rimarkis, ke Eŭlalia ne registris tiujn parolojn per la karnajn timpanoj. Ŝiaj fruntalaj lomboj pleniĝis de intensa lumo. La kortuŝaj frazoj de la instruanto amasiĝis en ŝiaj cerbo kaj koro, kiel sublimaj pensoj al ŝi falantaj el la ĉielo, saturitaj per revivigla kaj benata varmo.

Jes – konsentis el la fundo de la animo la sindediĉa kunlaborantino, kvankam ŝiaj lipoj restis fermitaj en la nekomprenebla silento – ŝi laboros ĝis la fino, konsciante, ke la servo por la vero apartenas al la Sinjoro, ne al la homoj. Ŝi forgesos ĉiujn batojn. Ŝi ricevos la aliulajn malkonsentojn, kaj ŝanĝos ilin en helpojn. Ŝi aliigos la senkuraĝigajn opiniojn en motivojn de nova energio. Ŝi rapidos rekoni siajn proprajn erarojn ĉiam, kiam montritaj de ies sincereco, ĝojante pro la oportuna okazo kiel eble plej multe ilin korekti. Ŝi iros antaŭen. La mediumeco estos al ŝi kampo de laboro, kie ŝi perfektigos la sentojn, kiujn ŝi nutras, ne pensante pri la iloj por ĝin servi: ĉu gravas al ŝi efektive la psikografiaj malfacilaĵoj, kiam pulsadas en ŝi ia koro preta ami? Jes, super ĉio ŝi aŭdos la sugestojn de bono. Ŝi estos fidela al Dio kaj al si mem. Se la homaj kamaradoj ne povus ŝin kompreni, ĉu ne estos al ŝi konsolo esti komprenata de la amikoj el la spirita vivo? Ĉe la fino de ŝia surtera provo estos sufiĉa lumo por ĉiuj. Koncernis ŝin kredi, labori, ami kaj esperi al la Dia Sinjoro.

La Asistanto retiris la manojn, kaj lasis ŝin libera, kaj, alproksimiĝante al mi, li diris:

– Nia fratino estis helpita kaj fartas bone, Dio estu laŭdata!

Rimarkinte la fruntalajn lombojn de la mediumino, envolvitaj en lumo, mi sentigis al Kalderaro mian miron.

La amika instruanto, ne evitante pliajn klarigojn, informis:

– Eŭlalia, en ĉi tiu momento, mense firmiĝas en la kiel eble plej alta regiono. Trankvila, ŝi revenas al sia plej interna sanktejo por kompreni kaj profite senkulpigi.

Montrante la cititan cerban regionon, li finis:

– En la fruntalaj lomboj, Andreo, fiziologia eksteraĵo de la perispiritaj gravaj centroj, kuŝas milionoj da ĉeloj, atendantaj, por funkcio, la homan klopodon sur la kampo de spiriteco. Neniu homo, eĉ el tiuj plej kuraĝaj pensantoj, ekde la pasinteco

ĝis la nunaj tagoj, iam sukcesis utiligi ilian dekonon. Ili estas fortoj de nekonata kampo, kiun la animo konkeros, ne nur dum evolua kontinuo, sed ankaŭ per penoj de memedukado, de morala pliboniĝo kaj de sublima altiĝo; tian servon, mia amiko, nur la vigla kaj revelacia fido povas komenci, kvazaŭ nepre necesa lampo por la individua progreso.

## X

### DOLORA PERDO

Meze en la nokto ni renkontis afliktitan patrinan koron. La Spirito, kiu alparolis nin, vekis kompaton pro la mieno de terura sufero.

– Kalderaro! Kalderaro! – ŝi ekkriis konsternita – subtenu mian filinon, mian malfeliĉan filinon!

– Ho! ĉu ŝia farto malboniĝis? – demandis la instruanto, montrante koni la situacion.

– Multe! multe!... – veis la tremantaj lipoj de la afliktita patrino –; mi kredas, ke ŝi tute freneziĝis...

– Ĉu ŝi perdis la gravan okazon?

– Ankoraŭ ne – informis la interparolantino –, sed ŝi troviĝas ĉe la rando de profundegaĵo.

La instruanto promesis rapidi al la malsanulino post kelkaj minutoj, kaj ni revenis al nia intima konversacio.

Ĉar mi interesiĝis pri la afero, la ĝentila Asistanto resumis la okazintaĵon.

– Temas pri bedaŭrinda okazaĵo – li afable diris la mi –, en kiu aperas frivoleco kaj malamo, kiel perversigaj elementoj. Tiu fratino ĵus foririnta postlasis filinon sur la Planedo-krusto antaŭ ok jaroj. Kreskinte dorlotita, la junulino disvolviĝis, ne konante laboron nek respondecon, kvankam apartenante al nobla socia kadro. Solfilino, sindoninta de frua aĝo al pereiga kaprico, apenaŭ troviĝis sen la patrina zorgo en la karna mondo, ŝi potencis gubernantojn, subaĉetis servistinojn, trompis la patran viklecon kaj ĉirkaŭita de materiaj facilaĵoj, sin ĵetis, estante dudekjara, en la monduman vivon. Tiele senprotekta antaŭ la cirkonstancoj, ŝi ne sufiĉe prepariĝis por kuraĝe solvi la problemojn de sia persona savo. Sen la spirita protekto

propra al malriĉeco, sen la benataj stimuloj de la materiaj baroj, kaj posedante, kontraŭ siaj intimaj bezonoj, la profundan paseman belecon de sia vizaĝo, la kompatindulino renaskiĝis, sekvata de proksime ne ĝustadire de malamiko, sed de kunfarinto de gravaj eraroj, antaŭlonge elkarniĝinta, al kiu ŝi ligiĝis per terura malamo en proksima pasinteco. Tiel, trouzante sian liberecon en riproĉinda senfareco, ŝi akiris la devojn de patrino sen la protekto de edziniĝo. Nun vidante sin en ĉi tiu situacio, aĝante dudek kvin jarojn, fraŭlina, riĉa kaj prestiĝa pro sia familia nomo, ŝi malfrue bedaŭras novajn kompromisojn kaj malespere luktas por liberiĝi de la nematura infaneto, tiu sama kunkriminto el la pasinteco, kiun mi aludis; tiu malfeliĉulo, pro “aldono de la dia favorkoreco”, tiamaniere penas profiti la eraron de sia ekskunulino por realigo de ia savanta servo, sub kontrolo de niaj Plejgrandaj.

Antaŭ la mirego, kiu neatendite min ekposedis, kvankam mi sciis, ke reenkarigiĝo ĉiam estas beno efektiviĝanta per supera helpo, la Asistanto asertis, trankviligante min:

– Dio estas la amoplena kaj saĝa Patro, kiu ĉiam aliigas niajn proprajn mankojn en amarajn medikamentojn, kiuj nin kuracas kaj fortikigas. Tiel Cecilia, la mensmalsanulino, kiun ni baldaŭ vizitos, rikoltis pro sia ventanimeco mem la ekstreman rimedon kapablan korekti sian vivon... La malfeliĉulino tamen fortege reagis kontraŭ la dia helpo, per bedaŭrinda kaj perversa konduto. Mi kunlaboras en la laboroj de helpo al ŝi, ekde kelkaj semajnoj, pro la oftaj kaj kortuŝaj patrinaj interhelpoj ĉe niaj superuloj; sed mi nutras malfortan esperon je ia baldaŭa renobliĝo. La ligiloj inter patrino kaj supozata filo estas amaraj kaj malamaj, konsistigante malekvilibrigajn energiojn; tiaj ligiloj montras, ke virino devas ŝirmi sin en la sanktejo de rezigno kaj espero, se ŝi deziras venkon. Por tio, por glatigi savantajn vojojn kaj perfektigi sentojn, la Plejalta Sinjoro kreis la varmetan kaj velurecan neston de patrina amo; sed, kiam la virino ribelas, indiferenta al la sublimaj vibroj de la dia inspiro, estas malfacile, eĉ neeble, plenumi la planitan programon. La malfeliĉulino, kontentigante la kondamnindan deziron, penis helpi sin per kuracistoj, kiuj, subtenate de nia mondo, rifuzis plenumi ŝian kriman intencon; ŝi tiam utiligis venenajn drogojn, kiujn ŝi jam longe intense trouzas. Ŝia mensa situacio estas tiu de bedaŭrinda frenezulino.

Post tiu nelonga antaŭparolo, Kalderaro daŭrigis:

– Sed ni ne havas minuton perdotan. Ni vizitu ŝin.

Post kelkaj momentoj ni penetris en komfortan kaj parfumitan ĉambron.

Etendita sur lito, juna virino baraktis en teruraj konvulsioj. Apud ŝi troviĝis la patrino estulo, nevidebla al la karnaj okuloj, kaj surtera flegistino, el tiuj, kiuj, multe ĉeestinte biologiajn katastrofojn kaj moralajn dramojn, fariĝis malpli senteblaj al la aliula doloro.

La patrino de la malsanulino antaŭiris kaj informis:

– Ŝia situacio estas tre grava! ni helpu ŝin pro kompto!

Mi ĉi tie estas por malhelpi eniron de konfuzantaj elementoj, kiuj senkompte daŭrigas sian nigran viziton.

La Asistanto flegme kaj atente kliniĝis super la malsanulino kaj rekomendis al mi kunlabori en la ekzameno de la fiziologia kadro.

La organisma kadro estis el tiuj plej kortuŝaj.

La frata kompto sendevigas nin fari la doloran rakonton pri la embrio tuj elpelota.

Ĉirkaŭlimigite al la tezo de kuracado al halucinitaj mensoj, ni nur devas diri, ke la situacio de la junulino estis impresa kaj bedaŭrinda.

Ĉiuj endokrinaj centroj estis senordaj, kaj la memstaraj organoj rapide laboris. Ŝia koro montris strangan aritmion kaj vane la ŝvitnaskaj glandoj klopodis elpeli la toksinojn, kiuj formis efektivan invadantan torenton. Sur la fruntalaj loboj la senlumeco estis kompleta; en la encefala kortekso la perturbo estis evidenta; nur en la bazaj ganglioj estis grandega koncentriĝo de mensaj energioj, kio komprenigis, ke la malfeliĉulino envenis sur la plej malsupran kampon de sia memo, regata de la impulsoj detruantaj ŝiajn proprajn sentojn deviintaj kaj krudaj. De la bazaj ganglioj, kie amasiĝis la plej fortaj radioj de la haluciniĝinta menso, malsupreniris malhelaj radioj, kiuj invadis la salpingojn kaj ovariojn, kaj penetris en la generan ĉambron, kvazaŭ maldikegaj lancoj falantaj sur la kvarmonatan embrian organismon.

La sceno estis terura.

Penante sintonizi sin kun la malsanulino, mi aŭdis ŝiajn asertojn sur la pensokampo:

– Mi malamas!... mi malamas ĉi tiun trudiĝeman filon, kiun mi ne petis en la vivon!... Mi lin elpelos!... mi lin elpelos!...

La menso de la fileto en reenkarriĝa fazo, kvazaŭ vekita el milda dormo, petegis ploranta:

– Savu min! Savu min! mi volas vekiĝi ĉe laboro! mi volas vivi kaj reĝustigi mian destinon... helpu min! mi pagos mian ŝuldon!... mi pagos vin per amo..., ne elpelu min! pro karitato!...

– Neniam! neniam! estu malbenata! – mense diradis la malfeliĉulino –; mi preferas morti ol vin akcepti en la brakojn! vi venenas mian vivon, konfuzas mian vojon! mi vin malamas! vi mortu!...

Kaj la malhelaj radioj malsupreniris plu laŭ kontinua fluo.

Kalderaro levis la respektogindan kapon, rigardis min kaj demandis:

– Ĉu vi komprenas la gravecon de la tragedio?

Mi jese respondis kun neesprimebla impresio.

En tiu momento de nia dolora atendo, Cecilia decide sin turnis al la flegistino:

– Mi estas laca, Liana, tre laca, sed mi postulas la operacion en ĉi tiu punkto!

– Ho! sed tiel, en tia stato?! – diris la alia.

– Jes, jes – ree parolis la malsanulino maltrankvila –; mi deziras ne prokrasti tiun intervenon. La kuracistoj rifuzis ĝin fari, sed mi fidis vian komplezemon. Mia patro ne devas informiĝi pri tio, kaj mi malamas tiun situacion, kiun mi tute ne konservas.

Kalderaro surmetis la dekstran manon sur la frunton de la respondeculino pri la flegservoj, evidente celante transdiri ian pacigan instruon, kaj la flegistino konsideris:

– Ni penu ripozi, Cecilia. Vi eble ŝanĝos tiun planon.

– Ne, ne –, kontraŭstaris la senzorga estonta patrino kun nekaŝebla malbonhumoro –; mia decido estas neskuebla. Mi postulas la intervenon en ĉi tiu punkto.

Malgraŭ la decidita rifuzo, ŝi englutis la kalikon da sedativo, kiun ŝia kunulino proponis al ŝi, kontentigante nian nerektan influon.

Efektiviĝis la projekto, kiun nia instruanto deziris.

Kiam ŝi duone malligiĝis de la fizika korpo pro nerezistebla dormemo kaŭzita de la agado de la medikamento, tiam Kalderaro fluigis magnetajn emanaĵojn sur la fotimpreseblan diskon de ŝia vidaparato, kaj Cecilia komencis nin neperfekte vidi, tenante sin mirigita ĉe rigardado al sia patrino.

Sed mi rimarkis, ke, dum la patrineto verŝis abundajn larmojn de emocio, ŝia filino sin tenis flegma, malgraŭ la mirego, kiu montriĝis en ŝia rigardo.

La elkarniĝinta sinjorino antaŭenpaŝis, brakumis ŝin kaj afliktite petis:

– Infano kara, mi venas al vi, ke vi ne plenumu la nigran aventuron, kiun vi projektis. Rekonsideru vian mensan sintenon kaj alkonformiĝu al la vivo. Ricevu miajn larmojn, kvazaŭ peton de la koro. Pro kompato, aŭdu min! ne ĵetu vin en mallumon, kiam la dia mano malfermas al vi pordojn al la lumo. Neniam estas malfrue por rekomenco, Cecilia, kaj Dio en sia senlima boneco transformas niajn erarojn en savoretojn.

La freneza menso de la aŭdantino neprecize rememoris la sociajn konvenciojn, kvazaŭ ŝi travivis minuton da nedifinebla inkubo.

Kaj la patrino daŭrigis:

– Antaŭ ĉio aŭdu vian konsciencon! La antaŭjuĝo estas respektinda, la socio havas siajn justajn principojn; tamen, filino, iafoje venas momento en niaj destino kaj doloro, kiam ni devas resti ekskluzive kun Dio. Ne malestimu kuraĝon, fidon, bravecon... Patrineco prilumita de amo kaj sinofero ĉie estas feliĉa, eĉ kiam la mondo, nesciante la kaŭzon de niaj faloj, rifuzas al ni rimedojn por renobliĝo, transdonante nin al nova falo kaj senprotekto. Nun vi spertos tempeston da larmoj; uragano da nekomprenemo kaj netoleremo vipos vian vizaĝon... Sed bona vetero revenos. La vojo estas ŝtonoplana kaj seka, la dornoj disvundas, sed vi havos ĉe via brusto ameman infaneton, kiu montros al vi la estontecon! Vere, Cecilia, vi devus starigi vian neston de feliĉo sur la arbo de ekvilibro, pace glorante la ĉiutagan laboron kaj la ĉiunoktan benon; sed vi ne povis atendi... Vi cedis al batoj de senbrida pasio, vi forlasis vian idealon ĉe la unuaj impulsoj de viaj deziroj. Anstataŭ konstrui en trankvileco kaj konfido, sur firma bazo, vi elektis la danĝeran vojon de senprudento. Nun



estas nepre necese, ke vi evitu la fatalan krutaĵon, ĉirkaŭiru la perfidan profundegaĵon, alkroĉante vin al savtabulo de la superega devo. Revenu do, infano, al via komenca sereneco, kaj resignaciu antaŭ la nova ŝajno, kiun vi donis al via vojo, kaj akceptu la doloran patrinan servadon, oferante viajn belajn revojn. En silento kaj sennomeco, for de la socio, ni multfoje ĝuas la feliĉon koni nin mem. Se la publika malŝato ĵetas la pli malfortajn en la forgeson de si mem, ĝi altigas al Dio la pli fortajn, ĉi tiujn subtenante sur la nerimarkata vojo de la humilaj devoj, ĝis la monto de savo. Eble via patro malbenas vin, niaj plej amataj sur la Tero vin malestimas kaj provas vin malnobligi; sed kia martireco ne nobligos homon pretan pagi siajn ŝuldojn per sindediĉo al bono kaj sereneco ĉe doloro? Ĉu ne estas pli bone krono de dornoj sur frunto ol amaso da braĝoj en la konscienco? Malbono povas nin malfeliĉigi kaj deviigi; bono ĉiam korektas. Krom tio, se estas vero, ke honto vipos vian sentemon, la gloro de patrineco brilos sur via vojo... Viaj larmoj estos kvazaŭa roso sur kara kaj superbela floro, kiu estos via infano, karno el via karno, estaĵo el via estaĵo. Kion ne faros en la mondo la virino, kiu scias rezigni? Tempesto bruos, sed ĉiam for de via koro, ĉar tie, en ĝia interno, en la dia sanktejo de amo, vi trovos en vi mem la povon de paco ĝis la venko...

La malsanulino aŭdadis preskaŭ indiferenta, preta ne kapitulaci. Ŝi sen sintenŝanĝo aŭdis la patrinajn konsilojn. Ŝia patrineto tamen, sin helpante per ĉiuj eblaj rimedoj, daŭrigis, post pli longa paŭzo:

– Aŭdu Cecilia! ne restu en tia senfara sinteno. Ne apartigu la koron de la cerbo, ke via rezonado kune kun la sento bonfaru al vi, ke vi venku la krudan provon. Ne retenu vin en la supereco de via fizika formo, nek supozu, ke la spirita kaj eterna beleco starigas sian templon en la karna korpo, transiĝanta en polvon. La morto ja venos, kio estas realaĵo, konfuzanta iluzion. Ne restu plu post la vualo de mensogo. Humiligu vin ĉe la konstrua rezigno, prenu vian krucon kaj ekiru al la plej alta kompreno... Sur la kruco de via interna sufero vi aŭdos la emociajn voĉojn de ia benata filo... Se la mondo vin malestimos, li estos apud vi la dolĉa reprezentanto de Dio... Kio gravos al vi manko de fantaziaĵoj, se du

malgrandetaj velurecaj brakoj karese kaj fidele ĉirkaŭprenos vin, kondukante vin al renoviĝo por la supera vivo?

Tiam Cecilia, mirigante min pro sia agresemo, pense kontraŭstaris:

– Kial vi ne diris tion antaŭe? Sur la Tero vi ĉiam kontentigis miajn dezirojn. Vi neniam permesis al mi labori, vi subtenis mian senfarecon, vi kredigis al mi, ke mi estas en pozicio pli supera ol tiu de aliaj homoj, vi sugestis al mi la supozon, ke mi rajtas ĉiujn specialajn privilegiojn; vi fine ne preparis min! Mi estas tute sola kun aflikta problemoj... Mi nun ne kuraĝas humiliĝi... Almozi pagatan laboron ne estas la idealo, kiun vi al mi donis, kaj alfronti honton kaj mizeron estas al mi pli malbone ol la morto. Ne, ne!... mi ne rezignos, eĉ aŭdante la voĉon de vi, kiun malgraŭ ĉio mi ankoraŭ amas... Estas neeble retropaŝi...

La kortuŝa sceno konsternis. Mi tie vidis la jarmilan konflikton de la patrino amo kun la reala vivo.

La respektinda sinjorino pli amare ploris, pli forte alprem-  
is sin al sia filino kaj petegis:

– Pardonu min pri la malbono, kiun mi faris al vi, tro amate vin... Ho, kara filino, ne ĉiam la homa amo viglas! Ifoje blindeco pelas nin al kriptaj eraroj, kiujn nur mortobato tute forviŝas. Ĉu vi do ne vidas mian doloron? Mi rekonas mian nerektan partoprenon en via nuna malfeliĉo, sed nun komprenante la gravecon kaj delikatecon de la patrinaj devoj, mi ne deziras, ke vi venu rikolti dornojn en la sama loko, kie mi spertas la amarajn rezultatojn de mia neantaŭvidemo. Ĉar mi eraris pro eksceso de amo, ne deviu pro amaso da malamo kaj nekonformiĝo. Post tombo, tago da bono estas pli luma, kaj la punkto da malbono estas treege pli densa kaj aflikta. Akceptu humilecon, kiel benon, kaj doloron, kiel valoran oportunan okazon. Ĉiuj surteraj luktoj venas kaj pasas; kvankam ili daŭras, ili tamen ne eterniĝas. Ne kompliku do vian destinion. Mi submetiĝas al viaj riproĉoj. Ilin meritas tiuj, kiel mi, kiuj forgesis arbaron da realigoj por la eterneco, memvole tenante sin en la ĝardeno de facilaj kapricoj, kie la floroj ornamas ne pli longe ol rapida minuto. Mi forgesis, Cecilia, la bonfaran ŝpaton de la persona klopodo, per kiu mi devus plugi la grundon de mia vivo, dissemante donacojn de edifa laboro, kaj mi ankoraŭ ne sufiĉe ploris por elaçeti min

el tiel bedaŭrinda eraro. Sed mi fidas vin, kaj esperas, ke la samo ne okazu al vi sur la regenera vojo. Preferinde almozi pri pano, suferi la mokojn de la homa malico, tie, sur la Tero ol malatenti la oportunaĵojn de Dio, kaj konsenti, ke krueleco regu nian koron. Sufero de la venkitoj ĉe la homa batalo estas luma provizejo da sperto. La Dia Boneco ŝanĝas niajn vundojn en lumantajn lampojn por nia animo. Feliĉaj tiuj, kiuj alvenas al morto punktita de cikatroj, signoj de suferplena batalo. Por tiuj, ĉiama erao de paco brilos sur horizonto, ĉar la realo ne surprizos ilin, kiam la tomba malvarmo blovos ilian koron. La vero fariĝos al ili kuraĝiga amiko; espero kaj kompreno estos al ili fidelaj kunuloj! Reiru, mia filino, al vi mem; restarigu viajn kuraĝon kaj optimismon, spite de la nuboj ŝvebantaj super via deliranta menso... Ankoraŭ estas tempo!

Sed la malsanulino faris plej grandan klopodon por reveni en sian karnan envolaĵon, eldirante krudajn vortojn de rifuzo, neatenditajn kaj sendankajn.

Forigante sin de la paciga influo de Kalderaro, ŝi grade reiris sur sian sensorian kampon, eligante raŭkajn kriojn.

La instruanto iris al la ploranta patrino kaj informis:

– Bedaŭrinde, nia amikino, la proceso de frenezo pri ribelo plenumiĝis. Nun ni konfidu ŝin al la povo de la Superega Dia Protekto.

Dum la patrino estulo abunde ploris, la malsanulino konfuzita de la mensaj radioj, en kiuj ŝi plezuris, sin turnis al la flegistino, plendante:

– Mi ne povas! mi ne plu povas! mi ne eltenas!... Mi nun volas la intervenon! mi ne deziras perdi minuton!

Fikse rigardante sian kunulinon dum kelkaj momentoj, ŝi kun teruriga esprimo diris plu:

– Mi havis teruran inkubon... Mi sonĝis pri mia patrino revenanta de la morto kaj ŝi petis de mi paciencon kaj karitaton! Ne, ne!... Mi iros ĝis la fino! Mi decide preferos memmortigon!

Inspirite de mia instruanto, la flegistino ankoraŭ faris respektindajn konsiderojn.

Ĉu ne estus konsilinde atendi pli da tempo? Ĉu la sonĝo ne estus providenca averto? La malvigleco de Cecilia estis

grandega. Ĉu ŝi ne sentis sin subtenata de spirita helpo? Ŝi tiel juĝis oportune prokrasti la decidon.

La malsanulino tamen restis plu malcedema. Kaj, antaŭ nia miro, antaŭ sia ploranta elkarniĝinta patrino, la operacio komenciĝis kun la nigraj prognozoj de ni, kiuj observis la scenon tre kortuŝitaj.

Mi neniam pensis, ke konfuzita menso povus tiel multe malbonfari al si mem.

La malordo de la fiziologia kosmo kreskis momenton post momento.

Dolore surprizite, mi daŭrigis la ekzamenon de la situacio, kun miro observante, ke la embrio reagis antaŭ la perforto, kvazaŭ senespere alkroĉiĝante al la placentaj membranoj.

La menso de la infano vekigis, laŭmezure kiel kreskis la klopodo por la embria ablacio. La malhelaj radioj nun ne fontis nur de la patrina encefalo, sed ankaŭ de la embria strukturo, estigante pli grandan malordon.

Post longa kaj pena laboro oni fine eltiris la estuleton...

Sed, mirigite, mi rimarkis, ke la improvizita ginekologino fortiris el la ina ujo nur malgrandan porcion da senviva karno, ĉar la reenkarniĝanta estulo, kvazaŭ al la patrina korpo daŭre altirite de viglaj kaj nedifineblaj fortoj, prezentis tre specialajn kondiĉojn, alligite al la ĉela kampo, ĝin elpelanta. Duonvekiĝinta, en ia nigra sufera inkubo, ŝi montris ekstreman malesperon; ŝi lamentis per afliktaj krioj; ŝi ekspedis mortigajn vibrojn; ŝi balbutis sensencajn frazojn.

Ĉu ni ne estus antaŭ du rabobestoj katenitaj unu al la dua? La infano, kiu ne povis naskiĝi, aliiĝis en turmentanton de la patrina spirito. Premante per nevolaj impulsoj la neston da vaskuloj en la utero, ĝuste en la regiono, kie okazas la interŝanĝo de patrina kaj feta sangoj, ĝi kaŭzis fortan kaj abundan hemoragion.

Mi rimarkis ion pli.

Maljuste delokite kaj tie tenite de nerezisteblaj fortoj, la perispirita organismo de la estulo, kiu eĉ ne renaskiĝis, atingis per memvolaj movoj la koran regionon. Envolvinte la nodojn de la dekstra aŭriklo, ĝi perturbis la vojojn de stimulo, okazigante terurajn ŝokojn ĉe la centra nerva sistemo.

Tia situacio pligravigis la hemoragian fluon, kiu neantaŭvidite intensiĝis, devigante la flegistinojn peti tujan helpon, post kiam ŝi forviŝis kiel eble plej multe la signojn de sia eraro.

– Mi lin malamas! mi lin malamas – ekkriis la freneza patrina menso, ankoraŭ sentante la ĉeeston de la filo en sia organismo. – Mi neniam lulus entrudulon, kiu kaŭzus al mi honton!

Ambaŭ, patrino kaj filo, nun ŝajnis ĝustadire sintonizitaj en la ondo de malamo, ĉar lia menso kun stranga formo antaŭ miaj okuloj respondis en la apogeo de kolero:

– Mi venĝos min! Vi pagos centavon post centavo! mi ne pardonos vin... Vi malhelpis min repreni la surteran lukton, kie la doloro, kiu estus komuna al ni, instruis min senkulpigi vian kriman pasintecon kaj forgesi miajn akrajn ĉagreniĝojn... Vi rifuzis la provon, kiu kondukus nin sur la altaron de repaciĝo. Vi fermis al mi la pordojn de la savanta oportuno; sed, la malica povo reganta vin, ankaŭ regas mian animon... Vi levis ĝis la supraĵo de mia racio la ŝlimon, kiu kuŝis en mi. Vi rifuzas al mi la rimedon de purigo, sed ni nun ree estas kune kaj mi trenos vin en la abismon... Vi kondamnis min al morto kaj tial mia verdikto estas sama. Vi ne donis al mi ripozon, vi baris mian revenon al la paco de konscienco, sed vi ne restos plu pli da tempo sur la Tero... Vi ne volis min por la servado de amo... Vi do denove apartenos al mi por la kontentigo de malamo. Mi venĝos min! Vi iros kun mi!

La mensaj detruantaj radioj interkruciĝis de spirito al spirito en terura sceno.

Dum mi observis la intensiĝon de la toksinoj laŭlonge de la tuta ĉela reto, Kalderaro en silento preĝadis, ŝajne elvokante la eksteran helpon. Efektive, post momento malgranda grupo da spiritaĵoj laborantoj penetris en la ĉambron. La instruanto donis ordonojn. Ili devus helpi la malfeliĉan patrinon, kiu restos ĉe la malfeliĉa filino ĝis la fino de ŝia spertado.

Poste la Asistanto invitis min foriri, kaj aldonis:

– Ŝia elkarniĝo okazos post kelkaj horoj. Malamo, Andreo, ĉiutage ekstermas homojn en la mondo, kun intenseco kaj efikeco pli detruantaj ol ĉiuj kanonoj kune pafantaj. Ĝi estas pli potenca inter la homoj, por kompliki problemojn kaj detrui pacon, ol ĉiuj militoj konataj de la Homaro en la pasado de la jarcentoj. Vi ne aŭdas de mi nuran teorion. Vi travivis kun ni,

dum tiuj momentoj, hororan fakton, kiu ĉiutage okazas en la karna sfero. Post la regado de fortoj tiel malŝatindaj super tiuj du malekvilibraj animoj, kiujn la Providenco penis kunigi per la institucio de reenkarneigo, estas necese ilin konfidi de nun al la tempo, por ke la doloro faru la nepre necesajn korektojn.

– Ho! – mi afliktite ekkriis, rigardante la duelon de ambaŭ torturataj mensoj – kiel ili restos? ĉu ili restos plu interligitaj? kaj dum kiom da tempo?

Kalderaro fikse rigardis min kun la doloro de brava soldato, provizore perdinta batalon, kaj informis:

– Nun nenion valoras rekta interveno. Nun mi nur povas kunlabori per preĝo de frata amo kun la renoviga agado de ĉiutaga lukto. Al ambaŭ efektivigiĝis dolora proceso de reciproka obsedo kun amaraj sekvoj en la spaco kaj tempo, kaj kies gravecon neniu el ni povas antaŭvidi.

## XI

### SEKSO

Ankoraŭ sub la malagrabra impresio de la dramo de Cecilia, mi akompanis Kalderaron al kurioza centro de studoj, kie superaj mentoroj transdonis konojn al kunuloj sin dediĉintaj al helplaboro sur la Terkrusto.

– Ĝi ne estas templo por profundaj revelacioj – informis la instruanto –, sed institucio de efika helpo al ideoj kaj entreprenoj de agantaj kunlaborantoj en la organizaĵoj por spirita subteno; katedro de amikeco kreita de disĉiploj, kiujn nobligas la konstanta klopodo.

Pro mia demando de lernanto li bonkore daŭriĝis:

– Tiuj amikoj kunvenas unufoje ĉiusemajne, por aŭdi senditojn pri aferoj koncernantaj nian servadon al homoj. Mi estimas vian hodiaŭan ĉeeston, ĉar la delegito en la vespero komentarios problemojn pri la sekso. Ĉar vi en la fluantaj tagoj studas la enigmojn de frenezeco, kun nelonga tempo por realigo de rektaj eksperimentoj, lia parolado koincidas kun niaj deziroj.

Pli longa antaŭa konversacio ne estis ebla.

La Asistanto atentigis, ke la laboroj eble jam komenciĝis; tial ni tuj sekvis lin. Ni efektive trovis la kunsidon funkcia. Pli ol du centoj da kunuloj el nia mondo aŭdis atente prilumitan instruanton de animoj.

Ni niavice respektive sidiĝis por lin aŭdi.

La portanto de saĝeco, envolvita per forta heleco, senafekte paroladis. Kun parolo bontembre eldirata, penetranta en nian internon, danke sian sinceran voĉtonon, li humile esprimis:

– Ekzamenante la kaŭzojn de frenezeco inter individuoj, ĉu enkarniĝintaj, ĉu ekster la karno, nescio rilate la seksan konduton estas unu el la plej gravaj faktoroj.

“La homa nekompreno rilate tiun aferon estas kvazaŭa silenta milito de ekstermado kaj konfuzo, multe superante la ekstermadojn de pesto citatajn en la historio de la Homaro. Vi scias, ke, en la VI jarcento de nia erao, nur la epidemio de bubona pesto, nomata “pesto de Justiniano”, eliminis preskaŭ kvindek milionojn da personoj en Eŭropo kaj Azio... Sed tiu granda nombro estas bagatelaĵo se oni ĝin komparas kun la milionoj da animoj, kiujn la seksaj angoroj ĉiutage disŝiras. Tian preman problemon, kiu jam frenezigis multe da distingigaj cerboj, ni ne povas tuj solvi per nuraj vortoj de ekstere internen, similante suprajajn kuracistojn, kiuj preskribas longajn konsilojn al pacientoj, havante plejofte absolutan nescion pri la malsano.

Nun, kiam ni restas for de la plej fortaj altrudoj de la formo, sed ne liberiginte el la fundamentaj principoj de ĝiaj leĝoj, kiuj ankoraŭ subigas niajn manifestaĵojn, ni komprenas, ke la seksaj enigmoj ne reduktiĝas al nuraj fiziologiaj faktoroj. Ili ne rezultas el aŭtomateco sur la kampoj de la ĉela strukturo, kiel tiuj, karakterizantaj la generajn virajn kaj virinajn organojn, vere substance identaj, diferencantaj nur je la esprimo pri signoj. Pri la afero ni havas konceptojn pli modernajn. Se en tiuj organoj troviĝas la superaj kreaĵ fortoj, kontentigantaj la postulojn de la surtera naturo, reguligantaj la fizikan vivon, ni vidas ĉe la seksa malkvietigo fenomenon propran al nia psikismo, iranta al la superaj regionoj de la evoluado.

Sed estas dolore konstati la malharmonion, en kiun enprofundiĝas la homoj kun nigraj influoj sur la sferojn tuj post la karna lukto. Pluraj liberigaj movadoj ekaperis en la jarcentoj, avidantaj ian pli bonan vivon. Sangaj militoj de popolo kontraŭ popolo, civilaj revolucioj, dissemantaj terurajn suferojn, estas tenataj sur la Tero, en la kuro de la tempo, en nomo de regeneraj principoj, el kiuj venas novaj konkeroj de la monda juro; sed nescio sur la seksa kampo sklavigas plu milionojn da homoj.

Estas senutile pensi, ke la fizika morto prezentas pacan solvon al la spiritoj ĉe ekstrema malekvilibro, donantaj sian korpon al la senbridaj pasioj. La frenezeco en kiu ili baraktas, ne venas de nuraj cerbaj modifoj: ĝi venas de la disasociiigo



de la perispiritaj centroj, kio postulas longajn periodojn da riparado.

Nediskuteble, por la plimulto de la enkarniĝintoj, la juna fazo de la fiziologiaj fortoj estas delikata stadio de sensacoj, pro la kreantaj kaj konservantaj leĝoj, kiuj direktas la homan familion; tio tamen estas akcidento kaj ĝi ne difinas la esencan realon. La sidejo de la sekso ne troviĝas en la kruda korpo, sed en la animo, en ĝia subluma strukturo.

Sur la Terkrusto oni distingas inter viroj kaj virinoj, laŭ iliaj organaj specifaj signoj. Inter ni ankoraŭ superregas la amaso da rememoroj pri la surtera ekzistado, transiĝe, kiel ni estas, al regionoj pli altaj; sur ĉi tiuj ni scias, ke virineco kaj vireco estas kvalitoj de la animoj forte pasivaj aŭ malkaŝe aktivaj.

Tial ni komprenas, ke ĉe niaj variaj ekzistadoj ni grade akiras diajn ecojn, kiaj energio kaj amemo, forto kaj humileco, povo kaj ĝentileco, inteligento kaj sento, iniciativo kaj intuicio, saĝo kaj amo, ĝis ni atingos la superegan ekvilibron kun Dio.

Konvinkiĝintaj pri tiu universa realo, ni ne povas forgesi, ke nenia eksterigo de la seksa instinkto sur la Tero, kia ajn estu ĝia esprimforto, estos detruita, sed aliigita en staton de sublimeco. La manifestoj de la bestoj mem partoprenas en tiu evoluiga impulso. Ĉe la primitivaj popoloj, la seksa manifesto karakteriziĝis per la absoluta posedo. La tute aktiva personeco de la viro potencas la pasivan personecon de la virino.

La pacienca laboro de la jarmiloj tamen transformigis tiujn rilatojn. La virino-patrino kaj la viro-patro faris novajn paŝojn por renovigo de sia spirito. Surbaze de la seksaj spertoj la tribo aliigis en familion, la tabo transformiĝis en hejmon, la defendo per armilo cedis al la juro, praarbaro aliigis en pacan plantejon, la diverseco de impulsoj sur la grandegaj vastaĵoj de teritorio malfermis kampon al societo de idealistoj en la progresema patrujo, barbareco aliigis en civilizacion, la krudaj procedoj de allogo transiĝis en artismajn dezirojn kiuj dignigas la memon, krio altiĝis al kantiko; kaj, stimulita de la kreanta forto de sekso, la homa kolektivo antaŭeniras, kvankam malrapide, al la superega celo de la dia amo. De la spontanea animala manifestado de la malpli noblaj sentoj la animo iras al la glora inicado.

Deziro, posedo, simpatio, kareso, sindonemo, rezigno, sin-fero estas aspektoj de tiu nobliganta vojo. Iajoje homo haltas jarojn, jarcentojn, diversajn ekzistadojn antaŭ ol pasi de unu al alia stadio. Nemultaj individuoj sukcesas sin teni sur posteno de simpatio, kun la nepre necesa ekvilibro. Tre malmultaj trairas la regionon de posedo sen kruelaj luktoj kontraŭ la monstroj de egoismo kaj de ĵaluzo, al kiuj ili freneze sin donas. Tre malmultaj iras la vojojn de kareso, longe kateniĝante al la gnomoj de ekskluzivismo. Kaj iajoje nur post jarmiloj da doloregaj kaj purigaj provoj, animo sukcesas atingi la luman zeniton de sinofero por la supera liberiĝo, direkte al novaj cikloj de unuiĝo kun Dio.

La ekstazo de sanktulo iam estis nura impulso, same kiel facetita diamanto – ĉiela guto elektita por reflekti la dian helecon – longe restis en aluvio tute ne rimarkita inter la krudaj silikoj. Estas vere, ke, kiel la diamanto sin submetas al la disko de facetisto, tiel ankaŭ la seksa instinkto, por sin kroni per la gloroj de ekstazo, devas cedi al la imperativoj de respondeco, al la postuloj de disciplino, al la ordonoj de rezigno.

Ĉi tiuj konkludoj tamen ne devas instigi nin al programoj de altruda sanktigo en la karna mondo. Neniu homo sukcesus nei la fazon de evoluo, en kiu li troviĝas. Ni ne povas postuli, ke la nescia hotentoto uzu la talaron de profesoro kaj ekinstruu sen lernado Romanan Juron. Estus ridinde do peti de la mezevolua homo konduton de sanktulo. La Naturo, reprezentanto de la Neelĉerpebla Bono, estas indulgema patrino, donanta laboron kaj helpon al ĉiuj filoj el la Kreitaĵaro. Ĝia determino nin subteni ĉiam estas des pli forta, ju pli firma estas nia intenco progresi direkte al la Superega Bono.

Ni tamen ne deziras prediki al la homoj rigorajn normojn de artefarita virto, nek favori ian ajn konduton de senkonsciaj rilatoj. Nia idealo estas, super ĉio, tiu pri la frata interkompreno. Ni laboru, por ke la lumo de kompreno estu inter niaj enkarniĝintaj amikoj, por ke la amaj angoroĵoj ne ĵetu tiom da viktimoĵoj en la abismon de morto, venenitaj per krimaj pasioĵoj.

Pro la seksa blindeco nekalkuleblaj krimoĵoj abundas sur la Tero, ĉie kaŭzante strangajn kaj danĝerajn procesoĵojn de frenezo.

Iam kaj iam unu aŭ alia viktimo iras al hospitaloj por menskonfuzitoj, submetiĝas al flegado, kvazaŭ laboristo alportanta al riparoficejo sian kaputan instrumenton; sed en la frenezulejoj ni trovas sole nur tiujn, ĉagrenitajn kaj venkitajn, kiuj malsupreniris ĝis la fundo de la abismo. Milionoj da fratoj sin konservas duonfrenezaj en hejmoj aŭ institucioj; ili estas niaj kunuloj nekapablaj por sindono kaj rezigno, iom post iom dronantaj en la nigra ŝlimejo de halucinoj... Kun freneza menso fiksita en la kavaĵo de subkonscio ili perdiĝas sur la kampo de malsupera aŭtomateco, obstinante konservi deprimajn psikajn statojn. Ĵaluzo, nekontentiĝo, malkonsento, malĉasteco kaj frivoleco dissemas terurajn fenomenojn de malekvilibro.

Malkvietigaj mensaj bildoj pentriĝas sur la Tero, nin pelante al laciga helpa servado por redukti la rondon da malfeliĉo kaj timo de tiuj, senprudente sin ĵetantaj en la kuraĝajn aventurojn de sia besteca sento.

Ni ne solvos tiel kompleksan homan problemon simple per medicina interveno, kvankam estas admirinda la kontribuo de la Scienco sur la kampo de efikoj, ne atinganta tamen la esencon de la kaŭzoj. Personeco ne estas verko de la interna uzino de glandoj, sed produkto de la mensa kemio.

Endokrinologio povos multon fari per injekto de hormonoj, kvazaŭ tuja helpo al la ĉelaj kolektivoj, sed ĝi ne kuracos lezojn de la penso. Hodiaŭ aŭ morgaŭ genetiko povos interveni en la kaŝitajn ĉambrojn de la homa vivo, konfuzante la harmonion de la kromosomoj, celante trudi sekson al la embrio; sed ĝi ne atingos la plej altan regionon de virina aŭ vira menso, kiu tenos plu proprajn karakterojn sendependajn de la ekstera formo aŭ de la starigitaj konvencioj. Medicino kreos mil manierojn helpi korpon atingitan en ĝia interna ekvilibro; pro tiu edifa tasko ĝi ĉiam indos sinceran admiron kaj ardan amon; tamen koncernas nin praktiki la animan medicinon, kiu helpu la spiriton embarasitan en la ombroj...

Estas necese fari ĉirkaŭ niaj fratoj, enkarniĝintaj sur la Tero, la lumon de frateca kompato, kiu montru difinitajn vojojn al la individua respondeco. Estu pli da amo antaŭ la valoj de la instinka frenezo kaj tiam la ruinoj cedos lokon al sanktigaj spertoj.

Kiel efikigi la benatan kuracistan servadon al viktimo de seksa angoro, se la familia kontraŭstaro ĝin forte malhelpas?

kiel savi animmalsanulojn, en ia helpa instituto, se tiu socia organizaĵo frakasas la malsanulojn per la tuta pezo de sia opinio kaj de sia aŭtoritato? Memkompreneble, estus eksceso de sentimentaleco peti de la sociologio la tujan transformigon de ĝia kodo, aŭ trudi al la homa socio iajn regulojn de toleremo neakordigeblajn al ĝiaj defendobezonoj. Sed ni povas teni laŭdindan servon de pli granda kompreno, plibonigi la inklinojn de niaj amikoj enkarniĝintaj sur la Terkrusto kaj ilin nerapide vekti por la solvo interesanta nin ĉiujn.

La spiritigita amo, frukto de la kristana rezigno, estas la ŝlosilo kapabla malfermi la pordojn de la abismo, kien ruliĝis kaj ĉiutage ruliĝas miloj da homoj.

Ni distribu la benon de kompreno inter la homoj; ni etendu helpeman manon al ĉiuj spiritoj, troviĝantaj katenitaj de la malekvilibroj de siaj sentoj, ilin sciigante, ke la renovigaj laborejoj restas malfermitaj al ĉiuj idoj de Dio, perfektigante iliajn sentojn, nobligante iliajn impulsojn, vastigante ilian spiritan kapablon.

Ni rememorigu al la senesperaj koroj, ke por la amo la sekso estas tia, kia estas la okuloj por la vidado kaj la cerbo por la pensado: ili estas nenio alia ol aparatoj por eksterigo. Estas bedaŭrinda eraro supozi, ke nur perfekta seksa normaleco, laŭ la respektindaj homaj konvencioj, povas servi kiel templo por la amaj manifestoj. La kampo de amo estas senfina laŭ ĝia esenco kaj manifestado. Urĝas eviti deflankiĝojn kaj ekscesojn, estas nepre necese rekoni, ke ĉiuj estaĵoj en la Universo naskiĝis por ami kaj esti amataj. Iafoje, por multaj el ili, nedaŭre regas la imperativoj de la bonfara provo, la devoj de la elaĉeta statuto, la postuloj de la specialigita laboro, en kiuj lernantoj, ŝuldantoj kaj misiistoj travivas longajn fazojn de malsato kaj soifo de koro. Sed tio ne estas baro al la amo. Jesuo ne partoprenis la normalan edziĝon sur la Tero, kaj tamen la familio de lia koro kreskas kun ĉiu tago; liaj fortoj ne generis pasemajn formojn en la karnaj rondoj, kaj tamen liaj fekundigaj energioj renovigis la civilizacion, aliigante ties vojon, daŭrigante ĝis hodiaŭ la plibonigon de la mondo. Sublima simbolaro montriĝas en la konduo de la Majstro, kiu tiamaniere kliniĝis al la venkitoj laŭ la homa konvencio, al la soluloj kaj humiligitoj, ilin vidigante, ke estas eble

kunlabori por disvastigo de la senfina Bono, amante kaj abnegacianta sen egoismo kaj sen la malsupera intenco esti amataj laŭ la propraj kapricoj.

La konstruado de feliĉo ne dependas de la kontentigita instinkto. Interŝanĝo de seksaj ĉeloj inter la enkarnuloj, garantianta la kontinuadon de la fizikaj formoj en evolua proceso, estas nur unu aspekto el la multformaj interŝanĝoj de amo. Estas grave rekoni, ke la interŝanĝo de simpatiaj fortoj, de kombinantaj fluidaĵoj, de sintonizantaj vibroj inter animoj sin amantaj, ŝvebas super kiu ajn tuŝebla eksteraĵo de amo, subtenante nepereemajn verkojn de vivo kaj lumo en la sennombraj sferoj en la Universo.

Ni disvolvu do aman helpon al la malesperantoj en la mondo, sin sentantaj en la pasema kondiĉo de forlasitoj. Ni instruu ilin liberigi sian menson el la reto de la instinkto, malfermante al ili vojon al la idealoj de sanktiga amo, atentigante ilin, ke tenado de penso ĉe la torturata sekso, kun malestimo al la ceteraj apartaĵoj de la spirita realigo per la organa kosmo, estas senutile haltadi sur la evolua vojo; estas sendefende nin doni al la influoj de la danĝeraj monstroj de imagpovo, kiaj estas malkontentiĝo kaj envio, malespero kaj amareco, kiuj malfermas danĝerajn vundojn en la animo, kaj kiuj pelas nin al ekskluziveco, kulpo, kiu povas pligraviĝi ĝis frenezeco kaj senkonscio. Ni invitu ilin streki pli forajn horizontojn en la koro. Amo ĉiam renkontos novajn mondojn. Por ke tiaj malkaŝoj kroniĝu per dia lumo, sufiĉas, ke la homo sin donu al laboro, kiu per si mem kontraŭbatalos la abomenan nescion. Interne de ĉiu el ni firme brilas la liberiga heleco, kun la celo renovigi por ĉies bono, kiun ni devas kulturi kaj intensigi en ĉiuj tagoj de nia vivo.

Sklaviĝo al la turmentoj de sekso ne estas problemo solvota de literatoroj aŭ kuracistoj agantaj sur la ekstera kampo: ĝi estas afero de animo, postulanta individuan procedon de resaniĝo, kaj pri ĉi tiu nur la spirito decidus ĉe la tribunalo de sia propra konscienco. Estas neneigeble, ke ĉiu ekstera helpo estas altvalora kaj respektinda, sed ni devas rekoni, ke la sklavoj de la perturboj sur la sensoria kampo estos liberigitaj de si mem, t.e. per grandiĝo de la scio, per la komprenado pri la aliulaj suferoj kaj pri la propraj malfacilaĵoj; fine, per la

aplikado de la ordono “amu unu alian” (\*), tiel en prediko, kiel interne de sia animo, kun plej bonaj energioj de la cerbo kaj kun plej bonaj sentoj de la koro”.

Mi rimarkis, ke la prediko finiĝis meze en ĝenerala respekto.

La parolo de la sendito ravis min. Tiuj nocioj pri seksologio estis nekonataj de mi. Ili ne estis ripetoj el priskribaj libroj, ili ne estis fruktoj de malvarmaj observoj de scienculoj kaj verkistoj priokupitaj vekti atenton per vanaj vortoj. Ili venis de la parolo varmigita de frata amo de ia instruanto sindoninta al bezonoj de siaj fratoj ankoraŭ malfortaj kaj malpli feliĉaj.

Ĉirkaŭ li fariĝis ia movado. Mi komprenis, ke la ĉeestantoj povis formuli demandojn pri la temo en tiu vespero, kaj efektive estis faritaj pluraj demandoj kun altvaloraj respondoj, ĉar ĉi tiuj estis klarigaj kaj edifaj.

La instrua enketo fluis profitiga, kiam kunulo diskutis aferon, kiu ekscitis mian scivolemon.

– Respektinda instruanto – li diris –, en la lastaj tempoj sur la Tero, la plejmultaj enkarniĝintoj-psikologoj subtenas freŭdajn principojn, kiel bazojn por esplorado al konfuziĝoj de la animoj. Por la eminenta aŭstra kuracisto preskaŭ ĉiuj psikaj perturboj venas de la seksa misuzo. Sed kelkaj el liaj disĉiploj iom modifis tiajn teoriojn. Korektante la tezon pri erotikaj halucinoj, kiun la psikanalizo treege aplikis al la infanoj mem, ĉe studado de sonĝoj kaj emocioj, eminentaj pensuloj aldonis la aserton, ke ĉiu viro kaj ĉiu virino portas denaskan deziron doni al si gravecon, kiu pelas ilin teni primitivajn impulsojn de posedo; aliaj eminentaj reprezentantoj de la intelekta kulturo siavice certigas, ke la homo estas deponejo de ĉiuj spertoj de sia raso, kaj portas en si vastan arsenajon da inklinoj por iaĵ branĉoj de la penso.

La konsultanto faris paŭzon antaŭ la ĝenerala silento, reganta ĉirkaŭ lia altvalora demando, kaj daŭrigis:

– Hodiaŭ, for de la densa korpo de karno, ni scias, ke la vivo de spirito prezentas seniluziigajn surprizojn al la surtera scienco; sed, pro tio, ke ni doniĝis al la tasko helpi torturatajn kunulojn sur la Planedokrusto, ĉu ni ne povus ricevi ĝustajn klarigojn pri la afero por ilin transdiri?

---

(\*) Johano, 15:17. – **La Trad.**

La ŝaĝa instruanto tuj respondis:

– Mi jam scias, kion vi deziras. Vi parolas pri la movadoj de la analiza psikologio, gvidataj de Freŭdo kaj de du malsamaj fluoj de liaj kunlaborantoj. La eminenta sciencisto centris sian instruon en la seksa impulso, doninte al ĝi absolutan karakteron, dum la du fluoj da psikologoj, komence lin sekvantaj, diferenciĝis pro interpretado. La unua studas la denaskan deziron de la homo rilate la personan elstariĝon, dum la dua instruas, ke, krom la seksa kontentigo, kaj la individua graveco, ekzistas la impulso de supera vivo, kiu torturas la ŝajne plej feliĉan surteran homon. Al la studema rondo el esence freŭdaj lernemuloj, ĉiuj psikaj personfenomenoj konsistas en la seksa angoro; laŭ granda grupo de liaj kunlaborantoj, la kaŭzoj estas akiro de povo kaj ideo de supereco. Ni niavice asertas, ke la tri skoloj identiĝas, ili ĉiuj portas ian dozon da pravo, kaj ke mankas al ili tamen nur la baza kono pri reenkarismo. Ili aspektas kiel belaj kaj altvaloraj domoj de sciencaj principoj, tamen sen tegmento de logiko. Ni ne povas aserti, ke ĉio en la karnaj rondoj konsistas en sekso, deziro de graveco kaj supera aspiro; sed, veninte al la nuna kompreno, ni povas certigi, ke ĉio en la vivo estas kreanta impulso. Ĉiuj estaĵoj, kiujn ni konas, de vermo ĝis anĝelo, estas depongardantoj de kreantaj kapabloj. Vegetalo instigata de heliotropismo aperas en la pejzaĝo, distribuante vivon kaj ĝin renovigante. Lampiro lumas en ombro, penante sin ĉiamigi. Batrako sentas aman kaj patrecan vibrojn en la fundo de la ŝlimejo. Etaj birdoj vojaĝas longajn distancojn por kolekti materialon, per kiu ili teksas sian neston. Rabobesto forgesas sian sovaĝan karakteron, dum ĝi ame lekas sian ĵusnaskitan idon. Kaj pli ol duono de la enkarniĝintaj spiritoj sur la Terkrusto, kun menso fiksita sur la regionoj de la instinktaj movoj, koncentras siajn kapablojn sur la sekson, de kiu memkompreneble originas la plej vastaj kaj oftaj nervaj perturboj; ili estas densaj legioj, ĉe la primitiva pejzaĝo de la planeda evoluo, fratoj niaj en la infaneco de kono, kiuj ankoraŭ ne scias krei sentojn kaj vivon, krom mobilizante rimedojn de la seksa forto. Multe da homoj tamen post akiro de racio super instinkto, restas plu ĉe la malprudentaĵoj de superpovo, allogitaj de la aŭtoritateca kaprico, soifante evidentecon kaj distingiĝon, eĉ se ili estas multfoje alligitaj al profita laboro kaj noblaj pasioj... Malgranda gru-

po el viroj kaj virinoj, fine, post kiam ili atingis seksan ekvilibron, rilate la homan instinkton, kaj post kiam ili akiris titolojn, kiujn la laboro donis al ili kaj per kiuj ili regas la vivon, gvidante siajn proprajn energiojn, en plena reĝimo de individua respondeco, ekfirmiĝas sur la subluma regiono, en sia superkonscio, ne renkontante plu tutan ĝojon ĉe kontentiĝo de la fizika korpo aŭ ĉe la persona evidenteco; ili penas atingi la pli altajn rondojn en la vivo, absorbitaj de supera idealismo; ili sentas sin ĉe la sojlo de la diaj sferoj, jam eĉ sur la nebula vojo de la karno, simile al vojaĝanto, kiu, venkinte la krudajn vojojn en la nokta mallumo, haltas malĝustigita, inter la lastaj noktaj ombroj kaj la nedefineblaj promesoj de la matenruĝo... Por tiuj homoj, sekso, individua graveco kaj surtera rekte-alcelismo estas sanktaj pro la okazoj favorantaj iliajn emojn fari la bonon; tamen, en la sanktejo de ilia animo, brilas nova lumo... La partikularisma racio aliĝis en universalan interkomprenon. Iliaj noblaj sentoj kreskis direkte al la supera kampo. Ili antaŭsentas Dion kaj avidas identiĝi kun Li. Ili estas viroj kaj virinoj, kiuj, realiginte la plej altajn homajn instruojn, iras nun al anĝeleco...

Sed, ĉiamaniere, ĉio estas ĉiam la kreantaj kapabloj hereditaj al Dio konstante ludantaj en la kadroj de la vivo. Ĉiu estulo estas pelita krei en la organizado, konservado kaj ampleksigo de la Universo!...”

La instruanto montris signifan fizionomian esprimon, faris longan paŭzon dum sia prediko kaj poste bonhumore aldonis:

– Multfoje homoj kreas malbonon, devojigas la naturan fluon de bonfaraj cirkonstancoj, venenas okazojn, haltante tre longan tempon ĉe rebonigaj, elaĉetaj taskoj; sed eĉ en tio ni devas vidi la senĉesan manifestadon de la kreanta povo en ni mem, eĉ en tiuj devojantaj... Vere ili ekfalas sur krutaĵo de krimo, ĵetas sin en la valojn de ombro, sed organizante kaj reorganizante siajn proprajn agojn, ili akiras la benatan kapitalon da spertoj; kaj per spertoj ili atingas lumon, pacon, saĝon kaj amon, per kiuj ili iras al Dio. Ni do konkludas, ke, se la analiza psikologio de Freŭdo kaj de liaj kunlaborantoj multe progresis sur la kampo de esplorado kaj kono, parte deĉifrance iajn enigmojn pri la homa psikismo, tamen mankas al ĝi la ŝlosilo de reenkarniĝo por tute solvi la demandojn pri la animo. Estas neeble definitive solvi aferon sen evoluaj nocioj,



plibonigo, respondeco, riparo kaj eterneco. Ne gravas konstati kompleksojn kaj fiaskojn, rimarki psikajn lezojn kaj mensajn mankojn, ilin ne reparante... Unuvorte ne kontentigas la nura ekzameno de la ŝelo: estas nepre necese atingi la kernon kaj fari modifojn en la kaŭzoj. Por tio estas nepre necese konfesi, ke reenkarniĝo kaj senmorteco estas realaĵoj. Ĝis tiam ni helpu niajn surterajn amikojn konkeri konfidon pri si mem, penetri en la dian esperon, senĉese memplibonigi per la savanta laboro.

Ridetante, la sendito eksilentis.

Oni faris aliajn demandojn interesajn kaj oportunajn, kaj li, donis klarajn kaj edifajn respondojn kun efektiva profito por ĉiuj aŭdantoj.

Post la kunveno mi silente foriris apud Kalderaro, kiu ankaŭ enmemiĝis, kvazaŭ retenante la revelacian lumon de la aŭditaj instruoj. Mi ne scias, kion pensadis la pretema Asistanto en profunda meditato. Mi nur rekonis, ke je la unua fojo mi trovas novan kampon de kono sur la tereno de la seksologio. Ekde tiu momento aliaj nocioj de amo disvolviĝas en mia konscienco, prilumante mian eston.

## XII

### STRANGA MALSANO

Akompanante la abnegacian fraton de la suferantoj, mi penetris en komfortan loĝejon, kie Kalderaro tuj kondukis min al nobla ripozanta sinjoro.

Ni estis en eleganta ĉambro dekoraciita per orkolora farbo. Pompa tapiŝo kompletigis la aranĝon en la ĉambro, prezentante fantaziajn arabeskojn harmonie kun la desegnaĵoj sur la plafono.

Kuŝante sur divano, la malsanulo, kiun ni vizitis, dronis en profunda meditado. Apude humila estulo el nia sfero ŝajnis atendi nin.

Ŝi proksimiĝis kaj nin ĝentile salutis.

Ŝi komplezeme respondis la demandojn de la Asistanto:

– Fabricio plibonigas; tamen la angoraj fenomenoj daŭras plu. Li estas malkvieta, afliktita...

La instruanto turnis al la malsanulo espriman rigardon kaj insistis:

– Ĉu li ankoraŭ konservas memregadon? ĉu li ne tute sin donis al la detruantaj impresoj?

La interparolantino kun ĝojo respondis:

– La Dia Favorkoreco ĉiam ĉeestas. La tuta malekvilibro ankoraŭ ne starigis sian regadon. En nomo de Jesuo nia kunlaboro daŭras plu.

Tiam Kalderaro frate demandis, turnante sin al mi:

– Ĉu vi iafoje eĉ ekzamenis deklaritajn kazojn de skizofrenio?

Mi ne akiris specialajn konojn pri la afero; sed mi sciis, ke tiu morbo estas unu el la plej afliktaj demandoj en la moderna psikiatrio.

– Ĉi tiu malfacila branĉo de la Scienco, studanta la animan patologion – diris la kunulo, komprenante mian nescion – de longe estas kampo de batalo inter fiziologoj kaj psikologoj; vere tia konflikto estas bedaŭrinda kaj frivola, ĉar ambaŭ fluoj posedas substancajn kialojn en la argumentoj, kiujn ili diskutas. Ni devas rekoni, ke psikologio okupas la plej bonan pozicion, ĉar ĝi studas la problemon proksime al la profundaj kaŭzoj, dum la fiziologio analizas la efikojn kaj penas ilin forigi sur la supraĵo.

Tuj poste la Asistanto rekomendis al mi ekzameni la mensan sferon de la vizitato.

Mi ekzamenis lian internon kaj perpleksiĝis pro la afliktoj, kiuj plenigis lian eston. Lia cerbo prezentis strangajn anomaliojn. Ĝia tuta malsupera flanko montris nigrajn makulojn. La malordiĝoj de la sangocirkulado, de la movoj kaj de la sentumoj estis videblaj. Kalderaro prezentis al mi Fabricion, kaj deklaris lin skizofreniulo; sed ĉu ni ne estus tie antaŭ kazo de cerbokardia neŭrastenio?

La instruanto pacience aŭdis kaj atentigis min:

– Trafa diagnozo, laŭ la aspekto, kiun nia amiko prezentas hodiaŭ. Sed la skizofrenio, originanta el subtilaj perturboj de la perispirita organismo, manifestiĝas en la fizika vazo per miriga grupo da variaj kaj nedifineblaj malsanoj. Nun ni estas antaŭ la malsano de Krishaber kun ĉiuj ĝiaj specialaj karakteroj.

Montrante gravan esprimon sur la mieno, li diris plu:

– Sed rimarku trans la ŝanĝeblaj efikoj. Ekzameni la menson kaj la regionojn de la sentoj.

Mi pli profunden ĵetis mian observosondilon sur la internajn bildojn de la malsanulo kaj mi rimarkis torturajn scenojn sur la ekrano de lia memoro.

Enmemiĝinta, Fabricio ne rimarkis tion, kio okazis ekster li. Kun senmovaj brakoj, fiksaj okuloj, li sin tenis for de la ĉirkaŭaj sugestoj; sed interne, lia mensa zono similis ardantan fornego.

Lia superekscitita imagopovo sin tenis *aŭdanta la pasintecon...* Li rememoris la figuron de agonianta profundaĝa maljunulo. Li aŭdis, en liaj lastaj horoj en la korpo, la parolojn de li, kiu rekomendis al lia zorgo tri junulojn ĉestantajn tie, en la scenejo de liaj rememoroj. La mortanto eble estis la patro, kaj la junuloj fratoj. Ili konversaciis inter si larmantaj. Subite

ŝanĝiĝis liaj rememoroj. La maljunulo kaj la junuloj ŝajnis ribelintaj kontraŭ li, lin akuzante. Ili nomis lin per senkaritataj vortoj.

La malsanulo aŭdis la internajn voĉojn, afliktite, ĉagrenite. Li deziris liberiĝi de la pasinteco, li pagus ian ajn prezon por la forgeso, li avidis forkuri de si mem, sed vane: ĉiam la samaj kruelaj rememoroj skurĝantaj lian konsciencon.

Mi rimarkis liajn organajn difektojn, rezultantajn de ofta uzo de analgeziko. Tiu homo eble de longe dueladis kun si mem.

Mi esploris la situacion, kiam grandaĝa sinjorino venis en la ĉambron, provante voki lin en la realon.

– Nu, Fabricio! ĉu vi hodiaŭ ne nutras vin?

La aldemandito etendis sian rigardon tra la ĉambro, skuis la kapon por nea respondo sen paroloj kaj restis plu en sia sama pozicio.

La sinjorino afable insistis sed ne sukcesis ŝanĝi lian sintenon. Ĉar ŝi bonkore provis plu doni al li supon, la malsanulo subite ekstaris, kvazaŭ li tuj frezeziĝis. Li kolere eldiris nekonvenajn kaj maldankajn esprimojn; li rifuzis ŝian proponon, ruĝa de kolero, mirigante min pro sia krizo de perturbitaj nervoj.

Lia edzino revenis en la dominternon, forviŝante larmojn, dum Kalderaro fortuŝite klarigis al mi:

– Li estas tuj frezeziĝonta kaj li ankoraŭ ne iris sur la kampon de mensmalsano, danke la sindediĉon de malnova parencino elkarniĝinta, kiu vikle lin helpas.

Tuj poste la Asistanto submetis lin al revivigaj magnetaj emanaĵoj, renovigante lian forton.

Antaŭ la neŭrasteniulo, nun pli trankvila, li serene rakontis:

– Nia frato-malsanulo havis la malfeliĉon maljuste alproprigi al si grandan heredaĵon, post kiam li promesis al sia mortanta patro zorgi pri siaj pli junaj fratoj, en ĉeesto mem de ĉi tiuj; sed regante la situacion, li ĉesis subteni siajn fratojn kaj ilin forpelis en sia hejmo, helpante sin de bone pagitaj fiadvokatoj, el tiuj, kiuj senskrupule vivas malpurigantaj la leĝajn tekstojn. Ju pli energiaj kaj konvinkigaj estis la pravaj plendoj, ju pli kortuŝaj estis la voko al frata amikeco, de pli firme li tenis sin en sia krianta surdeco, kiu ĵetis liajn fratojn en mizeron kaj ĉiaspecajn malfacilaĵojn. Du el ili mortis

en sanatorio, sur mizeraj litaĉoj, trafitaj de ftizo, atinginta ilin en troaj noktaj taskoj; kaj la alia elkarniĝis en mizeraj kondiĉoj de malfeliĉego, en forlasiteco, antaŭ ol siaj tridek jaroj, pro profunda senvitaminozo, kaŭze de subnutrado, al kiu li estis pelita. Ĉi ĉion nia malfeliĉa amiko sukcesis realigi, evitante la surteran justicon; li tamen ne povis forĵeti el la anguloj de sia konscienco la rememorojn pri la farita malbono; la rememoroj pri la krimo estas konservataj de lia mensa organo, kiel karboj fariĝas vivaj braĝoj ĉiam, kiam ekscitita de rememorblovoj. Tiu malbona filo kaj perversa frato, dum li mastris siajn rezistajn fortojn, kiujn la korpa vireco donis al li, sukcesis forkuri de si mem, sen grandaj malfacilaĵoj. Facila mono, forta sano, distroj kaj plezuroj, funkciis al li, kiel peza kurteno inter la aroganta egocentrismo kaj la viva realo. Sed la tempo lacigis lian fiziologian aparaton kaj forigis la plimulton de liaj iluzioj; iom post iom li renkontis sin mem; sed *dum la revena vojaĝo al si mem* li vidis sin sola kun la memoraĵoj, de kiuj li ne sukcesis liberiĝi. Li vane provis trovi bonhumoron kaj komforton: ĉi tiuj kuŝis kaŝitaj antaŭ li. Li ne povis koncentri sin sur sian eston mem, ne aŭdante siajn patron kaj fratojn, kiuj lin akuzis kaj riproĉis lian fiecon... Lia turmentata menso ne trovis konsolantan rifuĝejon. Se li rememoris la pasintecon, ĉi tiu postulis de li repagon; se li venis en la estantecon, li ne trovis trankvilecon por teni sin en nobla laboro, kaj kiam li provis leviĝi al supera plano, dezirante preĝi al la Plejalta eĉ tiam li estis surprizita per doloraj avertoj, ke li korektu la faritan eraron. En tiu spirita stato li malfrue interesiĝis pri la sorto de siaj fratoj. Laŭ informoj ricevita ne estis eble al li tuj repagi: ili ĉiuj estis foririntaj, antaŭirinte lin sur la granda vojo al la tombo. De tiam, rimarkante la neeblecon rapide rektigi sian kurboplenan destinton, la malfeliĉulo fiksiĝis en la plej malaltaj zonoj de sia memo. Li perdis siajn noblajn ambiciojn kaj siajn altajn idealojn kaj komencis ignori la rimedojn de espero. La materiaj profitoj anstataŭ lin konsoli, nun kaŭzis al li teruran abomenon kaj neesprimeblan ĉagrenon. Kunkroĉite al la maŝino de financaj respondecoj, kreita de li mem sen emo posedi por doni en nomo de la Universa Bono, ne estis al li eble eviti la altrudojn de la socia vivo, al li, estanta alta komercisto ĝis tiam, kiam li ekfalas pro superega torporo. Vidante sin kriminto en la

tribunalo de sia propra konscienco, li komencis vidi persekutantoj ĉie. Tiel li ekspertis bedaŭrindajn fobiojn. Laŭ li ĉiuj teleroj estas venenaj. Li suspektas preskaŭ ĉiujn familianojn kaj ne toleras siajn malnovajn amikojn. La eksceso de materiaj rimedoj faris lin malkredi je sincera amikeco, donis al li nocion pri privilegio, kiun li neniam meritis, pliiĝis lian detruan sendependecon, estingis en lia koro la benatan lumon de la verbo “servi”. Kiel ni vidas, lia situacio estas tute nefavora al la necesa restariĝo. La kondiĉo, kiun li trudis al si pro la malpli noblaj deziroj, kiujn li ĉiam nutris, estas apatia kaj sterileca...

Veninte al tiu parto de la rakonto, Kalderaro precipe montris al la malsana cerbo kaj klarigis:

– La nerva sistemo, ligita al la encefalujo per procedoj nepriskribeblaj por la tekniko de la homa scienco, estas nenio alia, ol la reprezentado de grava sektoro de la perispirita organismo, kiun ni ĵus studis. La falinta menso de Fabricio, spertinte insistajn konsciencoriproĉojn, venenis tiujn vivo-centrojn per senĉesa produktado de koruptaj energioj. Logike okazis tio, kion en bona psikiatrio ni povus nomi “ĝeneraligita lezo de la nerva sistemo”. Tia lezo unue atingis la sidejojn de la plej ĵusaj akiroj de la personeco, t.e. la ĉelojn kaj pli novajn stimulojn, kiuj sin lokas en fruntalaj loboj kaj en la motora kortekso, nedaŭre senutiligante nian amikon por alta meditado kaj nobla laboro, kaj lin devigante retiriĝi, sur la spirita kampo, internen de si mem. Kun menso nun haltigita meze en la instinkta regiono de la individueco, nia malsanulo ankoraŭ ne estas pozitive malekvilibrigita, danke la kontinuan helpon de nia mondo.

Kiam la Asistanto eksilentis, tiam mi kuraĝis demandi:

– Ĉu ekzistas espero je baldaŭa ekvilibro?

– Tute ne – respondis la aldemandito en signifa maniero –; ĉe lia kazo vane funkcias ĉiuj uzataj terapioj. La krima spirito povas ricevi la plej variajn specojn de kunlaboro, sed li nepre estos la kuracisto de si mem. Kvankam la homoj ne ĝin rimarkas en la meĥanismo de siaj ordinaraj rilatoj, la Dia Justeco tamen nevarie agas. La krimintoj longe povas eviti la punon de la juĝa organizaĵo en la mondo; sed pli aŭ malpli frue ili vagos antaŭ siaj homfratoj, sur malalta spirita kampo, kia estas la kadro de punaj afliktoj. Por familianoj

kaj amikoj, Fabricio estas skizofreniulo nekapabla rezisti aplikojn de insulina ŝoko pro lia delikata kaj laca koro; sed por ni li estas kunulo falinta en malsupera ambicio, spertante amarajn rezultatojn de siaj intencoj egoisme regi la vivon.

Kiam la instruanto interrompis sian rakonton, mi formulis memkompreneblajn demandojn sur mia interna kampo.

Se la malsanulo ne prezentis perspektivon de substancaj pliboniĝoj, kia estas la celo de nia helpo? kial resti pli antaŭ nesolvebla problemo, kia estas tiu, pro neebleco de baldaŭa renkontiĝo de kriminto kaj liaj viktimoj?

Kalderaro ne lasis min sen respondo.

– Ni ĉi tie estas – li afable informis – por ebligi al li dignan morton. Li ne atingos definitivan frenezigon. Per nia frata helpo li elkarniĝos antaŭ ol la tuta eklipso de racio.

Kaj ĉar mi estis mirigita, la komplezema amiko aldonis:

– Fabricio edziĝis kun virino, per multo da motivoj meritanta la ĉielan subtenon, kaj tiu virino preskaŭ sublimes donis al li tri infanojn, al kiuj li noble sin donis, ilin preparante por alta laboro en socio. Nun ili estas du profesoroj kaj kuracisto, sin donintaj al la supera idealo servi al la ĝenerala bono. Fabricio ne rajtas maltraktivigi sian familion organizitan en la ombro de lia materia subteno, sed edukitan sen lia despota personeco. Por la servado al siaj edzino kaj filoj li ricevas de la Supro la nunan helpon ŝanĝi sian loĝejon, pro altrudo de la morto, preparite por la estonta reĝustiĝo. La preĝoj de lia kunulino kaj de liaj filoj certigas al li “bonan morton” proksima, por kiu ni organizas liajn energiojn kaj *pari passu* (\*) al kutimigas lian familion resti en aktiva misio ĉe la bono sen lia fizika ĉeesto.

La Asistanto eksilentis, pretigante sin fluigi magnetajn emanaĵojn sur la cirkulada aparato.

Longajn minutojn li fluigis fortojn ĉirkaŭ la plej gravaj vaskuloj kaj poste emanaĵojn laŭlonge de la korpo por kvietigi liajn nervojn.

Antaŭ mia natura miro, Kladeraro klarigis:

---

(\*) Latina esprimo, kiun oni povas tradiki per la vortoj “kun egala paŝo” aŭ “samtempe”. – **La Trad.**

– Ni preparas okazigon de trombozo per klaciigo de iaj vejnoj. La elkarniĝo milde venos post kelkaj tagoj, kiel kompata rimedo nepre necesa al la feliĉo de la malsanulo kaj de ĉiuj, kiuj proksime vidas lian suferegon.

La malsanulo nun pli trankvila laŭŝajne englutis miraklecan analgezikon. Li kvietiĝis, apogante sian kapon sur neĝblankaj kusenoj.

En la inter ni reganta silento mi scivoleme demandis:

– Sed, konsiderante la morton post nemultaj tagoj, kiel disvolviĝos la proceso de elaĉeto de nia amiko?

– Li jam komencis sian elaĉeton – serene respondis la instruanto.

– Kiel?

Kalderaro faris espriman geston kaj atentigis:

– Atendu.

En tiu sama momento la malsanulo funkciigis la sonorilon ĉe sia litkapo. Lia edzino rapide alvenis. Ŝi trovis lin pli bona kaj ridetis feliĉa.

La maljunulo pli trankvila petegis:

– Agnesa, ĉu mi povas vidi Fabriĉjon?

– Kial do ne? – ĝentile respondis lia kunulino – mi lin alkondukos.

Post kelkaj minutoj ŝi revenis, kondukante ĉirkaŭ okjaran knabon. La knabo kun ekstrema amemo sin ĵetis en liajn brakojn kaj demandis:

– Ĉu vi pli bone fartas, avoĉjo?

La malsanulo kore lin rigardis kaj informis:

– Mi pli bone fartas, mia infano... Kial vi ne venis matene?

– Avinjo ne permesis.

– Jes, vere; mi ne fartis bone...

La sinjorino foriris por rigardi la scenon de malantaŭ la kurteno.

Avo kaj nepo sentis sin pli hejme.

Tute transfiguriĝinta pro la ĉeesto de la knabo, nia preskaŭ freneza amiko petegis:

– Frabriĉjo, mi deziras, ke vi preĝu por mi...

La knabo lin tuj kontentigis.

Li tie mem surgenuiĝis kaj respekte recitis la Sinjoran Preĝon.



Post la preĝo la malsanulo kun malsekaj okuloj petis:

– Mia infano, ne forgesu preĝi por mi post kiam mi mortos.

La knabo nun staranta brakumis lian bruston kaj diris, diskrete plorante:

– Vi ne mortos!...

– Fabriĉjo, ĉu vi kredas, ke Dio pardonas pekintojn tiajn, kia mi ja estas?

La etulo larmanta kaj konfuza respondis:

– Mi pensas, avoĉjo, ke Dio pardonas nin ĉiujn.

Malkaŝante afliktiĝojn, kiuj plenigis lian koron, li ree demandis:

– Eĉ homon, kiu perfidas la konfidon de sia patro kaj ŝtelas de siaj fratoj?

La nepeto hezitis nekapabla kompreni la tutan amplekson de tiu intenca demando; sed, dezirante kontentigi la malsanulo, li kun sia tuta infana simpleco iamaniere balbutis:

– Mi opinias, ke Dio ĉiam pardonas...

– Ĝi estas tio, kion mi deziris scii – asertis la malsanulo pli konsolita.

La konversacio inter ambaŭ daŭris plu amema kaj dolĉa.

Post skrupula ekzameno Kalderaro almontris la infanon kaj klarigis:

– Ĉi tiu knabo estas la ekspatro de Fabricio, kiu rekunvivas kun sia krima filo, danke la benatan reenkarniĝon. Li estas la sola nepo de la malsanulo kaj poste prenos la administradon de la materiaj havaĵoj de la familio, havaĵoj, kiuj al li komence apartenis. La Leĝo ne mankas.

Mirigite pro la informo, mi formulis la demandojn, kiuj spontanee eliĝis:

Kiel la maljuna Fabricio siavice elaĉetos sin? Ĉu ankaŭ li estonte revenos en tiun saman hejmon? Ĉu post la morto de sia densa korpo, li spertos kompletan malekvilibron? Ĉu li longe restos en konsterniteco?

Kalderaro, deklarante finitaj niajn laborojn de helpo al tiu domo, ridetis al mi, pretiĝis por foriro kaj aldonis:

– Nia malsana amiko, konservante en sia menso la restaĵojn de sia krima ago, tuj post forlaso de sia fiziologia domo, dum multe da tempo suferos la rezultatojn de sia falo ĝis kiam doloro forĵetos la malignajn elementojn, kiuj venas lian animon. Kiam tiu elpuriga laboro estos kompleta, tiam...

– Ĉu li revenos al siaj familianoj? – mi scivole demandis, antaŭ la interrompita frazo.

– Kiam la nuna samsanga grupo estos altiginta sian spiritan nivelon al lumaj kulminoj, li estos pelita intense klopodi por ĝin atingi. Li tamen neniam estos forlasita. Ni ĉiuj apartenas al la grandega familio, en kiu ni moviĝas ekde nia origino – la Homaro.

En tiu momento ni eliris el la luksa ĉambro.

Post nemultaj sekundoj ni revenis al la Naturo, kaj ĝuis la benon de tre pura ĉielo. Dum mia instruanto rifuĝis en si mem, atentante la respondecujojn de la laboro, mi donis kuron al novaj pensoj pri la amplekso kaj grandeco de la reganta justeco.

### XIII

#### AMA PSIKOZO

Sekvante Kalderaron meze en la nokto, ni iris helpi malfeliĉan fratinton, preskaŭan memmortigintinon.

Ni penetris en la komfortan loĝejon, kvankam modesta, sentante la ĉeeston de pluraj malfeliĉaj estuloj.

La Asistanto ŝajnis al mi rapidema. Li ne haltis por ia ajn komentario.

Miavice mi akompanis lin ĝis humila ĉambro, kie ni trovis junan virinon konvulsie ploranta, regata de terura malespero. Ŝia menso vidigis ekstreman malekvilibron, kiu etendiĝis al ĉiuj vivaj centroj sur la fiziologia kampo.

– Kompatinda! – emociite diris la instruanto – al ŝi ne mankos la Dia Boneco. Ŝi preparis ĉion por forkuri per memmortigo, en ĉi tiu nokto; sed la Diaj Fortoj helpos nin interveni...

Li surmetis la dekstran manon sur la frunton de la fratino larmanta kaj klarigis:

– Tio estas Antonina, abnegacia kunulino de lukto. Senpatra orfino de tre frua aĝo, ŝi komencis perlabori la vivon en siaj ok jaroj por subteni siajn patrinon kaj fratineton. Ŝi pasigis siajn infanecon kaj adoleskon en grandegaj sinoferoj, ne konante la ĝojojn de la ridetantaj knabeco kaj juneco. Kiam ŝi aĝis dudek jarojn, ŝi perdis sian patrinon, tiam forportitan de la morto, kaj, malgraŭ siaj belaj virinaj idealoj, ŝi estis devigita oferi sin al sia fratino baldaŭ edziniĝonta. Post ŝia edziniĝo, Antonina penis foriri por prizorgi sian sanon; sed tre frue ŝi rimarkis, ke la edzo de ŝia fratino estas karakterizata de abomena malvirteco. Perdiĝinte en malsuperaj plezuroj, li ĉiutage sin donis al kutima ebriiĝo, revenante hejmen malfrue

en la nokto, distribuante batojn, vomante insultojn. Emociita antaŭ la destino de sia kunulino, nia sindona amikino restis plu hejme, en silenta rezigno, mildigante ŝiajn ĉagrenojn kaj helpante ŝin breĉi la nevojn kaj ilin prizorgi. Malgaje kaj malrapide kuris la jaroj, kiam Antonina konatiĝis kun junulo bezonanta subtenon, faranta pezan klopodon por teni sin ĉe la studoj. Ili afinis pri aĝo kaj komuneco de ideoj kaj sentoj. Sindonema kaj nobla, ŝi respondis al lia simpatio, fariĝante abnegacia fratino de la junulo. Lia societo iel ĵetis lumon en ŝian nokton de seninterrompaj soleco kaj sinofero. Dividante la tempon kaj siajn eblojn inter la fratino, kvar malgrandaj nevoj kaj la kunpartoprenanto de brilaj revoj, ŝi kuraĝa kaj feliĉa, ĉiutage sin donis al la sanktiga laboro, atendante la estonteco. Ŝi ankaŭ pensis ekhavi iun tagon la kronon de patrineco, en modesta kaj malriĉa domo, sed sufiĉa por enhavi la feliĉon de du koroj por ĉiam kunigitaj antaŭ Dio. Sed Gustavo, la junulo, kiu helpis sin per ŝia ama kunlaborado dum sep sinsekvaj jaroj, post la universitata kurso sentis sin tro altranga por ligi sian destinon al tiu de la modesta fraŭlino. Nun, sendependa kaj titolita, li komencis rimarki, ke Antonina fizike ne estis la kunulino, kiun liaj intencoj tiel deziris. Portante diplomon de kuracisto kaj sentante urĝan bezonon starigi hejmon kun grandioza programo en la socia vivo, li edziĝis kun junulino posedanta grandan riĉaĵon, malestimante la lojalan koron, kiu lin helpis en la malfacilaj momentoj. Profunde humiligita, la malfeliĉa fratino iris al li, sed ŝi estis malvarme akceptita. Gustavo kun abomena aroganteco krude informis al ŝi la novaĵojn: li bezonis meti en ordon la materiajn negocojn, kiuj lin koncernis, kaj tial li elektis la pli bonan partion. Krom tio, li deklaris, lia pozicio postulas edzinon, kiu ne devenu el medio kun humila aktiveco; li deziras iun, kiu ne estu laboristino ĉe laboratorio, kiu ne havu kalajn manojn, nek arĝentajn harojn sur la kapo. La fraŭlino ĉion aŭdis banata en larmoj, sen reago, kaj ŝi hieraŭ revenis en sian loĝejon, turmentante de la deziro morti, kiel ajn estus la sekvoj de tiu paŝo. Ŝi sentas, ke la esperoj forvelkas, frakasitaj de neatendita bato, ke ŝia ekzistado reduktiĝas al cindro kaj plovero, ke rezigno malfermas pordojn al ruino kaj morto. Ŝi sukcesis akiri ian dozdon da veneno, kiun ŝi intencas engluti ankoraŭ hodiaŭ.

Post malgranda interrompo de la klarigoj, li petis:

– Ekzameni ŝin, dum mi donas al ŝi la unuajn helpojn.

Dum longaj minutoj mi faris detalan esploron.

El la okuloj de Antonina falis pezaj larmoj; el la kranio tamen eliris purpuraj radioj, kiuj invadis ŝian torakon kaj speciale ŝian koron. Torturaj pensoj konfuzis ŝian menson. Mi rimarkis ŝiajn kaŝitajn petojn, kaj tre kortuŝis min aŭdi ŝiajn kriojn de malespero kaj ŝiajn ardaĵajn preĝojn.

Ĉu estas krimo – ŝi pensis – ami iun tiel ekscese? kie estas la Ĉiela Justeco, kiu ne premiis ŝin pro la sinoferoj de virino, sin dediĉanta al la doma paco? ŝi aspiras esti gaja kaj feliĉa, kiel la ĝojaj kunulinoj de ŝia infaneco; ŝi tre deziras indan edziniĝon, atendante akcepti kelke da infanoj donotaj de la Senfina Boneco de Dio! Ĉu estas kondamninda aspiro revii pri konstruo de modesta hejmo per protekto de simpla kaj bona kunulo, kiam la birdoj mem posedas siajn nestojn? Ĉu ŝi ne laboris ĉiam por feliĉo de aliaj? por kiaj nekonataj motivoj Gustavo forpelis ŝin al forlasiteco? Ĉu la kuloj de la manoj kaj la signoj sur la vizaĝo ne konfirmas ŝian sindediĉon al la honesta laboro? ĉu valoris la penon suferi tiom da jaroj por realigo, kiu nun ŝajnas al ŝi neebla? Ne! Ŝi ne volas resti plu en mondo, kie malvirto tiel facile triumfas, tretante sur virton! Malgraŭ la fido konsolanta ŝian koron, ŝi preferas morti, alfronti la nekonataĵon... Ŝi sentis sin nealĝustiginta, sen direkto, preskaŭ freneza. Ĉu ne estus pli racie – ŝi demandis sin mem – iri en la mallumon de tombo ol putriĝi sur litaĉo en frenezulejo?

Etendita sur lito la malfeliĉulino kaŝis sian vizaĝon en la manoj, singultante tute sola, vekante en ni kompaton.

Kalderaro interrompis la helpolaboron, rigardis min per signifa esprimo kaj informis:

– Mi havas ordonojn trudi al ŝi pli profundan dormon, tuj post la noktomezo.

Kaj, rimarkante, ke la horloĝo montras, ke ne malfruas la antaŭdifinita momento, la Asistanto komencis fluigi emanajojn laŭlonge de la simpata nerva sistemo.

La vasta reto de neŭronoj spertis anestezan influon. Antonina provis ellitiĝi, sed ŝi ne sukcesis fari tion. La interveno estis tro vigla, ke la malsanulino povu reagi.

La instruanto atente daŭrigis, flegme envolvante ŝin en trankviligajn fluidaĵojn. Post nelonge la fraŭlino venkite apogis sian dorson al la kusenoj, en stato, kiun ordinara magnetizanto nomus “profunda hipnoto”.

Kalderaro konservis ŝin en kompleta ripozo dum pli ol duonhoru. Post tiu tempo du estuloj aŭreolitaj de intensa lumo eniris en la ĉamburon. Ili brakumis mian instruanton, kiu kore prezentis min.

Estis nun ĉe ni Mariana, kiu estis sindona patrino de Antonina, kaj Marcio, prilumita spirito ligita al ŝi de foraj jarcentoj.

Emociitaj, ili dankis la helpadon de mia instruanto, kiu transdonis la malsanulinon al la patrino prizorgo.

La simpatia elkarniĝinta sinjorino klinis sin super sia filino kaj dolĉe vokis ŝin, kiel ŝi ĝin faris, kiam ŝi estis sur la Tero. Parte malligita el la kruda envolvaĵo, Antonina stariĝis en sia perispirita organismo, ravita, feliĉa...

– Panjo! panjo! – ŝi ekkriis, faciligante sian koron, kaj ŝi rifuĝis inter la patrinaj brakoj.

Mariana akceptis ŝin ameme, premis ŝin kontraŭ sia brusto, eldirante karesajn vortojn.

– Panjo, helpu min! mi ne volas vivi plu sur la Tero! Ne lasu min reveni en la pezan korpon... La destino forpelas min. Mi estas malfeliĉa! Ĉio estas kontraŭ mi... Fortiru min de ĉi tie... por ĉiam!

La nobla sinjorino malgaje rigardadis ŝin, kiam Marcio alproksimiĝis, kaj fariĝis vidata de la estimata malsanulino.

La fraŭlino larĝe malfermis la okulojn kaj instinkte genuiĝis, subtenate de sia patrino. Ŝi laŭŝajne klopodis rememori iun, kiu restis en tre fora pasinteco... Oni rimarkis ŝian ekstreman malfacilecon precize rememori. Ŝi rigardadis la senditon, banate en ne ordinaraj larmoj: ŝi ne verŝis funebrajn larmojn, kiajn en antaŭaj minutoj; nun ŝi estis tuŝita de sublima konsolo, de mistika ĝojego, kiu neklarigeble fontis el la profundaĵoj de ŝia koro.

Marcio pli intime venis al ŝi, per sia dekstra luma mano tuŝis ŝian frunton kaj ameme parolis:

– Antonina, kial vi malkuraĝas, kiam la savanta lukto apenaŭ komenciĝas? ĉu vi forgesis, ke ni ne estas orfoj? La

Senfina Boneco ŝvebas super ĉiuj malfacilaĵoj. Ĉu vi evitas la mallarĝan pordon, kiu al ni donos la feliĉan eblon al la renkontiĝo?

Eble pro tio, ke la interparolantino postuladis de si mem troan laboron, por rememori scenojn perditajn en la tempo, la sendito frate avertis:

– Ne pligravigu vian situacion! trankviligu vin! ĉu ne sufiĉas al ni la estanteco plena de benata laboro kaj renoviga lumo? Iun tagon vi reakiros la benon de via tuta memoro; nun kontentigu vin per la limigitaj donoj. Profitu la minutojn por restarigi vian destinon, utiligu la horojn por rekonduki viajn aspirojn al superaj sferoj. Kiaj motivoj sugestas al vi tian krimon, kia ja estas kaŭzi morton? kiaj kialoj kondukas viajn paŝojn direkte al la malluma abismo? Via patrino kaj mi de malproksime vidis tiun danĝeron, kaj ĉi tie ni estas por vin helpi...

Li faris longan paŭzon, ŝin ame rigardante, kaj daŭrigis:

– Ho, mia benata amikino, kiel vi tiamaniere malfermis vian koron al la monstra malespero? Diru al mi, ne tenu vin silenta... Mi ne estas via juĝanto, mi estas via amiko el eterneco. Ĉu mi do ne havos la konsolon aŭdi vin?

La malsanulino deziris paroli; sed la mildaj lumradioj, disradiataj de Marcio, ŝin tute ĉirkaŭis, sufokante ŝian voĉon, dum la ekstazo en tiuj neforgeseblaj minutoj.

Sed, dezirante evidente doni al ŝi okazon por pli granda faciligo de koro, li ŝin zorge levis, kaj insistis:

– Parolu!...

Kuraĝigita, Antonina timeme parolis:

– Mi estas lackonsumita...

– Vi tamen neniam estis forgesata. Vi ricevis de la Providenco mil diversajn rimedojn nepre necesajn al la valora servo de savo. Ĉu la surtera korpo, la benoj de Suno, la okazoj de laboro, la mirindaĵoj de la Naturo, la amaj ligiloj kaj la doloroj mem en la homa spertado ne estas netakseblaj donoj de la Dia Provizado? Ĉu vi ne konas, kara, la feliĉon de sinofero, vi forrifuzas la eblecon ami?

Tiam mi ja vidis la juna virino kun pli da konfido rigardi lin. Sentante sin forta antaŭ tiu nesofismebla elmonro de kareso, ŝi kun frata sincereco deklaris:

– Mi de longe revas pri posedo de hejmo..., mi deziras vivi por viro, kiu siavice helpu min porti la ekzistadon..., mi pensas ricevi de Dio kelke da infanoj, ke mi povu karesi! Ĉu estas peko, ĉiela sendito, aspiri tiajn aferojn? Ĉu estas krimanta la virino, kiu penas sanktigi la naturajn principojn de la vivo? Post multe labori sinsekvajn jarojn por la feliĉo de tiuj, kiujn mi amas, mi rimarkas, ke la destino mokas miajn esperojn. Ĉu estas virto vivi inter ĝojaj kaj feliĉaj homoj, kiam nia koro restas mortinta?

Marcio frate aŭdis ŝin, karesante ŝiajn manojn, kaj vidigante siajn altajn akirojn de vera amo, li pli komprenema kaj amema diris plu:

– Abnegacia amikino, ne permesu, ke la ombro dum kelke da horoj eklipsu al vi la lumon dum venontaj jarcentoj. Ĉu estas eble, Antonina, ke vi sentu vin tute sola, kiam la Superega Sinjoro donis al vi la subliman hejmon de tuta mondo? La Homaro estas nia familio, la infanoj de doloro apartenas al ni. Mi rekonas, ke pasemaj humiligoj de sento disŝiras vian animon, ke vi deziras apogi vin al karesa brako de inda kaj fidela kunulo. Sed, kara, laŭ la Supera Volo vi devas ricevi ankoraŭ nun la profitojn, eble troviĝantajn en soleco. Se ekzistas periodoj de florado en la homaj valoj, en kiuj ni ebriiĝas meze en printempo de la Naturo, vivoj ja estas laŭŝajne izolitaj kaj malfeliĉaj sur la kulminoj de meditado kaj rezigno, sub kies lumo ni preparas nin por novaj sanktigaj vojoj.

“Ne supozu, ke la fatala iro tra la tombo malfermas al ni pordojn al la libereco: la Leĝo sekvas nin ĉien, kaj la Superega Sinjoro, se Li praktikas la senfinan kompaton, ne malzorgas la nerompeblan justecon. La Eterna Saĝeco nevarie donas al ni lokon, kie ni povas esti pli utilaj kaj pli feliĉaj.

“Vi deklaras vin forlasita kaj malfeliĉa kaj tamen vi ankoraŭ ne taksis la multegajn eblaĵojn vin ĉirkaŭantaj. Vi diras, ke vi estas nekapabla brakumi la infanojn de Dio, sed kia estas la kaŭzo de tia ekskluziveco pri viaj samsanguloj? Ĉu vi ĝis hodiaŭ ne vidis la forlasitajn infanojn, neniam rigardis la infanetojn de mizero kaj necesbezono? Se vi ne povas esti patrino de floroj de via propra karno, kial do vi ne faras vin spirita zorgantino de la bezonantaj kaj suferantaj etuloj? Ĉu vi kredas, Antonina, ke ni povas esti nepre feliĉaj, aŭdante ĝemojn ĉe nia pordo? Ĉu estos tuta ĝojo en batanta koro



flanke de ĥoro da larmantinoj? La mondo ne estas nia. Ni, la infanoj de la Plejalta, ja estas pelitaj kunlabori en la verkoj nin ĉirkaŭantaj. Estas efektiva malfeliĉo iu kredigi al si, ke li estas favorito de la Ĉielo, kvazaŭ la Kompatema kaj Saĝa Patro ne estus alia ol malforta kaj partiema diktatoro! Skuu vian dormantan konsciencon... Memoru, ke la Ĉiopova ne aliĝas al nia malvasta ekskluzivismo de eraremaj homoj, kaj ne forgesu, ke pezas sur ni, antaŭ Lia universeco, netrandsoneblaj devoj de laboro, kaj ekzercu la altvalorajn rimedojn, kiujn Li donis al ni, ke ni iun tagon atingu la perfektecon de saĝo kaj amo.

“Vi suferas en via organaro turnita al egocentrismo, ĉar iu homo, kies karaktero afinis kun la via laŭ multaj aspektoj, kaj poste modifis sian vivdirekton, forpuŝis vin en forgeson. Vi ploras, ĉar vi esperis trovi ĉe lia societo ion de la Dia Ĉeesto, kiu portus serenecon al viaj doloraj esperoj de afabla kaj sentema virino... La seksaj malkvietigoj pliiĝis en la interno de via sanktejo, kaj vi spertas daŭran sieĝon de maltrankviloj. Sed... ĉu vi eble kredas, ke la sekso estas ekskluziva fonto de amo? Ĉu ankaŭ vi estas viktimo de tiu fatala trompo? Amo estas dia suno disradianta de ĉiuj noblaĵoj de animo.

“Ni iafaje estas senigitaj je sensacoj, malhelpataj uzi la energiojn, kiuj kreas la fizikajn formojn, por ke ni akiru pli valorajn kapitalojn por nia memo; eĉ tiel tiaj kontraŭaĵoj ne baras eksterigon de la dia sento; bari ĝin estus kvazaŭ estingi la Universon. Kio torturas la homan menson en tiaj okazoj, tio estas la klimato en la karcero organizita de ni mem; en nia sovaĝa egoismo ni ne scias perdi por kelke da tagoj, por ke ni gajnu en la eterneco, nek doni nedaŭrajn valorojn por konkeri la definitivajn donojn de la vivo.”

Antaŭ la fraŭlino, kiu ravita lin rigardadis tra dika vualo da larmoj, la sendito diris plu:

– Efektive, se vi ne povas dividi la sperton de la elektita viro, pro la cirkonstancoj pelantaj vin al rezigno, kial vi ne donas al li la puran fratan amon, kiu ĉiam altigas? Ĉu al ni estas malpermesate transformi en fratojn la homojn, kiujn ni estimas? Vi plie ne devas forgesi, ke la perfida fianĉo, nune bela en sia fiziologia figuro, ankaŭ sin vestos poste per la eluzita kostumo de laceco kaj maljuneco, se baldaŭ li ne alĝustigos al la vizaĝo de maskon de malsano aŭ de morto.

Li konos la elreviĝon pri la karno kaj en silento estimos serĉon de la spirito. Se vi vere amas lin, kial vi volas lin torturi per sarkasmo de memmortigo, anstataŭ regajni fortojn por lin atendi ĉe la fino de mallonga korpa ekzistado? Se vi ne povas esti kruĉo de pura akvo por la vojaĝanto kara, kial do vi ne estas oazo, kiu atendas lin sur la dezerto de neeviteblaj seniluziigoj? Krom tio, kiel vi fine sentas tian kriantan forlason, se ankaŭ ni vin atendas, ĉi tie avidante viajn amon kaj kareson?

Antonina ridetis en ekstazo, malgraŭ siaj larmoj abunde fluantaj.

Rimarkante la sanigan efikon de siaj kuraĝigaj paroloj, Marcio karesis ŝiajn harojn kaj murmuris:

– Kial vi volas atendi la fruktojn de la karno por praktiki la veran amon? Jesuo ilin ne havis kaj tamen ni ĉiuj sentas nin zorgataj de Lia senfina abnegacio. Ĉu vi, Antonina, promesas modifi de nun viajn mensajn sintenojn? La digna kaj nobla virino, pura kaj kristana, forgesas malbonon kaj ĉiam amas...

Kortuŝite, ni vidis la interparolantaron denove genuiĝi kaj solene ekkrii:

– Mi promesas modifi mian sintenon en nomo de Dio.

En tiu momento la sendito etendis malfermitajn manojn super la frunto de la malsanulino, kaj envolvis ŝin per lumaj radioj, kiuj tuŝis ne nur la perispiritan materion, sed ankaŭ iris transen, ĝis la densa korpo, por speciale fiksiĝi sur la regionoj de la encefalo, de la torako kaj de la inaj organoj. Tuj poste Antonina, ravita de la patrino kaj de la kunulo el supera mondo, foriris por agrabla kaj ripoziga ekskurso. Kalderaro prenis sur sin la devon helpi ŝin repreni la pezan portilon en la unuaj horoj de la hela mateno.

Edifite de la noktaj observoj, mi revenis kune kun li en la ĉambron de la fraŭlino preskaŭ sinmortigintino.

Inter la sesa kaj sepa horoj la elkarniĝinta patrino alportis sian filinon, kies fizionomio disradiis nekonatan kaj nekompreneblan feliĉon.

La instruanto helpis ŝin repreni sian fiziologian envolvadon, fluigante anestezaĵajn emanaĵojn ĉirkaŭ ŝia cerbo, ke ne estu permesate al ŝi ĝoje rememori ĉiujn detalojn de la nokta sperto; se ŝi konservis la tutan memoron, diris Kalderaro, ŝi eble mortus de ĝojego. Tial la ĝojoj, kiujn ŝi intense travivis,

estos gardataj en ŝia organismo sub formo de novaj energioj, nekonataj stimuloj, kuraĝo kaj kontenteco de nekonata origino.

Efektive, post nemulte da minutoj Antonina vekigis, kvazaŭ ŝi estus alia homo; ŝi sentis sin neklarigeble reanimita, preskaŭ feliĉa.

Unu el ŝiaj malgrandaj nevoj penetris en la ĉambron, ŝin vokante. La bonkora onklino rigardis lin, emociite.

Ia mirakleca energio, kies kono ne estis al ŝi permesata, religis ŝin al la intereso pro la vivo. Ŝi sentis neesprimeblan feliĉon en la suno trapasanta la vitraĵon, benis la modestan ĉambron, kie ŝi luktadis por plenumi la planojn de Dio, kaj ŝi hontis pro tio, ke en la antaŭtago ŝi pensis senprave forkuri de la lernado en la mondo. Ĉu ŝi ja ne estis helpata de la Providenco per mirinda kvanto da benoj? Ŝi rigardis la ĉarman infanon malriĉe vestitan, kiu petis ŝian akompanon por malsupreniri sur la malgrandan ĝardenon, kie novaj floroj ekburĝonis. Kio gravas la sensignifa fiasko de la koro antaŭ la noblaj laboroj, kiujn ŝi povus plenumi en sia pozicio de klera kaj juna fraŭlino? Ĉu la infanetoj de ŝia fratino ankaŭ ne apartenis al ŝi? ĉu ne estas pli noble vivi, ke ŝi estu utila, ĉiam fidante al la Neelĉerpebla Favorkoreco?

– Onklino Antonina! Onklino Antonina, ni ekiru! Ni ekiru por vidi la novan rozujon! – kriis la gaja kvinjara knabeto, ĝoje defianta la vivon.

Rimarkante la restariĝon de ŝiaj fortoj, ni sincere ĝojaj vidis ŝin stariĝi kaj respondi ridetante:

– Atendu! mi iros tuj, mia infano!

## XIV

### SAVA RIMEDO

Kiam ni finis aktivan kunlaboron ĉe ia nobla rondo sin doninta al preĝo, tiam certa kunulo venis al ni, kaj petis de la Asistanto servon al ia privata afero.

Certe Kalderaro konis la detalojn de la situacio, ĉar inter ambaŭ tuj ekestis kurioza dialogo.

– Malfeliĉe – diris la informanto – nia Antidio ne regas la situacion; li restas plu en preskaŭ tuta ruiniĝo. Li ree ligiĝis al danĝeraj elementoj de ombro, kaj revenis al la noktaj eraroj, kun grava malprofito por nia helpa laboro.

– Ĉu ne helpis la pliboniĝoj en la pasinta duonmonato? – frate demandis la instruanto.

– Li ilin profitis por tuj reveni al sia malsaĝeco – klarigis la interparolanto kun ĉagrena voĉtono.

– Estas notinde tamen, ke li troviĝis preskaŭ tute freneza.

– Jes, sed li sukcesis refoje ĝui enviindan organan staton, dank’ al via lasta interveno; sed tuj kiam li vidis sin forta, tiam li malsobre sindonis al alkoholaĵoj. La arda soifto kaŭzita de lia propra malzorgo kaj de la instigo de vampiroj, kiuj svarmas ĉirkaŭ li, renversis lian nervan sistemon. La perispirita organismo duonlibera de la densa korpo pro la malutilaj procesoj de ebrieco, plenigas lian menson per aliaj inkuboj pligravigitaj de la agado de la malicaj estuloj lin sekvantaj paŝon post paŝo.

– Ĉu li nun estas hejme? – demandis Kalderaro kun intereso.

– Ne – respondis la alia malkuraĝigite –, mi lasis lin ankoraŭ nun en malpli digna loko, kie la situacio de nia malsanulo reprenis bedaŭrindajn karakterojn.

La instruanto dum kelke da momentoj esploris la aferon kaj diris:

– Ni helpu lin; sed, se en la lasta okazo la helpo celis lin redoni al la ebla fizika ekvilibro, nun vi devas agi kontraŭe. Estas grave, ke vi apliku al lia korpo provizoran kaj pli fortan malekvilibron. Ĉe ĉi tiu kazo, kiel ĉe aliaj malfacilaj, malsano ĉiam korektas.

Kaj, rigardante la bonfaranto de la distanca malvirtulo, li demandis:

– Konsentite?

– Jes – li senhezite respondis –; vi, mia amiko, estas sperta pri helpo, kaj mi aprobas viajn determinojn. Kio ja interesas min, tio estas la efektiva sano de la malfeliĉa frato, kiu sendefende sin donis la ebrieco.

Ni direktiĝis al la loko, kie ni devos helpi la devojintan amikon.

Ni penetris en la domon kun larĝaj fenestroj intense prilumitan.

La aero sufokis. Malagrablaj emanaĵoj fariĝis pli kaj pli densaj, laŭmezure kiel ni antaŭeniris.

En la ĉefa salono de la domo, kie strangaj ornamoj abundis, kelkaj dekoj da paroj dancis kun siaj mensoj absorbitaj de malaltaj vibroj, kiujn la medio vigle inspiris.

Nedifinebla kaj disŝiranta impresio regis mian memon. Ĝi ne venis de la strangeco, kiun la indiferenteco de la viroj kaj frivoleco de la virinoj kaŭzis al mi: kio terurigis min, tio estis la scenon, kiun ili ne vidis. La amaso da estuloj konfuzaj kaj malvirtaj, kiuj tie moviĝis, estis grandega. La gedancantoj ne dancis solaj, sed ili senkonscie imitis ĉe la rapida ritmo de malsupera muziko la ridindajn gestojn de la nerespondecaj kunuloj, kiuj al ili estis nevideblaj. Tiaj sintenoj vidiĝis tie kaj tie, kaj iam kaj iam histeriaj krioj vibris en la aero.

Kalderaro ne detenis sin. Li montriĝis al kutimiĝinta al la sceno; sed ne sukcesante bridi la miregon, kiu min ekposedis, mi petis de li permeson kaj demandi:

– Mia amiko, kion ni vidas? ĉu gajajn homojn ĉirkaŭitajn de tiel senkonsciaj kaj perversaj estuloj? ĉu do danci estas krimo? ĉu gajeco estas grava eraro?

La instruanto pacience aŭdis la naivajn demandojn, kiujn miaj lipoj eldiris, diktitaj de la miro, kiu min ekposedis, kaj klarigis:

– Kiaj demandoj, Andreo! Dancado povas esti tiel sanktigita, kiel preĝado, ĉar la efektiva ĝojo estas sublima heredo de Dio. Ĉi tie la bildo estas malsama. Dancado kaj plezuro en ĉi tiu domo estas evidenta retroiro al la primitivaj statoj de la estulo, kun nekonzufuzablaj pligravigoj de la difektiĝoj de la sentumoj. Ni vidas en ĉi tiu domo virojn kaj virinojn kun alta rezonado, sed kun sintenoj, pri kiuj eble hontus multaj simioj. Sed for de ni ia ajn riproĉo: ni ilin kompatu. Ili estas transfuĝintoj de la socio, kaj plejparte ribelintoj kontraŭ la disciplino starigita de la Superaj Planoj por iliaj surteraj vojoj. Multaj el ili estas profunde malfeliĉaj, bezonantaj niajn helpojn kaj kompaton. Ili penas dronigi en vinon aŭ plezurojn iajn nociojn pri respondeco, kiujn ili ne sukcesas forgesi. Malfortaj antaŭ la lukto, sed indaj je kompato pro la konsciencoriproĉoj kaj maltraktivigoj ilin konsumantaj, ili meritas esti frate helpataj.

Kaj rapide rigardante la amason da konfuzantaj Spiritoj, kiuj tie sin donis al vampirismo kaj sarkasmo, li modeste daŭrigis:

– Koncerne ĉi tiujn malfeliĉulojn, kion ankaŭ ni faru, krom rekomendi ilin al la Dia Povo? Ili same provas la neeban forkuron de si mem. Haluciniitaj, ili nur prokrastas la teruran minuton de memrekono, kiu ĉiam alvenas, per mil procedoj de doloro, kiam ili tute ne atendas, post elĉerpiĝo de ĉiuj rimedoj de la dia amo, kiun la Supera Patro donas al ni ĉiuj. Ilia menso ankaŭ estas ligita al la primitivaj instinktoj, kaj ili, malfortaj kaj hezitemaj, timas la respondecon pri la renoviga laboro.

Vidante min gapanta kaj soifanta kaj novajn instruojn, la Asistanto konsilis al mi:

– Nu! ni lasu ilin amuziĝi. Danco en ĉi domo estas al ili, en lasta okazo, ia bono. Niaj enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj kunuloj, ĉi tie estantaj, atingis tiel abomenindan nivelon, ke, sen ia dubo, se ne estus la dancado, li estus tie ekstere praktikantaj ekstreme kondamnindajn agojn, tia estas la pretemo, en kiu ili troviĝas pro la krimo. La Patro kompatu nin ĉiujn.

Ni rapide iris en la internon.

En sufoka ĉambreto supozeble kvardekjara sinjoro kuŝis tremanta. Li ne sukcesis teni sin staranta.

Kalderaro detale ekzamenis lin kaj demandis la nova amikon, kiu nin akompanis:

– Ĉu li ree trinkas alkoholaĵojn de multe da tagoj?

– De unu semajno, precize.

– Kiel vidate, li rapide malfortiĝis.

La instruanto, dum li komencis fluigon de magnetaj emanaĵoj, konsilis min rimarki la karakterizaĵojn de la danteska sceno antaŭ niaj okuloj.

Antidio, malsana kaj malfeliĉa, malgraŭ sia malfacila situacio, petis glaseton da drinkaĵo, ĉiam plian glaseton, kiun juna servisto obeeme alportadis. Liaj membroj tremis, montrante malviglecon. Malvarma ŝvito fluis sur lia frunto, kaj iam kaj iam, li aŭdigis kriojn de sovaĝa teruro. Ĉirkaŭ li kvar brutiĝintaj estuloj subigis lin al siaj deziroj. Ili alterne regis lian fiziologian organismon, anstataŭante unu alian por absorbi la alkoholajn emanaĵojn, ĉe kiuj ili sentis neordinaran plezuron. Ili speciale ekposedis la “stomakan vojon” enspirante la drinkaĵon vapor-iganta de kardjo ĝis piloro.

La sceno kaŭzis angoron kaj teruron.

Ĉu ni estis antaŭ ebrulo aŭ ia viva kaliko, kies enhavon drinkis la satanaj genioj de malvirto? La malfeliĉa Antidio portis stomakon plena de likvaĵo kaj kapon kovrita per vaporoj.

Duonmalligite el la densa organismo pro anesteza agado de tokso, li pli intime komencis indetiĝi kun la estuloj lin turmentantaj.

La kvar elkarniĝintaj malfeliĉuloj siavice tenis sian menson invaditan de terurigaj vizioj el tombo, kiun ili trapasis, kiel dipsomaniuloj. Soifantaj kaj afliktitaj ili kunportis fantomajn bildojn pri vipuroj kaj vespertoj el la mallumaj lokoj, kie ili restadis.

Magnete sintonizante kun la malekvilibrigita psikismo de la vampiroj, la ebrulo komencis tondre petegi:

– Savu min! savu min pro Dio!

Kaj montrante al la proksimaj muroj, li kriegis sub la impreso de neesprimebla teruro:

– Ho! jen la verpertoj!... la vespertoj! forpelu ilin, retenu ilin!... kompaton! kiu liberigos min? Helpon! Helpon!...

Du sinjoroj, ankaŭ ebriaj de vino, mirigite alproksimiĝis. Sed unu el ili trankviligis la duan, dirante:

– Ni povas fari nenion. Tio estas Antidio denove. La atakoj revenis. Ni lasu lin pace.

Dum la malfeliĉa ebrulo daŭrigis kriante:

– Ve! ve! iu vipuro... ĝi min ĉirkaŭpremas, sufokas...

Kio do estos al mi? Helpon!

La konfuzantaj estuloj pliigis siajn sarkasmajn aktivecojn; ili infere ridegis. La malfeliĉulo aŭdis la ridegojn resonantajn en fundo de sia memo, kaj ekkriis, provante ataki, kvankam ŝancelirante, la nevideblajn turmentantojn:

– Kiu mokas min? kiu?!

Pugnigante la manojn, li diris plu:

– Malbenataj! estu malbenataj!

La dolora sceno daŭris, kiam Kalderaro venis al mi, kaj klarigis:

– Li estas bedaŭrinda patro de familio, kiu, nekapabla reagi kontraŭ la altiroj de malvirto, sin senreziste donas al la influo de elkarniĝintaj malbonfarantoj, afinantaj kun lia malekvilibrigita pozicio. Plenumante la petojn de la edzino kaj de du amindaj infanoj, kiuj lin sekvas, ni helpas lin per ĉiuj rimedoj laŭ niaj eblecoj; la senzorga frato tamen ne respondas al nia klopodo. Post ĉiu provo li sin prezentas pli kaj pli inklina al perversigo de siaj sentumoj; li super ĉio penas forkuri de si mem; li malŝatas respondecon kaj ne kuraĝiĝas koni la valoron de la laboro. Malfortigante lian nebrideblan deziregon sorbi alkoholaĵoj, ni esperas, ke li reedukiĝu. Por tio ni nun uzu drastan rimedon, ĉar nia malfeliĉulo sin montras kontraŭa al ĉiuj niaj procedoj de helpo.

Fiksante sur mi espriman rigardon, li finis:

– Antidio, dum kelke da tempo, ekde hodiaŭ, estos subtenata de la malsano. Li konos malliberigon sur lito, dum kelkaj monatoj, ke lia korpo ne putriĝu en frenezulejo, kio komenciĝos post nemultaj tagoj, pelante noblan edzinon kaj du infanojn en akran necertecon pri la estonteco.

Dirante tion, Kalderaro komencis komplikan fluigon de emanaĵoj laŭlonge de lia spino.

La malsanulo kvietiĝis iom post iom sur la malnova brakseĝo, sur kiu li sidis.



La Asistanto komencis fluigi lumajn emanaĵojn sur lian koron dum pluraj minutoj. Mi rimarkis, ke tiuj emanaĵoj grade koncentriĝis en la centra organo, kiu en ia momento subite haltis.

Antidio ŝajnis tuj elkarniĝonta, kiam nia instruanto al li redonis energiojn per rapidaj movoj. Pro la cirkulada fenomeno, kiu kaŭzis al li teruran ŝokon, la malfeliĉa amiko komencis peti helpon per laŭtaj krioj. Estis tiel granda doloresprimo en lia plendanta voĉo, ke granda nombro da personoj komplete alproksimiĝis.

Iu kompatema sinjoro prenis lian pulson, rimarkis la malordon de lia koro kaj preteme venigis ambulancan de la publika servo. Post nemultaj minutoj Antidio estis transportita per brankardo en hospitalon por urĝa helpo, sekvate de proksime de pretema spirita bonfaranto.

Forirante en mia kompanio, Kalderaro malgaje diris plu:

– Nia malfeliĉa amiko havos kardineŭrozon dum du-tri monatoj. Li vane uzos valerianon kaj aliajn medikamentajn substancojn, li vane sin helpos per anesteziiloj kaj kontraŭtoksoj. Dum kelkaj semajnoj li konos neesprimeblan malbonstaton por restarigo de la harmonio de lia psika kosmo. Li spertos nedireblan angoron, submetiĝos al kuracadoj kaj dietoj, kiuj malpliigos lian inklinon forgesi la sanktajn devojn de la momento kaj malrapide vekos liajn sentojn por la nobleco de vivo.

Rimarkinte mian surpriziĝon, la Asistanto finis:

– Kion do fari, mia amiko? La samaj Diaj Fontoj donantaj al la homo la karesantan venteton, trudas al li la detruantan uraganon... Unu kaj dua tamen estas nepre necesaj elementoj al la gloro de la vivo.

## KRISTANA ADMONO

Miaj ebloj de studo en kompanio de Kalderaro estis baldaŭ finiĝontaj, kiam, en la antaŭtago de la promesita vizito al la kavernoj de sufero, la estimata Asistanto invitis min aŭdi la parolon de la Instruanto Eŭzebio, kiu en tiu nokto predikos al kelkaj dekoj da kunuloj romkatolikoj kaj protestantoj de la reformaciaj Eklezioj, ankoraŭ troviĝantaj ĉe la servoj en la karna sfero.

– Ili estas fratoj malpli dogmaj kaj pli liberalaj, kiuj dum dormo fariĝas kapablaj ricevi niajn pli rektajn influojn. Pro siaj virtoj ili fariĝas indaj je la programoj de la pli altaj sferoj.

Mi ne kaŝis la surprizon, kiu subite ekposedis min antaŭ tiu informo, sed Kalderaro tuj daŭrigis:

– Estas grave kompreni, ke la Dia Protekto ne konas privilegiojn. La ĉiela graco estas kiel la frukto ĉiam aperanta sur la frondaro de la surtera klopodo: kie estas inda kunlaboro, tie troviĝas la helpo de Dio. Ne la religia konfeso nin fundamente interesas, sed la malkaŝo de vivanta fido, la pozitiva sinteno de la animo sur la vojo al altiĝo. Estas vero, ke la skoloj de kredo varias, ĉiu el ili situas en malsama rondo. Ju pli rudimenta estas la kurso de religia kompreno, des pli granda estas la malsupera diskutado, kiu starigas malfeliĉajn limojn de opinio kaj incitas bedaŭrindajn malpacojn, kvazaŭ Dio estus nenio alia ol diktatoro sin malfacile tenanta sur trono. Ĉar la evangelia Spiritismo estas potenca nukleo de superbela kompreno, estas logike, ke oni ĝin konsideru kiel altan kaj riĉan kristanan lernejon. Posedante tiom da benoj de kono kaj amo, ĝi devas ilin disdoni al ĉiuj kunuloj, eĉ kiam tiuj kunuloj

sin montras ribelaj kaj sendankaj sekve de la nescio, de kiu ili ankoraŭ ne sukcesis apartiĝi. La kompaton de Jesuo povus mezuri la evolustato de tiuj, kiuj sekvas lin de proksime. Antaŭ la enkarcerigita menso en la vanta intelekto de multaj gravaj personoj de lia tempo, ni Lin vidas flamanta de dia energio; kontraŭe, en Jerusalemo, en lia lasta tago, antaŭ la ekzaltita kaj nescia popolaĉo – kvankam enradikiĝinta en la principoj de fido –, ni trovas Lin silenta kaj humila, petanta pardonon al ĉiuj lin vundintaj.

Donante pli karesan voĉtonon al sia parolo, li bonkore aldonis:

– Ni ne forgesu, ke ni super ĉio klopodas ĉe eduka verko. Savi aŭ helpi iun ne signifas senigi inteseraton je okazo de lukto, de altiĝo aŭ de edifado. Ĝi estas frata subteno, ke li vekiĝu kaj stariĝu, reprenante ekvilibron, karakterizaĵon de tiu, kiu lin helpis. La Superega Sinjoro ne plezuras ĉe tio, ke Li posedas mizerajn kaj malfeliĉajn infanojn en la Kreitaĵaro; Li plenmane disdonas benojn kaj donacojn, eternajn riĉaĵojn kaj facilaĵojn, nur atendante, ke ĉiu el ni pretiĝu saĝe regi la propran posedaĵon. Kiel vidate, ĉiuj spiritaj laborsektoroj bezonas la dian helpon.

Antaŭ pliaj klarigoj pri la afero, ni atingis la serenan kampon, kie la nobla sendito estis aŭdata.

Mi tuj rimarkis, ke nun la kunveno ne karakteriziĝas per granda nombro da enkarniĝintaj kolegoj, kiuj tie estis nur nemultaj centoj, subtenataj de konsiderinda kvanto da kunlaborantoj el nia agosfero.

La lunlumo dolĉe kovris la parfumajn arbojn, kiuj sin klinis ĉe la blovo de la milda orientvento.

Impona pro la superbela heleco, kiu aŭreolis lian respektegan figuron, Eŭzebio laŭŝajne antaŭ longe komencis sian predikon. Ekstazantaj, la kunvenintoj aŭdis lian parolon tuŝitan de ĉiela lumo, kun nekaŝebla miro aliĝanta iliajn vizaĝojn. Grandnombre konfuzitaj kaj genuiĝintaj sur la freŝa herbo, ili subite sin sentis transportitaj al la paradizo...

La Instruanto envolvita en safiraj rebriloj, parolis kun nerezistebla altirpovo:

– Se la havaĵo de religia fido estas la nediskutebla faktoro de mensa ekvilibro en la mondo, kion do vi faras el via trezoro, ne ĝin utiligante en tempo, kiam la nefirmeco kaj necerteco

minacas ĉiujn viajn instituciojn de ordo kaj laboro, de kompreno kaj edifo? Ĉu eble ne timigas vin, vekante vian konsciencon, la renoviga movado, kiu refandas principojn kaj naciojn? Ĉu vi opinias, ke estas ebla ia epoko de ekstera paco sen la interna preparo de la homo por observi kaj apliki la Diajn Leĝojn? Pro akcepto de tia eraro la maŝino, frukto de via inteligento, nuligas vian eblecon pli alten iri en la regno de la Eterna Spirito.

“Iam, esti kristano simbolis elekton de la pli nobla sperto kun devo doni ekzemplon de la kondutomodelo konsekrita de la Dia Majstro. Ĝi estis seninterrompa kontraŭbatalo al malbono, per la armiloj de bono, aktiva manifesto de amo kontraŭ malbono, garantio de venko de la lumo kontraŭ mallumo, nekonstestebla triumfo de la konstruanta paco super la ruiniga malpaco.

Antaŭ la moloko Roma Ŝtato aliĝinta en imperialismon kaj koruptaĵon, la sekvantoj de Evangelio ne elmetis sin al vundantaj polemikoj, ne embarasiĝis en la retoj de la apartiganta egocentrismo, ne detruis altvalorajn eblaĵojn, starigante dogmajn limojn... Ili reciproke amis sin en nomo de la Sinjoro kaj oferis sian propran vivon pro danko al Tiu, kiu ne hezitis iri al la kurco pro amo al ni ĉiuj. Ili starigis siajn plej respektindajn sanktejojn en komuneco de sanktigaj principoj, kiuj ilin identigis kun la Savanto de la Mondo. Ili povis perdi pasemajn profitojn por akiri la **nepereemajn ĉielajn trezorojn**. Ili sin oferis unuj al aliaj per viva elmonro de frata sindonemo. Ili dividis la suferojn kaj multobligis la ĝojegojn inter si. Ili mortis ĉe doloraj atestoj por atingi la eternan vivon. Ili militis kontraŭ la malekvilibro de sia epoko kaj de siaj samtempuloj ne per batoj de malbeno, nek per lameno de glavo, sed per praktiko de rezisto, submetante sin al serveraj disciplinoj kaj montrante per paroloj, per pensoj kaj per agoj la subliman mesaĝon de la Majstro, kiu renovigis iliajn korojn.

Sed vi, kiuj estas heredantoj de tiuj sennomaj herooj, kiuj iris inter la afliktoj, kun spirito edifita de la promesoj de la Kristo, kion vi faris el la transforma espero, el la senhezita konfido? kien vi metis la vivantan fidon, kiun viaj patriarkoj akiris koste de sango kaj larmoj? kie estas la frateco, kiu signis la lernantojn de la Bona-Novaĵo? Riĉigite per favoroj el la Ĉielo, vi iom post iom ŝanĝis la pordojn de Dia Revelacio por la homaj komfortaĵoj.

Vi konstruis inter vi mem malfacile transsalteblajn barojn.

Dogmaro venenas vin, secesio koruptas vin. Ne ĝustaj interpretoj pri la dia mondo malheligas viajn mensajn horizontojn.

Vi starigas malkaŝan malamikecon en nomo de la Regno de Dio, kiu signifas universan amon kaj eternan unuiĝon.

Vi malpurigas la fonton de benoj, malbenante unuj aliajn, alvokante por tio la Princon de Paco, kiu, por nin helpi, ne hezitis antaŭ la abomeninda morto.

Al kia deliro vi venis, konkurante unuj kontraŭ aliaj por la imaga akiro de diaj privilegioj!

Iam la kunuloj de la Kristo pridisputis okazon servi; sed vi nune serĉas la minimumajn okazojn esti servataj.

Vi altigas ĉe la Sinjoro la Lumon de la Jarcentoj, kaj vi vin tenas en la mallumo de la abomeninda egoismo.

Vi atribuas al Li la gloron de paco, kaj tamen vi stimulas la fratmurdan militon, ĉe kiu homoj kaj institucioj sin reciproke masakras.

Vi turnas vin al la Dia Majstro, konsiderante lian senfinan bonecon, kiel la neelĉerpeblan fonton de amo; sed vi kulturis la malpacon en la interno de via memo.

Pro kiaj strangaj konvinkoj vi pensas konkeri la paradizon per voĉaj asertoj?

Ĉu vi forgesis, ke la Vorto, dia sur siaj fundamentoj, estas ĉiam kreanta? kiel konsenti, ke la savo okazas koste de simplaj vortoj, al kiuj tute ne respondas viaj sintenoj?

Sed ni nepre rekonas la superbelan karakteron de via tasko en la mondo.

Jesuo fondis la religion de Universa Amo, kiun la sacerdotoj dividis en plurajn skolojn gvidatajn de la nepravigebla sektismo. Malgraŭ tiu bedaŭrinda eraro de la homoj la esenco de viaj principoj estas tiu sama, kiu subtenis la kuraĝon kaj la noblecon de la laborantoj, sin oferintaj en la unuaj tagoj de Kristanismo.

Ĉar kelke da misiistoj de la religiaj veraĵoj forgesis la Dian Patrecon kaj permesis al si misuzojn de aŭtoritato, preferante subpremon kaj tiranecon, vi nun ne estas malpli respondajn pri la sanktaj deponoj, kiujn Jesuo al ni konfidis, destinitaj al la servoj de homa altigo kaj de sanktigo de la Tero.

La Evangelio sur siaj bazoj konservas la belecon de sia unua tago. Nenia sofismo sukcesis kovri la brilon de “kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu unu alian”...<sup>(\*)</sup>

Antaŭ la stimuloj de la Ĉielo, ĉu vi eble kredas servi Dion, enkarcerigante la servojn de fido en la luksajn templojn? La pompo de la ekstera kulto nur elstarigas la malesperon de danĝeraj iluzioj pri la spirita vivo.

La dia misio de la Majstro estus senfrukta, se la Bona-Novaĵo restus limigitaj al la sektaj tranĉeoj, kie vi vanteme rifuĝas, celante flamigi la abomenindan ŝtiparon de malamikaĵoj hipokrite afablaj.

Ĉu vi ne trovis alian manieron elmontri vian fidon ekster la malpli digna konkurenco?

Vi vane starigas kastelojn de opinio por parolismo sen verkoj, ĉar, se morto surprizas la ribelan materialiston, vidigante la realecon de la vivo, la tomo ankaŭ malfermas la tribunalon de la rekta justeco al ĉiuj utiligintaj la religon por pli bone maski la indiferenteco, kiu loĝas en ilia interna mondo.

Ne opiniu, ke la fido estas konsekrita al la malpli granda klopodo.

Kiel okazas al la scienco, tiel la religio plenumas specifan laboron en la mondo. Forto ekvilibriganta la penson, ĝiaj servantoj estas vokitaj kunlabori por la harmonio de la homa menso.

Ĉe la pozitiva fidadado estas la forto reguliganta la pasiojn, la nerezisteblajn impulsojn de besteco, el kiu ni venas, la evoluan proceson prezidantan en nia ekzistado.

Tial Jesuo ne konfidis siajn instruojn al malgranda rondo en ŝtonaj temploj. Li vere respektis la monumentojn, kiuj rememorigis la “sanktajn preĝlokojn” konsekritajn al la superaj manifestoj de la spirito; sed li ne kristaliĝis ĉe adoraj sintenoj: Li vivis, konkerante amikojn por la Regno de la Ĉielo.

Li ne altrudis al siaj sekvantoj severajn regulojn de agado: Li petis de ili amon kaj komprenon, sinceran fidon kaj bonhumoron por la edifaj laboroj.

Alproksimiĝinte al Magdalena, Li ne tenis sin en frivola konversacio: Li interesis ŝin je la subluma renoviga apostoleco.

---

<sup>(\*)</sup> Johano, 13:34. – **La Trad.**

Vizitinte Zakĥeon, Li benis lian noblan kaj konstruan klopodon. Direktinte sin al virino el Samario, Li ne okupiĝis pri senutilaj disputoj: Li impresas ŝin pro la kontakto de sia dia animo, farante ŝin forlasi la malnovan kruĉon de fantazio por la eternaj fontoj. Kunvivinte kun blinduloj kaj lepruloj, frenezuloj kaj malsanuloj el ĉiuj specoj, Li tenis sian socialan vivon bazita sur la plej pura frateco kaj plej altaj stimuloj al sanktigo. Fine la du lastaj amikoj, de Li murditaj sur kruco, estis deklaritaj ŝtelistoj, al kiuj Li ne rifuzis sian fratan parolon flamantan de amo.

Kiel oni elvoku lian nomon por pravigi la frenezaĵojn de apartigo kaŭze de fido? kiel oni apogu sin al la Amiko de ĉiuj por estigi interkontraŭajn opiniojn, ekbruligante ŝtiparojn de malamo malprofite por la komuna solidareco, pri kiu li donis ekzemplon ĝis sia superega sinofero? Ĉu ne estus nigrigi lian memoron, dissemi malpacon en lia nomo?

Mi rimarkis, ke la paroloj de la instruanto kaŭzis profundan impreson. La plimulto de la aŭdantoj ploris de nebridebla emocio, tuŝite de la Ĉiela Juĝo.

Eŭzebio, altiranta la ĝeneralan atenton, kuraĝe daŭrigis:

“Oni ne postulas, ke vi transformigu la spiritan deponaĵon de via respektinda kredo. Sur ĉiuj sektoroj, kie la semado de la Kristo burĝonas, estas eble honori la Dian Leĝon kaj asimili ĝiajn sublimajn paragrafojn en la koron. Kion oni petas de via kredemo, tio estas la profito de la ĉielaj benoj verŝitaj sur vin per abundaj fluoj de lumo.

Ne limigu vin al elmontrado de konfido al la Plejalta, ĉe la ceremonioj de la ekstera kulto. Forbalau la indiferentecon glaciigantan viajn luksajn bazilikojn. Ni ŝanĝu nin en efektivajn fratojn unuj de aliaj. Ni aliigu preĝejon en dolĉan hejmon de la kristana familio, kiaj ajn estas niaj interpretoj. Ni forgesu la falsan aserton, ke la apostolaj tempoj forpasis por ĉiam. Ĉiu lernanto de la Evangelio konservas en sia propra vivo enfermejon destinitan al la viva kulto por la Dia Majstro, vivo, preter kiu fluas amaso da senhavuloj ĉiutage...

Amante kaj helpante, kredante kaj agente, Jesuo subtenis la malekvilibrigitan menson de la grekromana mondo, inspirante al ĝi novan vivon, favore por ia Homaro pli feliĉa. Tiel same ĉiu disĉiplo de la savanta fido povas kaj devas kunlabori por la restarigo de siaj malfortaj kaj hezitantaj fratoj.

Evitu la fariseismon de la modernaj tempoj, kiu rifuzas fratan helpon, en nomo de la satana genio de la dogma skismo. Jesuo neniam estis predikanto de malpaco, Li neniam defendis la malmodestan vantemon de tiuj, kiuj per la lipoj deklaras sin puraj, tenante la koron metitan en la haladza ŝlimo de la fatalaj fiero kaj egoismo!

Ni intensigu nian konfidon al la Ĉiokompatema, etendante lian benatan regnon de savo.

Atendi la Ĉielon, malŝatante la Teron, estas malprudentaĵo.

Neniu el ni subaĉetos la Dian Justecon, kvankam vi multfoje kultivos plu la ideon pri ridinta komerco kun Dio.

Se terkulturisto neniam staras sen rektaj devoj antaŭ sovaĝa verdaĵo aŭ danĝera ŝlimejo, kiel do ni restu sen tujaj devoj sur la scenejoj de krimo kaj mallumo, de maltrankvilo kaj sufero?...

Falinta frato estas nia altpreza ŝarĝo, malfacilaĵo estas nia sankta stimulo, doloro – nia puriganta lernejo.

Ni brakumu unu alian en nomo de la Dia Ŝafido, kiu renovigis nian menson, altigante nin al superaj planoj en la glora supreniro, per sinofero.

Nur tiel, miaj amikoj, estas eble plenumi la destinon, kiu nin koncernas.

Antaŭ la endanĝera mondo, halucinita de malaltaj ambicioj kaj regata de malamo kaj mizero, sekvoj de senĉesaj kaj detruantaj militoj, ni harmoniu kun Jesuo Kristo, ke ni ekvilibrigu la karnan sferon.

Konfuzantaj ombroj vagas ĉirkaŭ viaj paŝoj kaj viaj institucioj, kiel pereiga rondo.

Evitu la renverson de spiritaj valoroj, fortimigu la ombrojn, kiuj minacas viajn politika-religiajn organizojn. Evitu la fanfaronantan sciencon sen saĝeco, liberigu vin de rezonado kalkulanta sen amo, revigligu vian fidon, ke viaj impulsoj ne malordiĝu manke de edifo.

La Terkrusto nun estas kampo de pli kruda, pli dolora batalo...

Veku vian dormantan konsciencon kaj klinu vin al la Dia Leĝo, forgesante la multejarcentan iluzian sklavecon.

Savo estas kontinua laboro por renoviĝo kaj pliboniĝo.

Ni anoncu al la turmentata mondo nian fidon je Jesuo, por ĉiam!...”



Finante, Eŭzebio estis aŭreolita per mirindega lumo.

La ravita ĉeestantaro montris palajn vizaĝojn pro granda miro.

Grandega grupo da kunlaborantoj el nia mondo altigis sian voĉon por harmonioj, farante emocian kanton de gloro al la Superega Sinjoro.

La melodiaj notoj de la himno perdiĝis fore, en la malproksima arbaro, forportataj de milda zefiro...

Post la laboroj de la kunveno mi rimarkis, ke la enkarniĝintaj amikoj subtenataj de kolegoj de niaj helpaj aktivecoj foriĝis ne animitaj kaj optimismaj, ĉar, multaj el ili, komprenante eble pli klare, ekster la densa portilo de la fizika spertado, la erarojn de la devojiĝinta kredo, foriris malĝojaj, singultante...

## XVI

### MENSMALSANULOJ

Antaŭ ol ni vizitis la kavernojn de sufero, Kalderaro insistis ĉe mi, ke mi kune kun li rapide vizitu grandan institucion konsekritan al akcepto de mensmalsanuloj sur la Terkrusto.

– Tiam vi komprenos pli ĝuste – li ĝentile klarigis, sin turnante al mi kun sia ordinara afableco – la tragedion de la elkarniĝintaj homoj kun sensacoj tute malekvilibritaj. Esceptinte la tute organajn kazojn, frenezulo estas iu, kiu provis perforte liberiĝi de la surtera lernado per maldisciplino kaj nescio. Sur tiu kampo ni vidas ian specon de memmortiginto lerte maskita, la memneniigon de la mensa harmonio pro nekonformiĝo de la animo al la kadroj de lukto, kiujn prezentas la homa ekzistado. Antaŭ la doloro, malhelpaĵo aŭ morto, miloj da personoj kapitulacas, sin senhezite donantaj al la detrua konfuziteco, kiu al ili malfermas la tombopordojn. Ili komence estas nur malkontentaj kaj malesperaj, eĉ ne rimarkataj de tiuj ilin de proksime akompanantaj. Ili tamen iom post iom transformiĝas en mensmalsanulojn kun variaj gradiĝoj de resanigo preskaŭ nebla, pro tio, ke ili ja estas portantoj de konfuzaj kaj malplaĉaj problemoj. Nevideblaj fruktoj de malobeo, ili ekruinigas la fiziologian korpon al ili konfiditajn sur la Terkrusto kaj fine fariĝas malriĉiĝintaj kaj malfeliĉaj. Afliktitaj kaj duonmortaj, ili estas viroj kaj virinoj suferantaj ekde la surteraj rondoj, enkavigitaj en inferaj abismoj, ĉar ili ribelis kontraŭ la diaj planoj, ne atentante ilin en la bonfara lernejo de savanta lukto, pro malprudentaj kapricoj.

Karese konservante lian instruon, mi lin akompanis en la matena ekskurso al granda malsanulejo, kie la frenezuloj grandnombre troviĝis.

Sur la unua korto, kien ni venis, troviĝis densa amaso da malekvilibritaj virinoj konversaciantaj.

Iu blankhara virino, montranta akran sovaĝecon en sia rigardo, portis uniformon de la domo, kvazaŭ ŝi trenus reĝinan veston, kaj ŝi diris al du apatiaj kunulinoj:

– Kiel markizino, mi ne toleras enmiksiĝon de senkonsciaj kuracistoj. Mi pensas, ke mi estas malliberigita pro kaŝitaj motivoj de familio, kiujn mi penas malkaŝi en la unua okazo. Mi havas potencajn malamikojn en la kortego; sed miaj amikoj estas pli prestiĝaj kaj fidelaj.

Ŝi mallaŭtigis la voĉon, kvazaŭ timante kaŝitajn spionojn, kaj parolis en la orelon de iu el siaj kunulinoj de sufero:

– La Imperiestro interesigas pri mia afero kaj punos la kulpajn. Oni izolis min pro abomeninda mona afero.

Laŭtigante la voĉon, ŝi neatendite ekkriis:

– Ĉiuj pagos! Ĉiuj pagos!

Kaj ŝi klarigis plu kun gestoj de altranga sinjorino.

Kortuŝis min rimarki la miksecon de la enkarneigintaj malsanulinoj kaj malfeliĉaj estuloj, tie kunpuŝantaj unu alian. Katenite ankoraŭ al mia malnova riproĉinda scivolemo, mi provis halti por aŭdi la malsanulinon ĝis la fino, sed la Asistanto rapidis averti min:

– Ni ne haltu. Malfeliĉe ni trapasas longan galerion de elaĉeta sufero, kie niaj helpaj rimedoj ne donas tujajn profitojn. Ĉi tie preskaŭ ĉiuj mensmalsanuloj estas homoj, rezignintaj la realecon, altenante sin al cirkonstancoj el pasinteco sen plua pravo de ekzisto. Ĉi tiu malfeliĉa fratino jam posedis nobelecajn titolojn en antaŭa ekzistado; ŝi faris kiantajn erarojn pliigante la blindigajn energiojn de fiero kaj vantamo. Renaskiĝinte en humila lernado por la nepre necesa reĝustigo, ŝi maltrankviliĝis antaŭ la unuaj pli krudaj provoj de bonfara korekto, ŝi reagis kontraŭ la rezultato de sia propra semado, transdonis sian fizikan korpon al la fluo de pereigaj okazaĵoj, kaj fine sin mense lokis en plej malaltaj zonoj de sia persono kaj en penso komencis loĝi en sia pasinteco de altiraj mensogoj. Ŝi senespere alkroĉiĝis al siaj rememoroj pri la vantema markizino en salonoj, kiuj jam malaperis, kaj ŝi vagadas en la valoj de frezo en bedaŭrindaj kondiĉoj.

Ni faris ne multe da paŝoj kaj ni trovis alian amason, ĉe kiu vidiĝis kurioza sinjorino ekstreme nerva.

– Dio liberigu min de ĉiuj, Dio liberigu min de ĉiuj! – ŝi malkviete kriis. – Mi ne revenos! neniam, neniam!...

Pacienca, la flegistino alproksimiĝas kaj petas:

– Sinjorino, estu pli flegma! Tio estas via edzo, kiu venas por vizito. Ni iru al la vestoŝranko.

Kaj ridtante:

– Ĉu vi ne sentas vin feliĉa?

– Neniam! – ekkriis la frenezulino kun miriga mieno de doloro. – Mi ne volas vidi lin! mi lin malamas, mi malamas lin kun ĉio al li apartenanta!

Redirante esprimojn de malŝato, ŝi rigidiĝis kaj falis en bedaŭrindan krizon de nervoj, motivo, kial la helpistino ĉe flegado petis urĝan helpon.

Mi deziris halti por esplori la situacion, sed la Asistanto ne tion permesis al mi, klarigante:

– Ne perdu tempon. Vi ne evitigos al ŝi la malbonon. Nia preterpaso ĉi tie estas rapida. Mi nur rekomendas al vi observi la rifuĝejon de ĉiuj forgesantaj la nunajn taskojn, dezirantaj eviti la devojn de la edukanta realo.

Li modifis sian voĉtonon kaj diris plu:

– Ni ne certigas, ke ĉiuj kazoj en malsanulejo ekskluzive rilatas al tiu faktoro. Multaj homoj trairas tiun timigan tunelon, pelite de postuloj de la korektanta provo; sed estas nepre necese rekoni, ke la plimulto komencis la afliktantan dramon en si mem. Ili estas niaj fratoj ribelantaj kontraŭ la superaj planoj, kiuj ilin kondukis relerni malfacilajn instruojn, tiajn, kia tiu pri realproksimiĝo de malnovaj malamikoj per la samsangaj ligiloj aŭ pri alfronto de ŝajne netransasalteblaj baroj.

“Ke okazu la evolua vojirado de la spirito, estas nepre necese deloki la menson, revolvi la ideojn, renovigi konceptojn kaj nevarie modifi por la pli granda bono la internan manieron de ekzisto tiel, kiel ni faras al la grundo por reviviglo de la produkta kultivejo aŭ al ĉia homa institucio por ĉies progreso. Sed se la animo rifuzas ricevi la dian helpon per la procesoj de senĉesa transformo al si donitaj, por sia propra bono, per la diversaj situacioj, el kiuj konsistas la tagoj en la karna lernado, ĝi restos sur la vojflanko, kreante maltrankviligajn bildojn kun nepravigeblaj deziroj.

Ni preskaŭ povas aserti, ke naŭdek el cento da frenezuloj, esceptinte tiujn, kiuj originas el mikroba enpenetro en la grizan

materion, komenciĝas ĉe la rezultatoj de la gravaj eraroj, kiujn ni praktikas per senpacienca aŭ per malĝojo, t.e. per la mensaj sintenoj, kiuj altrudas plorindajn devojiĝojn al tiuj, ilin akceptantaj kaj nutrantaj. Kiam tiuj malekvilibrigaj fortoj instaligatas sur la interna kampo, tiam komenciĝas la malkomponiĝo de la mensa harmonio; ĉi tiu iafoje daŭras ne nur dum ekzistado, sed dum pluraj el ili, ĝis interesato fidele pretiĝu uzi la diajn benojn, kiuj lin kovras kvazaŭ per roso, por restarigi liajn trankvilecon kaj kapablon de renoviĝo, kiuj estas propraj al individuo en benata kaj evolua laboro. pro ribeleco, la responda animo povas sin direkti al multaj krimoj, al kies fatalaj rezultatoj ĝi senfine ligiĝas; kaj pro malkuraĝo ĝi inkliniĝas ekfali en la krutejojn de inercio, kun fatala malfruiĝo de la edifoj, kiuj koncernas ĝin realigi.”

Post tiuj klarigoj, ni penetris en ampleksan verandon de la vira pavilono kaj ni tuj renkontis viron, kiu sin klasis inter la absolutaj skizofreniuloj. Kelkaj estuloj je nigra aspekto ĉirkaŭis lin. La malsanulo similis efektivan aŭtomaton sub fera ganto de tiuj kunuloj. Li faris maŝinecajn gestojn kaj al la zorge alproksimiĝanta gardisto, li klarigis per serioza voĉtono:

– Bonvolu veni, sinjoro Johano. Ne timu. Mi hieraŭ estis “leono”, sed ĉu vi hodiaŭ scias, kiu do mi estas?

Antaŭ la flegisto hezitanta, li finis:

– Hodiaŭ mi estas “bananarbo”.

Mi sen ia dubo trovas en tiu kazo bonegan okazon riĉigi spertojn, ĉar mi tuj rekonis kompletan ligitecon inter la viktimo kaj la obsedantoj al ĝi nevideblaj. La malfeliĉulo estis marioneto en la manoj tute malicaj.

Kalderaro ne permesis al mi interrompi la marŝon.

– La malekvilibra proceso kompletiĝis – li informis min –, kaj vi ne trovos eblecon refari per rapida laboro liajn mensajn energiojn centritajn en lia malsupera regiono. La malfeliĉulo de longe fariĝas paciento de hipnotizaj agoj fare de kruelaj persekutantoj; li estas elmetita al la elsendoj de kontinuaj fortoj, kiuj lin premas kaj frenezigas.

– Ho ĉielo! – mi ekkriis konsternite – kiel do mi lin helpu?

– Tio estas viro – diris plu la instruanto –, kiu en antaŭaj enkarniĝoj misuzis sian personan magnetismon.

Mi ne povis ne eldiri demandon, kiu spontanee naskiĝis:

– Kiel do? la magnetismaj sciuj estas novaj...

Kalderaro, vidigante en la rigardo sian karakterizan cedemon, demandis:

– Ĉu vi kredas, ke ili komenciĝis de Mesmer?

Kaj ridetande, li daŭrigis:

– Se ni konsideros la tekston, laŭ ĝia litera senco, la misuzo de magnetismo eble komenciĝis de Eva en la paradizo...

Li montris al la malsanulo kaj diris plu:

– En tre fora pasinteco nia neantaŭzorga amiko trouzis sian allogan potencialon, turnante ĝin al malpli indaj aventuroj. Pluraj virinoj, kiuj suferis lian detruan agon, pafis kontraŭ lin senĉesajn eksplodojn de malsaniga kaj korupta malamo, korelverŝojn, kiujn la kompatinda amiko meritis pro la kondamninda aktiveco, al kiu li sin donis dum multaj jaroj. Malfortiĝinte de konstanta reago, lia kapitalo da forto malpliĝis; tial li fariĝis ludilo de detruaj fortoj, al kiuj ĝustadire li aliiĝis, kiam li entuziasme adoptis la deklaritan praktikon de malbono. Ne estas eble antaŭvidi ĝis kiam li restos en tia konduto. Ĝenerale, kiam ni krimas, ni povas difini la ĝustan momenton de nia eniro en la malharmonion; sed ni tute ne scias, kiam venos la tempo ĝin forlasi. Dum nia reveno al la rekta vojo, sur kotejoj, ĉe kiuj ni malpurigās pro indiferenteco aŭ malbona fido, ni ne povas antaŭdifini datojn por la reveno: ni implikiĝas en cirkonstancaj aferoj, de kiuj ni liberiĝas nur post dolora reĝustiĝo...

Rimarkante mian miron antaŭ la hipnotisma laboro, kiun la malvarmaj turmentantoj realigis, la Asistanto diris:

– Ne timu! La fizika morto subite ne modifas la inteligentojn, kiuj sin donis al malbono, kaj la duelo de la lumo kontraŭ la mallumo ne limiĝas al la mallarĝaj karnaj rondoj.

Tuj poste ni surpriziĝis antaŭ du stultiĝintaj grandaĝuloj eldirantaj senrilatajn frazojn.

– La tempo – klarigis la instruanto, montrante al ili – iam fine denuncas nian efektivan konduton. Kiam homo ne praktikis en sia ekzistado konstruan servadon, kiu nin koncernas sur la Tero, la senilaj fenomenoj de la korpo estas pli malĝojigaj al animo, ĉar en ĉi tiu okazo, la individuo jam ne regas la konvenaĵojn forĝitajn de la homa rekte-alcelismo, kaj evidentiĝas lia mensofiksado al la malsuperaj impulsoj.

Milionoj da fratoj restas sinsekvajn jarcentojn en la infana fazo de kompreno, pro tio, ke ili ne kuraĝas klopodi por sia pliboniĝo. Dum ili tenas la kunlaboron de la fizika sano, de la surteraj konvencioj, de la financaj ebloj kaj de la variaj pasemaj impresoj, kiuj la ekzistado sur la Terkrusto donas al tiuj, kiuj sin vestas per karno, ili apogas sin al la titoloj de civitanoj, kiujn la socio aljuĝas al ili; tuj kiam ilin vizitas morbo, manko de rimedoj aŭ maljuneco, tiam ili montras la spiritan infanecon, en kiu ili kuŝas: ili ree fariĝas infanoj, malgraŭ ilia grandaĝo manifestita de la osta portilo, ĉar tro longe ili restis sur la supraĵaj regionoj de la vivo.

Lia klarigado ne povis esti pli logika; sed ekzamenante tiun vastan frenezulejon, kie tiom multe da malsanuloj el ambaŭ seksoj stagnis distancaj de la realeco de la mondo, sen ia perspektivo de baldaŭa elkarniĝo, mi pensis pri la homoj, kiuj jam renaskiĝas neperfektaj kaj menskonfuzitaj; pri la malprogresintaj infanoj kaj pri la malgrandaĝuloj luktantaj kontraŭ la juna demenco; pri la sennombraj fobioj, afliktantaj respektindajn kaj komplezemajn personojn, mi tiam petis de la instruanto klarigojn pri la scenoj de tia speco sufero, kiu ne atendite atakas la plej distingigajn familiajn instituciojn.

La Asistanto ne surpriziĝis kaj informis:

– Ĉi tie, Andreo, ni studas la rikolton pri la semadoj tiel en la nuno, kiel en la pasinteco. Ni taksas ne nur la lernadon en unu pasema ekzistado, sed ankaŭ la pilgrimon de la animo sur la senfinaj vojoj de la vivo, de la nepereema vivo, kiu ĉiam antaŭeniras, venkante altrudojn kaj devigojn de la formo, sin purigante kaj sanktigante ĉiutage. Vi vidos kun ni afliktan scenon de spiritaj suferoj, kaj eble vi lernos en homa frenezulejo pri la malekvilibroj perturbantaj la menson devojiĝintan de la Universaj Leĝoj. Vere, de alieneco komenciĝas “la anima malsupreniro al la malsuperaj regionoj de la morto”. En frenezulejo estas eble kompreni iamaniere la mensmalsanon de la viroj kaj virinoj, kiuj, ŝajne ekvilibrigitaj sur la socia kampo de la Terkrusto, kie ili interŝanĝas la eternajn diajn valorojn por tujaj iluziaj kontentigoj, estas pelitaj post la tombo en abomenindan malesperon de la sento. Rilate la perturbojn, kiuj akompanas la animon dum renaskiĝo aŭ infaneco de korpo, dum juneco aŭ senileco, estas necese rekoni, ke la malekvilibro komenciĝas de malobeo al la Leĝo, same kiel elaĉeto komenciĝas

ĉe la krimo. Adoptinte konduton malakorde kun la realo, la spirito nevarie, en ĉiuj rondoĵoj, kie li vidos sin, renkontas la efikojn de sia propra ago. Ĉu en la meĥanismo de la fiziologia heredeco, ĉu ekster ĝia influo, la menso enkarniĝinta aŭ elkarniĝinta sin montras per la rikolto de tio, kion ĝis semis sur la evolua kampo de la komuna klopodo, sur la monto de altiĝo per praktiko de la maksimuma bono, aŭ en la elaĉeta valo per la praktiko de malbono.

Pretiĝante foriri, la Asistanto longe rigardis min kaj finis:

– Se oni konsideras ne nur la estantecon, sed ankaŭ la foran pasintecon, ĝenerale frenezulo estas iu, kiun tedis la benoj de la homa sperto, kaj kiu preferis izoli sin en siaj mensaj kapriĉoj; kaj la spirita estulo turmentata post la morto ĉiam estas iu, kiu memvole evitis la realaĵojn de la Vivo kaj de la Universo, kaj kreis purgatoriajn regionojn por si mem. Ĉu vi komprenis?

Mi danke fiksitis la intruanton.

Jes, mi komprenis. Kaj, konsiderante la matenan lecionon, mi sekvis la instruanton, kiu silente foriris de la observokampo por poste iri renkonte al la bonfarantoj, kiuj vizitos la kavernojn por tasko de amo kaj paco.



## XVII

### ĈE LA SOJLO DE LA KAVERNOJ

Nun, kiam ni estis kuniĝintaj, Kalderaro kaj mi, kun la helpa laborkomisiono, kiu servos en la kavernoj de sufero, mi surpriziĝis ĉe la demando de Fratino Cipriana, kiu estris tiaspecajn aktivecojn.

La grupo konsistis el malgranda nombro da kunuloj: ne pli ol sep.

Vidante min apud la Asistanto, Cipriana senafekte demandis min post la kutimaj salutoj:

– Ĉu frato Andreo deziras iri en nia akompano?

La abnegacia amiko respondis, ke la Instruanto Eŭzebio mem opiniis pri la konveneco de mia vizito al la purgatoriaj abismoj; li klarigis, ke mi interesiĝas kolekti informojn pri la vivo en la malsuperaj sferoj por rakonti ilin al niaj enkarniĝintaj kunuloj, helpante ilin ĉe la necesa preparado por la scienco bone vivi.

La direktorino ĝentile aŭdis kaj parolis:

– Jes, la sugesto de Eŭzebio estas altvalora, kiam temas pri komencaj observoj en la Malsupra Ombrejo. Sed, car mi rekte respondas pri la servoj de la ekspedicio, mi ankoraŭ ne povas lin akcepti en ĉiujn apartaĵojn.

Ŝi fiksas sur mi sian luman kaj mildan rigardon, kvazaŭ bedaŭrante la neeblecon kaj diris plu:

– Nia estimata Andreo ne posedas la kurson de helpo al suferantoj en la densa mallumo.

Ŝi min karesetis per sia dekstra mano kaj parolis:

– Se al ni estas necese ekhavi malfacilajn preparajn realigojn, ke ni rikoltu la profiton de la Grandaj Lumoj, nepre

necese estas al ni la inicado, ke ni distribuu tiun saman profiton al la “grandaj mallumoj”.

Antaŭ mia nekaŝebla desapontiĝo, la respektinda bonfarantino daŭrigis:

– Ni tamen konsentu, ke nia frato ne troviĝas ĉe ni, sen substancaj solvotaj problemoj. Ĉiu situacio, al kiu ni estas kondukataj, enhavas kaŝitajn instruojn por nia bono. La superaj planoj neniam proponas al ni aferojn, kiujn ni ne bezonas, sur la areno de la cirkonstancoj. Se Eŭzebio sugestis ĉi tiun oportunaĵon, estas tial, ĉar Andreo Ludoviko devas fari sur ĉi tiuj lokoj urĝan laboron. Sed, konsiderante miajn respondec-ojn, mi ne povas ordoni, ke li sekvu nin al ĉiuj promenadoj; mi tamen invitas Fraton Kalderaro resti en kompanio de la komplezema lernanto ĉe la sojlo de la kavernoj, ne malsuprenirante kun ni; eĉ tie, ĉar li estas lernema, li trovos neelĉerp-eblan materialon por observo, ne bezonante meti sin en embarasajn situaciojn, por kiuj li ne sufiĉe prepariĝis...

Antaŭ la prezentita solvo, ĝenerala ĝojo ree nin konsolis. Mi kontente dankis. Kalderaro ankaŭ manifestiĝis danka. Kaj meze en la gajeco de la laborantoj, kiuj ĝojas ĉe la okazo senĉese lerni por la bono, ni ekiris direkte al la timege malluma regiono.

Ha! mi jam vidis terurajn profundegaĵojn, kie kulpaj estuloj alparolis unuj la aliajn en bedaŭrindajn sintenoj; mi vidis pluvon da flamantaj fajreroj, falantan sur la valojn de ribelo; mi trovis sennombrajn estulojn poseditajn de strangajn haluciniojn en rebonigaj ĉambroj; sed tie...

Ĉu ni estus atingantaj la “malluman arbaron”, kiun aludis Alighieri en sia senmorta poemo?

Ŝiris mian koron la lamentaj disaj voĉoj flugantaj al la fuma ĉielo! Ne, ne estis nur lamentoj; proporcie kiel ni antaŭeniris, malsuprenirante, la krio aliĝis; ni ankaŭ aŭdis ridegojn, malbenojn.

Ni haltis sur grandega ŝlimeca ebenaĵo, kie nombraj grupoj da elkarniĝintaj homoj sin sekvis ĝis nevidebleco, en mirega malordo, simile al miloj da frenezuloj, apartigitaj unuj de aliaj multope, laŭ la speco de malekvilibro, propra al ili.

Ne estis al mi eble taksi la amplekson de la grandega ebenaĵo, kaj, eĉ se estus topografiaj markoj por tiu takso, la nebulo estis tro densa, ke oni povus mezuri la distancojn.

Ni iris kelke da kilometroj sur horizontala plano, kaj, kiam la tereno denove kliniĝis, malfermante aliajn abismajn perspektivojn, Fratino Cipriana kaj ŝiaj kolegoj plezure adiaŭis nin, postlasante nin – la Asistanton kaj min –, kun sciigo, ke ili revenos al ni post ses horoj.

Brakumante min, la direktorino ĝentile diris:

– Mi deziras al vi, mia amiko, feliĉan sukceson ĉe viaj studoj. Certe, revenonte, ni ricevos viajn konsolajn impresojn.

Mi ĝojege ridetis pri tiel granda montrado de estimo.

Tuj poste Kalderaro kaj mi troviĝis solaj sur la malluma vastaĵo loĝata de strangaj estuloj.

La konversacioj ĉirkaŭ ni estis sennombraj kaj kompleksaj.

Tiu elkarniĝinta popolo laŭŝajne ne konsciis pri sia propra situacio, laŭ tio, kion komence estis al mi eble juĝi.

Dum densaj torturataj animamasoj baraktis en viskeca substanco sur la grundo, kie ni iris, grupoj da frenezaj Spiritoj svarmis ne malproksime, ĉe senfinaj disputoj pri bagatelaj aferoj.

La pejzaĝo estis tute impresa pro la inferaj karakterizaĵoj, nin ĉirkaŭantaj. Rimarkinte la indiferentecon de multaj el tiuj malfeliĉaj fratoj, mi ne evitis la pensojn, kiuj venis al mi.

La grupoj da malfeliĉuloj tie agadis, ne konante la suferojn unuj de aliaj. Iaj grupoj flugis je malgranda alteco, kvazaŭ bandoj da nigraj korvoj, pli nigraj ol la ombro mem, nin envolvanta, dum aregoj da malfeliĉuloj kuŝis katenitaj, ligitaj al la tero, kvazaŭ malfeliĉaj birdoj kun rompitaj flugiloj... Kiel ni klarigu ĉion tion?

Mi komencis mian demandadon, turnante min al la instruanto.

– Ĉu tiuj mizeraj kondamnitaj nin vidas?

– Jes, kelkaj el ili ne atribuas al ni pli grandan gravecon: ili estas tre okupitaj pri si mem; ili gardas en sia koro malsuperajn sentojn, kaj malfruos ilin liberigi.

– Sed ĉu tiu animamaso restas forlasita, doninta al si mem?

– Ne – respondis Kalderaro pacience –; ĉi tie funkcias sennombraj helpdomoj kaj variaj lernejoj, en kiuj multe da estuloj praktikas abnegacion. La pacientoj kaj la torturitaj estuloj estas helpataj laŭ ebleco de profito, kiun ili montras.

Li stampis sur sian vizaĝon komplezeman esprimon kaj diris:

– La inferaj regionoj neniam estos sen flegistoj kaj instruantoj, ĉar unu el la plej grandaj ĝojoj en la ĉieloj estas malplenigi la inferojn.

Vidante bandojn da estuloj moviĝantaj en la aero preskaŭ sur ni, mi rememoris, ke en nia kolonio <sup>(\*)</sup> la flugkapabloj ne estis ordinare praktikataj por ne ĉagreni tiujn, kiuj ne posedis ilin elvolviĝintaj; sed... tie? Estuloj el malaltaj klasoj movis sin en la aero, kvankam je malmulte da metroj super la grundo.

Sed Kalderaro ekkriis:

– Ne miru. Flugado ĉefe dependas de la mensa forto provizita de intelekto; sed estas grave konsideri, ke la altegaj flugoj de la animo nur fariĝas eblaj, kiam al la alta intelekteco aliĝas la sublima amo. Ekzistas perversaj Spiritoj kun vigla flugkapablo, malgraŭ tio, ke ili estas limigitaj al malaltaj forflugoj. Ili posedas grandegan rezonpovon kaj volonte uzas la naturfortojn, sed sen noblaj sentoj, kio malhelpas al ili altajn flugojn. Sed rilate la estulojn akceptitajn en nian spiritan kolonion, ankoraŭ nekapablaj laŭnombre uzi tian rimedon, la fenomeno estas komprenebla. Estas pli facile akcepti estulojn kun pli granda kapitalo da amo kaj malmulta inteligento, en ordinara evolua proceso, ol enlasi alte intelektajn sen amo al similulojn; ĉe tiuj lastaj, la komuna vivo en konstrua laboro estas preskaŭ neebla. Sed, rilate flugadon, estas necese, ke ni konsideru la mensajn gradiĝojn, rimarkante en la propra Naturo, ke la korvoj malalte flugas serĉe de putraĵoj, dum hirundoj ŝvebas en la supro, renkonte de printempo.

Post kiu klarigo, rememorante la surterajn necesajojn, mi demandis:

– Sed... kaj la bezonaĵoj por ekzistado?

La instruanto tuj kontentigis min, informante:

---

(\*) La Aŭtoro aludas la urbon “Nia Hejmo” en Supera Sfero. “Nia Hejmo” estas ankaŭ nomo de alia verko de Andreo Ludoviko, jam esperantigita de L.C. Porto Carreiro Neto kaj eldonita de la Brazila Spiritisma Federacio. – **La Trad.**

– Nenio mankas al ili rilate la esencajn postulojn de helpo kaj necesbezono, same kiel okazas en hospitalo sur la Tero.

La Asistanto faris mallongan paŭzon kaj daŭrigis:

– Aludante frenezulejon, mi nun klarigas, ke mia intenco, vizitante hospitalon en via kompanio, estas ĝuste prepari vin por la ekskurso, kiun ni nun efektivigas. Ni ĉi tie vidas, en ĉi tiuj amasoj da nekompreno kaj doloro, senfinajn vicojn da frenezuloj, kiuj memvole apartiĝis de la realaĵoj de la vivo. Ili firmigis la menson en la pli malaltaj zonoj de sia memo, kaj, forgesante la sanktan havaĵon de racio, faris gravajn erarojn, kaj tial ili respondas por pli pezaj ŝuldoj.

Vi jam vidis en nia spirita organizaĵo por kolektiva vivo, suferantajn fratojn konvene subtenataj; kelkaj el ili ankoraŭ suferas strangajn halucinajn perturbojn, aliaj estas gardataj, simile al perispiritaj mumioj, en profunda letargio, kies vekigo oni atendas; aliaj kuŝas en vastaj malsanulaj ĉambroj por iom post iom restariĝi spirite... Ĉi tie tamen kolektiĝas efektivaj triboj da krimuloj kaj erarintoj, altiriaj unuj de aliaj, laŭ la kulpoj ilin identigantaj. Multe da ili estas inteligentaj kaj laŭintelekto mensklaraj, sed sen fasketo da amo, kiu altigu ilian koron, erarvagas de obstaklo al obstaklo, de inkubo al inkubo... La elkarniĝa ŝoko al ili, ankoraŭ nerebonigeblaj por la sanktiga helpo, pro la hardeco de ilia sento, ŝajnas reanimi ilin ĉe la mensa pozicio, en kiu ili troviĝis en la momento de ilia transiĝo inter la du sferoj, kaj tiamaniere ne estas facile ilin eltiri el la malekvilibro, al kiu ili neprudente sin ĵetis. Ifoje tiel ili restas sinsekvaj jaroj en la eraroj, al kiuj ili alkiutiĝis, kaj vigligante malsuperajn impulsojn per senĉesa interŝanĝo de energioj unuj kun aliaj, ili ĉiuj komencas travivi ne nur sian propran konfuzitecon, sed ankaŭ la malekvilibron de siaj ceteraj kunuloj de malfeliĉo.

Antaŭ tiu pandemonio la instruanto daŭriĝis:

– Erebo, laŭ antikva koncepto, krepitante en eternaj flamoj de dia venĝo, estas pereiga iluzio; sed la purgatoriaj lokoj de krimaj intencoj kaj agoj, atendantaj la animojn makulitajn de la frenezuloj, estas logikaj realaĵoj en la spirita zonoj de la mondo. Ĉi tie la avaruloj, la murdintoj, la ambiciuloj kaj malvirtuloj el ĉiuj nuancoj kolektiĝas pro bedaŭrinda interna blindeco. Ili formas densajn kordonojn,

kliniĝantaj pli kaj pli al profundegaĵoj. Ĉiu havas teruran romanon el doloraj okazaĵoj. Malliberigitaj en si mem, ili fermas sian komprenon al revelacioj de la vivo kaj limigas siajn mensajn horizontojn, moviĝante en sia propra interno, en ekskluziva ago, en primaraj impulsoj, kulturante la pasintecon, kiun ili devas forviŝi. Plibonigante, ili estas helpataj de aktivaj abnegaciaj societoj ĉi tie funkciantaj. Pli altrangaj aŭtoritatoj el nia sfero, plenumante superajn devojn, improvizas tribunalojn kun edukaj funkcioj, kies verdiktoj, montrantaj amon kaj saĝecon, ĉiam fine determinas regeneran laboron ĉe reenkarneigo sur la Terkrusto aŭ ĉe pezaj taskoj meze en la Naturo, kiam estas sufiĉa kompreno kaj pento de la interesatoj, kiuj malrespektis la Leĝon, ofendante sin mem.

De ĉi tiu vastega arsenalo de mensmalsano ombrata de kulpoj, eliras la plej granda nombro da doloraj reenkarneigoj, irantaj en la karnajn rondojn. De ĉi tie, kiel de analogaj zonoj, iras sur la fizikan kampon, pli densan, milionoj da fratoj en akraj provoj, ke ili sin liberigu de ŝuldoj kaj reharmonigu sian konsternitan internon. Malmulte da homoj sukcesas profiti la surterajn okazojn por restarigi siajn proprajn energiojn. Estas ĉiam facile deflankiĝi de la rekta vojo; sed la reveno estas tre malfacila...

En tiu momento venis al ni grandega kaj brua abelaro da suferantoj. Ĝi estis nigra grupo da fratoj pozitive frenezaj. Ili parolis trafe maltrafe kaj komentariis hommortigojn; ili rememoris per kruelaj vortoj neesprimeblajn scenojn de doloro kaj malico.

Neniu el ili rimarkis nian ĉeeston.

Kalderaro tre trankvila, konante mian malnovan scivolon, informis:

– Ĉi tiuj malfeliĉuloj restas jungitaj unu al alia pro preskaŭ perfekta sameco kaj estas retenataj nur de la vibraj leĝoj ilin regantaj. Se vi tamen deziras ekkoni la historion de iuj el ili, sondu la individuan menson de la tipo, kiu altiras de vi pli grandan atenton.

Profitante momenton, kiam la disputo sereniĝis, mi iris al malfeliĉa frato, kiu impresis pro sia maldika “facies” (\*).

---

(\*) Latine, vizaĝo. – **La Trad.**

Mi konformiĝis al la mensa ondo al li propra, sed la sceno, kiun mi vidis, ne ebligis al mi longan esploron.

Mi rimarkis la motivon, kial lia malsano kulminis per frenezeco: li murdis sian edzinon en teruraj cirkonstancoj. Sed la kompatinda ne montris penton; li nutris deziron revidi sian viktimon por ĝin turmentegi, kiom da fojoj estus al li eble.

Kia tragedio estis kaŝita tie, en tiaj tempestaj rememoroj?

Terurita, mi levis la okulojn al la Asistanto, en muta demando, sed preter nia frunto flugis peza grupo da monstraj estuloj, farantaj surdigajn bruojn, kaj mi tuj forgesis la edzinmurdinton, kiu altiris mian atenton. Kalderaro, vidante mian perpleksecon, klarigis:

– Ĉi tiu bando da mizeraj Spiritoj, moviĝantaj kiel eble estas al ili, konsistas el malnovaj surteraj negocintoj, kies ekskluziva deziro estis amasigi monon, ke ili kontentigu sian avidecon, helpante nenium. La oro, nedaŭre apartenanta al ili, neniam utilis por semi dankon eĉ sur nur unu kunulon de homa ekzistado. Avidaj pri facila riĉaĵo, ili elpensis mil rimedojn por monopoligi grandajn kaj malgrandajn profitojn, neniom interesiĝante pri la paco de sia proksimulo. Ili estis homoj kun vigla penso, povis mense flugi je grandaj distancoj, certigante absolutan triumfon al la materiaj entreprenoj, kiujn ili realigis kun absoluta egoisma celo. La sufero de iliaj najbaroj ne ĝenis ilin, ili ignoris la aliulajn malfacilaĵojn, ili malzorgis pri la valoro de la tempo. Ili volis nur amasigi financajn rimedojn, kaj nenion pli. Apartigite for de la karitato, de la kompreno kaj de la dia lumo, ili kreis por si mem la malvarman kaj rigidan miton de oro, kaj fandis kun ĝi siajn viglan menson kaj avaran koron... Nun, sklavigitaj al la fiksa ideo ĉiam gajni, ili ĉi tien peze flugas mensmalsanaj kaj konfuzitaj, serĉe de monopoloj kaj profitoj, kiujn ili ne trovos plu.

Mi ilin kompatis. Mi volis haltigi kelkajn, frate konversacii kun ili por ilin prilumi; sed la instruanto paralizis miajn brakojn, kaj flustris:

– Kion vi faras? ĝi estus senutila. Estas neeble reĝustigi en momento, per nuraj paroloj, tiom da mensoj en kruela malekvilibro.

Kaj, pelante min antaŭen, li finis:

– Ni ekiru: Vi konsumus multe da semajnoj por ekkoni la scenejon de doloro, etendiĝanta antaŭ ni, kaj ni disponas nur kelke da horoj.

## XVIII

### MALNOVA KARULO

Ni iris ne grandan distancon, kiam stranga grupo da maljunuloj venis al nia flanko.

Ili ĉiuj havis mienojn je abomeninda aspekto. Ĉifone vestitaj, skeletaj, ili tenis la manojn plenaj de ŝlimeca substanco, kiujn ili iam kaj iam senpacience afliktite levis al la brusto. Ĉe bloveto de vento ili alkroĉiĝis al la substancoj el koto, ilin premante al sia brusto pro senfina timo ilin perdi. Terurite, ili interrigardis, kvazaŭ timante tujan akcidenton. Ili frustris inter si malicaĵaj kaj suspektemaj. Ifoje ili provis ekkuri, sed ekhaltis sur la sama loko, inter timo kaj suspekto.

Unu el ili diris per raŭka voĉo:

– Ni bezonas ian elirejon. Ni ne povas resti plu. Kaj niaj negocoj? niaj domoj? La riĉaĵo, kiun ni eltrovis, estas nekalkulebla...

Kaj ili montris kun ĝojo la ŝlimajn substancojn elfluantajn el siaj kurbaj manoj.

– Sed... – li maltrankvile daŭrigis – ĉi tiu tuta oro, kiun ni kunportas, restas laŭ arbitro de ŝtelistoj sur ĉi tiu senkultura tero. Estas nepre necese, ke ni trovu la vojon por reveno. Ĉi tiu loko timigus iun ajn.

Aŭdinte tiun strangan personon, mi direktis demandan rigardon al Kalderaro, kiu al mi atente klarigis:

– Ili estas elkarniĝintaj procentegistoj de antaŭ longe. Ili venis al tiel malalta grado de alkroĉiĝo al la pasema materia riĉaĵo, ke ili fariĝis nekapablaj por ekvilibro en la mensa zono de inda laboro, ĉar ne akcepteblaj en sia interna sanktejo de superaj aspiroj. Sur la Terkrusto ili ne trovis rimedojn por teni sin en modera kaj nobla ambicio, nek atentis la metodojn,



kiujn ili uzis por atingi siajn egoismajn objektojn. Ili malŝatis aliulajn rajtojn kaj mokis la afliktitecon de la aliaj. Ili starigis efektivajn kaptilojn kontraŭ nezorgaj kunuloj, celante elsuĉi iliajn ekonomiojn, riĉiĝante koste de naiveco kaj blinda konfido. Tiom da suferoj ili dissemis per siaj malprudentaj agoj, ke la mensa materio de la viktimoj, turnita en malicajn elsendojn de venĝo kaj malbena, kreis al ili bronzan barilon ĉirkaŭ la kampo de iliaj ideoj; tiel ĉi tiuj konfuzaj fiksiĝis ĉe la krimoj de pasinteco, aliigante ilin en aŭtentikajn fantomojn de avareco, torturataj de la oraj miraĝoj en ĉi tiu dezerto de sufero. Ni ne povas antaŭdiri, kiam ili vekigis pro la situacio, en kiu ili troviĝas.

Mi sincere ilin bedaŭris kaj Kalderaro diris:

– Ili frezeziĝis de la pasio posedi, fine fariĝante, post la nigra aventuro, sklavoĵoj de mensaj monstroj de neesprimebla formo.

Mi pretiĝis demandi, kiam unu el la maljunuloj laŭtigis sian voĉon en la stranga koncerto, ekkriante:

– Amikoj, ĉu ni ne estas viktimoj de inkubo? iafoje mi pensas, ke ni estas eraraj. Kiom longe ni vagas for de nia hejmo? kie ni estas? ĉu ni ne frezeziĝis?!...

Ho, tia voĉo! kiam mi ĝin aŭdis, terura dubo ekposedis min. Kiu estas frezeza? mi nun demandis min mem. Tiu maljunulo aŭ mi?

Mi fikse rigardis liajn trajtojn. Ho! ĉu eble? Tiu malfeliĉa spirito memorigis min pri mia patroflanka avo Klaŭdio. Li korkliniĝis al mi de miaj plej fruaj jaroj. Malvarme traktante kun aliaj, li plurfoje min dorlotis, karesante mian infanan hararon per siaj manoj, kiujn la jaroj ŝrumpigis. Liaj okuloj lumis, kiam li rigardis la miajn, kaj mia patrino ĉiam asertis, ke nur en mia kompanio sereniĝis la nervaj krizoj, kiuj antaŭis lian finon. Mi ne memoris lian historion kun specialaj detaloj; sed mi sciis, ke li akiris grandan riĉaĵon pro skandalaj aĝioj, suferante doloran maljunecon pro troa amo al mono. Li menskonfuziĝis en la lastaj tempoj de sia korpo, kaj vidis ĉie denuncantojn kaj ŝtelistojn. Afliktita, mia patro translokigis lin en nian hejmon, kie mia patrino helpis lin venki la lastajn suferojn. En momento venis al mia memoro lia morto. Oni venigis min de la kolegio, kie mi faris la duan gradan kurson,

por kisi liajn malvarmajn manojn je la lasta fojo. Mi neniam forgesis lian impresan kadavrecan maskon. Liaj kurbaj manoj sur la brusto laŭŝajne zorge gardis ian kaŝitan trezoron, kaj sur liaj vitrecaj okuloj, kiujn kompatemaj manoj ne sukcesis fermi, ŝvebis timegon pri la nekonataĵo, kvazaŭ lin terurigis tragikaj vizioj en la Transmondo, kien kontraŭvole li estis portita.

En la daŭro de la tempo mi eksciis, ke mia avo postlasis tro valoran financan kapitalon, kiun ni, liaj parencoj, malŝparis en nababecaj fantazioj... Revenante al pasinteco, mi rekonis, ke vigla ligilo min ligis al tiu malfeliĉulo, kiu suferis la inkubon de surtera oro, kunportante ŝlimajn tavolojn, kiujn li ameme premis kontraŭ la koro.

Dum miaj rememoroj plenigis tiun momenton, malfeliĉa kunulo al li ekkriis:

– Ĉu inkubo? neniam, neniam! Ho Klaŭdio, ne tiom kortuŝiĝu!...

– Ha! oni eldiris lian nomon. Tiu konfirmo miregigis min; mi provis ekkrii, sed mi ne povis. Komprenante ĉion, kio okazis en mia interno, la komplezema Kalderaro min subtenis, dirante:

– Andreo, mi scias ĉion. Mi nun komprenas la kialon de via veno al ĉi tiuj lokoj: Fratino Cipriana estis prava. Ni ne perdu tempon. La maljunulo montras sin akceptema. Li komencas kompreni, ke li eble eraris, ke li eble spertas kruelan inkubon. Ni helpu lin. Urĝas helpi lian vidkapablon, ke li vidu nin.

Afliktita, mi observis mian instruanton, kiu komencis fluigi emanaĵojn sur la senbrilajn okulojn de mia malfeliĉa prapatro. La estulo kun la providenca alfluo de forto, reakiris nedaŭran klarmenson, kaj fine nin vidis.

– Ho! – li ekkriis antaŭ la mirigitaj kolegoj – kia malsama lumo!

Kaj frotante siajn okulojn, li aldonis, parolante al ni:

– De kie vi venis? ĉu vi do estas pastroj?

Li certe aludis la tre blankajn tunikojn, kiujn ni survestis.

Mi tuj antaŭeniris kaj demandis:

– Mia amiko, ĉu vi estas Klaŭdio M..., malnova bienposedanto en la ĉirkaŭaĵoj de V...?

– Jes, ĉu vi min konas? kiu vi estas?

Kun facila koro li aldonis per emocia voĉo:

– Delonge mi estas katenita sur ĉi tiu mistera regiono, plena de danĝeroj kaj monstroj, sed abunda je oro, je multe da oro... Via parolo min reanimas... Ho! kompatu min! helpu min eliri... Mi volas reveni...

Kaj nun surgenue, kun malfermitaj brakoj al mi, li rediris:

– Reveni..., reveni al la miaj, denove vidi min hejme!

Mi kortuŝite brakumis lin, kaj ne dezirante ĉagreni lin per neoportunaj informoj, mi klarigis:

– Klaŭdio M..., vi estas viktimo de bedaŭrinda trompo.

Via malnova domo fermiĝis al viaj fizikaj okuloj, kiuj jam malaperis! Vi enkarcerigis vian spiriton en vana revo pri malveraj riĉaĵoj. La morto forprenis vian animon for de la karna korpo, jam de pli ol kvardek jaroj.

La maljunulo malfermegis siajn dolorajn okulojn. Li ne sin tenis. Li eligis larmojn en konvulsia ploro, ŝirante miajn plej internajn fibrojn.

– Mi bone ĝin sentas! – li flustris, inspirante kompaton. – Mi havas kapon varma, ne kapabla rezoni; sed... kaj la oro, la oro, kiun mi amasigis kun tiom da ŝvito?

– Rimarku viajn manojn, nun kiam dia heleco prilumas vian spiriton! La kapitalo amasigita koste de aliulaj suferoj ŝanĝiĝis al ŝlimaj substancoj. Rimarku!

Mia avo ekrigardis la amasojn da koto, kiujn li prenis, kaj terurite ekkriis. Poste, rigardante min per larmaj okuloj, li konsideris:

– Ĉu ĝi estas do puno? Mia krimo kontraŭ Ismenia postulis punon...

Ĉar la singultoj lin sufokis, mi demandis:

– Kiun do vi aludas?

– Mian fratinnon, kies rajton mi piedpremis.

Intense emociante nin, li daŭrigis:

– Vi estas senditoj de Dio, kaj aŭdas mian konfeson.

Mortante, mia patro konfidis al mi fratinnon, kiu ne estis laŭleĝa infano de nia domo. Mia patrino, sindona kaj sankta, kun la sama senfina zorgo al mi mem, vartis ŝin. Sed kiam mi vidis min sola, mi ŝin forpelis de nia domo. Mi pruvis, ke mi ne

dividis kun ŝi samsangajn ligilojn por pli bone alproprigi la riĉaĵon, kiun mia patro al ni heredigis. La kompatinda ploris kaj suferis; mi tamen pelis ŝin al mizera destino, estante zorga pri la firma financa bazo, kiun mi sukcesis ekhavi. Mi fariĝis riĉa, mi multigis kapitalojn, mi ĉiam gajnis...

Kaj fikse rigardante la makulitajn manojn, li amare daŭrigis:

– Kaj nun?

Mi estis lin konsolonta, malfermonta al li mian kortuŝitan koron; sed Kalderaro faris al mi malpermesan geston, rekomendante silenton.

Mia malgaja avo diris plu, malkaŝante al mi novajn kampojn de sento:

– Kie vivas miaj geparencoj, kies estonteco zorgigis min? kie ruliĝas la mono, kiun mi pene amasigis, forgesante mian animon mem? kie spiras mia fratino, de kiu mi forrabis ĉiujn rimedojn? kial oni ne instruis min, ke la vivo daŭras plu post la tombo? ĉu mi efektive estas “mortinta” por la mondo aŭ freneza kaj blinda? Ha! mi mizera! kiu min helpos?

Etendante siajn sekajn brakojn, li petegis:

– Kompatu min! Miajn gepatrojn oni portis al tombo antaŭ multe da jaroj kaj miaj infanoj certe min forgesis... Mi estas forlasita, sen iu ajn. Helpu min, senditoj de la Eternulo! ne forlasu maljunulon perfiditan de siaj ambicioj kaj intencoj! nun, kiam mi min rekonas, mi timas, mi tre timas.

Rigardante min per okuloj, kiujn ombris dika kurteno da larmoj, li informis:

– Miaj familianoj forgesis mian sindonon. Nur unu persono en la mondo eble memoros pri mi kaj etendus al mi protektantajn manojn, se li sciis pri mia restadejo...

Li stampis ameman esprimon sur sian doloran maskon kaj klarigis:

– Mia nepo Andreo Ludoviko estis la lumo de miaj okuloj. Multfoje liaj karesoj mildigis mian turmentatan penson. En multaj okazoj mi hejme manifestis deziron, ke li sin donu al Medicino. Mi tiucele destinis por li rimedon. Mi deziris vidi lin praktiki bonon, kiun mi, neklera homo, ne sciis fari. Ofte atakis min konsciencoriproĉon pro uzurpo, kiun mi turdis al mia

fratino; sed konsolis min la penso, ke la nepo de mia koro iel elspezos la monon, kiun mi senrajte metis en monŝrankon, sin instruante kiel konvene por bono de ĉiuj... Li estos bonfaranto al malriĉuloj kaj malsanuloj, li disjetos bonajn semojn, kie mia senutila ekzistado dissemis ŝtonojn kaj dornojn de malprudento. Mia nepo estos bela, amata, respektata...

Forviŝante abundajn larmojn, li demandis per peteganta voĉo, kun atento streĉe turnita al miaj gestoj:

– Ĉu eble vi, sendito de Dio, povos porti al mia nepo la teruran sciigon, ke suferoj min konsumas? Mi ne indas eliron el ĉi tiu kelkarcero, kie mi frenezigiĝis, sed estos al mi konsolo ekscii, ke Andreo havas informojn pri miaj suferoj!

Ha! ne plu helpis gestoj de Kalderaro, ke mi silentu ankoraŭ plu. El mia brusto kvazaŭ elrompiĝis torento da nebareblaj larmoj. Tie mi ne troviĝis antaŭ superaj grupoj, kies elsendoj de energioj min subtenus ĝis fino de la eduka batalo por memdisciplino, sed antaŭ bedaŭrindaj restaĵoj de surteraj pasioj. Mi memoris pri mia avo karesanta miajn harojn; pri tio, ke mia patro ĉiam aludis la dezirojn de la maljunulo, rilatajn al mia akademia studo... Mi pensis pri la longaj jaroj, kiujn la kompatinda eble konsumis tie alkroĉita al la ideoj pri financa posedo; mi komprenis kiel granda estas mia ŝuldo al li, rilate la kuracistan diplomon, kiun mi ne sciis honori en la mondo... Mi direktis petegantan rigardon al Kalderaro, sopirante pardonon...

La Asistanto ridetis kaj ĉion komprenis.

Kiu ja perdis la tutan infanan esprimon, se la Kristo mem, Superega Gvidanto de la Tero, iam malfermis siajn malfortajn brakojn en la lulilo en la stalo?

Mense revenante al la scenejo de mia fora infaneco, mi sentis min denove infano; mi venkis per salto la spacon nin apartigintan kaj genuiĝis ĉe la piedoj de mia malfeliĉa bonfaranto, kiun mi nun vidis tremanta kaj timanta. Mi kisis kaj kisis liajn manojn kaj, levante al li la larmantajn okulojn, mi demandis:

– Avoĉjo Klaŭdio, ĉu vi do ne plu konas min?

Neeble priskribi tion, kio okazis.

Mi momente forgesis la studojn, kiujn mi intencis fari; la scenojn en tiu medio, kiuj kaŭzis scivolon kaj timon. Mia

spirito sentis la sinceran dankon kaj la puran amon; kaj, dum la mizeraj estuloj kriegis enfermitaj en uzuro, unuj ribelintaj, dum aliaj kaŝe ridis nekapablaj kompreni la improvizan scenon, mi, subtenata de Kalderaro, kiu ankaŭ diskrete forviŝis larmojn, antaŭ la emocio min posedanta, levis mian avon en la brakoj, kaj kvazaŭ freneza de ĝojo kunportis la altprezan ŝarĝon, kiu estis dolĉa kaj malpeza por mia koro.

## XIX

### REALPROKSIMIĜO

Kiam Cipriana revenis en kompanio de siaj ceteraj amikoj, ŝi renkontis min banata de larmoj, kaj aŭdis la strangan rakonton de mia duonmensklara avo. Ŝi faris konsentan geston kaj afable diris:

– Mi sciis, Andreo, ke vi venos por ia rezultato.

Dum rapidaj minutoj mi priskribis al ŝi la okazintaĵoj, kaj donis al ŝi ĉiujn informojn pri la pasinteco.

La direktantino serene pesis mian rememoradon pri la pasinteco kaj diris:

– Ni disponas mallongan tempon; kaj, ĉar ne estas eblo por la malsanulo nin akompani, ni devas internigi lin tuj en ia rifuĝejo ĉi tie mem.

Mia avo, malgraŭ la ĝojego, ke li min rekonis, ne havis sufiĉan ekvilibron: li eldiradis senrilatajn frazojn, en kiuj la nomo Ismenia ofte estis redirata.

– Ni ne povas forgesi – akcente diris la instruantino –, ke la frato Klaŭdio bezonas flegadon kaj zorgon. Estas neeble antaŭdiri, kiam li troviĝos en kondiĉoj spiri pli altan atmosferon.

Tiel dirinte, ŝi ĝentile kaj ameme aŭskultis la duonfrenezan maljunulon, patrinece ekzamenante lin.

Post kelkaj momentoj, ŝi informis:

– Andreo, nia malsanulo devas reveni al la karna provado por pli rapide kaj efike pliboniĝi.

– Nu, en ĉi tiu okazo – mi humile diris – ni povos meriti vian helpon, Fratino?

– Kiel do ne? ĉar la reenkarniĝo okazos por nuraj korektaj aktivecoj, sen influo sur la kolektivajn interesojn, en pli ampleksa maniero, nia persona helpo povas esti pli decida kaj tuja. Ĉi

tie ekzistas granda nombro da bonfarantoj, zorgantaj pri multenombraj reenkarnejoj en la regeneraj rondoj. Ni vidu, kiel ni studos la estontan situacion de ĉi tiu frato.

Ŝi submetis la maljunulon al ama demandado.

La kadukulo emociite rakontis, ke lia patro, edziniĝante, kondukis el sia malkvieta juneco en sian hejmon filinon, kiun lia patrino akceptis kun amo. Poste tiu fratino fariĝis al li sindediĉa vartistino, meritante de li justan dankon. Sed, blindigite de la malsupera intenco senmezure posedi monon, li senigis ŝin de la havaĵoj, kiujn ŝi ekrajtis pro la morto de liaj gepatroj, kiuj atakite de maligna febro, forlasis lin en la antaŭtagoj de lia edziĝo. Senposedigita, post ploro kaj vana plendo, Ismenia estis pelita rifuĝi en domo de riĉa familio, kiu, pro kompatado, donis al ŝi okupon de kelnerino kun malŝatinda salajro. Mi sciis, ke ŝi, premita de ĉiaspecaj malfacilaĵoj, edziniĝis kun analfabeto, kruda kaj kruela homo, kiu ŝin torturis kaj donis al ŝi kelkajn filinojn en doloraj kondiĉoj de mizero. Priskribinte sian plej grandan devion en sia vojo, li komencis komentarii la neindajn idealojn, kiujn li nutris sur la kampo de avareco, skuante niajn korojn.

Cipriana, montrante sin alcutimiĝinta al tiaspecaj problemoj, klarigis al mi:

– Ni jam konas du esencajn aferojn por la servoj koncernantaj lin: la bezonon de realproksimiĝo al Ismenia, kiu, reenkarneĝinta aŭ ne, troviĝas en loko, kiun ni ne konas, kaj la altrudon de ekstrema malriĉeco kun intensa laboro, ke li reeduku siajn proprajn aspirojn.

Posedante la probablan adreson de la idoj de la fratino iam humiligita, Cipriana rekomendis, ke du el niaj kunuloj faru rapidan esploron sur la Terkrusto, ke ni orientu nin rilate la vojojn irotajn en la neatendita okazaĵo.

La senditoj ne konsumis pli ol naŭdek minutojn.

Ili alportis bonajn novaĵojn, kiuj min konsolis.

Ili lokalizis la familion, kiun aludis la malfeliĉa maljunulo per siaj amaraj rememoroj, kaj alportis la sensacian informon. Amikoj el nia sfero klarigis al ni, rilate Ismenian, ke ŝi reenkarneĝis kaj travivas la junaj fazon de siaj fizikaj fortoj. Ŝi enkorpiĝis ĉe la sama familia trunko, kun kiu ŝi kunlaboris en la tempo, kiam mia avo ŝin forpelis el sia domo.



Kortuŝite Cipriana ĉion aŭdis kaj, interesigante pri ni, sugestis, ke ni organizu la bazojn de la estonta provado, konkerante sen perdo de tempo la simpation de la junulino.

En tiu tempo ni jam troviĝis interne de helpa institucio, kiu akceptis la peton de nia direktorino favore por la malsanulo, kun bonega volo nin servi.

Donante ĉiujn atentojn al mia antikva kreditoro, la estimata bonfarantino diris, direktante al mi:

– Nia amiko, dum ĉirkaŭ du jaroj, ne povos foresti for de nia frata helpo. Li ankoraŭ restas profunde konformiĝinta kun la atmosfero de ĉi tiuj lokoj. Ni ofte vizitos lin, subtenante lin per niaj rimedoj, ĝis li ree povos spiri la aeron de la Terkrusto. Estas notinde, ke lia menso ne facile liberiĝos de la maŝaro de nekompreneo, kaj en tiu stato li ne sukcese revenos al la karna edukejo.

Mi sekvis la konsilon, akompanante la sinsekvon de disponoj por la afero.

Cipriana kompateme rigardis la mensmalsanan estulon kaj bonkore daŭrigis:

– Nun, Andreo, kiam ni finas niajn laborojn en la semajno, ni provu konduki Ismenian ĉi tien, por la preparaj laboroj de realproksimiĝo. Ĉar ŝi nune troviĝas en la surtera juneco, eble ŝi helpos nin en la preciza momento, akceptante la menskonfuzitan fraton en sian propran hejman institucion. Sed antaŭ ol ĉio ni bezonas ŝian simpation por nia laboro de renobligo.

– Se Ismenia akordiĝos, se ŝi konsentos... – mi hezite aldonis.

– Ni respondos pri la cetero – decide promesis la interparolantino –; la reveno de Klaŭdio sur la fizikan sferon havos karakterojn tre personajn, sen influoj, de pli granda graveco sur la kolektivian spiriton, motivo, kial ni mem povos fari preskaŭ ĉiujn paŝojn.

Konfidinte la malsanulon al la bonfarantaj kunuloj, kiuj servis en la domo de kristana amo, en kiu ni gastis, ni ekiris en Rio-de-Janeiron, kie Ismenia estos renkontata de ni, en modesta hejmo de kvartalo Bangu.

Post noktomezo ni respekteme eniris humilan loĝejon.

La fratino de mia avo nun estis la sesa filino de tiu sinjorino, kiu, en la fizika sfero estis konata kiel nepino

de la maljuna Ismenia, kies personeco por la surtera familio perdiĝis en la tempo, kaj kiu ne estis alia ol la knabino-junulino, sub niaj zorgoj, reveninta al la perfektigantaj taskoj de la karna lukto.

Tie ĉio montris dignan malriĉecon kaj adorindan simplecon. Antaŭenirante, Cipriana metis la dekstran manon sur la frunton de la dormanta junulino, kvazaŭ vokante ŝin al ni. Efektive, post kelke da momentoj, ŝi venis al ni, kaj vidante, ke nia instruanto envolvita en intenan lumon faris al ŝi geston de beno, ŝi surgenuiĝis for de la materio, ekkriante kun larmoj de ĝojo:

– Ĉiela Patrino, kiu estas mi por ricevi la gracon de via vizito? Mi estas neinda servantino...

Ŝi kovris la vizaĝon per la manoj, eble sentante sin blindigita de la subluma heleco, kaj pene retenante la emociion bolantan en sia brusto; sed nia respektinda bonfarantino alproksimiĝis, apogante la karesajn manojn sur ŝia abunda nigra hararo kaj komplete parolis:

– Karulino, mi estas simple via fratino, via amikino... Aŭdu do! Kiaj estas viaj intencoj en la vivo?

Ĉar la junulino levis al ŝi la larmantajn okulojn, la nobla senditino aldonis:

– Ni bezonas vian kunlaboron kaj ni deziras ne esti neutilaj amikoj. Per kio ni povos servi al vi?

Afliktaj momentoj da atendo forpasis.

– Parolu! – komplezeme aldonis Cipriana –; diru sen timoj...

Per voĉo rompata de emocio, ŝi rememoris kun infana naiveco:

– Patrino, se mi povas ion peti, mi deziras vian helpon al Nikanoro. Ni estas gefianĉoj de preskaŭ du jaroj, sed ni estas malriĉaj. Mi laboras ĉe teksta industrio, kun malalta salajro, por helpi la subtenadon de nia domo, kaj Nikanoro estas masonisto... Ni jam longe revas pri organizo de malgranda kaj modesta hejmo, sub protekto de la Dia Providenco. Ĉu ni povos atendi la aprobon de Dio?

Cipriana stampis sur la vizaĝon superegan patrinan amon kaj diris:

– Kiel do ne? Viaj deziroj estas justaj kaj sanktigaj. Nikanoro ricevos nian helpon, kaj viaj esperoj nian vivan kontribuon. Sed ni atendas ion el via kunlaboro...

– Ha! per kio mi povos helpi vin, mi mizera servantivo?

La direktorino ne longigis la konversacion, kaj sole nur petis:

– Venu kun ni!

Poste, forte surprizante min, Cipriana kovris ŝian vizaĝon per mallarĝa vualo el substanco simila al gazo, ke ŝi ne vidu la impresajn pejzaĝojn, kiujn ni trapasos.

Subtenate de ni, post ne longe la junulino scivola kaj emocia surgenuiĝis antaŭ mia avo, kiu, vidante ŝin, elrompiĝis per ekkrioj montrantaj afliktiĝon:

– Ismenia! Ismenia! mia fratino, pardonu min!...

Karesante ŝiajn manojn, li torturata rigardadis ŝian humilan mienon:

– Ho! tio estas ŝi mem – li diris posedita de evidenta miro – kun la sama malĝojo en la tago, kiam mi ŝin forpelis!... Sed kion do ŝi faris por esti nun pli juna kaj bela?

Ĉar la vizitantino silentis konfuzite, li afliktita ekkriis:

– Diru, diru, ke vi min pardonas, ke vi forgesos la malbonon, kiun mi al vi faris!

Ĉe tiu punkto de la neatendita intervjuo, Cipriana intervenis kaj turnis sin al ŝi, demandante:

– Ĉu vi neniam aŭdis, en la familio, ke via praavino havis fraton...

Antaŭ ol ŝi finis, la junulino siavice demandis:

– ... kiu forpelis ŝin el la domo?

– Jes.

– Mia patrino jam aludis tiun foran pasintecon – ŝi malgaje aldonis.

– Ĉu vi do ne rekonas lin? – afable demandis la bonfarantino. – Ĉu vi ne rememoras lin?

En tiu momento la maljunulo intervenis, vekante ŝian memoron:

– Ismenia, Ismenia! mi estas Klaŭdio, via malfeliĉa frato...

La junulino ne sciis interpreti tiujn parolojn, sed la direktorino ĉirkaŭvolvante ŝiajn fruntalajn lombojn per la manoj,

fluigante sur ŝin magnetajn emanaĵojn, afable insistis, provante dronigi ŝian memoron en la plej gravaj perispiritaj centroj:

– Revidu la pasintecon, mia amikino, ke ni pli bone servu la Dian Verkon.

Mirante, mi rimarkis ke io neordinara okazis en la menso de la junulino, ĉar ŝiaj okuloj, antaŭe dolĉaj kaj trankvilaj, fariĝis grandaj kaj malkvietaj. Ŝi provis retropaŝi antaŭ la peteganta esprimo de mia avo, sed la severeco de Cipriana ŝin haltigis, evitante la eksplodon de ŝiaj komencaj impulsoj de timo kaj ribelo.

– Nun, jes! Mi memoras... – ŝi veis timigite.

Nia instruistino tiam liberigis ŝian fruntan kaj, almontrante la malsanulon, ekkriis per emocia voĉo:

– Kaj vi ne eksentas kompaton?

Kelkaj sekundoj da atendo peze forpasis; sed la amo, ĉiam dia en virino je noblaj aspiroj, triumfis en la kompatema rigardo de Ismenia, kiu tute aliĝinta brakumis la malsanulon, ekkriante:

– Ĝi estas vi, Klaŭdio? kio do okazis al vi?

La kadukulo faris longan komenton pri siaj suferoj, aludis siajn pasintajn erarojn, kaj pli klarmensa kaj kontenta parolis al ŝi pri la konsolo, kiun donis al li la realproksimiĝo.

Ŝi longe konservis lin ĉe sia brusto, sentigante al li sian grandan amemon, sian sindediĉon kaj sian senliman komprenemon.

Kiam ili estis laŭŝajne repacigitaj, tiam Cipriana alproksimiĝis al ŝi kaj diris:

– Mia amikino, ni ĝojos aŭdi vian promeson helpi nian fraton Klaŭdio en proksima estonteco. Ĉu vi kunlaboros kun ni favore por li, akceptante lin en viajn abnegaciajn brakojn de patrino, se la Dia Leĝo konsentos vian edziniĝon?

Respekteme, konigante al ni la trezorojn de simpla kaj humila ekzistado sur la Tero, la vizitantino ekkriis:

– Se la Ĉielo donos al mi la feliĉon kontribui por la bono de Klaŭdio, tiu bono estos farata al mi mem; kaj, se iun tagon mi havos la feliĉon edziniĝi, li estos nia unua kaj adorata infano. Anticipe mi scias, ke Nikanoro ĝojegos pro mia ŝuldiĝo.

Ravite, rigardante la malfeliĉan kaptiton de la ombroj, ŝi promesis:

– Vi dividos kun ni la malriĉan kaj honestan vivon, konos la ĝojon por la pano, frukto de ŝvito kun la Dia Protekto, kaj, en nia kompanio, vi forgesos la iluziojn, kiuj nin apartigis dum longa tempo...

Evidentigante belan simplecon de koro, ŝi ekstaze projektis:

– Li estos feliĉa masonisto, kiel Nikanoro! li laŭdos la dignan lukton, kiun ni nun benas!...

Ĉar ŝi kortuŝite ploris, ĉirkaŭbrakis ŝin Cipriana, ankaŭ kortuŝita, kiu certigis kun larmantaj okuloj:

– Kara infano, feliĉa estu vi, kiu komprenas kun ni la ĉielan servadon de nobla virino, ĉiam preta por la sublima patrineco.

Ankoraŭ pli kelkaj minutoj da karaj interkomprenoj forpasis, kaj, kiam la Suno ornamis la horizontojn per diamantaj koloroj, tiam ni denove troviĝis en la modesta ĉambro de Ismenia, helpante ŝin repreni la fiziologian aparaton kaj forgesi la okazintaĵon, kiun ŝi travivis ĉe ni, en la sfero de la Spirito.

Ŝi vekigis en la peza portilo, spertante nekonatan ĝojegon. Ŝi konservis sian menson refreŝigita per feliĉaj ideoj. Ŝi havis klaran impreson, ke ŝi revenas de mirinda pilgrimo, kies detalojn ŝi ne sukcesis rememori. Ne sciante la kialon, en tiu momento ŝi havis absolutan certecon, ke ŝi edziniĝos kaj ke Dio destinis al ŝi feliĉan estontecon.

Kiu povus vortigi nian dankon kaj miron en tiu horo? Miaj kunuloj benis ŝin kaj mi, ŝin emocie adiaŭinte, kisis ŝian etan dekstran manon, per silenta kiso de profunda amikeco kaj neesprimebla danko.

## XX

### EN LA HEJMO DE CIPRIANA

Fininte la semajnon de studoj, kiujn mi faris, kaj tenante novajn valorojn en la spirito, mi akompanis Kalderaron, meze en krepusko, al la laŭdinda fondaĵo en la malsuperaj regionoj, kiun la Asistanto nomis “Hejmo de Cipriana”.

Ekstreme perpleksa antaŭ la problemo, kiu postulis mian atenton, kia estis la renkontiĝo kun mia avo, mi nun ne havis motivojn por longaj filozofiaj-sciencaj esploroj ĉe la privilegia kulturo de la instruanto baldaŭ adiaŭonta.

Esplorado cedis lokon al meditado, rezono al sento. Mi rikoltis multe da materialo rilata al la menso, eltirante valorajn konkludojn por difini la animajn malekvilibrojn; mi ekzamenis diversajn malsanulojn, kun kiuj mi interrilatis; mi rimarkis malsanojn, kies kaŭzoj ligiĝis al plej profundaj kaj malpli konataj radikoj de la spirito; sed inter la novaĵoj mi renkontis malsanulon, kiu delokis min de intelekta scivolo al zorgaj konsideroj pri la destino kaj pri la esto.

Mi nun rekonis, ke, por akiro de profita saĝo, estas nepre necese ekhavi amon.

En tiuj momentoj, la nekvietaj demandoj silentis en mia esto, bridite de dolora koro.

Vere mi povus esti multe progresinta sur la kampo de novaj scioj, konkerinta prestiĝajn simpatiojn, renovigante miajn konceptojn pri la vivo kaj la Universo, ilin plibonigante; sed por kio utilos tiaj venkoj, se ne estus al mi eble helpi bonfaranton ĉe malfacilaĵo?

Kun firma penso pri la surpriza afero de tiu horo, mi alvenis kun Kalderaro al grandega institucio, en kiu Cipriana distribuis la konstantan bonon de sia frata sindonemo.

Miaopinie ĝi estis helpa domo malsama ol tiuj, kiujn ni konis; ĝi ĝustadire ŝajnis granda labora centro.

La plimulto de la kunuloj tie moviĝantaj ne posedis luman esprimon, ili estis tipaj personoj en regenera proceso. Eksceptinte Ciprianan kaj la asistantojn, kiuj kompletigis ŝian sekvantaron, la komunumo ne malgranda konsistis el evidente malsuperaj estuloj: viroj kaj virinoj similaj, laŭ la aspekto, al tiuj de la enkarnaj rondoj.

Kiel ordinare okazis, Kalderaro helpis min, klarigante:

– Fratino Cipriana planis ĉi tiun adorindan reduton por spirita restarigo kaj realigis ĝin, uzante la suferantajn kaj menskonfuzitajn fratojn mem, kiuj erarvagas sur la najbaraj regionoj.

Ŝi kompreneble ne loĝas ĉi tie; sed en ĉi tiu edukejo ŝi pasigas grandan parton de sia tempo, kiun ŝi dediĉas al la sanktiga servado en la malaltaj sferoj de evoluo. Vere la organizaĵo funkcias sub gardado de siaj propraj kunuloj, kiuj resaniĝadas. Ĝi estas do grava lernejo por anima reĝustiĝo, por memrekono kaj por preparo de bonvolaj individuoj. Nia meritplena amikino komencis la verkon, de kiu ŝi fariĝis fidelega estrino. Sed la institucio estas propra al malsupera regiono, por estuloj, kiuj deziras plibonigi siajn kondiĉojn de ekzistado. Transiĝa edukejo, sub rekta agado de tiuj, kiuj ricevas de ĝi profiton, ĝi fariĝis valora nukleo de instruo kaj helpo. Estuloj liberaj de la karno, en malfacilaj internaj kondiĉoj sur la kampo de kono, ĉi tie ricevas altvaloran helpon, ke ili konvene readaptiĝu al la vivo.

Diversaj grupoj de meza situacio sin direktis al ia konstruaĵo en la centro de la grandega organizaĵo kaj mi divenis, ke tio estas la templo destinita la preĝo.

Multe da kunuloj rapide marŝis, konversaciante flanke de ni. Tie estis tiom da estuloj ĝojaj kaj tiom da estuloj maltrankvilaj, kiom en ia ajn strato de granda urbo en la densa mondo; mi havis la impreson, ke ni vizitas grandegan universitaton, situantan en malluma klimato.

Kvankam, laŭ la aspekto, ili estis distingiĝaj inter si, tiel la malgrandaj, kiel la nombraj fratkolektiĝoj, kiuj tie moviĝis, ili tamen estis identaj unuj al aliaj per la vivanta espero lumanta en ĉies rigardo. Ĉiuj, kiujn ni renkontis, montris neduban sintenon de laboro kaj renoviĝo; eĉ la kripluloj kaj

malsanuloj, kiuj tie grandnombre haltis, montris temperamentojn de transformiga optimismo.

– La respektinda instruistino – bonvole daŭrigis la Asistanto – instalis ĉi tie efektivan laborejon por spirita restarigo. Malnovaj prezentantoj de fiero, kiuj, inter la homoj, atingis la grimpojn de vanteco kaj krimo, kiam, post longaj jaroj da elpuriĝo, elmontras reedifantajn dezirojn, tiam estas akceptataj en ĉi tiun domon, kie ili organizas sentojn kaj konojn por la Vojo al la estonteco. El ĉi tie kaj el aliaj samaj institucioj, lokitaj meze en elaĉetaj regionoj, eliras sennombraj korektigaj reenkarniĝoj. La fundamenta programo de Cipriana estas forgeso de malbono kaj la konstanta altigo de bono en la lumo de espero je Dio. La organizaĵo kostis al ŝi multe da sinoferoj rilataj al tempo kaj rajto, kiujn ŝi havis pro personaj meritoj; sed en la daŭro de la jaroj, elementoj de ŝi mem preparitaj komencis administri la verkon kaj ĝin subteni.

Mi pesis la bonkorecon kaj la saĝecon de tiu brava misiulino, preta je ĉia servo de supera kunlaboro, rememorante mian propran aferon ĉe mia mensmalsana avo implikita en la ombroj, kiam mi penetris en la sanktejon, kie ŝia voĉo estos aŭdata per preĝo. Diversaj estuloj de ŝi konataj ĉirkaŭis ŝin.

Unu sinjoro videblekonsolita pie diris la ŝi:

– Plenuminte viajn konsilojn, Fratino, mi ne plu spertis inkubojn. Mi renovigis mian konduton pri miaj familianoj: mi komencis kunlabori, anstataŭ kontraŭstari.

– Brave! – kontente ekkriis Cipriana – daŭra bono estas frukto de la frata kunlaboro. Vi vidos, kiel granda diferenco, por via feliĉo, estos konstatata ĉirkaŭ viaj paŝoj.

– Fratino – diris al ŝi simpatia sinjorino –, mia situacio estas alia. Nun mi rimarkas, ke la mondo ne estis konstruita por mi, kaj ke estas mia devo labori favore por la mondo.

La respektinda interparolantino faris belan fizionomian esprimon kaj diris:

– Via progreso estas videbla. Forgeso pri niaj personaj kapricoj pligrandigas nian komprenon.

Tremanta maljunulo kun ĉiuj karakteroj de ĵuselkarniĝinto iris al ŝi, kun la okuloj plenaj de larmoj.

– Fratino – li malĝoje flustris –, mi ankoraŭ suferas la malnovajn kutimajn malsanetojn. Estas momentoj, kiam mi falas, perdante konscion pri mi mem, por poste vekigi afliktite...



La instruantino diskrete lin karesis kaj konsolis:

– Estas memkompreneble. Estu konvinkita, ke via situacio pliboniĝos. Iafoje, dum jaroj ni gardas impresojn, kiuj tute nature ne disfumiĝas en kelke da tagoj.

Pliaj kunuloj, kun evidenta intenco ŝin aŭdi, iris al ŝi, sed, rimarkante nian ĉeeston, ridetante, ŝi venis al ni por kompleze informi:

– Andreo, la problemo de nia malsanulo jam estis studata je ĉiuj ĝiaj tujaj solveblaj partoj. Klaŭdio restos plu en la rifuĝejo tiel longe ĝis li sin prezentos en kondiĉoj esti translokita en nian regeneran institucion. Ĉi tie lin sin preparos por la reveno en la karnajn rondojn. Ĉio okazos laŭ la dezirata harmonio. Krom tio, niaj kunlaborantoj estas instruitaj rilate la helpon, kiun ni ŝuldas al Ismenia por realigo de ŝiaj idealoj.

Mi ĝojis konfuzite kaj kortuŝite, kaj dankis Dion. Nia interparolado ne daŭris plu. La signalo por la preĝo vokis nin al la ĝoja kaj dolĉa devo.

Cipriana faronte la preĝon, estis akompanata de siaj proksimaj kunlaborantoj, kiuj en la momento ŝin sekvis.

Kun surgenuiĝinta animo mi vidis ŝin kun okuloj levitaj supren, de kie elŝprucis intensa lumo sur ŝian frunton... El ŝiaj torako, cerbo kaj manoj fontis radiantaj elsendaĵoj je dia forto, de kiuj ŝi fariĝis perantino por ni ĉiuj.

Atingite de la lumaj radioj, kiuj fluis el supera sfero pere de ŝia noblega persono, ni nin sentis lulataj de neesprimebla mildeco...

Harmoni plena ĥoro el centoj da voĉoj bone agorditaj kantis neforgeseblan himnon de laŭdo al la Superega Patro, kiu venigis al mi abundajn larmojn.

Tuj poste la emocia parolo de la instruantino vibris en la templo, petegante protekton de la Kristo:

Sinjoro Jesuo,  
 Ĉiama inspiro sur niaj vojoj,  
 Malfermu al ni, pro favorkoreco,  
 Kiel ĉiam,  
 La noblegajn pordojn  
 De via senmezura providenco...  
 Vivodonanto,

Veku nian konsciencon,  
Ke ni semu reviviĝon  
En la mallumaj valoj de la morto;

Distribuanto de la Superega Bono,  
Helpu nin kontraŭbatali malbonon  
Per spiritaj armiloj;

Princo de Paco,  
Ne forlasu nin indiferentaj  
Por la malpaco,  
Kiu skurĝas la koron  
De niaj suferantaj kunuloj;

Majstro pri Saĝeco,  
Forpelu malproksimen de ni  
La senton de laceco  
Ĉe servoj,  
Kiujn ni devas fari  
Al niaj nesciaj gefratoj;

Sendito de la Dia Amo,  
Ne donu al ni pacon,  
Dum ni ne venkas  
La monstrojn de milito kaj malamo,  
Kunlaborante kun Vi,  
En via sankta surtera verko;

Paŝtisto de la Senmorta Lumo,  
Kuraĝigu nin,  
Ke neniam ni timiĝu  
Antaŭ suferoj kaj malespero de la mallumo;

Distribuanto de la Senfina Riĉeco,  
Provizu niajn manojn per viaj senlimaj rimedoj,  
Ke ni estu utilaj  
Al ĉiuj survojaj estaĵoj,  
Kiu ankoraŭ sentas sin bezonantaj  
Viajn senmortajn donojn;

Anĝela Ambasadoro,  
 Ne forlasu nin ĉe la deziro  
 Senrajte ripozi,  
 Kaj faru nin  
 Viaj humilaj servantoj,  
 Kie ajn ni troviĝos;

Anoncanto de la Bona Novaĵo,  
 Ne pernesu,  
 Ke niaj oreloj dormu  
 Ĉe la ĥoro de singultoj  
 De tiuj, kiuj petegas helpon  
 En la rondoj de sufero;

Kunulo de Eterneco,  
 Benu niajn respondecojn kaj devojn;  
 Ne forlasu nin en neperfekteco,  
 Kiun ankoraŭ ni estas portantaj!

Donu al ni, Amata Jesuo, la favoron servi al Vi,  
 Kaj la Superrega Sinjoro de la Universo gloru vin  
 Por ĉiam.  
 Tiel estu!...

La interno de la templo fariĝis brilega. Tiam mi vidis tra dika vualo da larmoj, kiuj venis en miajn okulojn, ke mirinda krono el disaeriĝantaj brilantoj dum momentoj trembrilis sur la respektiginda kapo de tiu misiulino de bono, kvazaŭ ĝi tuj estus tien metita de nevideblaj manoj...

Post la kunveno Cipriana kun mirinda simpleco venis adiaŭi min.

Kial mi ne diru? Mi havis la okulojn vualitaj de larmoj, mi deziris ŝin sekvi, kvazaŭ filo danka por ĉiam, tiaj estis la saĝeco kaj amo elbordiĝantaj el ŝia glorata spirito.

Kalderaro brakumis min la unua, kun bondeziroj por feliĉa vojaĝo, kiujn mi ne povis reciproki, sufokite de intensa emocio. La ceteraj kunuloj kortuŝite salutis min kaj fine Cipriana premis min al sia brusto, patrinece kisis min kaj diris kun malsekaj okuloj:

– La Patro vin benu. Neniam forgesu korecon ĉe plenumo de ia ajn devo.

Kaj eble pro tio, ke ŝi vidis min profunde emociita, ŝi aldonis:

– Ni estos kuniĝintaj laŭ spirito.

Mi apartiĝis de ŝiaj brakoj, kun resopiroj de filo, en kies interna sanktejo la flamo de danko neniam estingiĝas.

Nun, sola kaj emociita, revenante al la laboroj, kiuj min atendis, mi enspiris la parfumojn de la hela nokto, kiu pleniĝis de miregindaj trembrilantaj astroj...

– Favorkora Sinjoro – mi mense petegis –, volentu beni la vermon, kiu mi estas!...

Mi havis la impreson, ke la koro batis ŝvelinta en mia brusto. Antaŭ miaj okuloj la konstelacioj brilis, montrante glorajn destinojn en la senfina estonteco...

Kaj silente meditante pri la grandeco de Dio, mi verŝis abundajn larmojn de ĝojego, spertante neesprimeblajn sensacojn, kiuj invadis mian animon ekstazantan kaj feliĉan sub nova espero!